

B.TRAVEN

LA TREZORO DE LA SIERRA MADRE



Romantraduko

PRI LA TRADUKO

Tradukis Hans-Georg & Dorothea Kaiser
laŭ la unua eldono 1927
„*Der Schatz der Sierra Madre*“
de la eldonejo
Librogildo Gutenberg
en Berlino.

kontrolis Vladimir Türk

aranĝis Hans-Georg Kaiser
Frank Vohla

Finredakto: 01.11. 2022

0 1

La benko, sur kiu sidis Dobbs, laŭordis neniel. Unu el la latoj elrompiĝis, kaj dua lato kurbiĝis malsupren, tial oni sufiĉe rajtigite povis rigardi la sidadon sur ĝi puno. Ĉu li meritas la punon aŭ ĉu oni maljuste kroĉis la kondamnon al li, kiel la plej multaj kondamnoj, kiujn oni kroĉas al iu, pri tio Dobbs en tiu momento ĝuste ne pensadis. Ke li sidas maloportune, li verŝajne rimarkus nur tiukaze, se iu demandus lin, ĉu li sidas oportune sur la benko. La pensoj, kiuj okupis la viron Dobbs, estis la samaj, kiuj okupas tiom da homoj. Estis la demando: Kiel mi povas enspezi monon? Se oni jam havas iom da mono, estas pli simple enspezi monon, ĉar oni povas investi ion. Sed, se oni posedas nenion, estas malfacile kontentige solvi tiun aferon.

Dobbs havis nenion. Oni povas trankvile diri, ke li havis malpli ol nenion, ĉar li havis eĉ ne tutan kompletan vestaron, kiu en limigitaj cirkonstancoj povas esti rigardata modesta komenca kapitalo.

Sed kiu volas labori, tiu trovas laboron. Oni nur ĝuste ne iru al tiu, kiu diras tiun frazon; ĉar li ne havas laboron je disdono kaj ankaŭ neniun povus nomi, kiu serĉas laboriston. Tial li ja uzas tiun ĉi frazon, por pruvi kiel malmulte li komprenas la mondon.

Dobbs estus tirinta ĉarojn kun ŝtonoj, se li estus trovinta tian laboron. Sed eĉ tian laboron li ne ricevis, ĉar ĉeestis tro multaj, kiuj atendis pro tiu laboro, kaj ĉar la indiĝenoj havas ĉiam pli da bonŝancoj ricevi ĝin ol fremdulo.

Ĉe angulo de la *plaza* ŝupurigisto havis sian altan feroseĝon. La ceteraj ŝupurigistoj, kiuj ne povis pagi seĝon, kuradis kun siaj kestetoj kaj klapbenketoj kiel neĝomusteloj ĉirkaŭ la *plaza* kaj lasis nemolestata neniun, kies ŝuoj ne estis puraj kiel spegulo. Egale, ĉu li sidis sur unu el la multnombraj benkoj aŭ ĉu li promenis, oni ĉiam molestis lin. Do, eĉ la ŝupurigistoj ne facile trovis laboron, kaj kontraŭe al Dobbs ili estis kapitalistoj, ĉar ili havis ekipaĵon, kiu kostis almenaŭ tri pesojn.

Eĉ se Dobbs havus la tri pesojn, ŝupurigisto li ne povus fariĝi. Ne ĉi tie inter la indiĝenoj. Blankulo ankoraŭ neniam provis purigi ŝuojn surstrate. Ĉi tie ne. La blankulo, kiu en ĉifonoj kaj ĝismorte malsata sidas sur benko de la *plaza*, la blankulo, kiu almozpetas aliajn, la blankulo, kiu faras rompŝtelon, ne estas malestimata de la ceteraj blankuloj. Sed, se li purigas botojn surstrate aŭ almozpetas ĉe indiĝenoj aŭ portadus glaciakvon en siteloj kaj vendus ĝin, li sinkus kiel neestimato profunde sub la plej kotan indiĝenon kaj tamen mortus pro malsato. Ĉar neniuj blankulo akceptus lian laboron, kaj la neblankuloj rigardus lin nedeca konkuranto.

Sur altan feroseĝon ĉe la angulo sidiĝis sinjoro en blanka kostumo kaj la purigisto ekpoluris liajn brunajn ŝuojn. Dobbs ekstaris, li lante promenis transen al la seĝo kaj diris kelkajn flustritajn vortojn al la sinjoro. La sinjoro apenaŭ rigardis supren, metis manon en pantalonpoŝon, eligis peson kaj donis ĝin al Dobbs.

Momenton staris Dobbs tute perpleksa, tiam li reiris al la benko. Li kalkulis ricevi nenion aŭ eble dek centavojn. Li

tenis la manon en la poŝo kaj karesis la peson. Kion havigi por ĝi? Tag- kaj vespermanĝon aŭ du tagmanĝojn aŭ dek pakaĵojn da cigaredoj de la marko *Artistas*, aŭ kvinfoje glason da laktokafo kun *Pan Frances*, kiu estas kutima bulko.

Post certa tempo li forlasis la benkon kaj migris sur kelkaj stratoj malsupren al la hotelo *Oso Negro*.

La hotelo fakte estis nur *Casa de Huespedes*, loĝdomo. En la antaŭa fronto troviĝis je unu flanko la magazeno kun ŝuoj, ĉemizoj, ŝapo, sinjorinaj subvestoj kaj muzikiloj; je la alia flanko estis magazeno kun dratmatracoj, faldeblaj kuŝseĝoj kaj fotografaj aparatoj. Inter tiuj du magazenoj troviĝis la larĝa domtrairejo, kiu kondukis al la korto. En la korto troviĝis la disfalemaj kaj putrantaj lignobarakoj, kiuj formis la hotelon. Ĉiuj ĉi barakoj havis malgrandajn, malvastajn mornajn senfenestrajn ĉambretojn. En ĉiu ĉambreto staris kvar ĝis ok litoj. Sur ĉiu lito kuŝis malpura kuseno kaj malnova trivita lankovrilo. Lumo kaj aero por la ĉambroj envenis tra la pordoj, kiuj ĉiam estis malfermitaj. Spite tion la ĉambroj ĉiam estis mucidaj, ĉar ili ĉiuj troviĝis sur la ebena tero kaj tial la sunradioj povis enpenetri nur iom en ĉiun ĉambregon. Ankaŭ aertrablovo ne ekzistis, ĉar la aero en la korto estis senventa. Tiun aeron la klozetoj, kiuj ne havis gargarilojn, ankoraŭ pli malbonigis. Krome brulis meze de la korto tage kaj nokte ligna fajro, sur kiu staris grandaj ladokonservujoj, en kiuj oni kuiris lavaĵojn, ĉar en la hotelo troviĝis ankaŭ la lavejo de ĉino.

Maldekstre en la domtrairejo, antaŭ ol oni venis en la korton, estis ĉambreto, en kiu sidis la domvartisto. Dua ĉambro, tuj apud tiu akceptejo, estis ĝis supre fermita per dratreto. Ĉi tie kuŝis konservataj sur la bretaroj la kofroj, kestoj, paketoj kaj kartonujoj de la hotelgastoj. Jen kuŝis kofroj de homoj, kiuj eble nur nokton dormis ĉi tie; ĉar kelkaj de la kofroj kaj kestoj estis kovritaj per multe da polvo. La mono, kiun la gasto havis, sufiĉis nur por nokto. Je la sekva mateno la viro dormis ie ekstere kaj ankaŭ la sekvajn noktojn. Iutage li tiam revenis, prenis ĉemizon aŭ pantalonon aŭ iun alian uzaĵon el la kofro, fermis ĝin kaj redonis ĝin por plukonservado. Kaj iutage la viro tiam ekvojaĝis. Ĉar li ne havis monon por trajno aŭ ŝipo, li devis migri perpiede kaj ĉe tio ĝenus lin lia kofro. Nun la viro eble estis en Brazilo aŭ antaŭlonge mortis je soifo en dezerto aŭ li mortis sur ĝangala vojo pro malsato aŭ estis mortbatita.

Post jaro, kiam la konservejo por la kofroj estis plena, tiel ke ne plu enmetebilis la aĵoj de la novaj alvenintoj, la hotelposedanto komencadis reordigadon. Je la aĵoj troviĝis kelkfoje notfolieto kun la nomo de la posedanto de la kesto aŭ de la kartonujo. Okazis, ke la viro forgesis la nomon, kiun li donis tiam, kaj ĉar li ŝanĝis intertempe sian nomon, li nun ne povis repostuli sian kofron, ĉar li ne povis rememori pri sia tiama nomo. Li certe povis priskribi la kofron. Jen la domvartisto demandis pro la nomo, kaj ĉar la nomo ne estis identa kun la folieto pikita per pinglo sur la kofron, la kofro ne estis redonita al li.

Ofte la notfolieto kun la nomo defalis. Kelkfoje ĝi estis markita nur per kreto, kiu forviŝiĝis. Foje la domvartisto

pro hasto forgesis demandi pri la nomo kaj skribis nur la litonombbron per blua kraĵono sur la kartonujon. Sed la litonombbron la posedanto de kartonujo neniam sciis, kaj se li estus sciinta ĝin, li apenaŭ retenus ĝin en sia memoro. Dato estis donita neniam.

Estis do neniam konstatebla, kiom longe kuŝis kesto aŭ kofro ĉi tie en la konservejo. La daŭro de la konservotempo estis prijuĝata laŭ la alto de la polvotavolo, kiu troviĝas sur la aĵoj. Kaj laŭ tiu ĉi alto la hotelposedanto povis diri tre precize, kiom da semajnoj jam kuŝadis certa kofro aŭ certa sukbersako tie. La konservado kostis neniom. Sed, se la ĉambro fariĝis tro plenŝtopita, oni elprenis la aĵojn, kiuj montris la plej altan polvotavolon. La posedanto traserĉis la enhavon kaj ordigis ĝin. Plej ofte estis ĉifonoj. Okazis malofte, ke oni trovis iun valorplenan aĵon en kofro; ĉar tiu, kiu havas ankoraŭ valoraĵojn, ne tranoktas en *Oso Negro*, aŭ li pasigis tie nur unu nokton. Tiujn ĉifonojn la hotelbaraka posedanto donacis tiam al ĉifonitaj hotelgastoj, kiuj almozpetis pri ili, aŭ al aliaj ĉifonitaj homoj ĝuste preterirantaj. Estas ja en la mondo tiel, ke neniu pantalonon povas esti tiom ĉifonita, neniu ĉemizo tiom trivita, neniu boto tiom tratretita, ke ne troviĝas iu, kiu rigardas tiun pantalonon aŭ tiun ĉemizon ankoraŭ tre bona; ĉar neniu homo surtere povas esti tiom povra, ke alia ne supozus sin eĉ pli povra.

Dobbs ne havis kofron, kiun li povus doni por konservado, eĉ ne kartonujon aŭ papersakon. Li ne sciis, kion meti en ĝin; ĉar ĉio, kion li posedis, li portis en siaj pantalonaj poŝoj. Jakon li ne plu havis jam dum monatoj.

Li eniris en la ĉambreton de la domvartisto. Tiu ĉambro en la antaŭvando, kiu troviĝis en la ĉefa enirejo, efektive havis giĉetan breton, sed neniu uzis ĝin, eĉ ne la domvartisto mem. Sur tiu ĉi giĉeta breto, proksime antaŭ la ŝovebla fenestro, staris akvobotelo kaj kruĉeto el fajenco. Tio estis la komuna akvobotelo por ĉiuj hotelgastoj. En la dormoĉambroj mem ne estis akvo kaj ne akvobotelo. Tiu, kiu estis soifa, devis iri al la ĉi-tiea giĉeta fenestro por trinki. Kelkaj spertaj gastoj, precipe tiuj, kiuj nokte ofte eksoifis, kunprenis tekilobotelon plenigitan per akvo en la dormoĉambro.

La domvartisto estis ankoraŭ tute juna viro, apenaŭ dudek kvin jarojn aĝa. Li estis malgranda kaj magra kaj havis longan pintan nazon. Lia servo etendiĝis de morgaŭ matene je la kvina ĝis vespere je la sesa. Vespere je la sesa la alia domvartisto komencis sian noktoservon. Ĉar la hotelo tage kaj nokte seninterrompe estis malfermita, ne tiom pro la trajnoj, kiuj nur nokte alvenis, se ili malfruiĝis, sed multe pli pro la laboristoj, kiuj ĉi tie dormis en la hotelo kaj havis okupon en la restoracioj aŭ en aliaj negocaj branĉoj, kie la labortempo finiĝis tre malfrue en la nokto, kelkfoje nur antaŭmatene.

Tage kaj nokte oni vekis iujn en la hotelo, ĉar ĉiam estis iuj, kiuj devis ellitiĝi je iu ajn tempo, ĉar ili devis iri al iu laboro. Tie dormis privataj noktogardistoj, bakistoj, asfaltfaristoj, stratpavumistoj, gazetvendistoj, panportistoj kaj anoj de profesioj, kiuj tute ne lasas priskribi sin per unu vorto. Multaj el tiuj homoj povus lupreni privatan loĝejon, kie ili pli oportune kaj pli pure dormus kaj ne estus en komuneco kun

nekonatoj, fremduloj kaj vagabondoj. Sed pro la vekado, pro ilia ĝustatempa laborkomenco, ili loĝis ĉi tie en la hotelo, kie ili povis fidi pri tio, ke oni vekos ilin ĝuste en tiu minuto, kiun ili diris. Ambaŭ domvartistoj estis tre diligentaj homoj. Venis ĉiutage novaj gastoj kaj antaŭaj foriris. Alternoj okazis ĉiutage. Ĉiuj nacioj estis prezentataj, blankaj, flavaj, nigraj, brunaj, ruĝbrunaj vizaĝoj preteriris la ĝiceton. Sed la domvartisto, kiu deĵoris, sciis ĉiam, ĉu la viro pagis ĉu ne. Se li dubis, li rigardis tuj en la libron kaj persekutis la viron per la okuloj tra la fenestro, kiu kondukas al la korto, por scii, en kiun ĉambbron li kuras.

Ekzistis kelkaj tute malgrandaj ĉambroj, en kiuj estis nur unu lito, relative larĝa kaj kun matraco. La matraco estis ja tre dura, sed la gastoj ne estis dorlotitaj. Tiuj ĉambroj estis destinitaj por du personoj kaj kostis por ĉiu persono peson. Estis ĉambroj, kiujn uzis tiuj, kiuj venis kun ino. Ankaŭ por kelkaj inoj kaj knabinoj ekzistis kelkaj barakoj kun diversaj fiksitaj litoj, kiuj kostis kvindek centavojn. Tiuj ĉambroj havis du pordojn, sed la pordoj ne estis fermeblaj kaj pendis tiel oblikve en la hingoj, ke oni eĉ ne povis fermi ilin ĝuste. La litoj de la unuopaj virinaj gastoj tamen havis moskito-retojn, sub kiuj la inoj povis kaŝiĝi kaj senvestiĝi. Precipe la knabinoj de simpla deveno kaj la indiĝenaj knabinoj havas mirigan lertecon vesti kaj malvesti sin sub tiuj retoj kaj sub ili pasigi tiel nevidate la nokton, kvazaŭ ili estus interne de la masonitaj muroj de domo. Plej ofte estis kuirejaj knabinoj aŭ telerlavistinoj el la restoracioj, kiuj loĝis tie.

La viroj tro devis okupiĝi pri la propraj aferoj, por povi zorgi pri la junulinoj. Kaj la junulinoj loĝis en tiu hotelo, kie ĉio

estis tiel malfermita kaj nefermita, kiel tio apenaŭ imageblas, pli sekuraj ol en kelkaj aliaj lokoj prezentataj kiel „Bona familia hotelo“. La ĉifonitaj viraj hotelgastoj estus mortbatintaj la viron, kiu kuraĝus enŝteliĝi al la junulinoj por fari tie iun stultaĵon.

Estis gastoj en la hotelo, kiuj tie loĝis jam du, tri, ja eĉ kvin jarojn. Ĉar ili ĉiam havis la saman dormlokon, kaj loĝis en la sama angulo, ili propradire loĝis same tiel puraj kiel en privata domo. Nur la dormkunuloj kompreneble plej ofte alternis ĉiunokte. Sed okazis, ke kuniĝis sufiĉe da daŭraj gastoj, kiuj plenigis tutan ĉambron por si. La vivo por la viroj estis multe pli libera ol en privata domo. Ili povis veni, kiam plaĉis al ili, sen kolerigi la dommastrinon, ili povis foriri laŭplaĉe sen tio, ke iu okupiĝus pri ili, kaj kiam ili venis hejmen peze ŝarĝiĝintaj, des pli neniue okupiĝis pri ili.

Ŝrankoj ne estis en la ĉambroj. La vestojn oni pendigis al najloj, kiuj estis batitaj en la lignajn vandojn. Kelkaj gastoj, kiuj jam pli longe ĉi tie loĝis kaj havis laboron, pakis siajn dimanĉajn vestaĵojn en grandan lignokeston, kiun ili povis fermi per pendoseruro. Aliaj faris kovrilon el sakotolo, por gardi siajn aĵojn kontraŭ polvo. Ceteraj zigzage tiris ŝnuregon trans siajn pendigitajn vestojn, tiel firme, ke unuopa pantalono eltireblus nur tre malfacile.. Oni ŝtelis malofte ion; ĉar, tiukaze, se iu portis ion sub la brako, la domvartisto rigardis lin misfideme, kaj se la domvartisto eĉ konis la pantalonon kaj sciis, ke ĝi apartenas al alia, la fripono tute ne estus sukcesa. La domvartistoj konis la pantalonon kaj jakojn de siaj gastoj sufiĉe bone. La domvartisto sidis sen multe da libera loko en sia ĉambro, ĉar la ejo estis

plenpak-ita per ĉiuj eblaj aĵoj. Malgrandaj paketoj, kartonujetoj, tute malgrandaj retikuletoj kaj tiaj aĵoj, kiuj apenaŭ indus la penon malfermi pro ili la dratkaĝon, ĉar ili estis transdonitaj nur por mallonga tempo ĉi tie. Oni volis transpreni ilin post duono de horo, aŭ iam tiam. Plej ofte oni vere transprenis ilin je la interkonsentita tempo, sed kelkfoje ili kuŝis eĉ semajnojn ĉi tie kaj estis forgesitaj de la posedanto, kiu subite forvojaĝis, eble kiel maristo ĝis la kontraŭa fino de la mondo. Kiam ŝipo ĝuste elveturis kaj mankis ŝipanoj, oni kunprenis tiun, kiu plej rapide estis preta foriri kaj lasi ĉion post si, kiu do foriris tiel, kiel li ĝuste staris tie.

Krome en la malvasta ĉambro estis alta bretaro kun mantukoj, sapo kaj lavtukoj el basto por la bangastoj. Oni povis nur duŝi. Ĉiu duŝado kostis dudek kvin centavojn. La akvo estis frida kaj tre limigita.

Krome tie staris bretaro por leteroj kaj diversspecaj paperoj. Ĉion kovris polvo.

Krome tie troviĝis ankoraŭ monŝranko. En tiu oni konservis la valoraĵojn de la gastoj, kiujn dormgastoj transdonis: mono, horloĝoj, ringoj kaj aparatoj, kiuj estis valoraj. Inter tiaj aparatoj troviĝis kompasoj, kampmezuriloj kaj similaj aĵoj, kiujn uzas geologoj aŭ serĉistoj de oro kaj arĝento. Ankaŭ tiaj homoj, kiuj havis tiajn aparatojn, ofte tre enmizeriĝis kaj fine albordiĝis ĉi tie kiel dormgastoj. Ankaŭ fusiloj, revolveroj, kaj fiŝkaptiloj ĉi tie pendadis.

Antaŭ la domvartisto sur malgranda angulo de la tablo, kie

estis ankoraŭ loko libera de paperoj, paketoj, kaj skatoloj, kuŝis la granda libro por fremdaj gastoj. Ĉi tien oni enskribis ĉiun hotelgaston. Nur la familian nomon, la lironumeron kaj la pagitan sumon. Kiel la gasto krome nomiĝis, kiun naciecon li havis, kiun profesion, kiun celon, kaj de kie li venis, ĉio ĉi tute ne interesis la hotelposedanton. Eĉ malpli interesiĝis pri tio la polico, kiu neniam venis por rigardi en la libron. La libro interesis en la plej bona kazo iam la publikan estraron por la kolektado de impostoj, se la hotelposedanto volis pruvi, ke oni taksis liajn enspezojn tro alte. Nur tie, kie multaj superflujaj oficistoj estas survoje kaj pagataj de la ŝtato, la polico zorgas pri ĉiu sterkejo kaj volas scii ĝis la koloro de unuopa haro de papilo, kiu estas la hotelgasto, de kie li venas, kion li volas fari ĉi tie kaj kien li intencas foriri. La oficistoj alie ja ne sciis, pri kio ili okupiĝu, kaj la impostpagistoj baldaŭ eltrovus, ke oni ne bezonas ilin.

Dobbs envenis al la domvartisto, metis peson sur la tablon kaj diris: „Lobbs, por du noktoj.“

La domvartisto foliumadis en la libro, ĝis li trovis malplenan liron, skribis la nomon „Jobbs“, ĉar li ne komprenis bone lin kaj estis tro ĝentila por demandi plian fojon, kaj tiam li aldonis: „Ĉambro sep, lito du.“

„Bone“, diris Dobbs kaj foriris. Li rajtus tuj sterna sin, la ceteron de la posttagmezo, la tutan nokton, la tutan sekvan duan tagon, la sekvan nokton kaj la tutan sekvan antaŭtagmezon ĝis tagmeze, se li intencus tion. Sed li estis malsata kaj devis ĉasi aŭ fiŝkapti ion.

Sed la fiŝoj simple ne mordis la hokon. Donis neniu iom al li. Tiam li vidis iri antaŭ si sinjoron en blanka kostumo. Li atingis lin, murmuris ion, kaj la sinjoro donis kvindek centavojn al li.

Kun tiuj kvindek centavoj Dobbs unue iris al ĉino por tagmanĝi. Tagmezo delonge pasis, sed estis ĉiam tagmanĝo ĉe ĉino, kaj se estas jam tro malfrue, por ke oni povu nomi ĝin ankoraŭ *Comida Corrida*, tiukaze oni nomas la saman manĝon simple *cena*, kaj tio estas tiukaze la vespermanĝo, ankaŭ tiukaze, se la horloĝo de la katedralo ĵus batis la kvaran.

Tiam Dobbs iom ripozis sur la benko, kaj fine li pensis pri kafo. Li ĉasiris denove certan tempon vane, ĝis li ekvidis sinjoron en blanka kostumo. Kaj la sinjoro donis al li kvindek centavojn. Arĝentomoneron.

„Hodiaŭ mi bonŝancas pri sinjoroj kun blankaj kostumoj“, diris Dobbs kaj iris al la ronda kafostando je la flanko de la *Plaza de la Libertad*, kiu estis plej proksima al la dogan- kaj pasaĝerhaveno.

Li sidiĝis sur la altan koktelejan seĝon kaj mendis glason da kafo kun du kornbulkoj. La glaso estis plenigita je tri kvaronoj per varmega lakto kaj poste per surverŝita nigra varmega kafo, ĝis la glaso estis plena ĝis la rando. Tiam oni metis la sukerujon antaŭ lin, la du belajn brunajn kornbulkojn kaj glason kun glacia akvo.

„Kial vi, banditoj, jam denove altigis la prezon je kvin cent-

avoj?“ demandis Dobbs, ĉe tio li enmiksitis kirlante la monteton da sukero, kiun li ŝutis antaŭe en sian glason.

„La elspezoj estas tro altaj“, diris la kelnero, dum li pikadis per dentopurigilo en sia buŝo kaj tiam pro enuo apogis sin al la kokteleja baraĵo.

Dobbs nur tial demandis por diri ion. Kvankam por li kaj lia speco tio estis grava afero, ĉu la kafo kostas dek kvin aŭ dudek centavojn, sed li ne ekscitiĝis pri la pliigo de la prezo. Se li povis havigi 15 centavojn, li povis havigi ankaŭ dudek centavojn, kaj se li ne povus kunigi dudek da ili, tiukaze mankus ankaŭ la 15 centavoj. Fakte estis do tute egale.

„Mi ne aĉetas lotojn, damne, lasu min fine en paco“, li vokis al la indiĝena knabo, kiu jam dum kvin minutoj svingadis la longajn sveltajn flagojn de la loteriaj biletoj antaŭ lia nazo.

Sed la knabo sin ne lasis rifuzi tiom facile.

„Tio estas la loterio de la ŝtato Michoacan. La plej alta gajno estas sesdek mil pesoj.“

„Foriĝu finfine, rabisto, mi ne aĉetas lotojn.“ Dobbs trempis sian kornbulkon en la kafon kaj ŝovis ĝin en la buŝon.

„La tuta loto estas nur dek pesoj.“

„Hundido, mi ne havas dek pesojn.“ Dobbs volis trinki glutton da kafo, sed la glaso estis tro varmega, li ne povis teni ĝin en la mano.

„Jen prenu do kvaronon de loto, tio estas du pesoj kaj kvindek.“

Dobbs tre lerte kondukis la glason al la buŝo. Sed kiam li nun volis trinki, li bruligis siajn lipojn, tiel, ke li rapide devis remeti la glason, ĉar la glasoj pro la longa atendado ankaŭ por la fingroj fariĝis tro varmega.

„Se vi nun ne foriĝos tuj al la diablo kun viaj ŝtelitaj lotoj, mi verŝos la akvon sur vian vizaĝon.“

Dobbs diris tion ĉi foje kolera. Ne pro kolero pri la negoce fervora knabo, sed des pli pro la kolero, ke li brulvundetis sian langopinton. Al sia lango li ne povis turni sian koleron, ankaŭ ne al la kafo, kiun li zorgeme gardis kontraŭ elverŝiĝo. Tial li turnis sian koleron kontraŭ la knabo.

La knabo ne estis tre impresita. Li kutimiĝis pri tiaj eksplodoj de kolero. Li ankaŭ estis bona komercisto, kiu konas siajn klientojn. Kiu je tiu tempo trinkas kafon kaj al tio povas manĝi du bulkojn, tiu kapablas aĉeti ankaŭ loterian bileton plej favore de la ŝtato Michoacan.

„Tiukaze prenu do nur dekonan, *señor*. Tio kostas nur unu peson.“

Dobbs prenis la akvon kun la glacia akvo kaj strabis ĉe tio al la knabo. La knabo vidis ĝin, sed ne foriris de sia loko.

Dobbs trinkis gluton de la akvo. La knabo svingadis dum tio siajn flagan faskon kun la lotoj antaŭ lia nazo. Kun subita

movo Dobbs verŝis la akvon sur lian vizaĝon, kaj la lotoj gutis pro akvo.

Sed la knabo ne estis kolera pri tio. Li ridis nur, skuis la akvon el la lotoj kaj per duono de supra manplataĵo forigis la akvon de sia ĉifonita ĉemizo. Tiun akvoelverŝon li rigardis kvazaŭ kiel unuan amikecan preparon de negoco ol signo de nepacigebla malamikeco. En lia kapeto fiksiĝis foje la opinio, ke tiu, kiu povas pagi glason kun laktokafo kaj povas manĝi du kornbulkojn aldone, ankaŭ devas aĉeti loton, por denove enspezigi la ekestintajn kostojn per loteria gajno.

La plej granda glaso, se temas pri la enhavo, iam malpleniĝos. Dobbs eldevigis la lastan guton, kiu iel eligeblis, sen devi rompi la glason. Finfine ankaŭ la lasta ero de la belaj kornbulkoj estis surpikita kaj Dobbs pagis sian kvindekon. Li ricevis dudek centavojn en la formo de malgranda arĝenta monero.

Nur tion la knabo ŝajne atendis.

„Aĉetu do duonon de loto de la *Monterrey*-loterio, *señor*. Tio kostas nur dudek centavojn. La plej granda gajno estas dudek mil pesoj. Jen prenu tion. Tio estas bonŝanca numero.“

Dobbs pesis la arĝentan moneron en la mano. Kion li faru per ĝi? Ĉu aĉeti cigaredojn? Li havis ĝuste nun post la kafo neniun emon al cigaredoj. La loteria loto estus pura disipo. Almenaŭ, for estas for. Kaj oni povos esperi kelkajn tagojn. Ja ne daŭros multajn monatojn, sed ĉiam nur kelkajn tagojn

ĝis kiam okazos la tirado.

„Nu, donu do vian loton, hundido. Nur por ke mi ne plu devu vidi vin kun viaj lotoj.“

Kun rapida servopreteco la malgranda komercisto ŝiris dudekonon de la flageca lotaro. Estis tute minca papero. Tiom minca, ke la presitaĵo sur la dorsa paĝo estis same tiom forta kiom sur la antaŭa paĝo.

„Tio estas tre bona numero, *señor*.“

„Kial vi do ne ludas ĝin mem?“

„Mi ne havas la monon por tio. Jen la loto. Mi tre dankas al vi, *señor*. Honorigu min ankaŭ venontan fojon.“

Dobbs enpoŝigis la loton sen rigardi la numeron. Tiam li foriris por bani. Tio estis longa vojo. Eksteren de la loko, longan distancon post la *cemeteryo*. Tiam malsupren de la monto al la rivero. Antaŭ ol oni venis tien, oni devis salti trans kanalojn kaj flakojn kaj vadi tra marĉaj lokoj.

En la akvo jam svarmis dekoj da indiĝenoj, tiel kiel blankuloj starantaj sur la sama socia rango kiel Dobbs, kiuj vivis de tio, kion aliaj lasis fali. Bankalsonojn havis neniu. Sed ankaŭ ĉeestis neniu, kiu afliktiĝus pri tio. Iris eĉ inoj kaj knabinoj preter tiu ĉi banloko, kiuj ne rigardis tion kiel ion eksterordinaran, ke la viroj ĉi tie banis tute nevestitaj, kaj kiuj ankaŭ tute ne pensis publike ofendiĝi pri tio. Kompreneble, la noblaj usonaj aŭ eŭropaj damoj rigardus

tion sub ilia digno preteriri tie. Tiuj staris supre sur la deklivo kaj sur la balkonoj kaj en la fenestroj de siaj domoj kun altkvalitaj prismaj binokloj kaj observis la banantojn. La damoj, kiuj ne loĝis ĉi tie, sed sur la alia flanko de la *Avenida Hidalgo*, en la *kolonia Guadelupe* kaj en la aliaj distriktoj, lasis inviti sin al teo de damoj ĉi tie loĝantaj. Ĉiu damo kunprenis sian prismobinoklon, por – por rigardi la vastan pejzaĝon de supre, ĉar la elvidaĵo de ĉi tie estis rigardinda. Tial la distrikto cetere havis la nomon *Colonia Buena Vista*.

La banado estis refreŝiga, kaj Dobbs ŝparis dudek kvin centavojn, kiujn li devus pagi por la duŝado en la hotelo. Sed ankaŭ la banado tamen havis siajn ombrajn flankojn. Jen la gigantaj kankroj, kiuj sidas en la ŝlimo. Kaj tiuj paguroj pensis de tempo al tempo, ke la piedfingroj de la bangastoj estas bongusta viando, kiu ne malestimindas. Tia pinĉo dolorigas diable, se tia tre aĝa elkreskinta paguro forte kaptis iun piedfingron kaj volas formarŝi kun ĝi.

La rivero dispartiĝis ĉi tie en multajn brakojn. Je unuopaj bordoj sidis la kankrofiŝistoj. Estis peniga negoco, kiu entreprenblis nur de iu, kiu havas senfinan paciencon.

La kankrofiŝistoj estis plej ofte indiĝenoj aŭ tre povraj mestizoj. La logaĵo estis malnova stinkanta viando. Ju pli ĝi stinkis des pli bone tio estis. Oni surpikis grandan viandobulon sur fiŝkaptilan hokon, kiu estis fiksita je tre longa ŝnuro. Tiam oni ĵetis la viandobulon tre malproksimen riveran brakon.

Tie la bulo kuŝis dum sufiĉe longa tempo. Nun la fiŝisto komencis treege lante retrotiri la ŝnuron al si, tiel malrapide, ke oni apenaŭ vidis tion. Daŭris eternecon ĝis la hoko kun la bulo denove estis ĉeborda. Tiam la ŝnuro plu estis lante altirata sur la malalte leviĝantan ŝliman bordon. Ses- ĝis dekfoje tio estis vana. Oni devis denove elĵeti la hokon, ofte kun nova viandobulo, ĉar la antaŭa estis formanĝita, por tiam retrotiri ĝin denove kun senfina pacienco.

La kankroj per la pinĉilo kaptis firme la sekan viandon kaj tenis tiom kramfe la viandobulon, ke ili lasis eltiri sin tiel, ĉar ili ne volis redoni la bulon. Se oni tiris tro rapide la kankron, ĝi ne povis tiom rapide sekvi aŭ ĝi eksuspektis ion kaj eklasis la bulon. Ofte ĝi kaptis la bulon tiom forte, ke ĝi forpinĉis ĝin de la hoko, kaj tiukaze venkis la kankro. Paciencaj fiŝistoj bone enspezis ĉiutage, ĉar kelkaj el la kankroj pezis duonon aŭ tri kvaronojn de kilogramo, kaj la restoracioj pagis konsiderindajn prezojn, ĉar la viando estas tre sopirata de franduloj.

Kiam Dobbs observis la fiŝistojn ĉe la laboro, li pensis, ke tio ne estus negoco por li. Li ne havus la paciencon, kiu necesus por tio. Iu senpripensita hasta moveto incitus foriri la predon. Tiu kankrokaptado postulas trankvilon de la nervoj, kiun Dobbs, plenkreskinta en la tumulto de usona urbego, ne povis provizi, eĉ ne tiukaze, se li ricevus kvin pesojn por ĉiu kankro.

Li reiris ŝanceliĝante en la urbon. La banado kaj la migrado faris lin malsata, kaj li devis zorgi havigi vespermanĝon.

Denove estis vane dum certa tempo, kaj li devis akcepti embarasigajn rimarkojn kaj gluti ilin. Sed oni fariĝas dikhaŭta, se oni estas malsata kaj se oni ne vidas alian eblon por ricevi vespermanĝon.

Fine li vidis sinjoron en blanka kostumo. Li pensis, ke rilate sinjorojn kun blankaj kostumoj, li hodiaŭ bonŝancas, ke li provu do denove. Kaj li ĝuste divenis. Estis kvindek centavoj, kiuj sufiĉis por la vespermanĝo.

Post la vespermanĝo kaj post ripozo sur la benko, li pensis, ke estus tute bone, se li havus iom da mono en la poŝo, ĉar oni ja neniam scias, kio povos okazi. Pri tiu mono li ne pensis sen iu instigo, sed la penso ekaperis, kiam li vidis preteriri sinjoron en blanka kostumo transe sur la alia flanko de la *plaza*. Li tuj iris rekte al li.

La sinjoro efektive metis manon en poŝon kaj eligis kvindekon. Dobbs volis kapti ĝin, sed la sinjoro firmtenis sian kvindekon. Tiam li diris tute seke: „Aŭskultu foje, knabo mia, tian nekredeblan impertinentecon mi travivis ankoraŭ neniam en mia tuta vivo, kaj se iu rakontus tion al mi, mi rigardus tion mensogo.“

Dobbs staris tute perpleksa. Io tia ankoraŭ neniam okazis al li, ke al li iu tiom longe paroladis. Li ne sciis ĝuste, ĉu li plu staru aŭ ĉu li forkuru. Sed ĉar li ankoraŭ nun vidis la kvindekon en la mano de la sinjoro, li havis la impreson, ke tiu kvindeko pli frue aŭ pli malfrue tamen estos destinita por li kaj, ke la sinjoro volas havi nur la plezuron, ĉe tio alkroĉi predikon. La predikon por la kvindeko mi ja tute facile

povus kunaŭskulti, mi ja ne devas fari ion gravan, diris Dobbs al si. Kaj tiel li restadis trankvile staranta.

„Hodiaŭ posttagmeze vi rakontis al mi“, daŭrigis nun la sinjoro, „ke vi ankoraŭ ne manĝis. Tial mi donis peson al vi. Tiam mi renkontis vin denove, kaj vi diris, ke vi ne havas dormmonon, pro tio mi donis al vi kvindek centavojn. Iom pli poste denove vi venis kaj diris, ke vi ankoraŭ ne vespermanĝis, kaj mi donis al vi ankoraŭfoje kvindekon. Nun diru al mi la sekvan, por kio vi do nun ankoraŭfoje volas havi monon?“

„Por morgaŭ matene kaj por la matenmanĝo“, rapide diris Dobbs sprite.

La sinjoro ridis, donis la kvindekon al li kaj diris: „Tio estas la lasta fojo, ke mi donas ion al vi. Nun iru foje ankaŭ al alia, kaj ne ĝuste ĉiam al mi. Tio ektedas min.“

„Pardonu do, sinjoro, mi ne sciis, ke vi estis ĉiam la sama sinjoro. Vian vizaĝon mi neniam rigardis, tion mi vidas nun je la unua fojo. Sed ekde nun mi ne revenos.“

„Por ke vi ankaŭ kun certeco plenumu vian vorton, kaj ne plu molestu min, mi volas doni al vi ankoraŭfoje plian kvindekon, por ke vi havu ankaŭ morgaŭ la tagmanĝon. Sed ekde tiam bonvolu, mi tre petas vin, mem zorgi por via vitenado, sen mia kunagado.“

„Jen do ankaŭ tiu ĉi fonto estas elĉerpita“, diris Dobbs al si. Kaj li konkludis, ke estus pli bone iom retiriĝi al la kamparo kaj rigardi kiel statas tie.

02

Dobbs trovis en sia dormejo viron, kiu rakontis al alia dormkamarado, ke li volus iri al Tukspam, sed, ke li ne havas vojkunulon. Aŭskultinte tion, Dobbs tuj diris: „Ulo, mi kuniros al Tukspam.“

„Ĉu vi estas boristo?“ demandis la viro en la lito.

„Ne, pumpisto.“

„Bone“, respondis la viro, „kial ne? Ni tute certe povos iri kune.“

Sekvamatene ambaŭ ekiris por traserĉi la multnombrajn naftokampejojn survoje al Tukspam pro laboro. Ili matenmanĝis unue en kafobudo, ĉiu trinkis glason da kafo kaj manĝis du bulkojn, kaj tiam ili ambaŭ ektritis.

Sed tute rekte oni ja ne povas iri al Tukspam. Tie ne estas fervojo. Nur aviadiloj. Kaj tikaze flugo kostus kvindek pesojn. Sed tie veturas multaj kamionoj al la kampejoj. Iu el ili eble kunprenos onin. Iri piede la tutan vojon ne estas tiel simple. Estas distanco de pli ol cent mejloj kaj ĉiam sub ardanta tropika suno kaj sen multe da ombro.

„Tio estas la plej malgranda zorgo“, diris Barber, „se ni nur unue estus transe de la rivero.“

La transiĝo de la rivero kostis dudek kvin centavojn, kaj tiujn dudek kvin centavojn ili ne volis elspezi.

„Nu, do nenio alia restos al ni“, diris Barber, „jen ni devos atendi la Huasteca-frajtpramon. Tiu prenos nin por nenio transen. Sed tio povos daŭri ĝis la dekunua antaŭ ol iu alvenos denove, ĉar ili ne veturas laŭtempe, sed laŭ la frajto, kiun ili havas.“

„Mi proponas, ke ni pacience sidu sur la muro“, respondis Dobbs. De la matenmanĝa restmono li aĉetis por dek centavoj pakaĵeton kun dek kvar cigaredoj. Fortuno estis je lia flanko. En la pakaĵeto estis bonhava kupono por kvindek centavoj, kiun li tuj interŝanĝis ĉe la cigaredovendisto kontraŭ kontanta mono. Nun li posedis la grandan moneran sumon de peso kaj dek centavoj.

Ankaŭ Barber havis proksimume peson kaj kvindek centavojn kiel vojaĝkapitalon. Ili ja estus povintaj pagi la monon por la pramo; sed ĉar ili havis sufiĉe da tempo kaj ne perdis tempon, ili senprobleme povis atendi la frajtpramon kaj ŝpari la monon.

Ĉi tie ĉe la pramo estis vigla trafiko. Dekoj da grandaj kaj malgrandaj motorboatoj atendis veturgastojn. Specialaj boatoj, kiuj veturis pli multekoste ol la boatoj taksiaj, transportis transen la ŝipestrojn kaj la manaĝerojn de la naftokompanioj, kiuj devis tro rapidi por povi atendi la taksiboatojn. Tiuj ĉiufoje devis kunhavi kvar aŭ ses veturgastojn antaŭ ol ili brue povis ekveturi. Kaj ĉar ĉi tie ĉiam iuj restadis, speciale la laboristoj, kiuj transe laboris kaj ĉi tie loĝis kaj ĉi tie svarmis centope kaj eĉ milope en la matenaj kaj posttagmezaj horoj, estis ĉe la pramo tia vivo, kia sur foirplaco. Jen tabloj, kie oni eldonis tagmanĝon aŭ kafon aŭ

frititajn bananojn aŭ fruktojn aŭ enĉiladojn aŭ varmegajn tamalojn aŭ cigaredojn aŭ dolĉaĵojn. Ĉiu vivis de la pramo kaj per la pramo. Aŭtomobiloj kaj pramoj alportis el la urba interno seninterrompan vicon de veturgastoj. Tio deruliĝis tiel la tutan tagon kaj la tutan nokton, sen interrompo. Transe estis la manoj kaj ĉi tie en la ĉi tiea flanko estis la cerbo, estis la centraloficejoj, la bankoj. Transflanke de la rivero estis la laboro, ĉi tie estis la ripozo, la paŭzo, la plezuro. Transe estis la riĉo, la oro de la lando, la nafto. Transe ĝi estis senvalora. Nur ĉi tie, sur tiu ĉi flanko, en la urbo, en la krutaj oficejdomoj, en la bankoj, en la konferencejoj, en la *All America Cable Service* ricevis la nafto, kiu sur la alia flanko estis tute senvalora, sian prezon. Nafto kaj oro estas ja sen valoro per si mem. Ilia valoro estas difinata nur per multaj aliaj agoj kaj proceduroj.

Preter tiu ĉi pramo migris miliardoj da dolaroj. Ne kiel monbiletoj, ne kiel stampitaj oromoneroj, ja eĉ ne kiel ĉekoj. Tiuj miliardoj pretermigris ĉi tie kiel koncizaj notaĵoj de homoj, kiuj plej ofte, sed ne ĉiam, estis veurigataj en specialboatoj, do ne en taksiboatoj, kaj kiuj portadis la notaĵojn en siaj malgrandaj notlibroj kelkfoje nur sur peco da papero. Riĉoj kaj valoroj en nia jarcento lasas esprimi sin en notaĵoj kaj kunporti kiel notaĵoj.

Je la deka kaj tridek alvenis fine la kargopramo, plenigita per bareloj, kestoj kaj sakoj. Dekoj da indiĝenaj viroj kaj inoj transvenis, peze ŝarĝitaj per korboj, en kiuj ili portis kampofruktojn en la urbon, aŭ petatojn, mansaketojn el basto, kokinojn, fiŝojn, ovojn, fromaĝojn, florojn kaj kapridojn.

Barber kaj Dobbs eniris, sed daŭris ankoraŭ pli ol horon antaŭ ol la pramo denove veturis transen. La rivera veturo kontraŭflue daŭris longan tempon, antaŭ ol la albordiĝejo estis atingita. En granda distanco kontraŭ la riverfluo ankris cisternŝipoj, unu apud la alia, por ŝarĝi la nafton kaj por porti ĝin trans la oceanon.

Sur la transflanko de la rivero la trafiko estis simile vigla kaj estis simila foira tumulto, kiel flanke de la urbo. Ne nur en la fludirekto de la rivero, sed multe pli kontraŭ la fluo, preskaŭ ĝis la riverbuŝo, ankris la grandaj cisternŝipoj.

Iom pli malproksime de la bordo, sur la altaĵoj, troviĝis gigantaj cisternoj, plenigitaj per la valora nafto. Multnombraj tuboj kondukis la nafton el la cisternoj malsupren al la riverbordo. Ĉi tie oni pumpis ĝin tra metaldrattuboj en la grandegajn cisternojn de la ŝipoj. Kiam la nafto estis enpumpita kaj la ŝipo plenigita, ĝi hisis la ruĝan signalflagon, ĉar la kruda nafto eligis gason, kaj malatenta traktado de fajroflamo povis elbruligi la ŝipon ĝis la akvosurfaco.

Aroj de komercistoj ĉi tie vagadis kun fruktoj, papagoj, jaguaridoj, jaguaraj kaj pumaj feloj, simioj, kornoj de bubaloj, malgrandaj palacoj kaj katedraloj artoplene konstruitaj el konkaj, kaj ofertis siajn varojn al la maristoj. Se ili ne povis ricevi monon, ili akceptis ankaŭ aliajn aĵojn. Kostumojn, pluvomantelojn, ledokofrojn aŭ ion ajn alian valorplenan, kiun ili povus interŝanĝi.

La rafinejoj elblovis nubojn el fumo kaj gaso. La forblovita gaso sedimentiĝis en la pulmoj kaj traĥeoj, kie ĝi pikis kiel

delikataj pingloj. Jen la homoj tusetis, kaj se la vento blovis tiujn gasojn eĉ transen en la grandan urbon, la tuta loĝantaro sentis sin kvazaŭ en venena forno. La nekutimigintoj, la novaj alvenintoj, ekhavis malcertigitan timeman senton. Ili kaptis sin seninterrompe je la gorĝoj aŭ provis terni aŭ blovi tra la nazo, kaj plej ofte ili ne sciis, pri kio temas. Multaj el la novuloj havis la senton, kvazaŭ ili devus morti, tiel venena estis la pikanta sento en la gorĝo kaj en la polmo.

Sed tiuj, kiuj jam delonge kutimiĝis pri tio, akceptis ĝin facile. Tiom longe, kiom tiu pikanta veneno ŝvelis en la urbo, fluis la oro tra la stratetoj, kaj la vivo aspektis rozkolora, de kiu ajn flanko oni rigardis ĝin.

Ĉi tie estis la salonoj, unu apud la alia. Ili ĉiuj vivis de la maristoj. La plej bonaj klientoj estis la maristoj usonaj. Ĉar ili ricevis en sia patrolando nek bieron nek vinon nek brandon. Ili ĉi tie faris ĉion, kion ili hejme devis preterlasi, kaj ili drinkis tiom provizige, ke ili bone povis elteni la vivon denove dum certa tempo en sia seka malsprita lando. Ili kutimiĝis pri altaj prezoj por kontrabandita brando. Kaj ĉi tie, kie la prezoj estis normalaj, ŝajnis al ili, kvazaŭ la viskio kaj la biero kostas tute nenion, kvazaŭ ili ricevus ĉion donacite. Tiel migris dolaro post dolaro en la *cantinas* kaj en la koktelejojn. Kaj nur kelkajn domojn apude estis la belaj damoj, kiuj forprenis de ili la restaĵon de ilia mono. Sed tiuj maristoj sentis sin neniam trompitaĵoj. Ili estis feliĉaj, kaj se oni estus forpreninta de ili per malpermesoj kaj leĝoj la drinkadon kaj la belajn damojn, ili ŝarĝus la forprenintojn per miloj da malbenoj. Ili ne bezonis kuratoron. Kaj la marista misio, kiu zorgas nur pri tio, ke la maristoj ricevu

puran liton kaj sekan varman kuŝejon, kie ili povas legi gazetojn, estas plej alte estimata de la maristoj. Kiu havas sopiron viziti preĝejon, ĉiam trovas preĝejon, oni ne devas porti ĝin al la maristo ĝis la tagmeza tablo aŭ en la dormhalon kaj tiel naŭzigi al li tie la malmulton de religio, kiun la lernejo ankoraŭ lasis al li. Maristoj kaj la prizongastoj estas la du popolaj klasoj, kiujn oni rigardas kvazaŭ la plej sendefenda predo, kiun oni rajtas plenŝtopi per religio, ĝis kiam ili vomas pro la tronutrigo. Sed tro da manĝo ankoraŭ neniam kaŭzigos bonon. Kaj ĉar ĝi neniam estigas bonon, sed estigas la malon de tio, kio estas intencita, oni surpakas al la krimuloj kaj al la maristoj ankoraŭ pli kaj pli da religio. La krimuloj en la prizono kaj la maristoj sur firma tero, se ili jam elspezis sian tutan monon, formas la plej bonan preĝparohon. Ambaŭ partioj preferus sukan kinejan prezentadon, sed tiun ili ne povas havi por nenio.

Barber diris: „Estas ĝuste tagmezo, ni fakte povus foje surgrimpi cisternŝipon. Eble tagmanĝo flanken falos por ni.“

„Tio ne estas aĉa ideo“ reiris Dobbs, „ili povas nur elĵeti nin, tio estas ĉio.“

Ili vidis stari du virojn kun nudaj brakoj ĉe fruktokomercisto. Barber tuj marŝis al ili kaj diris: „De kiu ŝipo vi do estas?“

„De la *Norman Bridge*. Kial?“

„Ĉu vi jam manĝis?“ demandis Barber.

„Ne, ni estas ĝuste sur la vojo tien.“

„Kiel estus pri tagmanĝo por ni ambaŭ?“ demandis Barber.

„Venu nur tuj kun ni sur la ŝipon. Ili ĉiuj iris transen en la urbon. Amaso da manĝo postrestis.“

Kiam Dobbs kaj Barber horon poste forlasis la ŝipon, ili apenaŭ povis iri plu, tiom plenŝtopitaj ili estis. Ili sidiĝis al muro por unue digesti dum certa tempo. Sed tiam ili maltrankviliĝis, ĉar ili volis iri plu kaj nepre bezonis tranoktejon.

„Ni povas iri per du vojoj“, diris Barber. „Ni povas iri ĉi tie sur la ĉefa vojo, ĉiam restadante proksime de la laguno. Sed mi pensas, ke tiu vojo ne estus bona. Sur tiu iras ĉiuj. Jen troviĝos nenio en la kampejoj, tiuj estas ĉiuj tro inundataj de vagabondoj. Ankaŭ laboro tie ne estas, ĉar venas sufiĉe da homoj!“

„Tiukaze ni ja tute ne devos transiĝi, se tio estas tiel senŝanca“, diris Dobbs malvoleme.

„Ĉu senŝanca? Tion mi ne diris“, Barber defendis sin.

„Nur ĉi tie sur la ĉefa trafikvojo apenaŭ okazas io, ĉar tro multaj tie promenadas. Mi pensas, ke estas pli bone, se ni iros sur la interna vojo. Jen ni trafos sur pli da kampejoj tute nekonataj, kiuj troviĝas pli flanke de la grandaj vojoj. Jen ni preteriros kampejojn, kiuj ĝuste komencas starigi arganojn. Jen ĉiam io estas por fari. Ni iru nun foje ĉi tie perpiede laŭ

la la riverfluo kaj poste maldekstren, kaj post duono de horo ni estos jam en *Villa Cuauhtemoc*.”

„Tiukaze ek do, se vi supozas, ke tiu vojo estas pli bona“, diris Dobbs.

La tuta vojo estis plena de nafto kaj nenio alia krom nafto. Maldekstre sur la altaĵoj staris la cisternoj kiel soldatoj marŝorde envicigitaj. Dekstre estis la rivero. Baldaŭ la ŝipoj ne plu videblis, kaj la riverbordo fariĝis trarigardebla. Sed la akvo estis kovrata per alta tavolo de nafto, la bordoj estis kovrataj larĝtavole per nafto, kaj ĉiuj aĵoj, kiujn la rivero aŭ la envenanta alta tajdo estis ĵetinta sur la bordon, estis kovrataj de tenaca nigra nafto. La vojo, kiun ambaŭ iris, estis multloke marĉa pro la tenaca nafto, kiu fontis el disrompitaĵoj tuboj aŭ fontis el la tero. Nafto kaj nenio krom nafto, kien ajn oni rigardis. Eĉ la ĉielo estis kovrata per nafto. Pezaj nigraj nuboj blovigataj de la rafinejoj ĉi tien forportis naftogasojn kun si.

Tiam sekvis altaĵoj, kiuj aspektis pli serenaj. Tie estis la lignaj loĝodomoj de la inĝenieroj kaj oficistoj. Ili loĝis ĉi tie bele kaj enaere, kaj kion ili devis lasi je urba vivo post si, tion ili devis anstataŭi ĉi tie per gramofonoj kaj radioriceviloj. Ĉar reveni ĉi tien vespere el la urbo estis sufiĉe komplika kaj ankaŭ ne sekura. Sufiĉe da friponoj vagadis ĉie tie, kiuj atendis simplan okazon kaj ne alte taksis la vivon de iu alia.

Villa Cuauhtemoc fakte estas la malnova urbo, pramalnova indiĝena urbo, kiu jam estis ĉi tie, antaŭ ol venis la hispanoj.

Ĝi estas en loko pli sanfavora ol la nova urbo, kaj ĝi situas ĉe la bordo de granda lago, kiu donas fiŝojn, anasojn kaj anserojn neimageble grandamase. La natura trinkakvo en la malnova urbo estas pli bona ol tiu en la nova urbo. Sed la nova urbo sciis rapide kaj vaste superi la malnovan. Ĉar la nova urbo situas proksime de la oceano kaj ĉe rivero, sur kiu la plej grandaj oceanaj vaporŝipoj povas veturi ĝis la ĉefa stacidomo kaj ĉi tie ankras tiom sekure kontraŭ la plej sovaĝaj uraganoj, kvazaŭ ili ankrus en bankuvo. Pri la malnova urbo oni apenaŭ parolas plu en la nova. Miloj, dekmi-
loj de la loĝantoj de la nova urbo scias nenion pri tio, ke sur la alia flanko de la rivero kaj duonon de horo surpiedan pli interne en la lando troviĝas la origina urbo. Sed tiuj du urboj, la patra kaj la ida, malproksimiĝis pli kaj pli. La nova urbo, ĵus cent jarojn aĝa, havante ducent mil da loĝantoj, kun eterna manko de loĝejoj, situas en la ŝtato Tamaulipas, dum la malnova urbo apartenas al la ŝtato Verakruco. La malnova urbo fariĝas pli kaj pli kamparana, la nova urbo fariĝas pli kaj pli mondurbo, kiu sendas sian nomon en la plej forajn angulojn de la Tero.

Tuj, kiam la du migrantoj, kiuj nun tre rapidis por antaŭveni, atingis fine de la urbo transflanke de la laguno la altan vojon, ili ekvidis indiĝenon kaŭrantan ĉe la vojo. La indiĝeno havis netrivitajn pantalonon, puran bluan ĉemizon, altan pintan pajloĉapelon kaj sandalojn. Granda bastkorbo, plenigita per kelkaj havaĵoj, kuŝis antaŭ li sur la tero.

Ili ne atentis la viron kaj iris rapide plu. Post iom da tempo Dobbs turnis sin al li kaj diris: „Rigardu, kion volas la indiĝeno de ni, li ĉiam sekvas nin.“

Barber turnis sin kaj diris: „Ŝajne estas tiel. Nun li ekstaras kaj ŝajnigas, kvazaŭ li serĉus ion en la vepro.“

Ambaŭflanke estis larĝa nepenetrebla vepro.

Ili iris plu, sed kiam ili turnis sin, ili vidis, ke la indiĝeno sekvas ilin. Li ŝajne iris eĉ pli rapide por pli proksimiĝi. Barber demandis: „Ĉu la ulo havas revolveron?“

„Mi ne vidis iun“, opiniis Dobbs.

„Ankaŭ mi ne. Mi demandas vin nur por ekscii, ĉu vi eble vidis ion. Ŝajne li do ne estas bandito.“

„Ne tre certas“, diris Dobbs, post iom da tempo, turninte sin denove kaj ekvidante la sekvantan indiĝenon. „Li povus esti ja spiono de la banditoj, kiu tenu nin en okuldistanco. Se ni iam starigos kampadejon, li atakos nin aŭ venos liaj komplicoj.“

„Malagrabla“, respondis Barber. „Plej bone estus, se ni retroirus. Oni scias neniam, kion intencas fari tiuj uloj.“

„Sed kion oni prenu de ni?“ Dobbs serĉis sekurecojn.

„Ĉu preni?“ ripetis Barber. „Ni ja ne portas ŝildon je ni, ke ĉiu el ni havas proksimume peson je si. Kaj se ni portus tian ŝildon, ili misfidus tion, sed tiom pli atakus nin, ĉar ili pensus, ke ni havas amason da mono. Du pesoj por tiuj uloj cetere estas amaso da mono. Ni havas ja ankaŭ ŝuojn, pantalonojn kaj ĉiu ĉemizon kaj ĉapelon. Ĉio ĉi estas valoraĵoj.“

Sed ili iris plu. Ĉiufoje, kiam ili turnis sin, ili vidis, ke la indiĝeno estas malantaŭ ili, apenaŭ dek kvin paŝojn for de ili. Kiam ili haltis, ankaŭ la indiĝeno haltis. Ili eknervozis. Ili ekŝvitis.

Dobbs spiris profunde. Fine li diris: „Se mi nun havus revolveron aŭ fusilon, mi mortigus lin sen cerbumo. Tiukaze oni havus sian pacon. Tion mi ne plu eltenas. Kiel estus, Barber, se ni kaptus kaj ie firmligus lin al arbo lin aŭ batus lin sur la kapon tiel, ke li ne plu povos persekuti nin?“

„Mi ne scias“, respondis Barber, „ĉu tio estus bona. Eble li estas tute senkulpa. Sed se oni povus liberigi sin de li, tiukaze tio estus vere agrabla.“

„Mi nun ekstaras kaj lasas proksimiĝi lin“, diris Dobbs subite. „Mi ne plu povas iri tiel. Tio faras min freneza.“

Ili haltis, sed ili moviĝis tiel, kvazaŭ ili volus preni ion de la arbo, frukton aŭ birdon.

Ankaŭ la indiĝeno ekstaris.

Dobbs nun ekhavis ideon. Li okupiĝis pli kaj pli fervore pri la arbo, kvazaŭ tie estus iu mirindaĵo inter la branĉoj. Kiel supozite, la indiĝeno tiel lasis trompi sin. Li proksimiĝis paŝon post paŝo, gapis dum tio al la arbo. Kiam li fine staris tute proksime de ambaŭ viroj, Dobbs faris ekscititan geston kaj kriis: „Jen, jen li forkuras!“ Kaj dum tio li montris per etenditaj brakoj al la ĝangalo, alŝirante Barberon kaj montrante precize la forkuranton al li.

Tuj poste li turnis sin al la indiĝeno kaj diris: „Kien vi volas iri? Kial vi ĉiam postkuras nin?“

„Mi volas iri tien“, diris la indiĝeno kaj montris al la vojdirrekto, en kiu intencis iri ankaŭ Barber kaj Dobbs.

„Kien?“ redemandis Dobbs.

„Tien, kien vi ambaŭ intencas iri.“

„Vi ja ne scias, kien ni volas iri“, diris Dobbs.

„Tamen, tion mi ja scias“, respondis la indiĝeno trankvile. „Vi volas iri al la naftokampejoj. Tien ankaŭ mi volas iri, eble mi ricevos laboron.“

Barber kaj Dobbs elspiris trankviligite. Tio estis la vero. La viro volis serĉi nur laboron, kiel ili. Kaj li efektive ne aspektis tiel, kvazaŭ li estus bandito.

Sed por forigi ankaŭ la lastan reston de misfido en si, Dobbs demandis: „Kial vi ne iras sola? Kial vi postkuras nin?“

„Mi sidis tie jam tri tagojn, de frue ĝis vespere, ĉe la finaĵo de la urbo kaj atendis blankulojn, kiuj volas iri la la kampejoj.“

„Vi trovas la vojon ankaŭ sola, ĉu ne?“

„Jes, konsentite“, diris la viro. „Sed mi timas la jagarojn kaj la pumojn. Estas tiom da ili ĉi tie. Tial mi ne emus iri sola. Ili povus mangi min.“

„Mi ne supozas, ke ni mem estas tre sekuraj kontraŭ la jaguaroj kaj pumoj“, opiniis Dobbs.

„Male“, rediris la indiĝeno. „Ili ne ŝatas blankulojn. Ili preferas atakas indiĝenojn. Sed, se mi iras en akompano, ili ne venos kaj ankaŭ ne manĝos min.“

Nun Barber kaj Dobbs ridis pri siaj propraj timoj, kiujn ili havis, kiam ili tiel devis sperti, ke tiu indiĝeno, kiun ili tiom timis, havis pli da timo ol ili mem.

La indiĝeno iris nun kun ili. Li parolis malofte kaj trotis aŭ post la aliaj aŭ apud ili, tiel, kiel la vojo permesis tion.

Mallonge antaŭ la sunsubiro ili alvenis en indiĝenan vilaĝon kaj intencis tranokti en iu el la kabanjoj. La indiĝenoj estas kutime tre afablaj gastoj, sed ĉiu el ili forsendis ilin al la najbaro, ĉiufoje kun la senkulpigo, ke ili ne havas lokon. La vilaĝo havis nur kelkajn kabanjojn. Kaj ankaŭ la lasta vilaĝa loĝanto, vizitata de ili, ne volis akcepti ilin.

Li montris afliktitan timigitan vizaĝon kaj diris: „Estos pli bone, se vi iros al la sekva vilaĝo. Jen granda loko kun pli ol tridek kabanjoj. Tie vi ĉiuj estos afable akceptitaj.“

„Kiom malproksime tio estas?“ Dobbs demandis misfide.

„Ĉu malproksime?“ demandis la indiĝeno. „Tio estas tute ne malproksima. Tio estas nur ĝuste du kilometroj ĝis tie. Tie vi estos tre frue antaŭ la nokto. La suno ja ankoraŭ ne malleviĝis tute.“

Ne restis io alia, ili devis ekiri al la sekva vilaĝo. Ili migris du kilometrojn, sed vilaĝon ili ne ekvidis. Ili iris du pliajn kilometrojn, kaj ankoraŭ tiam vilaĝo ne estis ekvidebla.

„Ili ruze mensogis al ni“, diris Barber ĉagrenite. „Mi volus scii nur tion, kial ili ne volis gastigi nin kaj nin sendis ĉi tien en la sovaĝejon?“

Dobbs, ne ĉagrenite malpli, diris: „Ankaŭ mi ja iom konas la indiĝenojn. Kaj mi devus scii tion pli bone. Tiuj kutime neniam malakceptas iun. Sed ili timis nin. Tio estas la tuta kaŭzo. Ni estas tri viroj, kaj en la nokto ni facile povus mortbati la familion.“

„Tia sensencaĵo“, rediris Barber. „Kial ni mortbatu la kompatindajn povrulojn? Ili havas ja mem nenion, eble eĉ malpli ol ni.“

„Sed ili timas nin. Tiukaze oni povas fari nenion. Ili prijuĝas la valoraĵojn, kiujn ili posedas, tute alie ol ni. Tie estas ĉevalo aŭ du kaj bovino aŭ kelkaj kaproj. Ĉio ĉi estas grandaj valorajoj. Ni ja povus esti banditoj. Kiu diru al ili, ke ni ne estas banditoj? Banditojn ili timas pli ol ĉion.“

Barber kapjesis kaj diris tiam: „Tiel tio estas ja tute komprenebla, sed kio nun? Ni sidas nun ĉie tie meze de la vepro kaj post dek minutoj estos tenebra nokto.“

„Do nenio alia restos al ni krom halti ĉi tie.“ Dobbs ne vidis alian eblon. „Vilaĝo ĉi tie certe ne tre malproksimas. La vojo estas ofte frekventata, ĉie kuŝas merdo de bovoj, ankaŭ de ĉevaloj. Sed la vilaĝo eble atingeblos nur post horo. En la

nokto ni ne povas migri. Jen ni devojiĝus kaj eble retroviĝus en iu marĉo aŭ en iu densa vepro, el kiu ni ne plu trovus vojon. Kaj eĉ, se ni venus en la vilaĝon, ili sendus la hundojn sur nian nukon. Je tiu tempo estas tute suspektige, se tri viroj venas en vilaĝon kaj petas pri tranoktejo.“

Per kelkaj flamigitaj alumetoj ili rastis la teron por trovi plaĉan dormejon. Sed tie estis nur larĝaj kaktoj kaj aliaj dornaj arbustaĵoj. Sur la tero mem rampadis ĉiaj eblaj bestetoj, kio estus malhelpinta ripozadon aŭ eĉ dormadon. Kaj nun la indiĝeno aldone eĉ parolis pri jaguaroj kaj pumoj, kiuj ĉi tie kuradas en tiu regiono libere. La indiĝeno certe devis scii tion, li estis ja el tiu regiono.

Ili iom da tempo staradis, tiam ili fariĝis lacaj de la starado kaj tamen sternis sin. Dobbs kuŝis apud Barber. Sed apenaŭ ili kuŝis du minutojn, la indiĝeno jam ŝovis sin inter ilin kiel hundo. Tute memgardeme kaj lante, sed kun emfazo. Li sentis sin sekura nur, se li kuŝis inter ambaŭ blankuloj; ĉar la jaguaro elektos ja ne ĝuste la mezulon, sed tiun, kiu kuŝas ekstere. Kaj por tiu ĉi nokto li havos ja sufiĉe je unu el ili.

Sed Dobbs kaj Barber ne konsentis pri tiu disdivido de la lokoj. Ili premis kaj puŝadis la indiĝenon tiom, ke li certe estis tute kovrata de bluaj makuloj. Sed li akceptis tion trankvile kaj sen rezisto. Kiam ili finfine estis elŝovintaj lin per pugnoj kaj piedoj el la mezo, li atendis certan tempon, ĝis li supozis, ke ili ekdormis. Kaj sufiĉis nur, ke tiu aŭ tiu ĉi el ili iom turnis flanken, malfermigante tiel malvastan fendon inter ambaŭ, jen li tuj ŝovis sin interen kaj baraktadis tiom longan tempon, ĝis kiam li denove kuŝis laŭ la tuta

longo inter ambaŭ. Ili fine rezignis pri la batalo, ĉar estis tute vane.

Barber vekigis pro iu reptilo, kiu kuris trans lian vizaĝon. Li rektiĝis sidante kaj palpe rastis sian korpon. Sed li trovis nenion danĝeran. Dum li nun tiel sidis kaj aŭskultis la kantadon kaj ĉirpadon de la nokta vepro, li subite skuiĝis pro ektimo.

Li aŭskultis tute klare ŝteliran alproksimiĝon de atentemaj paŝoj. Ne estis dubo, estis la paŝoj de granda besto. Tuj kiam li denove estis aŭskultinta la paŝojn kaj konvinkiĝis, ke li ne eraris, li vekigis skuante la ulon Dobbs.

„Kio tio estas?“ Dobbs demandis dormeme.

„Jen pumo aŭ jaguaro sur la spuro. Tuj post ni.“

„Mi pensas, ke vi revas“, diris Dobbs, malrapide vekigante. „Mi ne supozas, ke alvenas jaguaro kaj kuraĝe atakas nin.“

Li aŭskultis nun mem. Kiam li aŭskultis la brueton, li diris, pli rektiĝante: „Ŝajnas tiel, kvazaŭ vi pravas. Tio estas granda besto. Homo nokte ne ŝteliradas ĉi tie. Tiu havas pli da timo ol ni. Tio estas besto. La paŝoj estas sufiĉe pezaj.“

Ĉu la indiĝeno jam la tutan tempon kuŝis nedormanta aŭ nur nun vekigis, ne estis tute klara. Ĉiukaze li pensis, ke li estas plej bone protektata, se li ne anonciĝas kaj trankvile plu kuŝos inter ambaŭ. Sed nun li rektiĝis subite. Kaj tuj li staris. Lian vizaĝon oni ne povis ekkoni, ĉar estis tenebro.

Sed certe ĝi tordiĝis pro timo. El la tono de lia voĉo la du aliaj povis elsenti, kiel nun certe aspektas lia vizaĝo.

„Jen jaguaro, jen, tuj apud ni“, li diris kun tremanta voĉo. „Nun ni ĉiuj estas perditaj. Ĝi tuj eksaltos. Ĝi staras tie en la arbustaĵo kaj embuskas nin.“

Dobbs kaj Barber retenis la spiron. La indiĝeno sciis la irmanieron kaj la odoron de jaguaro, li ja apartenis al tiu regiono.

„Kion ni nun faru?“ demandis Dobbs.

„Plej bone, se ni krios kaj multe bruos“, konsilis Barber.

„Tio ne estas taŭga. Tio ne impresas jaguaron. Tio allogas ĝin eĉ pli kaj pli rapide.“

Senspire la triopo staris kaj aŭskultis la paŝojn. Dum minutoj ili aŭskultis nenion, tiam ili denove perceptis unu aŭ du paŝojn.

„Mi scias elirvojon“, diris Dobbs mallaŭte. „Ni grimpu ĉi tie sur arbon. Jen ni estos plej sekuraj.“

„Ankaŭ jaguaroj grimpas sur arbojn“, rediris Barber simile tiom mallaŭte. „Ili estas ja katoj, ili grimpas kaj saltas senpene.“

„Sed tio estas tamen la plej sekura loko“, Dobbs insistis pri sia plano.

Li palpadis atenteme ĉirkaŭ si kaj venis efektive post du paŝoj al mahagona arbo. Sen longan tempon plu pripensi la aferon, li komencis grimpi supren.

Apenaŭ la indiĝeno rimarkis, kio okazas, ankaŭ li tuj estis apud la arbo, nur por ke li ne iĝu la lasta kaj la plej malsupra. Li sekvis Dobbson sufiĉe rapide sur la arbon. Sed sian bastkorbon li kunprenis.

Barber ne volis restadi sola tie malsupre, kaj tial fine ankaŭ li postgrimpiis.

Jen supre, post kiam ili ennestigis sin tiel, kiel tio en la malhelo iel eblis, ili enspiris la unuan fojon denove iom pli libere kaj rigardis sian situacion pli trankvile. Ili nun sentis sin tie tamen pli protektata ol sur la tero. Barber tute pravis, kiam li diris: „Sube la jaguaro nin povas fortreni, sed ĉi tie oni povas firmteni sin.“

„Firmteni jes“, opiniis Dobbs. „Sed gambon aŭ brakon ĝi kunprenos.“

„Pli bone ol se oni devus tute kuniri“, diris Barber.

La laceco fariĝis pli granda kaj la timo malpli granda. La indiĝeno estis denove en la mezo, sub si li havis Barberon kaj super si Dobbson. Li sentis sin plej bone ŝirmata. Ĉiu el la triopo firmligis sin per pantalona zono al branĉo por malhelpi fali malsupren endorme.

Estis longa nokto, ofte interrompita de inkubaj sonĝoj kaj de revaj vizioj. Sed finfine mateniĝis.

En la hela lumo de la suno ĉio aspektis tre nature, nenio plu restis de la terurigo kaj de la sovaĝaj imagoj de la nokto. Eĉ la tera surfaco aspektis multe pli alloga ol ĝi aspektis nokte. Nur tridek paŝojn pli fore etendiĝis herbejo, kiu brilis intime tra la arboj.

La triopo sidiĝis kaj ĉiu ĉe la matenmanĝo fumis cigaredon. La indiĝeno aperigis tri sekajn tortiljojn, el kiuj li fordonis po unu al la aliaj.

Dum la triopo nun kune sidis, fumis kaj maĉis, kaj ĝuste foje ne parolis, ili aŭdis denove la paŝojn de la jaguaro. Ĉiuj samtempe timigite ekmoviĝis. Tiun manieron de la paŝoj ili konis tiel precize, kvazaŭ estus la paŝoj de iliaj plej proksimaj parencoj. Ili rekonis ilin post dek jaroj same tiel bone kiel en tiu momento; ĉar ili estis penetrantaj en ĉiun fibron de iliaj korpoj kaj tie firmkroĉiĝis.

En la hela bela tago jaguaro? Kial ne? Sed tiom proksime de tri homoj? Tio estis tamen tro nekutima.

Dobbs turnis sin en la direkto, el kiu venis la paŝoj en la nokto kaj ankaŭ tiumomente. Li rigardis observeme tra la arboj, al la herbejo kaj tie estis la jaguaro.

Nun ili ĉiuj povis vidi ĝin tute precize. La jaguaro paŝtis sin kaj estis ligita al arbostumpo per longa ŝnuro, por ke ĝi ne forkuru. Estis nedanĝera jaguaro, kiu estis jam ĝoja, se oni ne traktis ĝin malbone kaj permesis al ĝi la plezuron maĉi la herbojn. Jen azeno.

La indiĝeno diris nenion pri tio. Li sciis tute precize, ke li nokte aŭskultis jaguaron, kaj li konis jaguarojn. Dobbs kaj Barber rigardis sin reciproke. Ili diris eĉ ne vorton, sed ili fariĝis ambaŭ ruĝvizaĝaj. Tiam ili ridis, kvazaŭ ili volus diskrevi.

Finfine Dobbs diris: „Unu peton mi havas, kamarado, rakontu tion al neniuj. Alie ni nenie plu povus montri nin.“

03

La vilaĝo, pri kiu la indiĝenoj parolis je la pasinta vespero, perpiede malproksimis nur apenaŭ dudek minutojn. Ke ĉi tie estis alligita azeno kaj, ke tiu paŝtis sin, pruvis sufiĉe, ke iu vilaĝo proksimas. Sed ankaŭ povas esti, ke oni eraras, ĉar la azeno povas aparteni al lignohakisto aŭ al karbobruligisto. En la vilaĝo ili ricevis iom da manĝo: fabojn, tortiljojn kaj teon el citronfolioj. Malfrue posttagmeze ili alvenis en la unuan naftokampejon. Dobbs iris tuj al la inspektisto, sed tiu ne havis liberan okupon.

„Ĉu vi volas manĝi?“ demandis la inspektisto.

„Jes“, respondiis Dobbs. „Ni ankaŭ volonte tranoktiĝus ĉi tie, se tio eblus.“

„Certe troviĝos dormejo“, diris la inspektisto kaj reiris en sian barakon, mangestinte al la kuireja barako.

La indiĝeno ne iris de la nuko de la du aliaj. Li kroĉis sin al ili, kvazaŭ li estus ligita kun ili. Kiam ili nun transiris al la kuirejo, la ĉina ĉefo rigardis ilin, kaj tiam li decidis, ke ili devu manĝi en la kuirejo. Estis pro la indiĝeno. Se Dobbs kaj Barber estus solaj, ili manĝus en la manĝoĉambro por la blankaj laboristoj. Kun la indiĝeno tio ne estis ebla, ĉar ili havis siajn proprajn kuirejajn barakojn.

„Ni devos skui la viron de nia nuko“, diris Dobbs maĉante. „Ni ja ne povos vagadi kun li tra ĉiuj ĉi kampejoj, tio ne plu eblas tiel.“

„Morgaŭ matene ni forpelos lin hejmen“, rediris Barber, kiu ne volis fuŝi sian apetiton per tio, ke li nun faras planojn.

Pli poste Dobbs kaj Barber iris al la laboristoj, por aŭskulti, kio okazas ĉi tie aŭ en la najbaraj kampejoj.

„Nenio okazas“, diris longa svedo. „T troviĝas nur mortaj fontoj. Kvar havas salakvon, du havas sablon kaj ok havas nenion krom argilo. Ili malkonstruas ĉiujn. Ne necesas, ke vi iru plu. Pli sude oni denove boros. Sed tien vi ne povus iri de ĉi tie. Tiukaze vi devus iri tra Panuko aŭ vi povus iri ankaŭ tra Ebano, jen vi irus en alian distrikton.“

Ili trovis dormejon en provizeja remizo sur malnovaj sakoĵ, kie ili estis sekuraj kontraŭ azenoj, kaj kie ili povis postdormi la dormon, kiun ili perdis pro la jaguaroj en la pasinta nokto.

Matene aldone havigeblis konciza matenmanĝo, kaj poste ili ekmarŝis.

„Do, antaŭ ol ni iros ankoraŭ al la du aliaj kampejoj, kie eble io okazas, aŭ kie ni almenaŭ povos ricevi manĝon, ni devos mortigi la indiĝenon“, diris Dobbs, kiam ili estis duonon de horo for de la kampejo.

„Aŭskultu“, parolis Dobbs al la indiĝeno, „ni iros nun solaj. Ni ne plu bezonas vin.“

Timeme la indiĝeno rigardis supren kaj diris: „Sed, la jaguaroj, *señor!*“

„Tion vi mem devas intertrakti kun la jaguaroj“, nun enmiksiĝis Barber. „Ni volas liberiĝi de vi.“

„Jes, tio pravas“, diris Dobbs, „kaj se vi ne foriĝos libervole, tiukaze ni traktos vian felon per batoj, kaj sufiĉe draste.“

Sendecide la indiĝeno staris surloke. Li eĉ ne pensis pri tio peti aŭ persvadi ilin. Ambaŭ aliaj diris, ke li foriĝu kaj tion li devis akcepti. Ĉu li komprenis, ke li estas molesta, ĉu li komprenis, ke la duopo efektive havas la rajton elekti vojaĝan akompanion laŭplaĉe, ne fariĝis klara. Li staradis tie kaj diris nenion.

Dobbs kaj Barber ekiris. Sed kiel forpuŝita hundo, kiu ne povas disiĝi de sia mastro, la indiĝeno sekvis ilin plu. Fideleco aŭ sindonemo aŭ iu simila sento ne kondukis lin. Li estis tute sopra materiisto. Li sciis, ke ambaŭ iras al la naf-tokampejoj; li sciis, ke ambaŭ ĉiam ricevos ion por manĝi, kaj li sciis krome, ke tiukaze, se li kroĉas sin al ili, li neniam povos morti pro malsato. Se li irus sola, li ricevus en neniu kampejo eĉ nur paneron, apenaŭ de la propraj rasaj

kunuloj, kiuj tie dekope laboris en ĉiu kampejo. La timo pro la jaguaroj estis aŭtentika. Al la kampejoj li volis iri en ĉiu kazo, por demandi pro laboro; sed iri sola aŭ kun alia indiĝeno, li ne kuraĝis. Li konis la terurigojn pro la vepro kaj pro la ĝangalo pli bone ol la blankuloj.

Post kiam ambaŭ iris dum horo, Barber turniĝis kaj diris: „Jen tiu bruna diablo tamen denove ŝteliras post ni.“

Dobbs prenis ŝtonojn kaj komencis bombardi la indiĝenon per ili. Sed la indiĝeno lerte evitis la ŝtonojn kaj de tiam nur iom pli distance postrestis, por ke li ne estu trafata, kiam Dobbs aŭ Barber subite levus ŝtonon kaj ĵetus ĝin al la indiĝeno.

„Tiun ni ne skuos de la nuko“, diris Barber. „Mi ne plu scias rimedon.“

„Ni mortbatu lin kiel malsanan katon“, diris Dobbs kolere, dum li prenis denove ŝtonon kaj svingante ĵetis ĝin al la indiĝeno.

Kaj efektive, kiam ili alvenis en la sekvan kampejon, la indiĝeno denove trotis kun ili en la kuirejan barakon kaj kunricevis sian porcion da manĝo. La inspektisto faris strangan vizaĝon, kiam li vidis posttroti la indiĝenon malantaŭ la blankuloj.

Dobbs kaj Barber rakontis al la inspektisto, ke la indiĝeno ĉiam iras post ili, sed la inspektisto tiris la ŝultrojn supren. Li vere ne certis, kion li komencu kun tiaj, kiaj migras kun indiĝeno tra la kampejoj.

Ĉi tie en la kampejo ambaŭ havis la indiĝenon facile kapteble apud si, por sufiĉe bone povi trakti lian felon. Sed ĉi tie ili ne povus fari tion. La inspektisto tuj al la tuta triopo ordonus forlasi la kampejon, se ili komencus batali per pugnoj. Kaj nokte esti ekstere en la vepro, tio estis la lasta, kion deziris Dobbs kaj Barber.

Tiel okazis ankaŭ sekvmatene, la indiĝeno trotis ĉiam fidele malantaŭ ili, ĉiam restante ekster ĵetdistanco kaj kontraŭ ĉio, kion ambaŭ diris, li reagis tiel apatie, ke oni povis atingi nenion kontraŭ li. Li firme kroĉis sin al ili.

Jen ambaŭ finfine decidiĝis. Ĉi tie en la kampejoj iu laboro ja apenaŭ atendeblus, kaj tiel ili decidis reiri kiel eble plej rekte al la urbo. Estis la ununura eblo deskui la indiĝenon.

Malfrue antaŭvespere ili alvenis en Villa Cuauhtemoc, kie ili estis renkontintaj la indiĝenon je la strato al la kampejoj. Li ne miris, ke la vojaĝo jam estis je la fino. Li kaŭris sin denove sur sian lokon, kie li jam sidis antaŭ tri tagoj. Kaj tie li atendis novajn viktimojn, kiuj iros al la kampejoj.

Dobbs kaj Barber iris je la sama vespero reen al la riverbordo. Transiĝi ili jam ne plu povis. Ili dormis sur la ĉi-tiea rivera flanko sub larĝbranĉa arbo, kie ili krome renkontis tri aliajn dormogastojn, kiuj ĉi tie vivaĉis jam dum kvar semajnoj, ili dormis en la naturo sub tiu ĉi arbo kaj ricevis siajn manĝojn de la cisternŝipoj. Jen tagoj malsatigaj jen tagoj grasigaj. Estis tagoj, kiam ili ricevis sur la ŝipoj eĉ ne unu panmordaĵon kaj estis tagoj, kiam ili povis manĝi je tri aŭ

kvar ŝipoj je tagmanĝo kaj je vespermanĝo. Estis perfekta-
loteria ludo.

Je la sekva mateno ambaŭ estis transveturigataj per la
pramo al la urbo. En la malmultaj tagoj, dum kiuj ili for-
estis, en la urbo ŝanĝiĝis nenio. Ĉe la benko antaŭ la *Impe-
rial*, antaŭ la manĝorestoracioj, kiujn frekventis la naftuloj,
vagadis ankoraŭ nun tute la samaj uloj, kiuj estis tie antaŭ
du, tri, ses semajnoj kaj ripetadis siajn dirojn.

Barber iris denove siajn proprajn vojojn, kaj Dobbs inter-
tempe pli saĝiĝis nur pri tio, ke en la naftokampejoj la la-
boro estas same tiel rara kiel ĉi tie. Tiu sperto havis valoron.
Oni ne devis riproĉi sin, ke oni ne ekkaptis per ambaŭ ma-
noj ĉiun okazon, kiu ofertis sin. Pli ol postkuri la laboron,
kie ajn iu ekaperas, oni ne povas fari. En la naftokampejoj
estis neniun laboro kaj neniun ĉi tie.

Sed iumatene Dobbs ricevis okupon. Ŝarĝi maŝinpartojn.
Estis streĉa laboro, kaj li ricevis nur tri pesojn ĉiutage, de
kiuj ŝpareblis neniom. Post kvin tagoj ankaŭ tiu laboro estis
finita. Li staris tiam iutage ĉe la pramo, kiu kondukas tran-
sen al la stacidomo por la trajno al Panuko. Jen alkuris kvin
homoj, kiuj ŝajne devis tre rapidi.

Unu el ili, ne altstatura, sed fortika viro, vidis satri Dobbson
tie. Li haltis, diris ion al sia akompananto kaj vokis tiam
transen al Dobbs: „He, vi! Ĉu vi serĉas laboron?“

„Jes“, vokis Dobbs kaj proksimiĝis paŝon.

„Venu ĉi tien! Rapide! Mi havas laboron por vi, se vi ne timas laboron.“

Dobbs tre proksimiĝis nun.

„Mi transprenis kontrakton por ekipi naftokampejon. Viro ne venis. Li havas febron aŭ malarion. Mi ne scias kaj ne povas atendi la ulon. Vi povas anstataŭi lin.“

„Bone, mi faros. Kion oni pagas?“ demandis Dobbs.

„Mi pagos ok dolarojn ĉiutage. La manĝo ne enestas. Faras unu kaj okdek aŭ du dolarojn, mi ankoraŭ ne scias. Ses dolaroj restos nete en via poŝo. He? Ĉu jes?“

„Mi kunvenos.“ Dobbs, kiu ankoraŭ antaŭ dek minutoj kiel malsata kato estus postkurinta laboron por nur du dolaroj ĉiutage, kondukis nun tiel, kvazaŭ li faras komplezon al la kontraktisto, se li kuniras.

„Sed tiukaze vi tuj devos kuniri, ĉi-momente“, diris nun la kontraktisto haste. „Tiel, kiel vi staras ĉi tie. Por la alportado de viaj havaĵoj ni ne havas tempon. La trajno al Panuko ekveturos post kvarono de horo, kaj ni ankoraŭ devos transiĝi la riveron. Do ek, ek! Rapide, ekkuru! Eksagu!“

Li kaptis Dobbson ĉebrake kaj ŝiris lin kun si sur la pramon.

Pat McCormick, la kontraktisto, estis usonano de irlanda deveno. Li ne estis plu juna. La plej grandan parton de sia vivo li pasigis en la naftokampejoj de Teksaso kaj Meksiko. Li laboris kiel drilisto, kiel mekanikisto, kiel kamionisto, temporegistristo, provizejisto, pumpisto kaj krome en ĉiuj eblaj aliaj branĉoj, kiuj povas ekzisti en la naftokampejoj. En la lastaj jaroj li laboris pli ofte memstara. Li transprenis la ekipadon de la kampejoj. Kaj tiun laboron li transprenis kontrakte. Li faris sian prezon nur, post kiam li detale ekzamenis la lokon, kie la kampejo estu starigota. Por povi entrepreni tiun antaŭan ekzamenadon, necesis ĝuste la longa sperto, kiun li havis. Dependis de tio, kiom distancas la kampejo de la plej proksima trajnhaltejo, kiom ĝi distancas de la plej proksima strato, sur kiu ankoraŭ eblas veturi per kamionoj, ĉu estas vepro aŭ ĝangalo aŭ vastaj ebenaĵoj, kie la kampejo estas starigota. Ĉu akvo estas proksima, ĉu estas malkaraj helplaboristoj inter la indiĝenoj en tiu regiono, ĉio ĉi estis konsiderenda antaŭ fikseblas la prezo. Se la prezo estus tro kara, la kompanio eble transdonus la kontrakton al alia; se la prezo estus tro malkara, la kontraktisto perdis monon de siaj ŝparaĵoj. Sed la usonaj kompanioj ne avaris. Se oni pruvis al ili, ke ekzistis aŭ ekaperis cirkonstancoj, kiuj necesigis plialtigon de la kontraktsumo, ili estis pretaj postpagi.

De Panuko ili veturis per kamionoj, sur kiuj oni tuj kunprenis materialon al la sudaj distriktoj, ĝis finiĝis la sufiĉe malbona strato. De tiu finloko estis hakita vojo tra la vepro, ĉirkaŭ tri mejlojn longa. Tiu ĉi vojo estis ĝuste nur tiom

larĝa, ke la indiĝenaj helplaboristoj povis trairi kun pakmuloj. La vojo finiĝis en senarbejo ĉirkaŭ centmetra diametre, kiun oni estis hakinta el la vepro. En tiu senarbejo la kampejo estis starigota, ĉar la geologiaj ekspertoj de la kompanio konstatis, ke ĉi tie troviĝas tre verŝajne nafto.

Dudek indiĝenaj helplaboristoj loĝantaj en vilaĝoj, kiuj estis for kelkajn mejlojn, laboris ĉi tie jam dum kelka tempo por elhaki la senarbejon kaj por nun plilarĝigi la straton ĝis la ĉefstrato tiel, ke oni povu veturi sur ĝi per kamionoj.

La unuajn tagojn la ses viroj dormis en simpla tendo. Du ĉinoj zorgis pri la preparado de la manĝoj.

Traboj kaj tabuloj, ilaro, najloj kaj ŝraŭboboltoj estis jam alportitaj sur azenoj kaj muloj, kaj ĉiun duan horon alvenis nova karavano. La karavanestroj laboris simile kontrakte. Ili ricevis pagon por ĉiu kargo, do ne por la tempo, kiun ili laboris. Se oni estus paginta ilin laŭtempe, ili survoje sternus kaj dormus. Ankaŭ la elhakado de la senarbejo kaj de la strato, ĉio ĉi estis kontraktlaboro. La viroj bone enspezis tiel, multe pli bone, ol se ili laborus taglabore. Unue oni nun konstruis barakon, kie la blankaj laboristoj povos loĝi kaj dormi. Poste la kuirejo kaj la manĝohalo estis en la vico. Ĉio ĉi estis farita dum du tagoj.

Unu el la viroj nun estis liberigita de tiu laboro por starigi kun tuta grego el indiĝenoj la aliajn barakojn, dume la cetera kvinopo sub la komando de Pat starigis la arganon.

Tio estis tute diabla laboro. Dobbs ankoraŭ neniam laboris ĉe argano. Tre pezajn trabojn li devis alporti surŝultre, dume la suno senkompate arde radiis malsupren. Post tri tagoj liaj ŝultroj aspektis kiel kruda karno. La haŭto pendis ĉifone kaj strie de lia kolo, parte forbruligita kaj parte defrotita.

Kiam la traboj estis altrenitaj, oni devis trabori la truojn por la ŝraŭboboltoj. Kaj ĉio ĉi iris eksprese rapide. Oni apenaŭ ĝuste prenis al si la tempon por manĝado, por tute eluzi la tagan lumon. Horloĝon oni ne rigardis. De la unua brilo de la suno ĝis la lasta ruĝema rebrilo oni portis ion surŝultre kaj laboris kiel sklavo. Post sunsubiro oni laboris eĉ plu kun lanternlumo, se farendis laboroj, kiuj ĉe lanternlumo estis fareblaj. La elektra lumo sekvis nur multe pli malfrue, kiam la maŝinoj estis jam tie.

La pli spertaj viroj starigis la trabojn, kunigis ilin per boltoj, kaj apogis ilin per ŝtreboj, kaj la argano kreskis pli kaj pli alten, kaj pli kaj pli danĝera fariĝis la laborado en kapturnigaj altoj. La argankonstruistoj kroĉiĝis per genuo al ŝtrebo, dume ili kun ambaŭ brakoj kaj manoj kaj kun la subteno de la femuroj denove kaj denove ŝovis masivajn trabojn pli supren. Poste, en kapturniga alto, pendantaj pere de la genuartikoj, ili direktigis la pezajn trabojn tiom longe tien kaj tien kaj tiom longe tenis ilin, ĝis la boltoj estis ŝovitaj en la drilitajn truojn kaj firmŝraŭbitaj. La viroj devis esti kiel simioj. Eble eĉ pli lertaj ol ili, por ke ili ne falu malsupren, kaj por ke ili ne rompu sian nukon aŭ ne frakasu siajn brakojn kaj gambojn.

Finfine la preta *derrick*, la argano, estis kronebla. La pezaj feraj rulcilindroj, pere de kiuj moviĝas la larĝaj dratŝnuregoj, kiuj levas aŭ mallevas la drilon kaj la ŝlimforigilon, oni levis supren per vinĉo kaj fiksis ilin per firmaj boltoj.

La plej streĉiga laboro estis farita. Nun la maŝinejo estis en la vico. Poste la ilaro kaj la remizoj.

Intertempe la vojo estis irebla, kaj la unua kamiono traveturis de la trajnhaltejo rekte ĝis tie.

Malvasta rivero situis tri mejlojn for en la vepro. Al tiu rivero oni konstruis akvokondukilon, kaj borde de la rivero oni starigis la pumpstacion kaj surmetis la motorpumpilon. Ĝis tiu tago azenoj per kanistroj alportis la akvon de la rivero por la kampejo. Nun oni alpumpis kaj konservis ĝin en cisterno.

Tiam la vapormaŝino estis alveturigita per fortega traktoro. Je la sekva tago la traktoristo, kies traktoro aŭskulteblis kaj faŭkis, ĝemis kaj pumpumis ankoraŭ en distanco de mejloj, transdonis la vaporkaldronon.

Plian tagon poste oni altrenis la gigantajn lignajn pelradojn, kiuj aspektas kiel grandaj radoj de akvomuelilo, kaj trans kiuj moviĝas la kabloj kaj ĉenoj por la drilo, la ŝlimforigilo kaj la tuboj. Kaj alvenis la dinamoj. Oni elmetis la kurentkonduktilojn, kaj iuvespere ekbrilegis la loko en la vepro – kiu antaŭ malmultaj semajnoj ankoraŭ estis tute netuŝita en sia tropika soleco, tiel netuŝita kiel ĝi estis ekde la kreado de

l' mondo – en akre blindiga elektra lumo, kiu ne plu konas veprajn noktojn. De la vepro estis forprenita la nokta ripozo, kaj kien ajn trafis la radioj de la neniam haltanta lumo, la vepro komencis malsanadi. Kiel altaj montetoj kuŝis matene milionoj kaj milionoj da insektoj sub la elektraj lampoj.

De la maŝinpumpumado, kiu nun plenigis tage kaj nokte la vepron, la loĝantoj de la vepro estis forpelataj el sia patrio. Ili devis elmigri en nekonatajn novajn terenojn, kie ili esperis trovi trankvilon kaj manĝon.

Nun la efektivaj naftoviroj estis en la vico. La laboro de la *rigbuilder*, de la borstaciaj konstruistoj, estis farita. Ili reveturis al la urbo kaj atendis novan kontrakton. La nova kontrakto povus komenciĝi post tri tagoj, sed ĝi ankaŭ povus komenciĝi nur post ses semajnoj, kaj eblas eĉ, ke ili ankoraŭ post ses monatoj plu devus atendi la novan kontrakton. Nafto estas kiel ĵetkuba ludo. Oni pagas por kamp-ejo dekmil, dudek mil, kvindek mil da dolaroj, kaj se oni estos drilinta sen sukceso tiom, kiom tio ankoraŭ iel decas, tiukaze tie eble ne estas nafto, sed salakvo aŭ sablo aŭ argilo. Kaj tiukaze oni redonos la vepron al la laŭrajtaj posedantoj, kiuj tiom rapide kaj tiel emfaze reposedigas ĝin, ke jaron poste ĉiu spuro de homoj estas forviŝita.

La nafto estas hazarda ludo. Oni povas perdi sian tutan posedon, kaj oni povas gajni per kvinmil dolaroj kvin milionojn da dolaroj. Kaj tial ĉiuj, kiuj havas rilaton kun la nafto, estas hodiaŭ riĉaj kaj morgaŭ malriĉaj. Ili laboras semajnojn kaj monatojn meze de la vepro aŭ tute izolitaj en la

ĝangalo. Kaj kion ili tie perlaboris per streĉa laboro, tion ili disipas en tri tagoj en la urbo. Kaj la atentemuloj kaj ŝpar-emuloj, kiuj ne disipas la monon, simile perdas sian monon, ili atendas kaj atendas kaj atendas je laboro ĝis la lasta peso estas eldonita kaj tiam ili almozpetas la homojn, kiuj frekventas la *Imperialo*-n, la *Luizian*-on, la *Southern* aŭ la bankon. Ricevi okupon estas afero de bonŝanco en la nafto-regionoj, tiel kiel estas afero de bonŝanco trovi nafton.

Tiel okazis ankaŭ al Dobbs. Li staris tie kaj ne pensis pri laboro. Kaj jen ĝi kvazaŭ falis en lian poŝon.

„Kiel do estas nun pri mia mono?“ demandis Dobbs la kontraktiston.

„Pri kio temas?“ diris Pat. „Ne tiom urĝu min. Vi ja ricevos vian monon. Mi ne forkuros kun la mono de vi.“

„Tiukaze donu almenaŭ iom“, postulis nun Dobbs.

„Nu, en ordo“, respondis Pat. „Mi donas al vi tridek procentojn.“

„Kaj la alian?“ demandis Dobbs.

„Mi ne scias ankoraŭ, mi mem ne ricevis mian monon ĝis nun.“

Dobbs ricevis la tridek procentojn de sia perlaborita mono. La ceteraj viroj sian monon simile ne ricevis. Tiuj, kiuj energie urĝis lin, ricevis de Pat kvardek aŭ kvindek procentojn. Du aliaj, kiuj volis teni lin en bona humuro, por ke li denove

kunprenu ilin ĉe la sekva kontrakto, ricevis nur kvin procentojn, ĉar ili tute humile rakontis al li, ke ili ankoraŭ ne vespermanĝis kaj ankaŭ ne povas pagi sian hotelon.

„Mi volus scii nur tion, ĉu la mensogulo ricevis sian monon ĉu ne“, diris Dobbs al Kurtin, kiu kiel li apartenis al la kontrakto.

„Ja se oni scius tion“, respondis Kurtin. „La kompanioj estas foje tre malrapidaj, se temas pri la pagado de la kontrakto, ĉar la kontanta mono raras ĉe ili kaj nun komenciĝas la drilado, kiu forglutas amason da mono.“

Dum semajno nek Dobbs nek Kurtin trovis la kontraktiston McCormick. En sia hotelo li ne estis. Sed iutage Pat McCormick preteriris sur la alia flanko de la strato.

„Ek, sur lin!“ vokis Kurtin al Dobbs. Kaj kiel Satano li transsaltis. Kaj Dobbs estis tuj je lia flanko.

Kurtin kaptis la ulon Pat ĉe la ĉemiza maniko. Li ne surhavis jakon. „Kie estas nia mono, hundido. Donu nun tuj nian perlaboritan monon aŭ ni frakasos vin en pecetojn. Tuj!“ Kurtin diris tion sufiĉe laŭte kaj kun minacaj pugnoj.

„Kaj rapide kaj neniujn elturniĝojn plu!“ nun ankaŭ Dobbs enmiksiĝis. „Ni atendas nian monon nun jam dum pli ol tri semajnoj.“

„Estu trankvilaj, sinjoroj“, diris Pat retiriĝeme kaj tiris ilin kun si en koktelejon, kie li tuj mendis tri grandajn glasojn da habanero. „Ni povas ja klarigi ĉion ĉi ankaŭ tute tran-

kvile. Aŭskultu foje, mi havas en la sekva semajno denove belan novan kontrakton, kaj tuj poste ankoraŭ aldonan, unu el ili en Amatlan kaj la alian en Korkovado. Jen mi denove kunprenos vin ambaŭ. Vi estas fervoraj laboristoj, kun kiuj mi laboras volonte kune. Je via sano!“

Li levis sian glason kaj tostis ĝin kun la du aliaj.

Ili trinkis.

Tiam diris Kurtin: „Tio estas tute bona, ke vi denove volas preni nin en viajn kontraktojn. Sed sen mono ni ne laboros. Kie estas nia mono?“

„Mi ankoraŭ ne ricevis la monon. La ĉeko ankoraŭ ne estas ĝirita.“ Tiam li turnis sin samtempe al la koktelisto kaj komandis: „Ankoraŭ tri aldonajn grandajn habanerojn.“

„He, viro“, diris Kurtin nun senpacience, „ne supozu, ke vi nun povas elturniĝi plu, kaj ke vi superruzos nin per la brando.“

„Superruzi vin, ĉu?“ Pat ŝajnis sin mirigite. „Mi per brando vin superruzu? Tio estas ne tre...“

„Kio tio estas, estas al ni tute egala“, diris Dobbs. „Ni volas havi nian monon, por kiu ni laboris sufiĉe streĉe. Ĉu vi kunprenos nin denove en novan kontrakton ĉu ne, tio havas ja neniun valoron, se vi ne pagas.“

„Fihundulo damnita, kie estas nia mono?“ Kurtin elkriis tion subite, kvazaŭ li per unu fojo perdis siajn sensojn. Eble la brando havis alian efikon ol Pat atendis tion.

„Sed mi ja nur povas ripeti al vi, ke mi mem ne ricevis la monon ĝis nun.“

Jen Kurtin kaptis lin antaŭe je la gorĝo, skuis lin kaj diris: „Donu nun la monon, rabisto, aŭ mi frakasos vian kranion tuj ĉi tie sur la tabloplato.“

„Trankviliĝu, ĝentlemanoj, trankviliĝu“, nun la koktelisto enmiksiĝis. Sed krome li ne plu atentis la okazaĵon. Li purigis la koktelejan platon, tie, kie la glasoj postlasis siajn randojn kaj tiam bruligis cigaredon.

Pat estis fortika viro kaj li defendis sin. Sed Kurtin posedis la pli grandan koleron. Dobbs proksimiĝis, kvazaŭ ankaŭ li tuj volus salti al Pat.

Nun Pat elturniĝis el la gorĝa sufoko, retroiris duonon de paŝo kaj diris rikane: „Vi estas ja efektive ĝustaj banditoj. Tion mi estus devinta scii. Sed prefere mi fortranĉos al mi ion ajn, ol ke mi ankoraŭfoje prenos vin, banditojn, en mian kontrakton. Jen prenu vian monon, sed neniam plu vidigu vin.“

„Pri tio ni ne petos vian permeson“, diris Kurtin.

Pat ŝovis la manon en pantalonpoŝon kaj elteris manplendon da dolarbiletoj, kiujn li portis ĉifitaj en la poŝo.

„Jen via mono“, li diris al Dobbs. Ankoraŭ en tiu momento li estis dekalkulinta la ĝustan sumon. Li sciis en la kapo precize ĝis la cendo, kiom li ŝuldas al ĉiu el ili. Li ŝovis la monon al Dobbs, kaj tiam li dekalkulis per la sama mano, per kiu li tenis la biletojn, la monon por Kurtin kaj ĵetis ĝin transen al li.

„Do“, li diris nun laŭ tono, laŭ kiu oni traktas molestajn kreditorojn, „nun ne plu molestu min, mi vin petas. Vi havas nun vian monon, kaj mi tre gardos min ankoraŭfoje plu akcepti tiajn subhelpantojn, kiuj komprenas nenion, en mian kontrakton.“

Li ĵetis tri pesojn al la koktelisto, por la brandoj. Tiam li ŝovis la ĉapelon al la nuko kaj forlasis la koktelejon, ambaŭ virojn li tie lasis stari tiel, kvazaŭ ili ofendis lin neimageble impertinente.

05

„Nu, sed kial vi loĝas en la *Cleveland*-hotelo, ulo?“ demandis Dobbs Kurtinon, kiam ili paŝis sur la straton kaj preterpromenis la *Southern*-hotelon. „Tie vi pagas ja almenaŭ tri pesojn ĉiunokte.“

„Kvar“, respondis Kurtin.

„Kunvenu do al *Oso Negro*, kvindek centavojn“, konsilis Dobbs.

„Tie ĝi estas tro kota por mi kaj tie estas nur *beachcombers* kaj similaj fatrasuloj“, diris Kurtin.

„Estu laŭ via plaĉo. Sed, se via mono elĉerpiĝos, ankaŭ vi albordiĝos en *Oso Negro*, tiel, kiel ni ĉiuj. Mi ja mem ne devus loĝi tie. Sed mi volas kunteni miajn ŝpargroŝojn. Nescieblas, kiam denove io ekfloros por mi. Krome mi manĝadas ĉe la *Chink*, ĉe la ĉino, tie kostas ankoraŭ kvindek centavojn, tiel, kiel ĉiam.“

Ili iris ĝis la angulo de la *plaza*, kie estis la granda juvelomagazeno *La Perla*. Ili tie ekstaris kaj rigardis la belegaĵojn. Tie brilis orornamaĵoj kaj diamantoj. Tie videblis diademo por dek ok mil pesoj. Ili diris nenion, rigardis nur la stokitajn trezorojn, pensis pri la valoro, kiu tie prezentiĝis kaj pensis pri la amaso da mono, kiun devas posedi kelkaj uloj ĉi tie en la urbo por povi aĉeti tiajn aĵojn.

Eble tio, kion ili vidis kunigitaj tie, estis la kaŭzo, kiu foje deflankigis iliajn pensojn de la nafto. Ĉar tiu, kiu vivis tie, pensis nur pri nafto, pensis nur rilate nafton, kaj pensis nur pri viveblecoj, kiuj estas iel ligitaj kun la nafto. Ĉu oni laboris aŭ spekuladis, ĉiam temis pri nafto. Ili apogis sin dorse per la grandaj vitrotabuloj kaj rigardis kun enuo trans la *plaza-on*, malantaŭ kiu estis videblaj la ŝipmastoj. Tio memoris ilin ambaŭ pri vojaĝoj, kaj ankaŭ pri tio, ke estas ankoraŭ aliaj landoj kaj aliaj akirfontoj ol tiuj, kiuj estas disponeblaj en tiu urbo.

„Cetere, Kurtin, kion vi efektive intencas fari?“ demandis Dobbs post certa tempo. „Ĉiam staradi ĉi tie kaj atendadi,

ĝis kiam oni tute hazarde ricevas ion, pri tio oni fine fariĝas sata. Estas ĉiam nur atendado kaj atendado. La mono pli kaj pli malpliĝas, ĝis oni iutage havas neniom plu. Tiam la malnova fluto denove ekludas por almozpetadi tiujn, kiuj envenas el la kampejoj por tago aŭ nokto. Mi tute serioze meditas pri tio, nun foje fari ion alian. Ĝuste nun estas tempo, tiom longe, kiom oni ankoraŭ havas monon. Se ĝi estas for, tiukaze oni staradas kaj ne povas moviĝi.“

„La sama demando okupas min nun jam je la tria fojo“, respondis Kurtin. „Mi scias, kiel tio estas kaj kiel deruliĝas. Sed mi havas eĉ ne unu ideon. Fosi oron, tio estus la ununura ideo.“

„Jen vi diris“, interrompis lin Dobbs. „Pri tio ankaŭ mi ĝuste pensis. Estas fine ne pli riska spekulado ol atendi laboron en la naftokampejoj. Ekzistas ja apenaŭ plu regiono, kie tiom da oro kaj arĝento, ke oni elfosas ĝin, kiel ĉi tiu regiono.“

„Ni iru tien transen kaj sidiĝu sur la benkon“, diris Kurtin. „Mi volas diri la sekvan al vi, mi venis ĉi tien ne pro nafto, sed pro oro“, rakontis nun Kurtin, post kiam ili sidiĝis. „Mi volis labori en la naftodistriktoj nur dum certa tempo, ĝis kiam mi havos sufiĉe da mono en la manoj por prepari la orofosadon. Tio kostas sufiĉe da mono. Jen la vojaĝo, jen la ŝoveliloj, la hakiloj, patoj kaj la aliaj iloj. Krome oni devas havi la vivirimedojn dum kvar ĝis ok monatoj, ĝis kiam oni enspezos ion. Se fine prezentiĝos la finkalkulo, povas esti, ke oni perdis ĉion. Monon kaj penon, ĉar oni ne trovis ion.“

Dobbs atendis pri tio, ke Kurtin ankoraŭ parolos plu, sed Kurtin silentis, li ŝajne ne plu havis ion por diri.

Jen diris Dobbs: „La risko ne estas tro granda. Ĉi tie pigrumadi kaj atendi laboron, estas simile granda risko. Se oni bonŝancas, oni povas enspezi dum monato tricent dolarojn, eble eĉ pli, dum ses, dek, dek ok monatoj. Se oni mal-bonŝancas, oni ne trovas laboron, jen oni same tiel perdas ĉion. Tiel glate la oro ja ne kuŝas montete, ke oni devas nur forskrapi kaj ensakigi ĝin. Ankaŭ tion mi scias. Sed se ne estas oro, jen eble arĝento, kaj se ne arĝento, tiukaze estas eble kupro aŭ plumbo aŭ valorŝtonoj. Kvankam oni ne povas mem ekspluati ion tian, oni ĉiam trovas kompanion, kiu foraĉetas la terpecon de oni, aŭ kiu akceptas onin kun favoraj partoj kiel kompanianon. Ĉiukaze mi foje ĝisdetale pripensos la aferon.“

Ili parolis nun pri io alia. Tiel grave oni neniam rigardas tiajn interparolojn pri oroserĉado. Ĉiu diras kaj planas tion, kaj el dek mil da ili, tiam nur unu homo efektive ekiros kaj faros tion, ĉar tio ne tiel simple fareblas kiel ĉasi kuniklojn. Ne vivas ĉi tie eĉ unu viro, kiu ne pensis ĉeokaze almenaŭ iam pri tio serĉi oron. La multaj centoj de aliaj minoj por aliaj metaloj, kiuj estas ĉi tie en la lando, estis ĉiuj trovitaj kaj fonditaj de homoj, kiuj serĉis oron kaj tiam prenis tion, kion ili trovis. Kelkaj minejoj, en kiuj oni eligis nek arĝenton nek oron, alportas al sia posedanto pli da riĉoj ol ebligas multnombraj orminejoj. Ju pli la elektra industrio disvastiĝas des pli valora fariĝas la kupro. Povos veni la tempo, kiam oni rigardos oron malhavigenda. Pri kupro, plumbo kaj multaj aliaj metaloj oni ne povas diri tion tiel simple.

Neniu homo havas penson tute por si mem, kaj neniam iu tute por si mem havis originan ideon. Ĉiu nova ideo estas la kristaliĝinta produkto de mil diversaj ideoj, kiujn havis jam aliaj homoj. Unu el ili tiam subite trovos la ĝustan vorton kaj la ĝustan esprimon por la nova ideo. Kaj tuj, kiam la vorto ĉeestas, rememoras sin centoj da homoj, ke ili havis tiun ideon jam antaŭ longa tempo.

Kiam en iu homo ekmaturiĝas la penso kaj la plano entrepreni ion difinitan, oni povas esti certa, ke multaj homoj en lia proksimeco havas saman aŭ similan planon. Tial disvastiĝas amasaj psikozoj kun la rapideco de balaanta fajrobrulo.

Io simila okazis ĉi tie.

Kurtin volis restadi ankoraŭ nokton en la hotelo *Cleveland* kaj nur je la sekva tago transloĝiĝi al la *Oso Negro*. Kiam Dobbs venis hejmen, estis krom li nur tri usonanoj plu en la ĉambro. La ceteraj litoj tiutage ŝajne ne estis okupitaj. Unu el la novaj alvenintoj estis olda viro, kies hararo komencis fariĝi blanka.

Kiam Dobbs enpaŝis la ĉambron, la tri viroj interrompisian interparoladon. Sed post iom da tempo ili denove komencis interparoli. La oldulo kuŝis en lito, unu el la du aliaj kuŝis en lito en vestoj, kaj la tria sidis surlite. Dobbs komencis senvestiĝi.

Unue li ne komprenis, pri kio temas la interparolado. Sed tiam li komprenis per unu fojo, ke la maljunulo sciigas siajn spertojn kiel fosisto de oro al la pli junaj. La du pli junaj estis

venintaj ĉi tien por serĉi oron; ĉar oni rakontis en Usono ne-
imageblajn aferojn pri la ororiĉo de la lando.

„Oro estas diableca afero“, diris Howard, la pli aĝa. „Ĝi
ŝanĝas la karakteron. Oni povas havi kiom ajn multe de ĝi,
kiom ajn multe trovi kaj kiom ajn multe surpaki de ĝi, ke
oni sola tute ne povus forporti ĝin, sed ĉiam oni pensas pri
tio ricevi ankoraŭ iom pli aldone. Kaj por ricevi ankoraŭ al-
done iom, oni ĉesas fari diferencon inter justeco kaj maljus-
teco. Se oni foriras al oro, oni intencas kontenti jam pri
tridek mil dolaroj. Se oni trovas nenion, oni malpliigas siajn
pretendojn je dudek mil dolaroj, poste je dek mil, kaj iam
oni deklaras, ke oni estus tute kontenta pri kvin mil dolaroj,
se oni povus nur trovi ilin, ankaŭ se oni devas tre pene la-
bori por tio. Sed, se oni poste trovas ion, oni ne estas satige-
bla per la origina espero pri tridek mil dolaroj, sed oni gran-
digas la sumon pli kaj pli kaj volas havi kvindek mil, cent
mil, ducent mil dolarojn. Tiam venas la komplikaĵoj, kiuj
ĵetadas onin tien kaj tien kaj ne plu permesas, ke oni trank-
viliĝu.“

„Sed ne por mi“, diris unu el ambaŭ, „ne por mi, tion mi
povus priĵuri. Dek mil kaj finon! Finon, kaj se tie ankoraŭ
atendus duono de miliono. Dek mil estas ja ĝuste la sumo,
kiun mi bezonas.“

„Kiu ne fosis mem oron“, opiniis Howard kun sia hezitema
parolmaniero, „tiu ne akceptas tion. De hazardludejo oni
povas facile foriri, de monteto da oro, kiun oni devas nur
preni por ekposedi ĝin, neniun povas foriri. Mi fosis en
Alasko kaj trovis oron. Mi fosis en *British-Columbia*, en

Aŭstralio, en Montano, en Kolorado. Kaj mi kunskrapis atentindan monteton. Sed nun mi estas ĉi tie en tiu *Oso Negro*, kaj punkton. Mian lastan kvindek milon mi perdis pro nafto. Nun mi devas almozpeti konatajn amikojn sur la strato. Eble mi ankoraŭfoje ekiros per miaj maljunaj ostoj. Sed mi ne havas la necesan kapitalon. Cetere estas ĉiam tiel: Se oni provas tion sola, estas plej bone. Sed oni devas povi elteni la solecon. Se oni provas tion duope aŭ triope, ĉiam iu murdo embuskas onin. Se oni provas tion dekope, tiukaze ne rezultiĝos multe por unu viro, kaj kvereloj kaj murdo estas eĉ pli ĉirkaŭe. Tiom longe, kiom oni ne trovis ion, la frateco eltenas. Sed, se la montetoj kreskas kaj kreskadas, tiam la frateco fariĝas kanajleco.“

Kaj tiel la pli aĝa komencis rakonti orohistoriojn, historiojn, kiuj inter la vojaĝgastoj de la Oso Negro kaj de similaj tranoktejoj estas aŭdataj kun pli da fervoro ol la plej senhontaj amrakontoj. Se tia maljuna orofosisto rakontas, li povas rakonti la tutan nokton, kaj neniu ekdormas kaj neniu vokas: „Nun mi volas havi kvieton.“ Tia vokado pri kvieto ja en ĉiu kazo estus vana, egale ĉu temus pri rakontoj, pri oro aŭ pri ŝtelistaj rakontoj aŭ pri amrakontoj. Kvieton oni ja rajtas postuli. Sed, se iu farus tion tro ofte aŭ eĉ tro emfaze, sekvus hajlo de pugnoj, ĉar la rakontistoj insistis rajti same tiel sidi ĉi tie, kiel tiuj, kiuj volas havi sian pacon. Estas la rajto de ĉiu homo pasigi siajn noktojn kun rakontado, se la homo sentas la bezonon pri tio. Se tio al alia ne plaĉas, li havas la rajton serĉi pli kvietan lokon. Kiu ne povas trankvile dormi inter la tondrado de kanonoj, inter la klakado de ĉaroj, inter la kraĉospiroj de aŭtomobiloj, inter

la pelmelo de homoj alvenantaj, forirantaj, ridantaj, kantantaj, babilantaj kaj insultantaj, tiu ne vojaĝu. Tiu ne loĝu en hoteloj.

„Ĉu vi konas la historion pri la Mino de la Verda Akvo en *New Mexico*?“ demandis Howard. „Tiun vi certe ne konas. Sed mi konas la viron Harry Tilton, kiu ĉeestis, kaj de kiu mi eksciis la historion. Jen aro de kvindek viroj ekiris por serĉi oron. Ili ne iris tute blindaj. Jen malnova onidiro, ke en valo estas riĉa oromino, kiu estis trovita de la malnovaj meksikanoj kaj ekspluatata, kaj kiun pli malfrue la hispanoj forprenis de ili, post kiam oni devigis malkaŝi la lokon de la mino de la indiĝenoj per teruraj torturoj, per elŝirado de langoj, per ekborado de kapoj, kaj per pliaj tiaj kristanaj ampruvoj.

Proksime ĉe la mino estis tute malgranda lago, kiu kuŝis en rokovalo. Kaj la akvo de la lago estis verda kiel smeraldo. Tial oni nomis la minon *Mina del Agua Verde*, Mino de l' Verda Akvo. Estis nekutime riĉa mino. La oro etendiĝis pura en larĝaj vejnoj. Oni simple devis ĝin nur preni.

Sed la indiĝenoj kroĉis malbenon al la mino. Tiel asertis tion la hispanoj, ĉar ĉiuj hispanoj, kiuj havis kontakton kun la mino, rapide mordis en la polvon. Kelkaj pro serpentaj mordoj, aliaj pro febro, aliaj pro teruraj haŭtmalsanoj aŭ pro malsanoj, kies kaŭzon neniu povis klarigi. Kaj iutage la mino estis malaperinta. Neniu homo plu videblis, kiu tiutempe estis ĉe la mino.

Kiam la sendaĵoj ne plu alvenis kaj ankaŭ ne alvenis plu raportoj, la hispanoj sendis ekspedicion al la mino. Kvankam la mino estis ekzakte desegnita en la mapojn, kaj kvankam oni povis sufiĉe longe sekvi la vojon, ne troveblis plu la mino. Kvankam estis facile difini ĝian situon. Jen tri krutaj montopintoj, kiuj ĉiuj troviĝu en linio, ĉar tiukaze oni estus sur la ĝusta vojo, kaj se kvara montpinto, kies formo estas tre atentofrapa, ekmontriĝos kaj staros en certa angulo al la linio, jen oni estas tiom proksima al la mino, ke oni ne plu povas mistrafi ĝin. Sed kvankam oni serĉis dum monatoj, oni trovis nek la minon, nek la rokolagon. Tio estis en la jaro 1762.

Tiu riĉa mino neniam perdiĝis el la memoro de tiuj, kiuj interesiĝas pri orominoj.

Kiam la usonanoj anektis Nov-Meksikon, tuj denove viroj ekmarŝis por serĉi tiun minon. Multaj ne revenis. Kaj tiuj, kiuj revenis, estis preskaŭ idiotoj pro la vana serĉado kaj la halucinoj, kiujn ili havis pro la vagado en tiu rokovalo.

Estis tiam meze de la okdekaj jaroj, mi supozas, ke estis en la jaro 1886, ke denove iuj homoj ekiris por serĉi oron, ĝuste tiuj dekkvin viroj. Ili havis kopiojn de la malnovaj raportoj kaj kopiojn de la malnovaj hispanaj mapoj. Tio pri la kvar montopintoj estis ja tre simpla. Sed kiom ajn ofte kaj kiel ajn precize ili povis uzi la montpintojn kiel celdirekton, tamen de la mino estis videbla nenio. Ili fosis kaj eksplodigis rokojn tie kaj tie, sed montriĝis eĉ ne spureto. Ili laboris en taĉmentoj, ĉiu taĉmento triope, por povi rasti pli grandan

ĉirkaŭaĵon. Iliaj nutraĵoj fariĝis pli kaj pli raraj, sed la viroj ne rezignis.

Iam, malfrue posttagmeze, taĉmento preparis sian vespermanĝon. La fajro brulis, sed la kafo ne kuireblis, ĉar la vento, kiu fridetigis la kruĉon, estis tro forta. Tial iu komencis fosi pli profunde en la tero. Kaj kiam li estis fosinta ĝis profundo de futo kaj duono, li trovis oston. Li ĵetis la oston flanken sen rigardi ĝin pli precize kaj ŝovis nun la fajron en la truon, post la farado de aerkanaletoj.

Kiam la taĉmento sidis poste ĉe la vespermanĝo, iu el ili hazarde prenis la oston en manon kaj pentris per ĝi en la sablo.

Tiam lia najbaro subite diris al li: ‚Lasu min foje rigardi la oston.‘ Kaj post iom da tempo li diris: ‚Tio estas braka osto de homo. Nu, de kie estas la osto?‘

La viro, kiu fosis la truon, diris, ke li trovis ĝin dum la fosado kaj tiris la oston el la sablo.

‚Tiukaze tie devas kuŝi la tuta skeleto, kiel venu sola brakosto ĝuste ĉi tien?‘ diris la viro pripenseme.

Tiam jam estis malhele. Ili vualis sin en siajn kovrilojn kaj sternis sin por dormi.

Sekvatage diris tiu, kiu trovis la brakoston, mi nomu lin Bill, ĉar mi ne scias lian nomon, jen do diris Bill: ‚Tie, kie la brakosto estis, devas esti la skeleto. Nun en la nokto venis penso en mian kapon. Mi demandis min, kial la skeleto venis tien.‘

„Simplas, estas mortbatito, aŭ mortinto pro malsato“, diris iu el ili.

„Tio kompreneble estas ebla“, respondis Bill. „Ĉi tie iradis ja multaj. Sed mi ne supozas, ke oni ĝuste ĉi tie mortbatis ilin, aŭ ke ili ĝuste ĉi tie mortis pro malsato. Envenis al mi nun la penso, ke la mino estis ŝutkovrita pro sabloŝtormo aŭ per tertremo aŭ per montofalo aŭ per io simila. Kaj ĉar revenis de la hispanoj neniuj, ili dum tio estis ŝutkovritaj. Ili estis ŝutkovritaj en la proksimo de la mino. Kvankam tiu brakostoj ankaŭ tute bone povus aparteni al iu, kiu serĉis ĉie tie antaŭ ni kaj mortis ĉi tie; sed tute same eblas, ke tiu ĉi brakostoj apartenas al iu el la ŝutkovritaj hispanoj. Kaj se ĉi tie kuŝas lia brakostoj, kuŝas ankaŭ tute proksime lia skeleto. Kaj se ni sekvas la skeletojn, ni eble trovos ankaŭ la minon. Mi pensas, ke ni foje fosu ĉi tie ĉe la fajrotruoj.“

Ili fosis kaj trovis efektive la ceterajn partojn de la skeleto, pecon post peco. Ili fosis plu en cirklo kaj trovis duan skeletojn. Ili fosis plu en la direkto de la dua skeleto kaj venis sur trian. Kaj tiel ili trovis la direktojn, en kiu okazis la montofalo aŭ la tertremo. Ili sekvis la vojon kaj elfosis ilojn, kaj fine ili malkovris orajn bulojn, kiuj evidente estis disĵetitaj.

„Ni havas la minon. Kion fari nun?“ diris Bill.

„Ni voku la aliajn“, diris unu el ili.

„Ke vi estas azeno, mi sciis ĉiam“, diris la tria. „Sed, ke vi estas tia granda bovo, tion mi ne supozis. Ni tenos la buŝojn

tute fermitaj kaj diros nenion. Ni reiros kun la aliaj post kelkaj tagoj. Kaj post kelkaj semajnoj ni triope denove venos solaj ĉi tien kaj ekspluatos la minon.‘

La triopo interkonsentiĝis pri tio. Ili kunkolektis la malmultajn orajn bulojn kaj enpoŝigis ilin, por ke ili povu aĉeti taŭĝan ekipaĵon por tio. Tiam ili zorgeme denove ŝutkovris ĉion. Sed antaŭ ol ili povis kovri ĉion, proksimiĝis alia taĉmento. La viroj de la alia trupo misfide rigardis la fosadon, kaj tiam diris unu el ili: 'He, buboj, kiun ludon vi ludas ĉi tie? Ĉu vi volas deteni nin de la sankta meso?'

La triopo kontestis, ke ili trovis ion, kaj ke ili volis trompludi. Ekestis kverelo. Kaj kvazaŭ la aero estus forportita la paroladon de la unua taĉmento, kolektiĝis tie en la sama horo du pliaj taĉmentoj. La unua taĉmento kaj la dua, kiu surprizis la unuan, ĝuste estis preskaŭ pretaj forĝi pakton, ĉe kiu la ceteraj tri taĉmentoj estu ekskluditaj, kiam alvenis preskaŭ samtempe du pliaj taĉmentoj.

Nun kompreneble la dua taĉmento tuj retiriĝis de la preskaŭpakto kaj kulpigis la unuan taĉmenton pri perfido. Unu el la viroj estis forsendita por voki ĉi tien ankaŭ la lastan taĉmenton. Kaj kiam ĝi alvenis, oni interkonsiliĝis kaj decidis pendumi la tri membrojn de la unua taĉmento, pro la intencita silentigo de la trovo.

La tri viroj estis pendumitaj. Neniu protestis, ĉar forfalis tri pretendataj partoj, kiuj nun estis dispartigeblaj inter la ceteraj dekdu viroj.

Poste oni eklaboris kaj malfermis la minon. Estis efektive neelĉerpeble riĉa mino. Sed post kelke da tempo la nutraĵoj fariĝis tiom raraj, ke kvin viroj estis elsenditaj por alporti ilin.

Harry Tilton, kiu mem rakontis ĉion tion al mi, diris tiam, ke li estis jam kontenta pri tio, kio ĝis tiam fariĝis lia parto, kaj ke li volis formigri kun la kvin viroj, kiuj alportu la nutraĵojn. Li prenis sian parton kaj foriris. En la banko oni pagis al li por tio dudek ok mil dolarojn. Por la mono li aĉetis al si bienon, kie li setlis por ĉiam.

La kvin viroj, kiuj foriris por la nutraĵoj, aĉetis pakĉevalojn, pli bonajn ilojn, abundajn nutraĵojn, kaj registrigis sian rajton pri parto de la mino. Poste ili revenis.

Kiam ili alvenis la minon, ili trovis la kampadejon bruligita teren, kaj la postlasitajn virojn murditaj, aŭ pli ĝuste dirate, mortbatitaj de la indiĝenoj. La oro ne estis tuŝita. Se oni juĝas laŭ la spuroj, okazis terura batalo, en la tempo, kiam la viroj forestis por aĉeti nutraĵojn. La revenintaj viroj entombigis siajn mortigitajn kamaradojn kaj komencis plu labori en la mino.

Pasis nur tri aŭ kvar tagoj, jen la indiĝenoj revenis. Ili estis pli ol sesdek virojn. Ili tuj atakis kaj mortigis la ceterajn virojn. Sed unu el tiuj viroj ne estis mortigita, sed nur tre grave vundita. Kiam li rekonsciiĝis, li rampadis antaŭen. Dum tagoj aŭ semajnoj. Li ne sciis tion precize. Fine trovis lin bienisto kaj kondukis lin en sian hejmon. Li rakontis

siajn travivaĵojn. Sed antaŭ ol li povis priskribi la lokon, kie ĉio ĉi okazis, li mortis pro siaj vundoj.

La bienistoj de la regiono, kie la viro mortis, ekiris por trovi la orominon. Ili serĉis multajn semajnojn, sed ili ne trovis ĝin. Harry Tilton, kiu iris al unu el la nordaj ŝtatoj, eksciis nenion pri la aferoj, kiuj okazis tie. Li ne plu zorgis pri tio, li vivis kontenta en sia bieno kaj supozis ĉiujn siajn kamaradojn, kiuj fosadis kun li, riĉaj aŭ bonstataj viroj, kiuj, akirintaj sufiĉe da oro, vojaĝis en la orientan parton de Usono. Li mem estis silentema homo. Li parolis pri tio, ke li akiris sian monon per orofosado. Sed tio ne estis nekutima. Ĉar li ne troigis, sed, kiam li efektive foje parolis pri sia orfosista tempo, nur rakontis tute preterire kaj simple, tiu riĉa mino tute forgesiĝis.

Sed iom post iom pli kaj pli konkretiĝis la onidiro, ke Tilton akiris sian monon en malmultaj tagoj. Tion li ne kontestis. Kaj el tio oni konkludis, ke la loko, kie li fosis la oron, devas havi riĉajn trezorojn. Pli kaj pli da ĉasantoj de l' fortuno urĝis lin ellabori planon, tiel ke oni povu retrovi la minon. Li fine efektive faris tion. Sed intertempe pli ol tridek jaroj pasis. Lia memoro ne estis plu tiel bona. Mi formarŝis kun unu el la trupoj, kiuj iris laŭ la plano.

Ni trovis ĉiujn ĉi lokojn, kiujn priskribis Tilton. Sed la minon mem ni ne trovis. Eble ĝi estis ŝutkovrita plian fojon pro montofalo aŭ per tertremo, aŭ la indiĝenoj forviŝis ĉiujn spurojn, kaj tiukaze ili faris tion tiel lerte, ke troveblis nenio. Ili ne volis havi homojn en sia regiono; ĉar tia mino logus

centojn de homoj kaj la regiono estus ĵetita en tian tumulton, ke la vivo, kiun ili kutimis vivi, estus fuŝita.

„Ja, se oni povus trovi tian minon“, finis Howard sian rakonton, „tiukaze oni estus la gajninto. Sed tiukaze oni eble serĉas dum sia tuta vivo kaj trovos nenion. Estas tiel, kiel kun ĉiu alia negoco. Se oni trovas la ĝustan negocon kaj oni bonŝancas, oni havas sian orominon. Ĉiukaze, kvankam mi estas jam olda knabo, mi ĉiam denove partoprenas, se komenciĝas orofosado. Sed oni bezonas kapitalon, tiel, kiel por ĉiu alia afero.“

La historio, kiun Howard ĵus rakontis, entenis nenion, kio kuraĝigas kaj nenion, kio avertas onin. Estis kutima rakonto pri orfosado, sendube vera, sed tamen ĝi sonis fabeleca. Sed ĉiuj historioj, kiuj rakontas pri riĉaj gajnoj, sonas fabelecaj. Por gajni oni devas riski ion. Kiu volas havi oron, devas serĉi ĝin. Kaj Dobbs decidis en tiu punkto serĉi oron, eĉ se li estus ekipita nur per poŝtranĉilo.

Nur unu demando restis, ununura demando, kiu ŝovis sin en lian planon. Ĉu li iru sola aŭ kun Kurtin aŭ kun la maljuna Howard aŭ kun Kurtin kaj Howard?

06

Estis sekvamaten, kiam Dobbs plu rakontis al Kurtin la historion, kiun li aŭskultis de Howard. Kurtin aŭskultis atente. Fine li diris: „Mi pensas, ke temas pri vera historio.“

„Kompreneble temas pri vera historio. Kial ĝi estu mensogita?“ Dobbs tre miris, ke iu povas dubi pri la ĝusteco de la historio. Sed tiu dubo, kiun Kurtin esprimis, havis efikon al li. Al li la historio ŝajnis tiel normala, kiel la fakto, ke estas matene, kiam leviĝas la suno, kaj vespere, kiam ĝi subiras. Estis nenio en la historio, kio povus esti elpensita de verkisto. Sed la dubo, kiun metis Kurtin en sian demandon, tamen faris la historion aventurema. Kaj dum Dobbs rigardis la serĉadon de oro per same tiel sobraj okuloj, kiel la serĉadon de laŭordaj botoj en diversaj ŝumagazenoj de urbo aŭ kiel la serĉadon de laboro, li subite ekkomprenis, ke oro-serĉado nepre devas esti ĉirkaŭata de io timiga. Nur tial li havis tiumomente tian strangan senton, ĉar li perceptis neniam antaŭe tiun hororon, tiun mistikon kaj fremdecon, kiam oni parolis pri oroserĉistoj. Kiam Howard tiel seke rakontis la historion al li, li sentis nur, ke oro kaj ŝtonkarbo fakte estas simila afero, ĉar ŝtonkarbo homon, kiu okupiĝas pri ĝi, same tiel povas riĉiĝi kiel oro.“

„Ĉu mensogite?“ demandis Kurtin. „Pri tio mi diris nenion. La historio per si mem ne estas mensogita. Ekzistas centoj de tiaj historioj. Tutajn montojn de tiaj historioj mi legis en gazetoj, kiuj presas ion tian. Sed mi supozas, ke la historio – eĉ se ĉio alia estus neverŝajna – certe estas vera pri tiu parto, kie la tri viroj provas mistifiki la ceterajn de la kompanio kaj fridsange intencis trompi ilin.“

„Vi pravas!“ Dobbs kapjesis. „Tio estas la malbena, kiu ŝarĝas la oron.“

Dirinte tion, li klare konsciiĝis pri tio, ke nur antaŭ horo li

ne estus dirinta tian frazon, ĉar la penso tute ne venus en lian kapon, ke malbeno devas kroĉiĝi al oro.

Kurtin ne travivis tian ŝanĝon en sia opinio. Eble nur tial, ĉar tia neatendita dubo ne aperis en li, kiel ĵus spertis ĝin Dobbs.

Tiu interna travivaĵo, kiun Dobbs havis en tiu minuto, disigis la du virojn sen tio, ke ili konsciigis pri tio. Estis disigo interne de ilia senta mondo. Ekde nun ambaŭ iris rekte al alia celo en sia vivo. Iliaj diversaj sortodestinoj komencis elformi sin.

„Malbenon pri la oro, ĉu?“ Kurtin objetis kontraŭdire. „Mi ne vidas iun. Kie estas la malbeno? Estas same tiom da beno sur ĝi. Dependas nur de tio, kiu havas ĝin en la manoj. La diversaj karakteraj ecoj de la posedanto kreas la malbenon aŭ la benon. Donu al fripono silikonajn ŝtonetojn aŭ sekajn spongojn en la manojn, li tuj uzos ilin por fari per tio friponaĵon.“

„Avido pri posedo, estas la ununura eco, kiun la oro vekas en ties posedanto.“ Dobbs miris, kiel li venis al tiu opinio. Ĝi ŝajnis fremda al li. Sed li sugestis al si, ke li diris tiun opinion nur tial, por ke li povu kontraŭdiri ion al Kurtin.

„Tio estas ja pura sensencaĵo, kion vi diras“, rimarkis Kurtin. Senintence li elektis konfidencan formon de la alparolo, al kiu Dobbs same tiel senpense adaptiĝis, kvazaŭ li ne sentis la ŝanĝon.

„Dependas ja tute de tio“, Kurtin daŭrigis sian paroladon,

„Ĉu la posedanto ŝatas la oron per si mem, aŭ ĉu li uzas ĝin nur kiel rimedon por atingi certajn celojn. Estas ja ankaŭ en la armeo oficiroj, kiuj pli atentis pri tio, ke la ledaĵoj estu skrupule pure purigitaj ol pri tio, ke la ledaĵoj troviĝu en uzebla stato. La oro mem ne estas necesa. Se mi povas supozigi iun, ke mi posedas multe da oro, mi povas atingi la saman, kvazaŭ mi vere havus ĝin. Estas ne la oro, kiu transformas la homojn, sed multe pli la potenco, kiun ili povas praktiki helpe de la oro, jen tio, kio ekscitas la homojn tuj kiam ili nur vidas oron aŭ nur aŭdas pri ĝi.“

Dobbs movis la supran parton de sia korpo malantaŭen por apogi sin per la benko, sur kiu sidis ambaŭ. Li rigardis supren kaj rimarkis sur tegmento de unu el la transaj domoj du laboristojn, kiuj metis telefondratojn. Ili staris tiel nesekur-aj, ke oni povis atendi ĉiun momenton, ke ili falos mal-supren. Por kvar pesoj aŭ kvar pesoj kaj duonon ĉiutage, pensis Dobbs, kaj ĉiam kun la perspektivo rompi sian nukon aŭ frakasi la ostojn; ĉe la starigado de argano estas simile, nur ke la perspektivo estas pagata iom pli bone.

Tiam li pensis, ke estas sufiĉe kadavraĉa vivo, kiun oni vivas kiel laboristo. Kaj daŭrigante tiun penson, li demandis: „Ĉu vi do perfidus viajn amikojn por havi la tutan oron sola por vi, tiel kiel la tri viroj provis tion?“

„Tion mi nun ne povas diri“, respondis Kurtin. „Mi ne supozas, ke ekzistas eĉ unu homo, kiu precize povus diri, kion li farus, se li povus akiri grandan amason da oro por si mem, se li havus la okazon forigi aliajn partoprenantojn. Mi estas konvinkita, ke ĉiu homo agos alie ol li mem atendis en tiu

momento, kiam li subite ricevis multe da mono aŭ vidis la eblon nur per manmovado ensakigi amason da oro.“

Dobbs rigardis ankoraŭ nun supren al la telefonlaboristoj. Kvankam li ne deziris tion al la laboristoj, li esperis tamen iomete, ke unu el ili falu malsupren, ĉar tio havigus iom da distro en lia monotona vivo.

Ĉar tamen neniu el la laboristoj falis malsupren, li rekonsciigis, ke li sidas maloportune, kaj ke doloras liaj ŝultroj. Li rektiĝis sur la benko kaj bruligis cigaredon. Li postrigardis la fumon kaj diris poste: „Mi farus tion tiel, kiel Tilton. Tio estas la sekura vojo. Kaj oni ne devas plu tiom laboraĉi kaj ne plu tiom malsate pigrumadi. Mi estus kontenta pri malgranda kvanto kaj irus mian vojon. La aliaj pro mi kvereladu kun la aliaj.“

Kurtin ne sciis, kion respondi pri tio. La temo estis ĝisdetale traktita de ambaŭ, kaj ili parolis pri io alia, pri io tute neinteresa, nur por paroli ion kaj por ne sidadi tiel stulte.

Sed posttagmeze, reveninte de la banado en la rivero, kaj ĉagreniĝinte dum la tuta vojo, ke ili devis piediri sur la longa polva *avenida*, ĉar ili devis ŝpari la dek kvin centavojn por la tramo, oni denove komencis priparoli la orotemon. Ĉar ili ĉiam estis nur nesufiĉe sataj, ĉiam soifaj je glaso da glacia akvo, ĉar ili ĉiam dormis malbone en la duraj kaj neoportunaj litoj, laboris la penso pri oro seninterrompe en ili. Pri kio ili vere pensis, tio estis la ŝanĝo de ilia aktuala situacio. Tiu situacio ŝanĝeblis nur per mono. Kaj mono estis tre parenca al oro. Tiel la pensado pri oro fariĝis pli kaj pli

forta en ili kaj forigis ĉiujn aliajn pensojn. Ili fine ekkonsentis, ke mono ne povus helpi al ili, ke nur oro, granda monto da oro povus liberigi ilin el tiu ĉi vivo, el tiu desperiga vivo inter morto pro malsato kaj neniamsatiĝo. Ili estis en regiono, kie troveblas neimageble multaj trezoroj de oro. Ili vidis la oron briletantan antaŭ si, eĉ tiam, kiam ili fermis la okulojn, ĉar la suno tiel senkompate blindige radiis sur la blankan polvan *plaza*-n. Eble ne estis la oro, eble estis la varmega asfalto, la blanka polvo, la blankaj domoj, kiuj faris ilin tiel senpaciencaj. Sed kien ajn ili pensadis, ili ĉiam denove revenis al la oro. Oro estis ĝlacia akvo, oro estis kontenta stomako, oro estis frideta loĝejo en la alta eleganta hotelo *Riviera*. Oro, nur oro, kaj tiam ĉesiĝos la starado antaŭ la usona banko, kie oni esperas kvazaŭ embuske almozpeti la manaĝerojn de la naftokamejoj pri grandanime donita peso aŭ pri laboro. Tio estis hontiga kaj aĉa vivo. Tiel tio ne iru ĝiseterne. Oni devos fini tion.

Kiam pasis tri tagoj, dum kiuj montriĝis neniu bonŝanco pri laboro, kaj ŝajnis, kvazaŭ ankaŭ en la tri sekvaj monatoj ne estos bonŝanco pri laboro, diris Dobbs al Kurtin: „Mi ekiros nun al oro. Kaj se mi devus iri tute sola, mi iros. Ĉu mi mortacas ĉi tie aŭ en la Sierra inter la indiĝenoj, tio estas por mi nun vere tiel egala kiel kuko grasa aŭ barelo siropa. Mi ekiros.“

„La saman proponon ĝuste mi volis fari al vi“, diris Kurtin, „mi pretas pri ĉiu ŝtelado de ĉevaloj.“

„Ja efektive restas nenio alia plu al vi krom la elekto inter poŝostelado kaj *Santa Maria*.“

„Sankta Maria, ĉu?“ demandis Kurtin. „Mi ne estas katolika.“

„Ĉu vi estas katolika ĉu ne, tion ili ne demandas vin. Sed, se vi malbonŝancos ĉe poŝostelado, tiukaze vi ja lernos, kio estas Sankta Maria. Tio estas la puninsulo ĉe la okcidenta bordo, kie oni ne demandas vin pri la religio, sed kie oni volas scii de vi nur tion, kiom da jaroj oni kroĉis al vi. Se vi konatiĝos al tiu *Santa Maria*, vi ekscios, kial Sankta Maria ĉiam havas malfermitan klaktranĉilon en sia koro. Ĝin puŝis en ŝin iu, kiu revenis vivanta de tiu insulo.“

„Ni do povus ekiri tuj morgaŭ.“

Dobbs pripensis tion dum certa tempo, kaj poste li diris: „Mi pensis, ke ni kunprenu la pli aĝan Howard. Ni demandu lin hodiaŭ vespere, kiel li pensas pri tio.“

„Ĉu Howard? Kial? Li estas ja tre aĝa. Eble ni devus porti lin sur la dorso.“

„Maljuna li estas“, konfirmis Dobbs. „Sed li estas tiel persistema kiel kuirita malnova botoplandumo, se ĉio dependus nur de tio, li eltenus pli ol ni ambaŭ kune. Mi nun tuj devas konfesi, ke mi ne havas multe da scioj pri la orofosado kaj mi eĉ ne ĝuste scias kiel ĝi aspektas, se oni vidas ĝin antaŭ si en koto. Howard havas spertojn, li mem fosis ĝin kaj enspezis monon ĉe tio. Ĉe la nafto ĉio tio denove elspeziĝis. Kunhavi tian spertan ulon, estas kvazaŭ oni jam ensakigus duonon de l' oro. Ni eĉ ne scias, ĉu li efektive kuniros.“

„Ni simple demandu lin“, konsilis Kurtin.

Ili iris al la tranoktejo Oso Negro. Howard kuŝis en la lito kaj legis banditajn rakontojn el kajero de *Western Story Magazine*.

„Mi?“ li diris tuj. „Kia demando? Kompreneble mi partoprenos. Mi ĉiam ĉeestas, se komenciĝas io pri oro. Mi havas ankoraŭ tricent dolarojn ĉi tie en la banko. Ducent dolarojn mi enmetos por la afero. Estas mia lasta mono. Se tiu foriĝos, mi estos finita. Sed oni devas riski ion.“ Post kiam ili kunĵet-is sian tutan monon, Dobbs memoris pri sia loteria loto. „Ne estu tiel superstiĉa“, diris Kurtin ridante. „Mi ankoraŭ neniam vidis iun, kiu gajnis ion en loterio.“

„Faras nenion“, diris Dobbs pri tio. „Mi almenaŭ foje iru por rigardi la liston. Tio ne damaĝos al mi.“

„En tiu kazo mi kuniros. La acidan grimacon, kiun vi montros, mi nepre volas rigardi.“

La listoj estis elpendigitaj ĉie. En ĉiu magazeneto, kie oni vendas lotojn. La listoj estis presitaj sur tolo. Ĉar neniu aĉetis liston kaj la loterio neniam faris kromnegocon el la vendado de la listoj, la listoj estis pripalpitaĵoj de centoj da homoj. Ili devis esti tre solidaj, por povi rezisti la atakojn de tiuj, kiuj supozis, ke ili ĉifoje tute certe gajnos ion.

Tuj ĉe la angulo de la koktelejo Madrid pendis tia listo, kiu estis granda kiel mantuko.

Dobbs ĵetis rigardon sur ĝin kaj diris al Kurtin: „Via superstiĉo estas pli ridinda ol mia. Rigardu, ĉu vi vidas la grase presitan numeron? Tio estas numero mia. Por mia dudek-

ono oni nun pagos al mi cent pesojn.“

„Kie?“ demandis Kurtin mirigite.

„Ni iru tuj al la agentejo por enkasigi la sumon.“

Dobbs metis sian loton sur la tablon. La agento kontrolis ĝin kaj sen fari iun dekalkulon de iu speco, li enmanigis al Dobbs du pezajn orajn kvindekpesajn monerojn.

Kiam ili staris denove sur la *plaza*, diris Kurtin: „Nun mi alportos ankoraŭ cent dolarojn. Tiam sufiĉos. Mi havas amikon en San Antonio, transe en Teksaso. Tiu sendos la monon al mi.“

Li telegrafis, kaj la mono alvenis ĝustatempe. Ili prenis la noktotrajnon al San Luis. De tie ili veturis per la sekva trajno supren al Durango.

Tie ili sidis antaŭ mapoj kaj studis la regionojn.

„Kie la fervojo ankoraŭ veturas, tien ni eĉ ne pensu iri“, diris Howard sobre. „Tio ne indas la penon. Kie estas fervojo, kie estas nur unu bona vojo, tie oni konas ĉiun anguletejon, kie io povus esti. La sovaĝejoj estas, kie oni povas trovi ion. Tie, kie ne estas pado, tie, kien geologoj ne kuraĝas iri, tie, kie neniu homo scias, kio estas aŭto, tie, kie oni devas fosadi surgenu. Kaj tian regionon ni devas serĉi por ni.“

Li zigzagadis perfingre sur la mapo kaj diris tiam: „Proksimume ĉi tie. Ĝisdetale precize tio ne devas esti. Se oni jam foje estos tie, oni devos teni malfermita la okulojn. Tio est-

as ĉio. Mi iam konis iun, kiu povis eĉ flari la oron, tiel kiel soifa azeno flaras akvon, se li emas iri tien.“

„Ĝuste“, diris Dobbs; „jen venas en mian kapon, ke ni tuj ĉi tie en iu najbara loko aĉetu azenojn, kiuj portos niajn pakajojn.“

07

Kurtin kaj Dobbs lernis tre rapide, ke ili estus senhelpaj sen la oldulo Howard. Tiel larĝe kaj tiel senkaŝe la oro ne kuŝas, ke oni stumblas sur ĝi. Oni devas kompreni vidi ĝin. Oni povas iri trans ĝin kaj ĝin ne ekvidas. Sed Howard ĝin vidis. Eĉ se estis proksime nur spuro de ĝi. Li ekvidis ĝin laŭ la aspekto de la regiono, ĉu ĝi povas havi oron ĉu ne, ĉu indas la penon malligi la ŝpatojn de la pakajo kaj elfosi kelkajn ŝovelilplenojn da sablo kaj ellavi ilin. Kiam Howard komencis pikadi per pikfosilo kaj fosadis aŭ eĉ komencis lavi en la fritpato, tiukaze estis promesplena tero, kiu laŭjuĝe devus havi oron. Kvarfoje ili jam trovis oron. Sed la kvanto, kiu lasis ellavi sin, estis tiom eta, ke oni ne povus atingi akcepteblan tagsalajron. Unufoje ili trovis tre promesplenan lokon, sed la akvo, kiun ili bezonis por ellavi ĝin, estis ses horojn for de la loko, kaj ili devis rezigni pri la loko.

Tiel ili migris ĉiam plu, pli kaj pli profunden en la altan montaron.

Iumatene ili retrovis sin kvazaŭ firmpinĉitaj en malvasta vojo. Ili rampadis kaj grimpis anhele kaj havis penon trotigi antaŭen la azenojn. Ili estis en diable aĉa humuro.

Kaj Howard aldone diris eĉ en tiu fihumuro: „Mi ja elserĉis du fajnajn kunmanĝantojn, vin ambaŭ, tion mi faris. Ĉe l' diablo!“

„Fermu vian buŝaĉon!“ Dobbs vokis kolere.

„Fajnajn kunmanĝantojn“, ripetis Howard seke kaj moke.

Kurtin havis drastan insultvorton sur la lango. Sed antaŭ ol li povis elkraĉi ĝin, diris Howard: „Vi estas ja tiel stultaj, tiel senklapaj, ke vi eĉ ne vidas la dolarmilionojn, se vi tretadaĉas per ambaŭ piedoj sur ili.“

La du pli junaj, kiuj iris antaŭe, haltis kaj ne sciis, ĉu Howard mokis ilin, aŭ ĉu li havis atakon de debileco pro la streĉiĝo de la lastaj tagoj.

Sed Howard rikanis al ili kaj diris tute sobre, sen montri iun eksciton: „Vi promenas sur la nuda pura radianta oro kaj eĉ ne vidas ĝin. Kiu diablo rajdis min serĉi oron kun tiaj mefitoj, kiaj estas vi, tio ankoraŭ ofte cerbumigos min dum la resto de mia vivo. Nur tion mi volus scii, kiun hontigan pekon mi pune repagadu, ke mi devas toleri vin.“

Dobbs kaj Kurtin haltis. Ili rigardis antaŭ si sur la teron kaj tiam ili rigardis sin reciproke, kaj poste ili rigardis al Howard kun mieno, kiu ne tute klare montris, ĉu ili ekstultigis aŭ ĉu ili supozis, ke Howard estas sur tiu vojo.

La oldulo kliniĝis, fosis permane en la loza sablo kaj levis manplendon de ĝi. „Ĉu vi scias, kion mi havas ĉi tie enmane?“ li demandis. Sen atendi respondon li aldonis: „Tio estas pagokoto, aŭ se vi ne komprenas tion, tio estas oropolvo. Kaj tie estas tiom multe da ĝi, ke ni, la triopo, ne povos forporti ĝin sur niaj dorsoj.“

„Montru foje“, ambaŭ vokis samtempe kaj proksimiĝis.

„Vi ne devas proksimiĝi. Vi devas nur kliniĝi kaj levi ĝin, jen vi ekvidos ĝin kaj havos ĝin enmane.“

Skeptike ili levis manplendon kun sablo.

„Vi apenaŭ vidos ĝin“, Howard diris rikane, „kokidetoj. Sed pro la pezo vi ja palpos, pri kio temas.“

„Efektive“, vokis Dobbs, „nun ankaŭ mi sentas tion. Ni povus tuj plenigi la sakojn kaj poste repeli la azenojn.“

„Kompreneble, tion ni povus fari“, diris Howard kaj kapjesis. „Sed tio estus malbona negoco. Pli bone estos, se ni ellavos ĝin ĝis ĝi estos pura. Kial ni portu la superfluan sablon? La sablon oni ne pagos al ni.“

Howard sidiĝis kaj diris: „Tiukaze foje alportu unue kelkajn sitelojn da akvo ĉi tien. Mi faros procentprovon.“

Kaj nun komenciĝis la efektiva laboro. Oni devis serĉi akvon. Ili trovis akvon, sed ĝi kuŝis cent kaj dudek paŝojn pli malalte de la monto. Kaj oni devis suprenporti ĝin en siteloj. Malsuprenporti la sablon kaj tuj lavi ĝin ĉe la akvo,

farus pli da peno, se oni konsideras la tempon. La akvon oni povis uzi multfoje denove. Kvankam ĝi fariĝis malpli post ĉiu ellavado, oni devis anstataŭi nur la perditan akvon, dume ĉe la malsuprenportado de la tuta sablo povus okazi, ke en du sakoj da sablo estas apenaŭ gramo da valorajo.

Ili konstruis la kampadejon, starigis la balancilstablojn kaj la skueblajn trogecajn trafluilojn por la lavado de la ŝlimo, ili fosis akvokanaletojn por la niveldiferenco de la deklivo kaj elfosis per ŝpatoj cisternon, kiun ili per kalko kaj argilo faris tiom akvorezista, ke la akvoperdo fariĝis tiom etkvanta, ke ne indus la penon paroli pri tio.

Post du semajnoj ili povis komenci la produktivan laboron.

Estis streĉa laboro. Tion oni rajtas diri. Ili laboraĉis kiel freneziĝintaj punkaptitoj. Je la hela tagparto estis tre varme, kaj nokte estis ege frida. Ilia laborkampadejo situis alte en la montaro, en la *Sierra Madre*. Neniu ordigita vojo kondukis tien, nur mulopado ĝis la akvo. Por atingi la plej proksiman fervojan haltejon necesis azenrajdo dum dek aŭ dek du tagoj. Kaj la marŝo kondukis tra krutaj pasejoj kaj montaraj padoj, tra riveroj, tra kavigitaj vojoj laŭ altaj akraj rokovandoj. Sur la tuta vojo troviĝis nur kelkaj indiĝenaj vilaĝetoj.

„Tiel sklavece mi ankoraŭ neniam laboris en mia tuta vivo“, opiniis Kurtin iumatene, kiam Howard skue vekigis lin ankoraŭ antaŭ la sunleviĝo. Li tamen ekstaris, selis la azenojn kaj alportadis la akvokvantojn, kiuj estis necesaj por tiu

tago, kvankam li antaŭ la sepa ne ricevos eĉ mordaĵon en la stomakon.

Kiam ili ĉiuj sidis ĉe la matenmanĝo, diris Howard: „Kelkfoje mi demandas min tute serioze, kion vi fakte pensis pri la orofosado? Mi estas certa, ke vi imagis, ke oni devas nur kliniĝi, kapti la oron siilkece kuŝantan per la ungegoj, pleniĝi ĝin en sakojn, kaj tiam formarŝi. Se tio estus tiel simpla kaj tiel senpene farebla, la oro havus nur la valoron de silikaj ŝtonetoj.“

Dobbs murmuradis ion kaj diris post certa tempo: „Sed devas ekzisti lokoj, kie oni trovas ĝin pli kompakte, kie ne estas tiel mizere penige kunskrapi unĉon, ĉu?“

„Tiaj lokoj ekzistas, sed ili estas tiom raraj kiel lota ĉefgajno en loterio“, respondis la oldulo. „Mi vidis lokojn, en kiuj oni malkovris vejnojn, kie la uloj elhakis aŭ elfosis pugno-grandajn orobulojn. Tri-, kvar kaj ok-funtajn mi vidis dum unu tago. Kaj krome mi vidis, ke en la sama loko kvar viroj laboraciis preskaŭ ĝismorte dum tri monatoj, kaj ke la kvaropo en la tri monatoj apenaŭ rafinis kvin pundojn. Vi povas volonte fidi tion al mi: Ellavi sablon, kiu konstante enhavas oron, estas la plej sekura. Estas streĉa laboro, sed se oni laboris ok aŭ dek monatojn tiel, oni povas ŝovi atentindan sumeton en la poŝon. Kaj se oni eltenus tion dum kvin jaroj, oni estus sekurigita dum la resto de la vivo. Sed tiun mi volus unue vidi, kiu eltenas tion dum kvin jaroj. Plej ofte la trovejo elĉerpiĝas jam post kvin monatoj, kaj oni devos denove ekmigri por trovi alian virgecan trovejon.“

La du flavbekuloj imagis la fosadon de oro pli simpla afero. Tiun penson ili havis en ĉiu horo kvarfoje. Fosi kaj fosi de sunleviĝo ĝis sunsubiro sub diabla ardo. Tiam surĵeti kaj surĵeti la sablon, balancadi kaj skuadi kaj kribri ĝin, kaj ĉion ĉi ripeti, tri-kvar-kvinfoje. Ĉiam denove meti la kribritaĵon en la balancpatojn, ĉar ĝi ne elvenis pura.

Tiel tio deruliĝis tagon post tago, sen interrompo. Ili nek povis stari rekte, nek kuŝi, nek sidi, ĉar tiom doloris la dorsoj. Iliaj manoj fariĝis kvazaŭ tuberaj ungegoj. Ili ne plu povis rektigi la fingrojn. Ili ne razis sin, kaj ili ne tondis sian hararon. Ili estis tro lacaj kaj tro indiferentaj pri tiaj aferoj. Se la ĉemizoj aŭ pantalonoj disŝiriĝis, ili flikis ion je ili nur tiukaze, se tio nepre estis necesa por konservi la vestojn kontraŭ disfalo.

Ne estis dimanĉo; ĉar la ripoza tempo, kiun ili fiksis, necesis por ripari la primitivan maŝinaron, por foje lavi sin, por pafi kelkajn birdojn aŭ kapreolon, serĉi novan paŝtejon por la azenoj kaj migri al indiĝena vilaĝo por tie aĉeti ovojn, disfrotitan maizon, kafograĵojn, tabakon, rizon kaj fazeol-ojn. Ili jam devis esti kontentaj, se ili efektive ricevis tiajn aĵojn. Pri faruno, lardo, blanka sukero kaj ladkonservujoj kun lakto ili povis pensi nur tiukaze, se iu entreprenis tutan tagvojaĝon por atingi la pli grandan vilaĝon, kie oni povis ricevi tiajn raraĵojn de tempo al tempo, sed ne ĉiam. Se tia ekspedicio sukcesis eĉ kunporti botelon da tekilo, oni rigardis tion triumfa procesio.

Tiam leviĝis la demando, kiel oni konduku rilate la licencon. Sen licenco ili rajtis serĉi, sed ne fosi kaj ne rafini oron. Sed

tio rilate la licencon ne estis sen proplemo. Unu el ili devis iri al registara oficejo, devis tie precize informi, kie estas la trovejo, kaj devis pagi atentindan sumeton. De la gajno ili devis pagi eĉ procentaĵon. Entute povis daŭri kelkajn semajnojn, ĝis kiam ĉiuj aferoj estis regulitaj.

Ĉio ĉi ne estis tre terura. Sed tio, kio estis plej terura, estis la simpla fakto, ke ili per la ricevado de la licenco, eĉ se ili estis kiom ajn atentemaj, allogis banditojn. Banditojn, kiuj ne semas, sed rikoltas. Ili embuskis semajnojn aŭ monatojn, lasis fervore laboraĉi la virojn, kaj kiam ili poste foriris kun sia ŝarĝo, ili atakis ilin kaj forprenis la tutan oron. Kaj ne nur la oron oni forprenis de ili, sed ankaŭ la azenojn kaj la ĉemizojn, kiujn ili havis sur la korpoj. Elveni sen azenoj, sen pantalono kaj sen ĉemizo kaj ŝuoj el sovaĝejo, estas damne komplika afero. Ofte la banditoj komprenis tion, kaj por ne tro afliktigi la elrabitojn, ili prenis de ili ankaŭ la vivon, ĉar ili havis kompatemajn animojn. Kiu povus scii, kie la kompatinduloj malaperis? La vepro estas tiom granda, ĝiaj profundoj estas tiom netrapenetreblaj, ĝiaj danĝeroj tiom multaj. Jen serĉu foje perdiĝinton. Kaj antaŭ ol la serĉado efektive povus komenciĝi, la vepro apenaŭ postlasas lastan osteton. Kiel en tiu kazo eĉ raporti, kiu estas la viro, al kiu apartenis la osteto. Kaj la banditojn, ĉu? Tiujn oni metas antaŭ provizoran tribunalon. Sed por povi fari tion, antaŭe oni devas havi ilin. Kaj ĉar ili scias tion, ke neniuj povas damaĝi ilin, antaŭ ol oni kaptos ilin, tial tio estas tiel simpla negoco esti bandito anstataŭ penege labori kaj gajni la oron, kiu prezentiĝas al ĉiu por propra laboro.

Se iu ricevis licencon, tio ĉiam diskonigiĝas. Kaj tio ne estus la unua fojo, ke ne banditoj, sed la murdistoj de granda nobla minkompanio sin liberigas de la proletaj malkovrintoj. Tiam la trovejo dum kelkaj monatoj ne plu estas ekspluatata, la licenco senvalidiĝos, kaj la kompanio akiros la licencon, kiu efektive estos transdonita al ĝi, ĉar la antaŭa posedanto rezignis pri siaj rajtoj pro malĉeesto.

Sekve tion estis efektive prudente, ne rompi sian kapon pri la licenco. Kiam oni tiam post certa tempo decidas, ke oni nun povas forlasi la fosejon, ĉar oni havas sufiĉe da oro, oni povas diskrete forporti la predon. Neniu homo ekzamenos tiujn ĉifonitajn vagabondojn. Kaj ili povus facilanime almozpeti pri tabako ĉiujn homojn, kiuj renkontas ilin, kaj kiuj povus esti banditoj aŭ dum la ĝusta okazo intencas fariĝi banditoj.

Tio estas do la afero pri la licenco. Se oni havas iun, la oron povas forpreni banditoj. Se oni havas neniun kaj tio fariĝos konata, la registaro forprenas de oni duonon aŭ la tuton de la kunskrapitaĵo kiel punon. Jen la vepro, kiu estas tiom granda, tiom vasta, tiom silentema. Kaj jen tiom da aliaj aferoj. Tuj kiam oni posedas ion, aspektas ĉiuj aferoj en la mondo tuj tute male. En ĉiu kazo oni apartenas ekde tiu momento al la malplimulto, kaj ĉiuj, kiuj posedas nenion, aŭ kiuj posedas malpli ol oni mem, fariĝos ĝismortaj malmamikoj. Tiukaze oni devos ĉiam memgardi. Oni tiukaze ĉiam devos gardi ion. Tiom longtempe, kiom oni havas nenion, oni estas la sklavo de sia malsata stomako kaj la natura sklavo de tiuj, kiuj povas plenigi malsatan stomakon. Sed, se oni havas iom, oni estas la sklavo de sia posedo.

La tri viroj, kies vojoj ĉi tie kruciĝis, neniam estis amikoj. Ili eĉ ne pensis vere pri tio iam fariĝi amikoj. Ili estis, por diri la plej bonan tiurilate, negocamikoj. Nur pro kaŭzoj de utileco ili kuniĝis. Tuj, kiam tiuj kaŭzoj malaperis, ankaŭ ilia komuneco ĉesiĝis. Ili ekdisputis, kaj ili kverelis, kiel tio ĉiam okazas, se homoj estas kune dum certa tempo. Tiu kverel-ado estus povinta fari el ili iom post iom amikojn. Tio ne estus tre miriga. Se homoj, kiuj ne estas amikoj, komen- cas disputi kaj kvereli, tiukaze tio estas plej ofte la komenco de longa amikeco.

La komunaj penoj, la komunaj zorgoj, la komunaj esperoj, la komunaj seniluziigoj, kiujn travivis tiuj tri viroj en tiuj monatoj, devis konduki laŭ ĉiuj saĝoj de la sociologio al amikeco. Ili estis ja kvazaŭ militkamaradoj, pli bonaj mi- litkamaradoj ol milito iam povus formi. Estis pli ol nur ĉe unu okazo, ke Howard al Dobbs, Kurtin al Howard kaj Dobbs al Kurtin savis la vivon; alitempe okazis, ke Dobbs Howardon kaj alia fojo Kurtinon konservis kontraŭ ties lasta elspiro. Ĉiuj eblaj variaĵoj okazis. Ĉiu ĉiam tuj estis preta helpi al alia aŭ riski siajn proprajn ostojn, aŭ eĉ la pro- pran vivon por protekti la vivon de subita falinto. Okazis ĉio ebla. Ekzemple rompiĝis faligata arbo tro frue kaj Dobbs kaptis ĝin per ŝultro, kaj donis al ĝi tiel alian direkton, alie la arbo estus frakasinta Kurtinon. La ŝultro de Dobbs aspek- tis aĉa post tio!

„Fajne farite, Dobbs“, diris Kurtin. Kaj tio estis ĉio. Kion diri plu?

Du semajnojn poste kunrompiĝis galerio, kiam Dobbs estis en ĝi, kaj Kurtin elfosis lin, kvankam larĝa peza tavolo da silika tero pendis super li kaj ĉiun momenton povus subite fali por entombigi la kamaradon Kurtinon tiel sekure, ke Howard, se li provus trafosi la galerion de la alia flanko, alvenus en ĉiu kazo tro malfrue por eĉ nur diveni, kie troviĝas ambaŭ.

Kiam Dobbs poste estis elŝirita kaj rekonsciiĝinta kaj komencis spiri, li diris: „Se vi unu plian fojon estus kraĉintaj sur manplaton, tiukaze mi mem ne plu povus kraĉi sur tiun ĉi sablomonton.“ Dum tio li elkraĉis buŝplenon da tero.

En tiaj okazoj oni neniam interŝanĝis multajn vortojn. Estis tute sobra reciproka servo. Sed tiuj helposervoj ne proksimigis ilin. Ili ne fariĝis amikoj. Ili ne estus amikoj eĉ tiukaze, se ili savus ankoraŭ dek pliajn jarojn reciproke la vivon.

Ili mem ne povis observi sin, ili estis partoprenantaj partianoj. Sed tiu, kiu foje povus vidi ilin antaŭ la bivakfajro, mallonge antaŭ la kuŝiĝo por dormo, gajnus la impreson, ke ĉiu el ili atendas favoran okazon por salti al la gorĝo de la du aliaj. Tamen ne estis murdo, kiu briletis en iliaj okuloj. Ĉu eble estis envio? Sed se oni demandus ĉiun el ili, kion li sentas rilate la du aliajn, li ne dirus „envio“ aŭ „poseda avido“. Tio tute certe ne estis tiel. Ĉiu posedis simile multe, ĉiu sciis, ke la aliaj preskaŭ la tutan posedon metis en la komunan entreprenon, ke ĉiu laboris tre streĉe, ke ĉiu mize-rege vivaĉis, ke ĉiu toleris ŝajne neeblan por atingi la celon.

Kiel en tiu kazo senti envion? Aŭ posedavidon, ĉu? Tiel kontraŭnature ne sentas sana homo.

Ĉiuvespere ankoraŭ en la taglumo oni zorgeme taksis la valoron de la taga gajno, tiam ili dividis ĝin en tri partojn kaj ĉiu prenis sian parton al si. Tio okazis tuj dekomence kvazaŭ per si mem.

„Plej bone estos, se ni dispartigos la partojn ĉiuvespere, kaj ĉiu prenos sian parton al si.“ Tiun proponon Kurtin faris je la dua vespero de tiu semajno, en kiu la laboro komencis enspezigi la unuajn gajnojn.

„Tiukaze mi almenaŭ ne devos esti via trezora gardisto“, diris Howard.

Tuj la du aliaj rigardis supren: „Ni diris nenion pri tio, ke vi gardu la bonhavaĵojn. Tio estus estinta antaŭe ankoraŭ gravega demando, ĉu ni ĉion ĉi transdonus konfide al vi.“

„Ĉu vi parolas pri vi mem?“ ridante diris Howard. Li ne ofendiĝis. Li tro ofte travivis tiajn ŝanĝojn por ekscitiĝi pri tio. Afable li diris: „Mi pensis nur, ke mi estas la plej fidinda ĉi tie.“

„Vi, ĉu?“ vokis Dobbs. „Ĉu do ne ni? Ĉu ni estas forkurintaj punkaptitoj?“

Kaj Kurtin diris: „Kiel ni sciu, kie vi fariĝis maljuna?“

Howard ne lasis acidigi sian gajan humuron. „Kompreneble vi ne scias tion. Sed mi pensas, ke ĉi tie kaj inter ni ĉio ĉi ne

gravas. Mi demandis neniun el vi, de kie li venis, kaj kie li pasigis siajn jarojn de senkulpeco. Tio cetere estus tre malĝentila. Oni neniam tentu iun mensogi. Ĉi tie ekstere, kie krias neniuj ĉi pri ni, savas nin neniuj trompo. Ĉu ni ĉi tie reciproke mensogas ion, aŭ ĉu ni rakontas reciproke la sangan veron, tio valoras eĉ ne kvincendon. Sed mi estas el nia triopo la ununura, kiu ĉi tie ekstere estas fidinda.“

La du aliaj rikanis. Sed antaŭ ol ili trovis la tempon doni sukan respondon, Howard daŭrigis: „Vi ne devas ekscitiĝi. Pravas tio, kion mi diras. Ĉi tie gravas nur sobraj faktoj. Ni povus ja transdoni la oron konfide al vi“, dum tio li kapjesis al Dobbs, „por gardi ĝin. Sed kiam mi sidas en la vepro kaj ĉarpentas apogilojn kaj Kurtin rajdis malsupren en la magazeno, vi kunpakus ĉion kaj foriĝus.“

„Tio estas malicaĵo diri ion tian“, ekscitiĝis Dobbs.

„Povas esti“, rediris Howard trankvile, „ke tio estas malica elparoli tion. Sed estas same malice tion pensi. Kaj vi estus la unua homo, kiun mi renkontis iam ajn, kiu ne pensus ion tian. Kun la posedo de la aliaj fuĝi, mi tuj volas diri mian opinion, estas neniuj malicaĵo, sed ĉi tie ekstere tio estas tute natura afero. Stultulo, kiu ne farus tion. Vi estas nur tro hipokritaj por konfesi tion. Sed lasu foje havi al ni kune trezoreton el dudek kilogramoj da pura oro, tiukaze mi foje volus scii, kion vi pensas. Vi ne estas pli bonaj aŭ pli malbonaj ol iuj aliaj uloj. Vi estas tute kutimaj homoj. Kaj se vi ĉi tie iutage ligos min al arbo, ĉion surpakos kaj poste foriĝos kaj lasos mortaĉi min ĉi tie, por havi mian parton, jen vi farus

nur tion, kion ĉiu farus, se li ne ekhavis en la ĝusta momento la penson, ke tio finfine eble ne alportus la deziritan rezulton. Sed mi ne povus skui la polvon de la piedoj kun via oro. Mi ne plu estas sufiĉe rapida per la piedoj. Vi kaptus min je la kolumo interne de dekdu horoj kaj pendumus min sen konsciencaj riproĉoj al la plej proksima arbobranĉo. Mi ne povus fuĝi, mi dependas de vi. Tial mi pensas, ke mi estas la sola fidindulo ĉi tie.“

„Se oni pripensas tion tiel“, diris Kurtin, „tiukaze vi pravus. Sed ĉiukaze estos pli bone, se ni ĉiuvespere dividos la oron en partojn, kaj ĉiu gardos sian parton sola. Jen ĉiu povos foriri, kiam plaĉos al li.“

„Mi tute ne estas kontraŭ tio“, diris Howard, „tio ne estas tiel aĉa. Tiukaze havas ĉiu el ni la zorgon, ke la aliaj povas elflari lian kaŝejon.“

„Kian malican karakteron vi havas“, opiniis Dobbs, „ke vi ĉiam pensas nur pri fiaĵoj!“

„Vi ne povas ofendi min, bubo“, rediris Howard. „Mi konas la homojn kaj scias, al kiaj karesemaj agoj kaj pensoj ili kapablas, se temas pri oro. Esence la homoj ĉiuj estas samaj, se oro estas en la ludo, ĉiuj estas simile insidaj. Tie, kie oni povas kapti ilin, ili estas nur pli memgardemaj, pli mensogemaj kaj pli hipokritaj. Ĉi tie ekstere ili ne devas hipokriti, ĉi tie la negoco estas ĉiam klara kaj travidebla. Simpla kaj malkomplika. Interne de la urboj estas miloj da diversaj rezistoj kaj malhelpoj. Ĉi tie estas nur unu rezisto, la vivo de la alia. Kaj ĉi ti ekzistas ĉiam nur unu demando.“

„Kiu?“ demandis Dobbs.

„Tiun mi volus scii“, respondis Kurtin samtempe.

„Ĉi tie ekzistas nur tiu unu demando, ĉu iutage la memoro ne tro ŝarĝos la konsciencon de iu el ni. Agoj ne ŝarĝas iun. Estas ĉiam nur la memoroj, kiuj rongas je la animo. Ni venu do al la fino. Ni do ĉiuvespere dividu la oron. Kaj ĉiu elektu bonan kaŝejon. Se foje estos iam kvin kilogramoj kune por ĉiu, tiukaze ni neniel plu povos lasi svingopendi nian parton en saketo sur nia brusto.“

09

Multe da peno kaj sian tutan eltrovistan talenton uzis la viroj por bone kaŝi sian laborejon. La kampadejon, kie ili dormis kaj kuiris, ili lokis tien, kie ĝi malproksimis kvincent metrojn ĝis la mino. La lokon, kie troviĝis la mino, ili kamuflis tiel bonege ĉe la ununura ebla enirejo per arbustaĵoj kaj grandaj ŝtonoj, ke neniuj, kiu nokte vagadis proksime, povis trovi la laborejon. Jam post semajno tiom kunkreskis la arbustoj, la montetoj, la truoj kaj la ŝtonblokoj, ke eĉ indiĝenoj ĉasantaj bestojn, ne estus vidintaj ion okulfrapan, kio povus konduki ilin al la laborejo mem.

Kaŝi la kampadejon ne estis la intenco de la viroj. La kampadejon ili tenis tute malfermita. Por pravigi sian restadon tie, ili disetendis krudajn felojn kaj birdopreparaĵojn sur starigitaj kadroj. Tio faris el ili kvazaŭ per si mem

felĉasistojn kaj kolektistojn de raraj birdoj. Tiukaze leviĝus eĉ ne la plej eta suspekto, ĉar centoj da homoj praktikis tion kiel enspezigan negocon.

De la kampadejo kondukis diskreta pado al la mino. Por atingi la padon, ili devis rampi surventre la unuajn dek metrojn. Kiam ili estis trairintaj, ili kamuflis la padon per verda dorna arbustaĵo. Kiam ili revenadis al la kampadejo, ili unue zorgeme observadis la kampadejon, ĉu iu estas proksime. Se estus tiel, ili estus uzintaj grandan ĉirkaŭvojon kaj estus venintaj el alia direkto en la kampadejon, tiel kvazaŭ ili ĝuste revenis de la ĉasado.

En la tuta tempo, kiam ili jam vivis ĉi tie, eĉ ne unufoje iu montris sin, nek blankulo, nek indiĝeno. Estis ankaŭ tre neverŝajne, ke iu iam erare venus en tiun sovaĝan regionon. Sed la viroj estis tro prudentaj kaj tro memgardemaj por akcepti eventuale esti la viktimoj de hazardo. Eĉ ne fuĝanta besto, persekutata de ĉasisto, povis serĉi sekurecon en la laborejo.

La odoro de la laborantaj homoj tie pelis ilin alidirekte.

Kaj hundoj estas en la vepro tro timemaj, ili ĉiam restadas ĉe sia mastro kaj ne priklaradas ion.

Sed la vivo, kiun la tri viroj tie vivis, estis pli kompatinda ol tiu de litva fabriklaboristo en Detrojto. Estis la plej mizera vivo, kiu imageblas iel ajn. Dobbs diris iuvespere, ke li sentis sin en la plej ŝlima tranĉeo de Francio pli homeca ol tie dum la lastaj semajnoj. Kurtin kaj Howard ne povis prijuĝi

tion, ĉar ili ne havis la honoron batali en Francio por gardi la delikatajn senkulpajn bebojn je la brusto de usonaj patriroj kontraŭ la bajonetoj de la hunoj. Kaj kun ĉiu plia tago, kiun ili pasigis ĉi tie, la vivo fariĝis pli neeltenebla. La eterne sama manĝo, haste preparita de tro lacigitaj manoj, naŭzis ilin. Sed ili devis malsuprengluti ĝin. La trista monotoneco de ilia laboro faris la laboron eĉ pli streĉa ol ĝi estis per si mem. Fosadi, kribri, skui, eligi per nudaj fingroj, pene porti akvon, apogi la galerion. Unu horo kiel la aliaj, unu tago kiel aliaj. Semajnon post semajno. Kaj tiel tio deruliĝis nun jam dum monatoj.

La laboro mem eble estus eltenebla. Centmiloj da homoj faras sian tutan vivon la saman laboron kaj sentas sin tamen relative bone dum tio. Sed ĉi tie efikis aliaj potencoj kontraŭ ili.

La unuajn semajnojn ili pasigis sen konsciiĝi pri tio, kiel komplika povus fariĝi ilia vivo. Ili cerbumis eĉ ne momenton pri tio, ke je ili povus vori kaj ronĝi potencoj, pri kies ekzisto ili sciis ĝis tiam tute nenion. En la unua tempo, ĉiutage okazis io nova. Ĉiutage oni planis ion novan kaj faris tion. Ĉiu el ili sciis rakonti kelkajn ŝercojn aŭ pri negoceto, kiu estis nekonata al la du aliaj. Ĉiu estis studobjekto por la aliaj, ĉiu posedis ion specialan, kio interesis la aliajn aŭ eble naŭzis, sed tamen almenaŭ vekis ilian atenton.

Sed poste ili ne plu havis ion por diri reciproke. Neniu en sia tuta paroltrezoro postlasis vorton, kiun la aliaj ne konis.

Kaj ili konis ĉiun vorton de la aliaj, eĉ inklude de la prononcado kaj gestado, kiuj estis ligitaj al la vortoj.

Dobbs havis la kutimon dum la parolado de tempo al tempo parte kunpinĉi la maldekstran okulon. Komence Howard kaj Kurtin trovis tion tre gaja, kaj ili faris ŝercojn pri tiu precipaĵo. Sed tiam iam venis vespero, kiam Kurtin diris: „Se vi, damnita kanajlo, tion ne lasos, ĉiam denove tiki la maldekstran okulon, mi pafos al vi uncon da plumbo en la ventron. Vi scias tre bone, punkaptito, ke tio ĉagrenas min.“

Per unu salto Dobbs staris kaj eltiris la revolveron. Se Kurtin estus supreniginta sian revolveron same tiel rapide, jen la plej bela interpafado estus komenciĝinta. Sed Kurtin sciis, ke li tuj kaptus ses kuglojn stomake, se li nur ekmovus la manon malantaŭen.

„Mi scias jam sufiĉe bone, kiu vi estas“, kriis Dobbs, svingante la revolveron per la manartiko. „Vin oni ja publike skurĝadis en Georgio, ĉar vi atakis knabinon kaj sekspertortis ŝin. Nur pro plezuro vi ja ne estas ĉi tie en Meksiko, jupolevanto!“

Ĉu Dobbs estis punkaptito, Kurtin kompreneble ne sciis, tiel, kiel Dobbs ne sciis, ĉu Kurtin, iam ajn estis en Georgio. Ili suĉis tion el siaj pipoj aŭ maĉante eligis ĝin el la larĝa lardohaŭto, kaj nun ili diris tion por reciproke inciti sin ĝis kolera kulmino.

Howard ne lasis ĝeni sin, li ŝvebigis grandajn tabaknubojn kaj fikse rigardis al la bivakfajro. Sed kiam la du aliaj silentis

kaj ne tiel rapide povis eltrovi novajn insultojn, li diris: „He, buboj, rezignu pri intencita pafado. Ni ne havas tempon flegi malsanulojn ĉi tie.“

Dobbs reŝovis post certa tempo sian revolveron kaj sternis sin por dormi. Sed Kurtin plu sidis kun Howard ĉe la fajro kaj ekbrulis novan pipotabakon.

Nelonge poste venis mateno, en kiu Kurtin pikis Dobbson per revolvertubo sur la kokson. „Diru nun ankoraŭ unu vorton kaj mi ekpafos, venena bufo.“

Tio okazis tiel. Dobbs diris al Kurtin: „Ne ŝmacu ĉiam kiel grasigita porko, kiam vi manĝaĉas. En kiu aĉa edukejo vi plenkreskiĝis?“

„Ĉu mi ŝmacas, ĉu mi kraĉas, tio koncernas vin kiel hundo-koto. Almenaŭ mi ne blovas ĉiufoje tra la vaka dento kiel fajfanta rato.“

Dobbs respondis: „Ĉu la ratoj en *Sing Sing* havas vakajn dentojn?“

Tiu devus esti trovita unue, kiu ne sciuz, kion signifas tiu demando; ĉar *Sing Sing* estas la nelibervola restadejo de tiuj Nov-Jorkanoj, kiuj estis kaptitaj. La ceteraj Nov-Jorkanoj, kiuj ne estas kaptitaj, havas siajn oficejojn en *Wall-street*.

Tian amikecan alludon Kurtin ne povis trankvile toleri. Kaj li puŝis la tubon de la nesekurigita revolvero sur la ripojn de Dobbs.

„Ĉe l' diablo“, Howard vokis nun tute ekscitite, „vi kondukas tiel, kvazaŭ ni ĉiuj estus geedzoj. Formetu la feraĵon, Kurtin.“

„Vi, ĉu?“ kriis Kurtin kolerigite. Li lasis fali la brakon kun la revolvero kaj turnis sin kontraŭ la oldulo: „Kial vi komandas ĉi tie, kriplulo!“

Ĉu komandi?“ kontraŭdiris Howard. „Pri komandado mi tute ne pensas. Sed mi venis ĉi tien por fosi oron kaj por fari mian negocon, sed ne por kvereli ĉi tie kun stultaj knaboj. Ni bezonas unu la alian, kaj se iu el ni estos teren pafita ĉi tie, la du aliaj devos foriri, kun du personoj la orfosado ne lasas praktiki sin, aŭ nur tiel neoportune, ke ni apenaŭ povus atingi akcepteblan tagan salajron.“

Kurtin remetis sian revolveron kaj sidiĝis.

„Kaj mi, ĉu? Tion mi tuj volas diri al vi ambaŭ“, Howard daŭrigis, „mi estas nun vere sata pri tio. Mi ne volas restadi plu kun unu el vi ĉi tie, tial mi foriros. Mi estas kontenta pri tio, kion mi akiris ĝis nun.“

„Sed ne ni!“ Dobbs kriis kolere. „Vi kun viaj oldaj ostoj havas sufiĉe por la lastaj ses monatoj, kiujn vi eble ankoraŭ vivos. Sed ne ni. Kaj se vi volas fuĝi de ĉi tie, antaŭ ol ni estos elskrapitaj ĉion – ni ja trovos rimedon por firmteni vin ĉie tie.“

„Ne parolu al ni tiel infanece, oldulo“, enmiksiĝis nun ankaŭ Kurtin. „Ni kaptos vin interne de kvar horoj, se vi eble volas forrampi. Ĉu vi scias, kion ni faros tiam el vi?“

„Tion mi povas imagi, fripono“, mokis Howard.

„Tion vi ne povas imagi“, rediris Kurtin kaj rikanis. „Ni forprenos viajn ornuksajn kaj ligos vin al arbo, sekure kaj zorgeme, kaj poste ni foriros ambaŭ, sen vi. Murdi vin, kiel vi eble pensis, ne, tio ne okazos.“

„Certe ne“, respondis Howard, „por tio vi estas tro piaj. Mi ja povus lasi al vi vian infanece puran konsciencan. Firmligi kaj lasi sola! Oni foje pripensu tion. Vi vere ne indas, ke oni kraĉu sur vin. Kaj vi estis tiaj fajnaj ĝentlemanoj, kiam mi trafis vin tie malsupre en la urbo.“

Dum certa tempo la triopo silentis.

Poste diris Dobbs: „Tio estas ja ĉio sensencaĵo, kion ni babiladas ĉi tie. Sed diable, se oni vidas neniun alian vizaĝon dum monatoj kaj ĉiam devas kaŭri kune, tiukaze oni devas fariĝi naŭzulo. Mi supozas, ke tiel okazas inter geedzoj. Unue ili ne povas vivi eĉ dum duono de horo sen la alia, kaj tuj kiam ili devos vivi kune, kaj neniuj scias plu paroli eĉ novan frazon, kiun la alia ankoraŭ ne aŭdis cent fojojn, tiam ili sputas sin reciproke vizaĝen kaj volas venenigi unu la alian. Tion mi scias de mia fratino. Unue ŝi volis dronigi sin, ĉar ŝi ne ricevu lin, kaj kiam ŝi havis lin dum certa tempo, ŝi volis dronigi sin, por ne plu devi vidi lin. Nun ŝi estas divorcita kaj intencas provi ĝin kun alia.“

„Kiom vi pensas, Howard, kiom estas tio, kion ni akiris ĝis nun?“ demandis Kurtin poste neatendite.

La oldulo iom pripensis la aferon. Tiam li diris: „Tute precize tio ne takseblas. La rezulto ne elkalkuleblas centprocente. Estas ĉiam ankoraŭ iom da malpura metalo en la havaĵo. Sed mi pensas, ke ĉiu el ni elskrapis jam dek kvar mil dolarojn aŭ ĝis dek ses mil.“

„Tiukaze mi proponas la sekvan“, diris Dobbs, „ke ni ankoraŭ aldonu ses semajnojn, poste ni ebenigu la kampadejon kaj formigru.“

„Pri tio mi konsentas“, objëtis Kurtin.

„Pli da tempo ni ankaŭ ne havos la okupon ĉi tie“, opiniis nun Howard.

„Se mi ne eraras tute, la gajno estos post kvar semajnoj tiom limigita, ke plia laboro ne plu havus sencon. Ĉu vi vidis, ke dek paŝojn pli supre, kie ni nun elfosas la fluejon, la tero estas ŝanĝita? Tie ne estas plu sablo. Aŭ la rivero je tiu loko de supre malsuprenfalis sur la monton, aŭ ĝi elvenis de la monto. Tion oni nun ne povas vidi plu. Tie certe iam estis tera deglito. Kaj de tiam la rivero serĉis alian fluejon, aŭ la fontoj kaj apudaj rojoj ŝanĝis la pozicion.“

Revenis la paco en la kampadejon. Tiel gala kverelo kiel la lasta ne okazis plu. Ili havis nun difinitan celon, fiksitan tagon, je kiu ili intencis forlasi la kampadejon. Kaj tio ŝanĝis ilian humoron kaj ilian karakteron tiel perfekte, ke ili ne povis kompreni plu, kiel efektive eblis tiaj kvereloj. Ili okupiĝis nun pri la elpensado de la plej bona plano, kiel de tie nesus-

pektige foriĝi kaj sekurigi la predon, kie setli kaj kion komenci per la akirita gajno. Tiu skizado de planoj donis al iliaj interparoladoj alian direkton. Ili vivis jam en la antaŭsento denove esti en urbo kaj inter ĉiuj ĉi aĵoj, kiuj signifas civilizacion. Kaj sciante, ke tio ne daŭros longan tempon plu, ili subite tute facile povis aranĝi kun la vivkutimoj de la kunkamaradoj. Ili vidis je tiuj kutimoj ne plu la aĉan, ne plu tion, kio iun ajn el ili povis ĉagreni ĝis koler-eksplodo, sed ili reciproke fariĝis indulgemaj. Kiam de tiam unu el ili eble obstine gratis sian kapon kaj poste rigardis la forgratitaĵon sur la ungoj, kvazaŭ ĝi estus io manĝebla, jen ne sekvis plu malica rikana rimarko de iu alia, kiu ja mem havas fiajn kutimojn, sed li diris ridetante: „Ĉu ili mordas, Kurtĉjo? Nu, atendu, la viando estas tuj finrostita, tiam vi ne estos plu dependa de tia laŭsa manĝo.“ Kion Kurtin, simile ridante, tiel respondis: „Estas bone, ke vi rememoras min pri tio, mi ja devos dekutimiĝi de tiu damnita kutimo, alie la homoj eble eĉ ĵetos min el la hotelo.“

Kaj ju pli proksimiĝis la tago, kiam ili volis ĉesigi la kampaĉon, des pli bone ili akordiĝis. Howard kaj Dobbs eĉ jam parolis pri tio kunlabori kiel partoprenantoj en negoco por malfermi en Monterey aŭ en Tampiko kinejon kaj kune estri ĝin. Dobbs laŭ ili estu la estonteca estro pri arto, do tiu, kiu aĉetos filmojn, gvidos prezentojn, skribos la programojn kaj kontrolos la muzikon, kaj Howard transprenu la negocajn aferojn, la kason, la lupagojn, la salajrojn, la preslaborojn, la riparojn kaj la plibeligojn de la filmteatro.

Por Kurtin ne estis tiel simple. Li ne povis decidiĝi, ĉu li restados en Meksiko aŭ ĉu li reiros al Usono. En frazo li

menciis iam ĉeokaze, ke li havas ion tian, kian fianĉinon en San Antonio en Teksaso. Sed tio ŝajne ne multe interesis lin. Sed verŝajne li nur ŝajnis tion, por ke li ne estu mistifikata pri sia fianĉino. Pri inoj oni parolis nur malofte en la kampadejo. Kaj kiam oni tamen parolis pri ili, tiukaze okazis ĉiam malestimige. Ja kial oni sin turmentu per tiaj pensoj? Oni ĉiam parolas malestime pri aĵoj, se oni ne povas ricevi ilin. Cetere estis nur malfacile imagebla pri la tri viroj, ke ili povus havi inter siaj brakoj fraŭlinon aŭ knabinon. Povus temi nur pri la forkurinta edzino de stratrabisto. Honesta ino prefere dronigus sin en marĉa truo ol komenci aferon kun iu el tiuj viroj. Almenaŭ ne en tiu stato, en kiu ili troviĝis tiam, tiel, kiel ili kondukis kaj kiel ili esprimis siajn pensojn.

La oro, kiun portas bela kaj eleganta damo sur fingro aŭ kiu kiel krono ŝanceliĝas sur la kapo de imperiestro, plej ofte troviĝis jam en sufiĉe stranga societo kaj ĝi multe pli ofte banis sin en sango ol en sapakvo. Ĉiukaze krono el floroj kaj bukedo el la folioj de arbo havas devenon, kiu estas pli nobla. La daŭreco de la materialo, la daŭreco de florkrono, komparataj al la daŭreco de orokrono estas nur relativaj.

10

Kurtin estis en la *tienda* de la vilaĝo kaj aĉetis provianton. Jen la lasta provianto, kiun ili bezonis ĝis ilia foriro. „Viro, kie vi estis dum tiom longa tempo?“ demandis Howard, kiam Kurtin alrajdis kaj komencis deŝarĝi la pakazonon.

„Mi ĵus volis seli mian azenon kaj iri renkonte al vi“, objctis Dobbs. „Ni pensis, ke okazis io malbona al vi. Vi ja plej malfrue devis reveni je la dekkvara.“

Kurtin ne respondis, sed deŝarĝis la azenon kaj portis la sakojn al la bivakfajro. Poste li sidiĝis, ekbruligis pipon, prenis la tabakon el la sakoj kaj disdonis ĝin, kaj finfine li diris: „Damne, mi devis iri sur diablaj ĉirkaŭvojoj. Tie malsupre en la vilaĝo vagadas ulo. Li diris, ke li estas el Arizono.“

„Kion li celas ĉi tie?“ demandis Dobbs.

„Tion mi volonte eksciis“, respondis Kurtin. „Sed la indiĝenoj diris nur, ke li estas jam kelkajn tagojn tie kaj tie pigrumadas. Li demandis la homojn, ĉu ĉi tie estas minoj aŭ oro aŭ arĝento. Tial la indiĝenoj klarigis al li, ke minoj ne estas ĉi tie, kaj ke ankaŭ oro ne estas ĉi tie, ankaŭ ne arĝento kaj nenio ajn alia, ke ili ĝuste ankoraŭ iel povas nutri sin per la plektado de petatoj kaj de potfarado. Sed tiumomente diris la stulta azenulo de la *tienda* al li, ke ie tie en la montoj rampadas usonano, kiu ĉasas sovaĝajn bestojn. Li ja ne scias, ke ankaŭ vi ambaŭ estas ĉi tie. Li konas ja nur min. Tion mi almenaŭ supozas. Kaj poste tiu azenulo diris al li, ke mi frekventas lin ĉeokaze por aĉeti provianton, kaj ke mi do nun certe venos al li en tiu ĉi semajno. Tial la ulo el Arizono diris, ke li intencas atendi min.“

„Kaj poste tiu kota bestaĉo ankaŭ efektive atendis vin, ĉu?“

„Jes, tion li faris. Kiam mi alvenis tien malsupren, li tuj superŝutis min per vortoj, kion mi faras ĉi tie, „ĉu io estas

farebla ĉi tie“, ĉu ĉi tie estas amaso da oro kaj pliajn tiajn sensecaĵojn. Mi ignoris lin vortŝpareme kaj apenaŭ respondis ion.“

„Ĉu vi ne metis sukan galimation al li?“ demandis Dobbs.

„Tion mi faris. Kiam mi efektive respondis ion al li, mi liveris tielnomatajn fidindajn rakontojn. Sed ĉio ĉi tute ne helpis. Li volis kunveni al mia kampadejo. Li opiniis, ke ĉirkaŭe en la regiono nepre devas esti oro, ke li vidas ĝin je la vojo de la elsekiĝintaj riveroj, je la malsupren lavita sablo kaj je la rokopecoj, kiuj solviĝis de la supra montaro kaj jetiĝis malsupren.“

„Li estas granda viro“, diris Howard, „se li povas ekkoni el ĉiuj ĉi aĵoj, ke ĉi tie devas esti oro.“

„Nenion scias la ulo“, objetis Dobbs. „Li estas spiono, pri tio mi tute certas. Li estas aŭ spiono de la registaro pro la takso, aŭ li estas spiono de la banditoj, kiuj volas embuski nin sur la vojo en la urbon. Eĉ se ili ne pensas pri oro, ni havas ja azenojn kaj ilojn kaj vestaĵojn, tranĉilojn, revolverojn kaj felojn, tion ili supozas. Ĉio ĉi estas valorplena. Jen ja indas la peno ataki nin.“

„Ne“, diris Kurtin, „mi ne pensas, ke li estas spiono. Mi supozas, ke li efektive estas obsedita pri oro.“

„Nu, ĉu li do havas fosistan ekipaĵon?“ demandis Howard.

„Mi ne vidis ion tian. Li havas mulon, sur kiu li rajdas, krome kovrilon, kaldroneton por kafo, paton kaj sakon, en kiu eble estas ankoraŭ kelkaj ĉifonoj. Tio estas ĉio.“

„Per siaj fingroj li ne povas elskrapi la oron“, diris Dobbs. „Eble oni ŝtelis liajn ilojn, aŭ li devis vendi ilin. Sed kial tiu ventulo koncernu nin?“

Kurtin gratis sian kapon kaj havis la intencon poste rigardi la ungojn. Sed kiam li rimarkis, ke ankaŭ Dobbs kaj Howard rigardis al liaj ungoj, li lasis sinki la manon kaj denove decidiĝis ne plu fari tion. Sed Dobbs kaj Howard ĉifoje ne rigardis sur liajn ungojn por memori lin, ke li estas nur kelkajn tagojn for de la civilizacio. Ili observis nur senpripense la delonge kutiman movon de Kurtin. Oni eĉ ne povas priskribi tion senpripensemo. Iliaj pensoj estis absorbitaj de la sekretoplena ulo el Arizono, kaj ili havis la obtuzan percepton, ke per tio, ke Kurtin rigardas siajn ungojn, kiel li kutimis fari tion, kvazaŭ solveblus la sekreto, kiu ĉirkaŭas tiun ulon.

Kurtin gapis en la fajron. Poste li diris: „Mi ne povas prijuĝi lin, li ne aspektas kvazaŭ li estus de la registaro aŭ de la banditoj. Li aspektas sufiĉe sensuspekta, tia, kvazaŭ li tion, kion li diras, efektive opinias. Sed ni ja tamen jam havas rilaton al li, eĉ se Dobbs supozas, ke ne. Li sekvis min. Li demandis min unue, ĉu li povos kunveni en mian kampadejon. Tion mi rifuzis, poste li rajdis malantaŭ mi, mi ekstaris kaj atendis lin. Poste mi diris al li, ke li foriĝu al la diablo kaj ke li ne molestu min. ‚Mi ja tute ne volas molesti vin‘, li respondis, ‚mi volas esti nur dum kelkaj tagoj en societo. Mi fariĝis jam

tute freneza pro la ĉiama vagado en la montaro kaj la ĉiama parolado nur kun indiĝenoj. Mi volas iomete paroli kaj sidi dum kelkaj vesperoj kun blanka viro ĉe bivakfajro. Poste mi foriros.‘ Mi do diris al li, ke li serĉu alian kamaradon por tiu celo, ke mi ne volas havi ion komunan kun li. Ke li estas fripono, mi ja ne povis diri al li, la samon li ja povus aserti pri mi, tia, kia ni aspektas nun.“

„Kie li do estas?“ demandis Howard.

„Li ja ne estas eble jam ĉi tie?“ diris Dobbs kaj turniĝis.

„Tion mi ne pensas“, respondis Kurtin. „Mi iris ĉiujn eblajn ĉirkaŭvojojn kaj kurbigitajn padojn tra la vepro. Sed kiam mi povis superrigardi la vojon, mi ĉiam vidis, ke li estas sur la ĝusta vojo ĉi tien. Se mi estus irinta perpiede la vojon, mi povus miskonduki lin, sed provu tion foje, se vi havas du azenojn ĉe vi. Kaj necesas ja nur, ke li scias, ke iu loĝas en la montaro, kaj se li scias pri la direkto nur proksimume ion, tiukaze li devos renkonti nin hodiaŭ aŭ morgaŭ aŭ postmorgaŭ. Li certe sukcesos. Estas nur la demando: Kion fari kun la viro, kiam li aperos ĉi tie? En lia ĉeesto ni ne povos iri al la mino.“

„Tio estas malica afero, tre malica afero“, diris Howard. „Se estus indiĝeno, ne estus tre terure. Indiĝeno ne restadus, sed reirus al sia vilaĝo, al sia familio. Sed tiu ulo kroĉiĝis al ni kiel peĉoplastro. Li ankaŭ tuj flaris, ke ke okazas io ĉi tie. Kial ĝuste ĉi tie kaŝiĝu tri blankuloj? Ĉie tie en la montaro, ĉu? Ni povos rakonti al li nur, ke ni estas tri rabistoj kaj

murdistoj, kiuj devas kaŝi sin ĉi tie. Sed se li poste malsupreniros, ni havos regimenton de soldatoj sur la nuko, kaj tiam ankaŭ niaj belaj estontecaj planoj estos finitaj. Kaj se tie oficiro inter la soldatoj efektive trovos tion fidinda pri la rabistoj kaj murdistoj, li eble eĉ tuj pafmortigos nin ĉi tie por esti tute certa, ke ni ne eskapos de li.“

„Estas tute facile“ diris nun Dobbs. „Tiun ulon ni rapide denukigos. Kiam li venos, ni diros al li, ke li tuj foriĝu el la regiono, kaj ke ni plenigos lin per plumbo, se ni vidos lin ankoraŭfoje ĉi tie.“

„Tio estus tute certe azenaĵo“, opiniis Howard. „Tiukaze li iros malsupren, parolos tie stultaĵojn, eble eĉ trovos ie kamparan policon, kaj ni havos ĉi tie la plej sukan sterkokaĉon. Tiukaze vi same tiel rajtigite povus rakonti al li, ke ni estas eskapitaj punkaptitoj de l' Sankta Maria.“

„*Well*, tiukaze restos nur la rekta metodo.“ Dobbs aspektis decidiĝinta. „Tuj kiam li venos, ni sendos lin ĉielen, kaj finita estos la far'. Aŭ ni pendumos lin tie transe je la arbo kaj senfeligos lin. Tiel ni havos pacon.“ Certan tempon neniu diris ion pri tiu propono.

Howard ekstaris, rigardis al la terpomoj, do al rara luksaĵo, pikadis en ĝi, residiĝis kaj diris: „Tio pri la sendado ĉielen estus stultaĵo. Li eble estas tute senkulpa trampo, kiu preferas vagadas tra la vasta mondo de Dio kaj al sia kara kreinto preĝas per tio, ke li ĝojas elkore pri ĉio, kio videblas ĉirkaŭe

je belaĵoj anstataŭ laboraĉi en la naftokampejoj aŭ en la minoj por aĉa salajro. Kaj sendi ĉielen tian senkulpan trampon, tio estus krimo.“

„Ni ja ne scias, ĉu li estas naivulo aŭ fripono“, protestis Dobbs.

„Tio ankaŭ povus malkaŝiĝi“, diris Howard.

„Mi volus scii, kiel?“ Dobbs fariĝis nur des pli konvinkita pri tio, ke lia plano estas la plej bona. „Ni enfosos lin. Neniu lin trovos. Se ili malsupre rakontos, ke ili vidis lin supreniri, ni diros, ke ni ne vidis alveni lin, kaj punkton. Ni ja ankaŭ povus ĵeti lin en la ravinon. Li povus esti falinta per si mem, ĉu ne?“

„Ĉu volas vi fari tion?“ demandis Howard.

„Kial mi? Ni ja povus elekti per alumeto la faronton.“

La oldulo rikanis: „Jes ja, kaj tiu, kiu estos farinta tion, tiam povos rampi surventre dum sia tuta plua vivo antaŭ la du aliaj, kiuj vidis tion, ĉu? Tio estas ĉio bela kaj bona, se oni estas tute sola. Sed ĉi tie, kiel la aferoj statas, mi diras, ke ne.“

„Ankaŭ mi diras, ke ne.“ Fine ankaŭ Kurtin denove miksiĝis en la interparoladon. „Tio ĉi estas tro multekosta, tro stulta. Ni devos trovi ion alian.“

„Ĉu vi efektive estas tute certa, ke li sekvis vin, kaj ke li venos supren ĝis ĉi tie?“ demandis Howard.

Kurtin rigardis malsupren laŭ si kaj diris rezignante: „Mi estas tute konvinkita, ke li venos, kaj ankaŭ, ke li trovos nin. Li faris tute la impreson, kvazaŭ li – “ Ĉi-momente Kurtin levis la okulojn, rigardis al la malvasta senarbejo de la vepro kaj diris kun laca voĉo: „Tie li jam staras.“

Nek la oldulo nek Dobbs demandis, kie? Ili estis tiom surprizitaj, ke ili eĉ forgesis sakri. Ili sekvis la okulojn de Kurtin. Kaj en la ombro de la ekestanta nokto, skeme iluminata de la bivakfajro, staris la fremdulo. Apud si, tenante la kondukilon, li havis mulon.

Li staris tute silenta, ne vokis la kutiman „halo“ transen, ankaŭ ne vokis *How do you do?* kaj ankaŭ ne ofertis „Bonan vesperon“. Li staris nur tie kaj atendis. Li staris tie tiel, kiel malsata viro, kiu estas tro fiero por almozpeti ion.

Kiam Kurtin rakontis pri la viro, kiun li renkontis malsupre en la vilaĝo, imagis ĉiu el ambaŭ aŭskultantoj ion certan pri la aspekto de la viro. Sed Howard kaj Dobbs tute alie imagis la viron. Dobbs pensis pri viro kun la krudaj parte besteĉiĝintaj vizaĝtraĵoj de vagabondo en la tropikoj, kiu mizere vivas sian vivon helpe de stratrabado, kaj kiu ne ektimas pri iu ajn murdo, se li rigardas tion necesa por sia propra sekureco aŭ por konsiderinda predo.

Howard tute male pensis la fremdulon kutima oroserĉisto, korpe fortika, veterrezista, ledovizaĝa viro, kiu havas manojn kiel elsekiĝintaj arboradikoj, kiu timas neniun danĝeron kaj akceptas neniujn obstaklojn, kiu neniam estas en embaraso pri elirvojo, homo, kiu fikse direktas ĉiujn sensojn

kaj ĉiujn pensojn obstine al la sola celo: trovi oron kaj senrespekte ekspluati ĝin. Li havis la imagon pri tute honesta oroserĉisto de la bona speco, kiu neniam krimos ion kaj murdos iun nur tiukaze, se temas pri la defendo de lia mino aŭ de lia ekspluatitaĵo.

Kaj nun ambaŭ estis surprizitaj. La fremdulo nek kongruis kun la imago de Dobbs nek kun tiu de Howard. Li aspektis tute alia. Tiu fakto, ke li aspektis tute alia ol ili imagis, kaj la alia fakto, ke li staris pli subite kaj multe pli rapide tie antaŭ iliaj okuloj ol ili atendis, estis la kaŭzo, ke neniu diris ion, ke neniu vokis ion surprizite.

La fremdulo staris ankoraŭ silente en la malvastejo, kiu kondukis tra la vepro al la kampadejo. Li ŝajne simile surpriziĝis kiel la tri viroj, kiuj sidis ĉe la bivakfajro. Li atendis nur unu viron tie, Kurtin, kaj je sia surprizo li trovis tri virojn. La mulo priklaradis arbustojn. Poste la mulo verŝajne ekflaris la azenojn de la viroj, kaj ĝi ekkriegis. Sed ĝi elpuŝis nur unu krion. Ankoraŭ en la mezo de la krio, sen fini ĝin, la mulo eksilentigis, kvazaŭ ĝi ektimus la silentadon, kiu regis tie inter la viroj.

La triopo eĉ tiumomente ne trovis vortojn. Ili atentis nek la fajron nek la manĝon, kiu bolis sur la fajro. Ili ĉiam gapis nur sur la fremdulon, kaj ili ŝajne atendis, ke li ion diros aŭ ke li faros ion. Sed li ne moviĝis.

Jen Dobbs ekstaris kaj iris per hezitemaj paŝoj renkonte al la sintrudulo. Li havis la intencon bruske ataki lin per vortoj: ‚Kion vi volas ĉi tie? Kiel vi venis ĉi tien? Kiu vi estas?‘

Sed kiam li tiam tute proksimis al li, li diris nur: „Halo!“ Ankaŭ la fremdulo diris: „Halo!“

Dobbs havis la manojn en la pantalonpoŝoj. Li ne sciis kion diri. Tiam finfine li diris: „Venu transen al la bivakfajro.“

„Dankon“, diris la fremdulo koncize.

Li proksimiĝis pli, levis la malnovan selon kun la du sakpakaĵoj de la mulo, katenis la antaŭajn krurojn de la besto, frapis ĝin permane sur postaĵparton kaj tiam ĝi ek-trotis lante en tiu direkto, en kiu paŝtis sin la azenoj.

„Bonan vesperon“, li salutis kaj sidiĝis al la fajro.

Nur Howard respondis: „Kiel vi fartas?“

„Hm!“ diris la fremdulo.

Kurtin kirlis la fazeolojn kaj skuadis la terpomojn. Howard turnis la viandon, kaj Dobbs, kiu ankoraŭ ne sidiĝis denove, mallongigis per hakilo la lignon kaj ĵetis ĝin sur la fajron.

„Mi ja scias, ke mi ne estas bonvena ĉi tie!“ , diris la fremdulo.

„Tion mi ja jam malsupre sufiĉe klare diris al vi.“ Kurtin ne rigardis supren, kiam li diris tion.

„Mi ne povas ĉiam nur kaŭri kun la indiĝenoj. Mi volonte sciis, kiel aspektas ĝustaj homoj.“

„Tiukaze do ekiru kaj rigardu ilin.“ Howard estis sufiĉe malĝentila. „Ankaŭ ni ne scias, kio okazas ekstere.“

„Ni ankaŭ tute ne interesiĝas pri tio“, objetis Dobbs grumble. „Ni havas aliajn zorgojn. Por ke vi ankaŭ tuj sciu tion, tiu alia zorgo estas vi. Ni vere ne bezonas vin ĉi tie, eĉ ne por bruligi fajron. Pli bone, se vi morgaŭ frue matene foriĝos de ĉi tie. Alie ni povus fariĝi tre malagrablaj.“

La fremdulo diris nenion pri tio. Li sidis kvieta kaj observis kiel la aliaj okupiĝas pri la vespermanĝo. Kiam ĝi estis preta, diris Kurtin: „Prenu kaj manĝu. Hodiaŭ ĝi ja ankaŭ por vi sufiĉos. Ĉu ankaŭ morgaŭ, tio ankoraŭ montriĝos.“

La manĝo estis manĝata en silento. Se iu diris ion, temis nur pri la manĝo, ke la viando ne estas bona aŭ, ke la fazeoloj estas tro duraj kaj la terpomoj tro akvecaj. La fremdulo ne miksiĝis en la interparoladon. Li manĝis nur malmulte.

Kiam la manĝo estis finita, la triopo ekbruligis siajn pipojn.

„Ĉu vi havas tabakon?“ demandis Dobbs.

„Jes“, diris la viro trankvile, kaj li komencis ruli cigaredon por si. La triopo, por ne sidi tute silenta kaj samtempe por deflankigi la fremdulon de la spuro, parolis pri ĉasado. Sed ĉar ili ne okupiĝis pri ĉasado, ilia parolado ne sonis tre konvinka. Ili havis ankaŭ la senton, ke la fremdulo pli komprenas pri ĉasado kaj pri feloj kaj pri ĉio, kio koncernas tiun negocon, ol ili mem. Tial ili fariĝis nesekuremaj kaj komencis paroli pri tio forlasi la kampadejon kaj migri al alia regiono, kie ekzistas pli da grandaj ĉasbestoj.

„Ĉi tie tute ne estas ĉasregiono“, enmiksiĝis subite la fremdulo, kiam la aliaj ĝuste intermetis atentofrape longtempan parolpaŭzon. „Sed estas ĉi tie tre taŭga orregiono, ĉi tie estas oro. Mi vidis ĝin jam antaŭ kelkaj tagoj je la malnovaj elsekiĝintaj riverfluoj, kiuj ĉi tie kondukas malsupren de la montaro.“

„Ĉi tie ne estas oro“ kontraŭdiris Dobbs. „Ni estas dum sufiĉe longa tempo ĉi tie por scii tion. Ankaŭ ni prefere fokus ornuksojn ol ĉasi. Kia sensencaĵo!“ li aldonis moke ridante. „Infaneta babilaĉo. Ankaŭ ni ne estas de hieraŭ, kaj ankaŭ ni povas distingi orobulon de siliko. Ni ne bezonas viajn konsilojn.“

Li ekstaris kaj iris al la tendo por sterni sin kaj dormi.

Neniu diris ion pri tio kaj la fremdulo ŝajne ne ĉagreniĝis pri la malĝentila parolmaniero de Dobbs. Eble li jam kutimiĝis pri tia maniero de interparolado.

Howard rektiĝis kaj oscedis. Kurtin per frapado malplenigis sian pipon. Poste ambaŭ, unu post la alia ekstaris kaj iris simile malrapide al la tendo. Ili diris nek „Bonan nokton!“ al la fremdulo, nek invitis lin kunveni en la tendon.

Ankaŭ la fremdulo nun ekstaris. Li fajfis kaj post iom da tempo lia mulo alvenis iomete lamirante. Li iris renkonte al ĝi, frapis ĝin afable sur la nukon, parolis kelkajn vortojn al ĝi, kaj per frapo de plata mano li pelis ĝin denove sur ĝian vojon.

Poste li metis lignon sur la fajron, sidiĝis kaj zumadis por si mem. Finfine li denove ekstaris kaj iris al sia selo. Li portis iun el la du paksakoj al la bivakfajro, elŝiris el ĝi kovrilon, ruliĝis en ĝin, sternis sin, apogante sin per la kapo sur la pako, etendis siajn piedojn al la fajro kaj komencis dormi.

Interne en la tendo oni interparolis. Estis sufiĉe for de la fajro, tiel, ke la fremdulo povis kompreni nenion. Krome ili parolis nur mallaŭte, sed tre fervore.

„Sed mi estas tamen por tio“, diris Dobbs, „ke ni denukigu lin, iel.“

„Ĝis nun ni scias ja ankoraŭ nenion, kio koncernas lin.“ La oldulo diris tion en trankviliga tono. „Li aspektas sendanĝera. Mi ankaŭ ne pensas, ke li estas spiono. Li ne aspektas tiel. Spiono ankaŭ ne venus sola kaj ne aspektus tiom elmalsatigita. Mi pensas, ke li havas malpuran konsciencon. Oni persekutas lin, pro iu afero.“

„Oni povus komenci kverelon kun li“, diris Kurtin, „kaj poste oni kroĉos sukan frapon al li.“

„Tio sonas sufiĉe drola“, diris Howard „sed tio ne estas tre rekomendinda. Tio estas fia.“

„Ĉu fiaĵo ĉu ne.“ Dobbs atakis lin per furiozaj vortoj: „Ni devas liberiĝi de li, tio estas ĉio. Li ja sufiĉe frutempe estis avertita.“

Ili ankoraŭ interparolis certan tempon, sed tamen ili ĉiam revenis al la punkto, ke li devos foriĝi, sed ke mortigo havus kelkajn malavantaĝojn. Dum tio ili fine endormiĝis.

1 1

Sekvamatene ili renkontiĝis tre fihumore ĉe la bivakfajro. La fremdulo jam alportis lignon kaj denove ekflamigis ĝin. Li plenigis sian kaldronon per akvo kaj metis ĝin al la fajro. Dobbs tuj salutis lin: „Kara amiko, de kie vi havas la akvon?“

„Tiun mi ĉerpis el la sitelo.“

„Do, ĉerpis el la sitelo. Tio estas ja tre afabla de vi. Sed vi ne pensu, ke ni estas viaj servistoj kaj pene portos la akvon supren por vi.“

„Tion mi ne postulas. Mi iros por replenigi la sitelon.“

Kiam li diris tion, Kurtin ĵus venis al la bivakfajro. Eble eĉ pli fihumora ol Dobbs. Sed li tuj ciumis lin: „Ŝteli akvon, ĉu? Rabi nian lignon, ĉu? Kion vi pensas? Se vi ĉi tie prenos ankoraŭfoje ion, kio apartenas al ni, jen ni faros kribrilon el vi. Jen ĝangalrajto.“

„Mi pensis, ke mi estas inter honestaj homoj, kiuj translasas gluton da akvo al mi.“

Tuj Dobbs saltis al li. „Kion vi diras, pestulo? Ke ni estas

malhonestaj homoj, ĉu? Eble eĉ banditoj, ĉu?“ Kaj li pugnobatis lin, bone celinte, vizaĝen.

La fremdulo laŭlonge falis. Lante li ekstaris.

„Mi nun simile povus kroĉi hokon al vi. Sed kion mi komencu kontraŭ triopo? Vi atendas ja nur pri tio, ke mi eltiros mian revolveron por adiaŭi min per certa rajtigiteco en la transmondo. Sed tion mi ne faros. Mi ne estas frenezulo. Eble ja venos la tempo, kiam ni povos glatigi la kalkulon.“

Howard, kiu, kiel la aliaj, intertempe venis al la bivakfajro, demandis nun trankvile: „Ĉu vi havas ion por manĝi, fremdulo?“

„Mi havas saketon kun teo, mi havas ankaŭ fabojn kaj rizon kaj du skatolojn da lakto.“

„Kafon vi povas trinki kun ni. Ankaŭ manĝi. Hodiaŭ. Morgaŭ vi devos zorgi mem pri vi.“

„Dankon!“ respondis la viro.

„Ĉu morgaŭ?“ demandis Dobbs. Lia kolero rimarkinde malpliiĝis pro la lokita pugnobato al la enpenetrinto.“ „Ĉu morgaŭ? Ja, aŭskultu foje, ĉu vi ĉi tie volas setli vin je daŭro?“

„Mi pensas, ke jes“, la viro respondis trankvile.

Jen Kurtin kriis: „Setli, ĉu? Ĉi tie? Sed nur kun nia permeso.“

„La vepro kaj la montoj estas liberaj por ĉiu, kiu alvenas ĉi tien.“

„Nu, tiel tio ne estas, olda knabeto“, diris pri tio Howard. „Liberaj estas la montaro kaj la vepro kaj la ĝangalo malsupre, kaj la dezerto tie malantaŭe. Ĉio ĉi estas libera. Sed ni estas ĉi tie la unuaj, kaj la unua havas la setlorajton.“

„Tio ja pravas. Sed leviĝas la demando, ĉu vi estis la unuaj ĉi tie? Eble mi estis ja jam antaŭ vi ĉi tie? Antaŭ ol vi eĉ nur pensis pri tio setli ĉi tie.“

„Ĉu vi registrigis vian rajtigon?“

„Ankaŭ vi ja ne havas licencon.“

„Mi demandas vin, ĉar momente ni estas ĉi tie. Se tio efektive pravas, ke vi estis ĉi tie antaŭ ni, vi ne markis ion, vi forlasis la lokon, kaj per tio vi perdis ĉiujn rajtojn.“

La fremdulo silentis dum certa tempo. La triopo okupiĝis pri la preparado de la matenmanĝo. Ili ne hastis, ĉar ili ne sciis, kion komenci post la matenmanĝo. Labori ili ne povis, ĉar la fremdulo tiukaze trovus la minon. Sed ankaŭ ĉasi por ŝajnigi al la fremdulo okupon, ne plaĉis al ili. Unu el ili devus restadi kampadeje, por malhelpi la fremdulon traserĉi ĉion pro la mino kaj eble eĉ trovi ĝin. Sed tiun unuopulon, kiu restadus ĉi tie, la fremdulo povus eĉ venki. Restis ankoraŭ alia elirvojo. Du el ili sur la sekreta ĉirkaŭvojo povus

atingi la minon kaj tie labori, dum unu el ili restadus tie por kontroli la fremdulon. Sed la fremdulo ne sidus trankvila, sed vagadus. Se tiu, kiu restadus ĉe li, malpermesus tion al li, tiukaze tio des pli vekus ties suspekton, ke ĉi tie okazas io sekreto plena. Fine Kurtin havis ideon pri elirvojo. „Ni iros post la matenmanĝo kune ĉasi“, li diris al la fremdulo, „ni bezonas iom da viando.“

La fremdulo rigardis la aliajn, kvazaŭ li serĉus sur iliaj mienoj la celon de tiu propono. Sola iri kun li por ĉasi, ĉu? Tio donus al ili okazon kvazaŭ per akcidento mortigi lin, kaj tiel li estus forigita. Fine li diris al si, ke tiukaze, se ili volus forigi lin, ili farus tio ja tamen, kaŭzo troviĝus ĉiam.

„Hodiaŭ mi ja povas iri ĉasi kun vi“, li diris, „por ke ni havu provizon. Sed morgaŭ mi havos malmulte da tempo.“

„Kial?“ demandis la triopo samtempe kaj rigardis lin mirigite.

„Morgaŭ mi ĉi tie komencos serĉi oron. Ĉi tie estas oro. Kaj se vi ankoraŭ ne trovis ĝin, tiukaze estus nur pruvo, ke vi estas sufiĉe stultaj.“

Tio ĉagrenis la oldulon kaj li objektis laŭte: „Sed, se ni ne estus tiel ŝtipkapulaj, kiel vi pensas, kaj se ni estus trovintaj oron ĉi tie?“

„Tiukaze tio estus tute natura“, diris la fremdulo. „Sed vi ne trovis oron. Aŭ, se vi havas oron, tiukaze nur kelkajn manplenojn, nur iomete, skrapita de la supraĵo. Sed ĉi tie la oro kuŝas kvazaŭ vejne, ie ĉi tie kuŝas pli ol miliono da dolaroj,

el pura oro.“

„Miliono, ĉu?“ demandis Howard kun malfermŝiritaj okuloj.

Dobbs kaj Kurtin tute ne povis diri ion pro ekscitiĝo.

„Vi ne trovis la orovejnon, tion mi scias“, parolis la fremdulo trankvile plu. „Mi scias, ke vi estas ĉi tie jam preskaŭ dum jaro. La indiĝenoj malsupre diris tion al mi, ke viro jam tiom longe estas ĉi tie supre. Se vi estus ekfrapintaj la larĝan vejnon, jen vi havus tiom da oro, ke vi estus jam delonge foriĝintaj, ĉar vi tute ne povus fortransporti ĝin sen frapi atenton. Aŭ vi havus ĉi tie koncesiitan minejon, kun licencoj kaj maŝinoj kaj du aŭ tri dekoj da laboristoj.“

„Ni havas ĉi tie neniom, tute neniom“, diris Dobbs.

„Vi ja nun povas supozi min tiu aŭ ti ĉi, tute laŭ via plaĉo. Sed infano mi ne estas. Kaj se vi triope tiom da monatoj vivadas ĉi tie, jen vi faras tion ne pro plezuro. Mi pensas, ke ni parolu klardire kaj metu la kartojn senkaŝite sur la tablon. Kiun valoron havu la kaŝludo? Mi ne estas fia kadavro, mi estas certe minimume tiel honesta kiel vi. Pli bone ol vi mi tute ne volas esti. Ni ĉiuj volas gajni ion, ĉu ĉi tie en la vepro aŭ ie en la urbo. Komprenoble vi povus forigi min, tion mi scias tute certe. Sed tio povas okazi ankaŭ aliloke al mi kaj ankaŭ pere de aliaj. La riskon mi devas ja transpreni. Do, ĉu ni parolu tute klare reciproke?“

„Lasu nin foje dum iom da tempo interparoli tute solaj“, diris Howard.

„Tio estas en ordo, Howard“, respondis Dobbs. „Mi opinias, ke ni donu al li okazon pruvi, ke li estas nek spiono nek embuskas per io alia, kio ne plaĉas al ni.“

Nun li turnis sin rekte al la fremdulo: „Ni ja ne povas rigardi en vin, ĉu vi estas fripono, ĉu ne. Estas ĝuste, ke ni havas ĉi tie kelkajn monatojn da turmenta laboro post ni, honestan laboraĉon, pri tio vi povas fidi. Kompreneble, se ni interkonsentiĝos kun vi, vi eble povus ĉagreni nin. Kion tio povus kosti? La perdon de niaj penoj kaj suferoj. Sed mi povas certigi al vi, ke ni kaptus vin, kaj eĉ, se vi rampus ĝis supren al Hudsona Maro. Ni kaptus vin kaj tiam ne estus pardono. Do, ekparolu, kion vi volas, kaj kion vi intencas?“

La fremdulo eltrinkis sian kafon kaj poste diris: „Mi estis tute honesta al vi, dekomence. Mi diris al vi, ke ĉi tie estas oro, kaj ke mi venis por surpiki ĝin.“

„Kion plu?“ demandis Kurtin.

„Nenion plu“, respondis la fremdulo.

„Bone, bele kaj bone“, Howard objetis. „Sed kio estus en tiu kazo, se ni ĉi ti estus trovintaj iun pagokoton? Vi ja eble ne pensas, ke ni interkalkulus tion kun vi. Ni mem sufiĉe laboraĉis por tio. Nu, *well*, jen ĝi elestas. Jes ja, ni trovis ion kaj baldaŭ finos la aferon.“

Sen heziti diris nun la fremdulo: „Tio estas komenco. Se vi estas rektaj, ankaŭ mi estos rekta, kaj ni vidu, kiel ni interkonsentiĝos. Tuj por komenci: Je tiu loko mi havas rajton. Atendu, ne tuj ekscitiĝu. Kompreneble mi ne havas rajton

sigelitan, neniun licencon kaj nenion similan. Mia rajto bazas sin sur tio, ke mi scias ion, kion vi ne scias. Tio estas pli bona ol la plej bela stampita kaj impoŝtita licenco. Vi trovis neniom, tute neniom. Eble kelkajn orajn nuksetojn. Tiujn vi rajtas trankvile reteni.“

„Tion ni faros, tio tiel certas kiel amen en preĝo, ke ni retenos tion, kion ni havas, por ni“, diris Kurtin.

„La afero estas tiel.“ La fremdulo parolis tre lante. „Sola mi ne povas fari tion, kion mi intencas fari. Mi bezonas homojn, kaj mi pensas, ke vi taŭgas plej bone. Vi havas same tiom da intereso pri tio, kiom mi mem sekretigi la rakonton tiom longtempe, kiom eblas tio. Vi havas la ilojn. Mi havas neniujn. Mi povus tion, kion mi scias, vendi al kompanio. Sed apenaŭ iu pagos al mi eĉ nur cent dolarojn pro tio. La homoj volas vidi faktojn. La faktojn mi povas montri nur ĉi tie. Mi havas krome gravajn kaŭzojn ne fari tro da bruoj, ĉar alie iu kun tielnomataj rajtoj povus avanci kontraŭ mi. Mi proponas al vi la sekvan: Tion, kion vi havas, vi retenu por vi. Sed tiu oro, kiu ekde hodiaŭ estas enspezata, kiu estas enspezata per tio, ke vi laboras kun mi je mia plano, mi ricevos du kvinonojn kaj vi ĉiuj unu kvinonon.“

La triopo reciproke rigardis sin dum iom da tempo kaj ekridis.

Poste diris Howard: „Pajlon ni povas mem ŝpini en oron, kara bubo, kaj rakontojn ni povas rakonti al ni mem. Kion vi ĉiuj pensas?“ Li turnis sin al siaj kamaradoj.

Dobbs diris: „Tiel aŭ tiel. Ni estas preskaŭ jam pretaj kaj ĉe la fino. Ni perdos nenion, se ni aldonos kelkajn tagojn.“

„Tion pensas ankaŭ mi, ni perdos nenion. Se efektive io estas pri tio, kial ni ne provu? Ĉar ni estas jam ĉi tie“, opiniis Kurtin.

„Mi ne partoprenos“, diris la oldulo, „tio estas rakontoj pri rabistoj. Kaj mi estas sufiĉe sata pri la ŝtelĉasado. Mi volas refoje havi ĝustan liton sub mia postaĵo. Al mi sufiĉas. Sed kompreneble, se vi partoprenos, ankaŭ mi devos partopreni. Sola mi ne povus trabaraktiĝi dum du semajnoj en la vepro kaj la dezerto.“

„Aŭskultu, oldulo“, diris Kurtin, „grandan intereson, fari multajn kromhorojn, ankaŭ mi ne havas. Mi havas iun, kiu atendas min. Ni aldonu semajnon. Se ni trovos dum tiu ĉi semajno la promesitan, kiun la birdeto ĉi tie pepis al ni, jen bone. Kaj tiam ni povos ja decidi, ĉu indos la penon. Se ni ne atingos esperigan rezulton dum semajno, jen mi kuniros kun vi, oldulo. Ĉu ĉiuj konsentas pri tio?“

Ili diris, ke jes, kaj la fremdulo havis la vorton por klarigi siajn planojn.

„Cetere, kiel vi nomiĝas, ulo?“ demandis Howard.

„Lacaud“, diris tiu, „Robert Lacaud, el Arizono.“

„Ĉu parenco de la familio Lacaud en Los-Anĝeleso, mebloj?“ demandis Howard.

„Jes, de la flanko de la praavo. Sed mi havas nenion komunan kun ili. Mi estas disigita de ili je morto kaj perejo. Kaj se ni estus konvinkitaj, ke ili iros en la ĉielon, tiukaze ni cindrigus ses preĝegojn, nur por iri en la inferon kaj ja ne devi sidi kune kun la alia partio. Sed ne zorgu, ili ne venos en la ĉielon, tiuj heredaĵaj trompistoĵ.“

„Tiukaze vi devos damne peni, por ke oni akceptu vin en la ĉielo“, kun rido diris Dobbs, „tiel kiel vi mem kondutas momente, vi ne povos eviti la vojon de via parenkaro.“

„Eble tamen“, diris Kurtin. „Se mi estas ĝuste informita, ili havas tie diversajn boligajn sekciojn, kaj li povas ja sufiĉe frutempe petskribi, ke li ne estu trempita ĝuste en tiun kaldronon, en kiu oni stufas la aliajn honorindajn membrojn de lia moŝta familio. Io tia ĉiam aranĝeblas, ĉar Belzebuto havas koron. Kiel li alie povus tiom ofte ŝerci kaj ĉiam tiel gaji kaj esti ĉiam en bona humoro?“

Howard jam ekstaris por kontrolii la azenojn, por ke ili ne vagadu tro malproksime. Dum tio li grimpis sur pli alte situantan belvederon de la monto, por tie havi pli bonan superrigardon.

„Halo!“ li vokis laŭte.

„Kio estas?“ vokis Dobbs kaj Kurtin samtempe. „Ĉu la azenoj estas for?“

„Venu rapide ĉi tien. Sed diable rapide.“

Ambaŭ eksaltis kaj kuris transen. Ankaŭ Lacaud sekvis rapide.

„Kio estas tio, tie transe, kiu proksimiĝas al nia monto?“ vokis la oldulo. „Eble vi povas ekkoni tion pli bone.“

„Tio estas soldatoj aŭ rajdobesta federacia polico“, diris Dobbs.

Kaj tuj li aldonis: „He, kanajlo fia!“ Li turnis sin al Lacaud. „Do, tio vi estas. La malkovro okazis ja rapide.“

Subite li eltiris la revolveron kaj levis ĝin kontraŭ Lacaud. Sed Howard, staranta malantaŭ li, premis ties brakon malsupren.

„Vi malpravas“, diris Lacaud, kiu paliĝis pro la rapida movo de Dobbs. „Mi havas nenion komunan kun la soldatoj kaj la polico.“

„Aŭskultu, infaneto“, diris Howard al Lacaud. „Ne faru al ni dikan kaĉon ĉi tie. Se ili persekutas vin, jen ek do, kaj tuj. Lasu vin vidi de ili, sed ni ne volas havi policon ĉi tie. Ekmarŝu, malsupren, kaj sur ilian vojon. Alie ni ĵetos vin rekte en iliajn faŭkojn. Ni ne bezonas ilin ĉi tie.“

Kurtin grimpis iom pli alten kaj longe kaj zorgeme rigardis malsupren.

„Foje paciencu, knaboj“, li diris. „Mi pensas, ke ili ne estas soldatoj. Tio ankaŭ ne estas polico. Ili estas tro diverse vest-

itaj, ili havas ankaŭ diversajn fusilojn. Se mi vidas tion ĝuste, havas unu el ili eksterordinare longan pafilon, kiu certe aĝas cent jarojn. Mi scias nun, kiuj ili estas. Ili estas banditoj.“

„Damne“, vokis Howard, „jen ni saltas el la pluvo en marĉan truon. Banditojn ni bezonas eĉ dekfoje malpli ol la rajdantan federacian policon. Jen vivdanĝero. La polico fiksus nin, kaj ĉar ni krimis ja nenion, nur ĝuste forgesis pagi la kotizon, ni povus interkonsentiĝi. Sed ĉe la banditoj, jen ni devos mordi.“

Kvazaŭ li nun subite ekhavis ideon, li turnis sin al Lacaud: „Nu, filo, klarigu foje. Do, vi ĉi tie pelis la banditojn ĉi tien al ni, ĉu? Do bandita spiono. Jen mi ja pensis dum certa tempo ĝuste.“

„Mi havas nenion komunan eĉ kun la banditoj“, diris Lacaud. „Lasu min foje mem rigardi.“

Li grimpis supren al Kurtin, rigardis certan tempon streĉite malsupren kaj diris poste: „Tio estas banditoj. Mi scias nun ankaŭ, kiaj banditoj. Tion mi aŭskultis sur la haciendo de la *señor* Gomez. Li havis gazeton kun la priskribo. Mi ekvidas tie iun kun orobronza pajloĉapelo, kiu estas menciita en la priskribo. Li kuraĝas, ĉar li ne ŝanĝis la ĉapelon. Certe li ne scias, ke la ĉapelo estas en la priskribo. Ili ja ne vidas gazetojn kaj ankaŭ ne povas legi ilin. Tio estus la plej lastaj el ĉiuj banditoj, kun kiuj mi volus havi ion komunan.“

Kaj dum la tuta kvaropo observis nun la movojn de la banditoj el la alto kaj atendis, ĉu la rajdistoj enkurbigis en la padon, kiu kondukus ilin kun granda certeco ĉi tien sur la monton, rakontis Lacaud, kion li legis pri tiuj banditoj en la gazeto, kaj kion la homoj en la haciendo sciis raporti pri ĉi ĉi. Ĉar, kvankam la plimulto de la indiĝenoj kaj de la indiĝenaj laboristoj en la haciendoj ne povas legi gazetojn, tamen disvastiĝas la raportoj pri tiaj okazaĵoj tra la vasta malfermita lando kun la rapideco de kuranta prerifajro.

12

En malgranda fervojhaltejo, kie la fervojistoj de la nokto-trajno restadis du minutojn por plenumi la poŝtservojn, por akcepti du aŭ tri veturgastojn aŭ por lasi eliri ilin, grimpis ĉirkaŭ dudek ĝis dudekkvin viroj en la trajnon. Estis inter la naŭa kaj la deka vespere, kiam jam estis tre malhele.

Neniam okazis, ke en tiu malgranda haltejo eniris tiom da viroj en la trajnon, sed nek la staciestro nek la personaro de la trajno cerbumis pri tio. Povis ja esti viroj, kiuj volis veturi ien al foirplaco aŭ iuj, kiuj laboris en la minejoj kaj strikis, aŭ kiuj volis serĉi laboron en aliaj mindistriktoj.

Ĉiu el ili estis mestizo, ĉiu surhavis sian grandan pajloĉapelon, pantalonon, ĉemizon kaj sandalojn aŭ botojn. Ĉiuj kovris sin per kovriloj, ĉar la nokto estis frideta. Ĉar ne plu estis vendataj veturbiletoj post la eknoktiĝo en malgrandaj haltejoj, ili venis sen veturbiletoj. Ili aĉetebilis en la trajno.

La haltejo estis tenebra. Nur la staciestro havis sian lanternon kaj la trajnfervojistoj, kiu hastadis rapide apud la trajno. Tiel neniu vidis la vizaĝojn de la viroj, kiujn ili krome kovris per la kovriloj ĝis la nazo, kio ne frapis la atenton, ĉar tio estas normala.

Ĉiuj grimpis en la unuan vagonon de la dua klaso, kiu tuj sekvas post la pakaĵa vagono. En tiu vagono de la dua klaso sidis kiel kutime la dek du soldatoj kun ilia oficiro, ĉiuj kun pafprete ŝarĝitaj fusiloj por gardi la trajnon kontraŭ banditaj atakoj.

La plimulto de la viroj restis en la unua vagono de la dua klaso, sed kelkaj el ili, post kiam ekmoviĝis la trajno, iris de tiu vagono trans la platformon en la duan vagonon de la dua klaso, verŝajne por trovi pli bonajn sidlokojn. Ambaŭ vagonoj de la dua klaso estis plejparte okupitaj per kamparanoj, kutimaj komercistoj kaj indiĝenoj, kiuj intencis porti siajn varojn al la plej proksima pli granda urbo.

Malantaŭ la du vagonoj de la dua klaso sekvis la vagono de la unua klaso, ankaŭ tiu estis plejparte okupita. Kaj post tiu sekvis, kiel lasta, dormvagono.

La ekveturinta trajno rapidiĝis tre rapide. Ĝis la sekva haltejo estis tempodistanco de dudek minutoj aŭ kelkaj pli. Kiam la trajno plenveturis kaj rapidegis kaj la fervojistoj estis okupataj pri la vendado de la veturbiletoj al la novaj kunveturantoj, la viroj okupis la pordojn de la vagonoj, en kies proksimeco ili staris dekomence, kvazaŭ ili volus uzi multe da tempo por la serĉado de taŭgaj sidlokoj.

Samtempe, sen diri vorton, sen voki averton, ili tiris el siaj kovriroj fusilojn kaj revolverojn kaj komencis rapidan pafadon. La pafado celis speciale la soldatojn, kiuj havis siajn fusilojn starantaj inter la genuoj aŭ flanke apogitaj kontraŭ vagonvando, ili aŭ legis en legolibroj por lerni la legadon kaj skribadon aŭ maĉis sian vesperan panon aŭ dormis.

La pafado daŭris nur ĉirkaŭ dek sekundojn; tiam ruliĝis ĉiuj soldatoj en sia sango. La plimulto estis morta kaj la ceteraj anhelis kaj estis mortantaj. La trajnpersonaro kuŝis pafmortigita aŭ vivdanĝere vundita surplanke aŭ sur la benkoj. Dudek veturgastoj estis trafitaj, kelkaj mortaj, kaj aliaj elsangantaj terure vundite. Beboj je la mamoj de la patrinoj, inoj kaj infanoj sangantaj kaj mortantaj en kaosa pelmelo. Viroj kaj sinjorinoj surgenuis kaj petis pri kompto, patrinoj levis alte siajn plorĝemantajn bebojn por vekti la kunsenton de la banditoj, aliaj ofertis sian povrulan havaĵon kiel rekompenco por sia vivo. Sed la banditoj pafis kaj pafis, ĝis la municio estis forpafita.

Tiam ili komencis prirabadi la veturgastojn. Ili prenis ĉion, se ĝi havis certan valoron. Parto de la banditoj iris en la unuan klason kaj forprenis tie valoraĵojn sen pafi. Horloĝojn kaj monujojn, fingringojn kaj orelingojn, kolĉenojn kaj braceletojn. Se la predo ne ŝajnis sufiĉe granda, helpis puŝo en la stomakon per la revolvero aŭ la fusilo, tiel, ke la koncernato rapide rememoris, ke li havas ankoraŭ kelkajn ormonerojn en la maldekstra pantalonpoŝo kaj briliantringon en la kofro.

Poste oni tralumigis la dormvagonon, pelis la veturgastojn el la litoj kaj forprenis de ili ĉiujn moveblajn havaĵojn.

La trajno rapidegis dum la tuta tempo sur sia vojo. Eble la lokomotivestro ne aŭdis la pafadon, aŭ li aŭdis ĝin kaj esperis atingi la sekvan haltejon dum tiom rapida veturado, ke la banditoj ne povus desalti.

Sed la banditoj denove moviĝis antaŭen tra la du vagonoj de la dua klaso, kie la paniko de la veturgastoj atingis nepri-skribeblajn formojn, kiam revenis la banditoj. La rabistoj zorgis pri nenio kaj ekscitiĝis pri nenio. Ili iris trans la platformon al la pakaĵvagono, malfermrompis la kofrojn aŭ ĵetis ilin eksteren por kunkolekti ilin iam poste. Ili murdis la pakaĵoficiston kaj grimpis ekstere laŭ la veturanta trajno ĝis la poŝtvagono, kie ili mortpafis la du poŝtoficistojn kaj trafosis la poŝtsakojn.

Intertempe la lokomotivestro aŭdis, ke io ne estas en ordo, aŭ li vidis kelkajn banditojn, kiuj jam grimpis el la poŝtvagono en la tendron. La haltejo estis ankoraŭ tre malproksima kaj li ne povis atingi ĝin. Li retroĵetis la bremsstangon, kaj la trajno ŝajnis ekdissplitiĝi, tiom rapide ĝi haltis.

La hejtisto tuj desaltis kaj provis atingi la arbustojn piede de la relvoja taluso. Sed trafite de ses kugloj li renversiĝis kaj ruliĝis malsupren de la deklivo. Antaŭ ol la lokomotivestro gajnis la tempon desalti, jam kvar viroj grimpis sur la lokomotivon kaj firmtenis la lokomotivestron sen pafmurdi

lin. En la ekspedovagono la banditoj malkovris multnombrajn kruĉojn kun petrolo kaj gazolino kunveturigataj kiel ekspedvaroj por *tienda*, por magazena vendejo. Per tiuj flamigeblaj fluaĵoj ili surverŝis la vagonojn, enverŝis tra la disbatitaj fenestroj la gazolinon kaj tiam ili ĵetis ekflamiĝintajn alumetojn en la vagonojn. Eksplodece leviĝis la flamoj en la nigran noktoĉielon.

Kriante kaj plorante kaj plorĝemante, kvazaŭ pelate de frenezo, la veturintoj enfermitaj en la vagonoj provis ŝovi sin tra la fenestroj. Ili buliĝis ĉe la fenestroj, kaj se ili traŝiĝis, ili falis bruldifektite kaj bruligite el la alto malsupren sur la taluson, kaj iliaj membroj dum tio ekrompiĝis aŭ elartikiĝis. Tiuj, kiuj estis tro vunditaj kaj ne tiritaj en la paniko de helpanta mano eksteren, devis brulmorti kun turmentoj.

Antaŭe sur la lokomotivo staris du banditoj, kiuj puŝis siajn revolverojn sur la lokomotivestron kaj ordonis al li, ke li forkuplu la lokomotivon, kaj ke li ekveturu kun ĉiuj banditoj, kiuj buliĝis sur la tendro, ĝis kiam la lokomotivestro ricevu la ordonon halti.

La lokomotivo ekveturis kaj postlasis la brulantan vagonaron kaj la homojn, kiuj de la sovaĝaj flamoj estis terure iluminataj, kaj kiuj en tiu horora iluminado – freneziginte de teruro, doloro kaj malgajo – pelmelis, gestadis, kriis, plorsingultis kaj preĝis, kaj kiuj provis savi el la flamaro postrestintojn. Ĉio ĉi daŭris malpli ol sep minutojn, kaj la halt-ejo, al kiu la lokomotivo eksprese rapidis, estis ankoraŭ malproksima. Kaj subite iu el la viroj komandis al

la lokomotivestro, ke li haltu. La lokomotivo haltis kaj la viroj de-saltis. La lasta el ili pafis sur la lokomotivestron kaj puŝis lin per la piedoj malsupren de la deklivo. Poste la bandito sekvis siajn kunulojn.

Post kelke da tempo la lokomotivestro vekigis el sia senkonscienco. Kun la restinta vivoforto li rampis sur la deklivo supren kaj tiris sin sur sian lokomotivon. Spite al siaj doloroj, spite tion, ke li timis ĉiun sekundon devi renversiĝi, li iel kapablis teni ruligata la lokomotivon. Li atingis kun ĝi la haltejon. La staciestro, mirigita pri la soleca lokomotivo, kaj mirigita pri tio, ke la trajno delonge anonciita de la antaŭa fervojhaltejo, ankoraŭ ne alvenis, iris tuj al la lokomotivo kaj trovis la sangantan lokomotivestron. Kun la helpo de la veturgastoj, kiuj atendis ĉi tie la noktotrajnon, li portis la viron en la stacian barakon, kaj ĉi tie la mortonta maŝinestro havis jam nur tiom da tempo rakonti ankoraŭ la plej necesan pri la terura atako kontraŭ la trajno, antaŭ ol lia vivo estis finita.

La staciestro telegrafis kiel eble plej rapide al ambaŭ flankoj. Li atingis la haltejojn kaj oni tuj promesis sendi helpotrajnon. Tie sur la haltejo staris varotrajno, kiu devis preterlasi la pasaĝertrajnon. Du malplenaj varovagonoj estis elranĝitaj de la trajno, kunkuplitaj kun la varotrajna lokomotivo kaj jam la unua helpotrajno estis preta.

Sed kiu veturigu ĝin, kaj kiu ĝin akompanu? La banditoj certe estis ankoraŭ sur la relo por kunkolekti ĉion, kion ili ĵetis el la vagonaro. Ili tuj atakus la helpotrajnon, jam tial,

ĉar ili volis sekurigi la tutan predon. Versajne ili elŝiris ankaŭ relojn aŭ blokis la relajn vojojn.

La staciestro diris: „Estos pli bone, se ni atendos la grandan helpotrajnon, kiu certe kunportos armeanojn.“

Sed la lokomotivestro de la varotrajno tuj obĵetis: „Veturos mi. Tie kuŝas inoj kaj infanoj en sia sango, kaj tie kuŝas miaj kamaradoj, al kiuj ni eble parte ankoraŭ povos helpi. Mi veturigos la trajnon. Hejtisto, kion faros vi?“

La fervojistoj de Meksiko senescepte estis organizitaj tiutempe en tute bonega sindikato, kiu estis tre radikala kaj ĉiam strikema. Kaj ili estis tre solidaraj, ili unuecis kiel peĉo. Kaj pro ilia organizo kaj pro la spirito, kiu tie regis, kaj kiu faris el ili sincerajn virojn, kiuj ĉiam malsatas pri edukigo, ili konsciis pri sia valoro por la evoluo de lando, kaj tial ili fariĝis tiel ĝentilaj, helpopretaj, ĉiam ridemaj kaj ŝercemaj fervojistoj, kiuj estis tiel diversaj de la grumblaj kaj bojantaj suboficiroj, kiuj malplezurigas en Eŭropo kiel fervojistoj tiom ofte la vojaĝadon de la homoj. Ili ne estis subuloj de fieraj kaj orgojlaj superuloj, sed ili ĉiuj estis kamaradoj, ĉiuj kunuloj de sia fiera organizo. La hejtisto ne estis malofte prezidanto kaj ĉefparolisto en ĝuste tiu loka grupo, kie la liniotrafika estro modeste sidis kun la ranĝistoj, trakforkistoj kaj ŝmiristoj sur la sama benko por trankvile kaj atenteme aŭskulti, kion la prezidanto hejtisto proponas laŭ la celoj kaj la vivsituacio de la fervojaj oficistoj. Kaj se estis striko, tiam la linia ĉefo, kiu ricevadis dekoble pli altan salajron ol la ŝmiristoj kaj ranĝistoj, ne organizis teknikan helpon en be-

zono, sed li preparis la afiŝojn kaj murosciigojn, kiuj informis la publikon pri la kaŭzoj kaj bezonoj de la fervojista striko, ĉar skribe li estis ja pli lerta ol la hejtisto, kiu estis la prezidanto kaj parolisto. Kaj ĉar estis tiel, ĉar la liniotrafika estro kaj la rangisto manĝis el la sama pelvo, por diri tion tiel, kaj ĉar sekve de la organizo la kota ŝmiristo pli proksimis al la liniotrafika estro ol al la ŝtato kaj la interesoj de la komerco, de la industrio kaj de la popola bonfarto, kiuj ĉiuj envicis por li nur post la necesaj vivbezonoj de lia kamarado trakforkisto, la lokomotivestro fakte ne devis demandi: „Hejtisto, kion faros vi?“ Li scias la demandon jam antaŭe. Kaj li scias, kion respondos ĉiuj ceteraj fervojistoj tie starantaj kaj atendantaj la ekspedadon de la varotrajno.

Tie estas en la unua vico la propraj kamaradoj de la sindikato. Kaj eĉ, se tiuj ĉiuj estus sanaj, ili tamen kunirus. Ĉar tie estas ja ankaŭ la veturgastoj, kiuj bezonas helpon. Kvankam la sindikataj kamaradoj estas plej preferataj, sekvas tamen tuj poste la veturgastoj, pri kies bonfarto la fervojisto sentas sin pli respondeca ol pri la propra familio. Ĉar tio instruas lia sindikato al li. Kaj lia sindikato ĉiam pravas, kion ajn diras ĉiuj aliaj, inklude de la arkiepiskopo.

Tial diris la hejtisto: „Mi antaŭveturos per la persontrajna lokomotivo, pro sekureco. Vi sekvos kvincent metrojn post mi kaj havos tiam sufiĉe da tempo por halti vian vagonaron, se mi forglitos kun la antaŭlokomotivo, se la reloj estas elŝiritaj.“

Oni ekfunkciigis la lokomotivon. Ŝmiristo sursaltis kiel hejtisto. Kaj tiam la lokomotivo estis retroveturigita eksteren.

La malgranda helpotrajno intertempe jam veturpretis kaj ĉiuj vartrajnaj oficistoj, kvankam ili ĉiuj havis edzinojn kaj infanojn, sursaltis. Sursaltis ankaŭ kelkaj de la ĉirkaŭstarantoj kaj la trajno kvazaŭ impete ekflugis en la nokton.

La uloj de la sekuriga lokomotivo trovis la relojn laŭordaj. Nenio estis blokita. Sed, kiam ili venis pli proksimen de la akcidenta loko, oni rapide pafis al ili.

La banditoj kaŝis siajn ĉevalojn proksime de tiu loko, kie ili devigis halti la lokomotivestron. Ili ankoraŭ okupiĝis pri la ŝarĝado de la predo. Kaj tiuj, kiuj ŝtaris ĉi tie ĉe la ĉevaloj, pafis tuj sur la lokomotivon por malhelpi ties pluveturadon, por ke ili ne ĝenu la ceterajn banditojn ĉe la kunkolektado.

La hejtisto ricevis pafon en la gambon. Lia helpviro skrapafon je orelo. Sed ili rapidegis antaŭen, signalante per lanterno al la sekvanta trajno, ke la trako mem estas en ordo. Ankaŭ la helpotrajno estis salutata per pafoj. Sed kelkaj de la fervojistoj havis revolverojn kaj reagis. La banditoj en la malhelo ne povis ekkoni, ĉu en la nelumigataj vagonoj eble jam estas trupo de soldatoj. Ili ŝajne supozis tion, ĉar ili rapidis al la ĉevaloj kaj lasis kuŝi ĉion, kion ili ĝis tiam ne povis elpaki. Ili surseliĝis kaj forrajdis en la densan vepron, orientiĝantaj sin en la direkto de la montaro.

La fervojistoj de la helptrajno ŝarĝis per la subteno de la ne-vunditaj veturgastoj ĉiujn mortulojn kaj vunditojn en la trajnon kaj veturis kun la malĝojiga frajto reen al la haltejo.

Tie jam alvenis la telegramo, ke estas survoje la lazareta trajno, kiu tamen ne pli frue povos esti en la loko ol morgaŭ matene. Tiam ankoraŭ alvenis pliaj telegramoj en la haltejon, de la registaro kaj de la plej proksimaj garnizonoj. La registaro telegrafis, ke ĉiuj sekcioj de la rajdobesta federacia polico de la najbaraj distriktoj jam ekmarŝis, kaj ke kvar regimentoj de la kavalaria federacia armeo estas mobilizitaj kaj sendotaj ankoraŭ antaŭ la komenco de la mateno per specialaj trajnoj al la loko de la atako por komenci de tie la persekuton de la banditoj.

Trovi kudrilon en fojonostako, tio tute ne estas facila. Sed, se ĝi efektive trovendas, ĝi troveblas eĉ, se la fojnostako estas kiom ajn granda. Laŭ la leĝoj de la matematiko oni povas kalkuli, ke oni devos trovi ĝin kaj kiam oni ĝin trovos. Sed trovi banditon, kiu havas konsiderindan distancan avan-taĝon tra vepraj kaj ĝangalaj vojoj, kiujn li konas plej bone kaj kiujn la persekutanto tute ne konas, do trovi banditon, kiu post la trairado de la vepro atingas montaron, la altan montaron de Meksiko, tio tute ne kompareblas kun la serĉado de kudrilo en la plej granda fojnostako.

Sed la soldatoj ja estas plej ofte mem indiĝenoj. Tio havas valoron. Ili scias ankaŭ, kie je certa tempo estas la banditoj, nome ĉi tie ĉe la fervoja linio inter du precize konataj haltejoj. Kaj ne daŭris tre longan tempon, ĝis kiam la oficiroj eltrovis, ke la banditoj dividis sin en malgrandajn grupojn kaj

disiris en diversaj direktoj. La kudrilo en la fojnostako do kvazaŭ estis eĉ rompita en pecetojn.

Supraĵajn priskribojn de la banditoj oni telegrafis ĉien. Sed en tia okazo unu el la priskribitoj povas trankvile rajdi tra indiĝena vilaĝo, eĉ la soldatoj povas renkonti lin. Ili povas suspekti lin. Sed, se li ne havas ion en siaj poŝoj aŭ sur sia korpo, kio memoras pri la atako de la trajno, kiun utilon tiukaze havas la priskribo? Li havas ĉiam alibion. Li dormis en tiu nokto dudek kilometrojn for de la atakejo sub arbo ĉe la strato al Chalchihuites. La malon neniu povas pruvi al li.

Sed jen rajdas trupo de la federacia kavalerio tra Guazamota. Antaŭ kabano kaŭras du mestizoj envualiĝintaj en siaj kovriloj kaj fumas. La soldatoj rajdas trankvile preter ili. Unu el la mestizoj volas ekstari kaj iri malantaŭ la kabanon. Sed li ricevas mansignon de la alia, revenas kaj resid-iĝas trankvile.

La trupo jam preterpasis. Jen la gvidanta oficiro turniĝas kaj haltigas la trupon. Li estas soifa kaj rajdas al kabano. Trinkinte, li transrajdas al la alia flanko kaj deseliĝas. Ĉi tie kaŭras la du fumantaj viroj.

„Ĉu vi loĝas ĉi tie en tiu ĉi vilaĝo?“ demandas la oficiro.

„Ne, ni ne loĝas ĉi tie, sinjoro.“

„De kie vi estas?“

„Ni havas nian domon en Comitala.“

„Bone“, diras la oficiro kaj metas sian piedon en la piedingon. Li volas surseliĝi kaj forrajdi kun sia taĉmento.

Li estas iom laca, la ĉevalo dancetas, li ne povas atingi la piedingon. Unu el la du mestizoj ekstaras, ĉar la ĉevalo preskaŭ tretadis sur liajn piedojn. Li pli proksimiĝas kaj kaptas la piedingon por esti helpema al la oficiro. La kovrilo falas de liaj ŝultroj.

La oficiro denove remetas la piedon sur la teron.

„Kion vi havas tie en via pantalonpoŝo?“ li demandas poste la ekstarintan mestizon.

La viro rigardas laŭ si malsupren kaj al sia pantalonpoŝo, kiu elstaregas sufiĉe suspektige.

Li turnas sin je duono, kvazaŭ li volus pluiri al la kabano, kvazaŭ li serĉus truon. Tiam li rigardas al la soldatoj kaj al la oficiro, suĉas je sia cigaredo, elprenas ĝin el la buŝo, elblovas la fumon per puŝo kaj ridetas.

Per hasta movo la oficiro kaptas lin je la malfermita ĉemiza kolumo kaj samtempe ŝovas la maldekstran manon en la poŝon.

Ankaŭ la alia mestizo nun jam staras, suprentiras la ŝultrojn, kvazaŭ la okazaĵo ĝenus lian kvieton, kaj kvazaŭ li volus serĉi alian lokon, kie li povus kaŭri kaj fumi en paco.

Serĝento kaj du soldatoj saltis de la seloj kaj staras tiel, ke la du mestizoj ne povas fuĝi.

La oficiro ĉesas firmteni la ĉemizan kolumon de la viro kaj rigardas tion, kion li tiris el la poŝo. Estas bona ronda sufiĉe multekosta ledomonujo. La oficiro ridas kaj la mestizo ridas. La oficiro malfermas la monujon kaj ŝutas la enhavon sur manon. Ne estas multe, iom da oro, grandaj arĝenteroj, ĉio ĉi entute ĉirkaŭ 25 pesoj.

„Ĉu tio estas mono via?“ li demandas.

„Kompreneble tio estas mono mia.“

„Tio estas multe da mono. Tiukaze vi povus aĉeti novan ĉemizon.“

„Tion mi faros morgaŭ, mi volas iri en la urbon.“

Sed en la monujo estas ankaŭ veturbileto en la unua klaso al Torreon. Sed tiu ĉi mestizo veturas neniam en la unua klaso. Krome ĝi havas la daton de la ataka tago.

La alia viro estas traserĉata. Ankaŭ li havas monon, sed portas ĝin sen monujo en la poŝo. Sed li havas ankaŭ juvelorinĝon en la horloĝpoŝo de sia pantalono. Pro mangesto de la serĝento deseliĝas nun ĉiuj soldatoj.

„Kie vi do havas viajn ĉevalojn?“

„Ili staras tie malantaŭe“, diras la unua mestizo, ŝutas tabakon sur la folion, fermtiras per la dentoj la saketon kaj rulas novan cigaredon. Li ne estas nervoza kaj ne disipas eĉ ereton de la tabako. Trankvile li ekbruligas la cigaredon kaj fumas, dum alia suboficiro traserĉas ĉiujn liajn poŝojn.

La ĉevalojn de ambaŭ oni alkondukas kaj traserĉas. Seloj trivitaj, aĉa bridaro kaj frotdifektita lazo.

„Kie estas la revolveroj?“ demandas la oficiro.

„Tie, kie staris la ĉevaloj.“

La serĝento iras tien kaj skrapadas per la botoj en angulo de la tersurfaco, kie li eligas revolveron kaj malnovan pistolon.

„Kiel vi nomiĝas?“

La du uloj diras siajn nomojn. La oficiro notas la nomojn kaj tion, kion li trovis.

Vilaĝanoj kolektiĝas. La oficiro demandas junulon: „Kie ĉi tie estas la preĝeja tombejo, la *cementerio*?“

La oficiro, la soldatoj kaj la du mestizoj en la mezo sekvas la junulon, kiu montras la vojon al la *cementerio*. Post ili sekvas la vilaĝanoj, viroj kaj infanoj, kaj la inoj kun beboj sur brakoj.

Sur la *cementerio* la soldatoj iras en angulon, ŝpato estas alportata kaj ambaŭ mestizoj fosas siajn truojn. La oficiro fumas, la soldatoj fumas kaj babilas kun la vilaĝanoj.

Kiam la fosaĵoj estas sufiĉe profundaj, la du mestizoj sidiĝas kaj ripozas. Ili rulas denove cigaredon, kaj post iom da tempo diras la oficiro: „Se vi volas, vi povas nun preĝi.“

La oficiro komandas ses virojn, kiuj enviciĝas.

La du mestizoj ne maltrankviliĝas, ili ne estas nervozaj, ne timemaj. Ili krucosignas sin, murmuras ion, denove krucosignas sin kaj bruligas novan cigaredon. Poste ili starigas sin unu apud la alia sen atendi antaŭe komandon.

La oficiro vokas: „Pretiĝu!“

La du banditoj ankoraŭ iomete fumas, tiam ili forĵetas la cigaredojn.

Post kiam la fosaĵoj estas plenŝovelitaj, demetas la oficiro kaj la soldatoj la ĉapojn, staras iom silente, surmetas denove la ĉapojn, forlasas la tombejon, surseliĝas kaj ekrajdas.

Kial la ŝtato sen neceso disipu pli altajn kostojn, se la fincelo estos ja la sama!

Alia trupo de la kavalerio rimarkis en la montara regiono ok virojn rajdantajn en distanco de kelkaj kilometroj for sur ĉevaloj. La viroj ŝajne vidis la soldatojn, ĉar subite ili ekgalopis kaj foriĝis. La oficiro sekvis ilin kun sia trupo, sed ne povis trovi spuron, kien eventuale turniĝis la rajdistoj. La hufospuroj sur la sablaj vojoj estis tiom multnombraj kaj disvastiĝis tiom, ke la oficiro ne povis sekvi certan spuron. Li decidis sekvi al tiuj spuroj, kiuj ŝajne estas plej freŝaj.

Post kelkaj horoj la soldatoj venis al soleca haciendo. La soldatoj rajdis en la larĝan korton kaj deseliĝis por iom ripozi. La posedanto elvenis kaj la oficiro demandis lin, ĉu li eble vidis kelkajn rajdistojn. La haciendisto klarigis, ke neniu preterrajdis, ke li alikaze devus scii tion. Pro tio klarigis la

oficiro, ke li devos traserĉi la haciendon. La posedanto respondis, ke li agu laŭplaĉe.

La posedanto reiris en la domon. Kaj kiam la soldatoj proksimiĝis al la domo, oni pafis sur ilin el kelkaj flankoj. Unu soldato estis morta kaj kvar el ili vunditaj, kiam ili atingis la kortegan pordegon post la reirado.

Haciendo estas kiel granda bieno. Ĝi estas ĉirkaŭata per larĝa alta muro kaj staras kiel fortikaĵeto en la tereno.

La soldatoj kuntrenis siajn mortintajn kamaradojn ekstere. Tuj, kiam ili estis ekstere, la pordego de interne estis malfermita, kaj tiam oni pafis plu trans la muron al la soldatoj.

Kaj nun komenciĝas fervora batalo, kiu, kiel ambaŭ partioj scias tre bone, finiĝas nur kun la kompleta neniigo de la aliaj aŭ pro manko de municio. La sieĝatoj ne devis timi vivoperdon, ĉar oni mortpafus ilin en ĉiu kazo. La defendo estis la sola ŝanco, kiun ili havas por ŝanĝi sian situacion.

La oficiro unue kondukigas la ĉevalojn je tiom granda distanco, ke pafoj ne plu povos trafi ilin. La banditoj ne disipas kuglojn por la ĉevaloj dum la retransporto. Tiom multe da municio ili ne havas.

La soldatoj estas en aĉa situacio. La haciendo troviĝas en senkaŝita tereno de agroj kaj de bestopaŝtejoj. Elmalsatigi la banditojn ili ne povas, atendi artilerion la oficiro kaj ankaŭ la soldatoj rigardus hontindaĵo. Oni do devos ataki.

La haciendo estas kvarangula kaj el ĉiuj kvar flankoj atakas taĉmento. Tio okazas tre militece. La soldatoj antaŭeniĝas per mallongaj saltoj, ĵetas sin sur la teron, ekpafas, por doni al la alia fronto la okazon salti pli proksimen. La muron ili ne povas konkeri; tial ili turnas la atakon al ambaŭ pordegoj, al tiu en la fronto kaj al tiu sur la malantaŭa flanko. Post trihora batalo la oficiro logas la sieĝatojn al la antaŭa pordego, dum parto de liaj soldatoj povas surgrimpi kaj malfermrompi la malantaŭan pordegon, kiu estas defendata de nur tri viroj.

Sed tiel facile la banditoj ne rezignas pri la batalo. En la korto kaj ĉe la loĝodomo evoluiĝas malgranda batalo. Malfrue posttagmeze la soldatoj estas la nekontestablaj posedantoj de la haciendo. Ili havas kvar mortintojn, du grave vunditajn kaj naŭ vunditojn kun negravaj vundoj. En la domo kaj en la korto ili trovas ne nur la ok virojn, kiujn ili vidis rajdi antaŭe antaŭ si, sed ankaŭ kelkajn aliajn rabistojn el la trajno.

Sep el ili estas mortaj, kvin vunditaj, ilin oni tuj pafmortigas. Inter la mortintoj estas la posedanto de la haciendo, pri kiu oni ne scias, ĉu li mem estas bandito, au ĉu li estis devigita de la banditoj, kaj minacita per morto nei ilian ĉeeston. La kortanaro kaŝiĝis ie kaj nun elvenas. Ĝi havas nenion komunan kun la afero, tio estas certa. La familo de la posedanto ĝuste vizitas la ĉefurbon. En la vestoj de la viroj la soldatoj trovas amason da aĵoj, kiuj devenas el la trajnatako. Tiel oni kaptas la banditojn iom post iom. Unuope kaj en gregoj. Sed kapti ilin ĉiujn interne de mallonga tempo estas malfacile. Kaj ju pli da tempo pasas, ĝis kiam

oni havos ĉiujn, des pli malofte oni kaptos la lastajn. La ne-kaptitoj certe ne finas la restaĵon de sia vivo en kontempla kvieto.

„Kaj vi“, Lacaud finis sian raporton, „vi tute serioze pensas, ke mi povus havi ion komunan kun tiuj banditoj, kiuj entreprenis tian tiel teruran krimon, kiel tiun atakon de la trajno, ĉu?“

„Plezuro do ne atendos nin, se ili venos supren“, diris Howard. „Sekve tion, ankaŭ la demando pri konfido nun estas solvita.“

„Tial la uloj tie malsupre ŝajne estas do la lastaj, pri kiuj vi parolas“, diris Dobbs.

„Pri tio mi certas. En la raporto estis menciite, ke unu el ili surhavis ore bronzitan pajloĉapelon, kaj ke oni rigardas lin kiel ĉefbanditon, kiu kondukis plej brutale.“

„Plezuro ne atendos nin ĉi tie, se ili venos supren“, diris poste ankaŭ Kurtin. „Sed mi ja ne plu vidas ilin.“

„Vi ilin ne povas vidi, ili estas nun jam ĉe la vojkurbiĝo“, diris Dobbs. „Se ili estos preteririntaj la kurbiĝon, venos la loko, kie ni povos vidi, ĉu ili suprenvenos aŭ iros malsupren en la rokan valon.“

13

Ili sidis tie sur la roko kaj fikse rigardis malsupren por vidi ekaperi la rajdistojn el la vojkurbiĝo.

„Kiom da ili vi do kalkulis?“ demandis Howard.

„Dek aŭ dek du“, respondis Kurtin.

„Tiom de la banditoj ja tute ne plu povas ekzisti laŭ via propra rakonto“, diris Howard al Lacaud.

„Certe ne. La soldatoj kaptis la plej grandan parton el ili. Sed la kvaropo aŭ la kvinopo, kiu ankoraŭ postrestas, povis ja renkontiĝi kun aliaj aŭ unuiĝi al nova bando, kiu planas ion novan.“

„Mi supozas, ke Bob pravas. Kaj se tiel estas, kaj se ili efektive venos supren, jen ni fartos malbone. Ili bezonas revolverojn kaj municion.“

„Vi ja konas la vilaĝon kaj konas la homojn tie malsupre“, turnis sin Howard al Kurtin. „Eble la uloj tie malsupre serĉis revolverojn kaj la indiĝenoj timigite diris pri vi, ke vi estas ĉi tie supre kaj havas fusilon, ĉar vi ja ĉasas.“

„Ĉe la diablo, vi pravas, oldulo. Tiel eble estas. Tiukaze ili ĉiukaze venos ĉi tien por havigi la fusilon al si.“

„Tiukaze ni agos pli bone, se ni ne perdos plu tempon kaj antaŭpreparos nin tuj“, diris Dobbs. „Kurtin, vi sidu plu ĉi tie, ĉar vi akre rigardas, vi observu, ĉu ili alvenos. Ni nun

preparos la defendon.“

Ili tuj kaptis la azenojn, kondukis ilin en arbustejon sur la alia rokoflanko kaj firmligis ilin. Poste ili portis siajn armilojn, du sitelojn kun akvo kaj la pakaĵon kun biskvito en profundan tersulkon, kiu troviĝis apud la rokovando. Tiu sulko estis bone uzebla kiel defendejo, ĉar ili povis esti nek atakataj de la dorsa flanko nek ĉirkaŭataj, kaj ĉar ili havis antaŭ si la senarbigitan liberan lokon, kie ili povas persekuti ĉiun movon de la atakantoj kaj precize celi al ĉiu viro.

Kurtin diris: „Sed ni havus ankoraŭ sufiĉe da tempo dum tiuj antaŭpreparoj por grimpi sur la rokon kaj rampi tie en fendon kaj atendi, ĝis kiam ili forestos.“

„Ho, azeno“, diris Dobbs, „tiukaze ili irus ja al la mino kaj ni ne plu povus proksimiĝi tien por elfosi niajn oroporciojn, kiujn ĉiu el ni kaŝis tie.“

„Mi ne vidis minon ĉi tie“, diris Lacaud.

„Kompreneble ne“, respondis Dobbs. „Ni ja nun tamen devos prezenti al vi niajn malfermitajn manplatojn. Kompreneble ni havas ĉi tie minon. Dum la tempo, kiam ni defendos nian lokon, ili ne povus atingi ĝin. Sed, se ni forrampus en fendojn, tiukaze ili serĉus Kurtinon kaj lian fusilon, kaj tiukaze ili kompreneble trovus la minon, hodiaŭ aŭ morgaŭ. Ĉion ĉi elfosi ni ne havos sufiĉe da tempo. Kaj krome ni ne plu povus foriĝi de ĉi tie, se iu estus ĉe la mino, do ni ne povus porti hejmen, kio apartenas al ni. Ni ĉiam devus iri trans la senarbejon ĉi tie kaj ne povus eviti ilin sur

tiu vojo. Ni do devos murdi la oston, eĉ se ili tute ne scias, ke ni havas ĉi tie belajn raraĵojn, pesitaĵojn, ĉu vi komprenas? Ili senvestigus nin tute, eĉ la botojn ili ne lasus al ni. Tiukaze ni povus mortaĉi ĉi tie.“

„Estas tiel“, konfirmis Howard. „Se ni havus alian elirvojon, mi tamen ne riskus tion serioze. Ni fakte devos, jen ĉio.“

„Ili enkurbiĝis, ili venos supren“, kriis Kurtin kaj saltis malsupren de la roka eĝo. „Do nun rapide, pretigu ĉion.“

„Kion vi pensas, kiom longan tempon ankoraŭ daŭros, ĝis kiam ili povos esti ĉi tie“, demandis Howard. „Vi ja konas la vojon plej bone.“

„Tio daŭros de nun precize kvindek minutojn. Poste ili estos ĉi tie. Se ili venus sen ĉevaloj kaj sciuz la mallongigojn de la vojo, tiukaze ili povus esti dek minutojn pli frue ĉi tie.“

„Ĉu vi estas certa, tute certa, ke ili venos ĉi tien?“ demandis Dobbs.

„Enkurbiĝinte ĉi tien, ili tute ne povas iri aliloken. Ili devos veni supren. Tie ne esta vojo al alia flanko.“

„Sed ili ja eble povus returniĝi, ĉu ne?“

„Kompreneble ili povus fari tion. Sed tion ni prefere ne atendu.“

„Ni sternu la tendon“, konsilis Dobbs.

„Tiukaze ili ne tuj vidos, ke ĉi tie povas esti pli ol unu persono. Krome aspektas ankaŭ tiel, kvazaŭ ni estus mi ne scias kiom riĉaj.“

Ili kunfaldis la tendon kaj metis ĝin en la sulkon. Tiam ili trapikis paftruojn, por ke ili ne devu levi la kapojn, kaj tamen povos rigardi ĉion. Ili ankoraŭ interkonsiliĝis pri militplano kaj fine al ĉiu batis la koro, ĉar ili aŭskultis la voĉojn de la viroj, kiuj troviĝis sur la lasta vojkurbiĝo.

Kelkajn minutojn poste la viroj paŝis el la vepro kaj venis al la rando de la senarbejo. La ĉevalojn ili evidente lasis post si ĉe la lasta vojkurbiĝo, ĉar ĝuste la lasta distanco de la vojo por la ĉevaloj estis malfacile irebla. Sed ili eble havis ankoraŭ alian kaŭzon, kial ili lasis la ĉevalojn post si. Ili estis sep viroj, la cetera triopo certe estis ĉe la ĉevaloj, staris favore lokiĝinte kaj observis. Ĉiuj estis armitaj. Ĉiu havis revolveron, kelkaj havis aldone fusilojn. Ĉiuj surhavis grandajn ĉapelojn kaj portis buntajn tukojn ĉirkaŭ la kolo. Sed entute ili aspektis tre trivitaj. Nur du el ili posedis sandalojn, du el ili iris nudapiede, unu el ili havis sur unu gambo gamaŝon el led, la alia gambo estis sen gamaŝo; kaj kvankam la gambo kun la gamaŝo havis flavan ŝnureblan boton piede, la viro alipiede portis nigran gumoboton. Neniu el ili surhavis tute nedifektitan ĉemizon; sed kelkaj el ili havis ledojakojn. Kaj triopo el ili surhavis longajn ĝismaleole etendiĝantajn malvastajn brunajn ledopantalonojn. Sed ĉiu el ili portis unu aŭ eĉ pli da patronzonoj. Kelkaj portis kovrilojn ĵetitajn transŝultre. Verŝajne la kovriloj de la aliaj, tiel kiel la pakaĵoj kun la nutraĵoj, estis ĉe la ĉevaloj.

Post kiam ili paŝis sur la senarbejon, kiu troviĝis je la malantaŭa flanko de la kruta roko, kaj kiu estis ĉirkaŭata je la ceteraj flankoj per densa ŝajne ne trafenetrebla vepro kaj dornaj arbustoj miksitaj kun arboj, ili scivoleme ĉirkaŭrigardis. Ili vekis la impreson, kvazaŭ ili atendis ion alian, ne tion, kion ili ekvidis. Ke ĉi ti estas ripozejo servinta ankoraŭ antaŭ malmulte da tempo kiel kampadejo, tion ili ja certe ekkonis. Tie kuŝis ankoraŭ la ligno, la fajrolokoj aspektis ankoraŭ freŝaj kaj ne surblovataj. Tie kuŝis distrite malplenaj ladjkonservujoj, disrompitaj pecoj de potaĵoj kaj ŝiraĵoj de gazetpapero, kaj krome tie estis tute akre dislimita la rodita plataĵo, kie staris la tendo. La loko estis neregula kvarangulo kun ĉirkaŭa longo de sesdek paŝoj, kiu pli kaj pli grandiĝis per tio, ĉar de la flankoj ĉiutage estis forprenita la ligno, kiun ili bezonis por la bivakfajro. Ankaŭ je la freŝe forhakitaj arboj oni povis ekkoni, ke la loko ankoraŭ antaŭ malmulte da tempo devis esti priloga.

La viroj staris en grupo kaj komencis fumi. Kelkaj kaŭris kaj la ceteraj parolis. La viro kun la orobronzita pajloĉapelo ŝajne estis la gvidanto, ĉar ili ĉiuj rigardis al li, se li diris ion.

Ili venis kelkajn paŝojn pli proksime en la senarbejon. Tie ili staris denove kaj interkonsiliĝis.

Estis klare videble, ke ili ne scias, kion ili faru aŭ kion ili entreprenu. Kelkaj viroj ŝajne konvinkiĝis, ke la gringo, la usonano, transloĝiĝis, kaj ke oni venis tro malfrue. Tion ŝajne fine supozis ankaŭ la gvidanto, kiun ili nomis Rami-rez.

La interparolado fariĝis pli laŭta, ĉar la uloj komencis pli disiri kaj interparoli en pli granda distanco inter si. Tial la viroj en la tersulko povis kompreni preskaŭ ĉion, kio tie estis planata, kaj agi laŭ tio. Eble la banditoj post pli ampleksa ripozo formariĝis, kaj ili estus ĉi tie lastfine en paco.

Kvankam kelkaj banditoj ĉe la vagado venis ĝis la flankaj limoj de la senarbejo, oni tamen apenaŭ devis timi, ke ili tiel facile trovus la vojon al la mino, ĉar Dobbs kaj Kurtin kamuflis ĝin en la lasta horo precipe altkvalite, kaj tiom longe, kiom la enmetita dornarbustaĵo ne fariĝus senfolia kaj velkiĝinta, la vojo al la mino estus sufiĉe sekura.

Fine, post longa tien- kaj tienbabilado la banditoj ŝajne interkonsentiĝis pri decido. Ili parolis tiel laŭte kaj mangestis dum tio tiel impete, ke la sieĝatoj nun rapide lernis, kion la banditoj intencis fari. Ili decidis starigi ĉi tie dum kelke da tempo sian ĉefkomandojon, ĝis la afero pri la trajnelrabado iom malaktualiĝos kaj la soldatoj persekutos ilin en pli foraj distriktoj. La senarbejo ŝajnis al ili eksterordinare favora. Iom pli malsupre ili trovis akvon, ankaŭ herbejo por la ĉevaloj certe estus proksime, kaj la nutraĵon oni povus ŝteli ie de la kampoj malsupre en la valo, se oni ne plu povus manĝi ĉasbestojn. Pli malsupre sur la vojo ili trovis senarbejon, de kie oni povis observi la vojojn en la valo, kaj se oni vere ekvidus proksimiĝi la soldatojn, tiukaze oni povus ankoraŭ sufiĉe frutempe foriĝi, se oni trovus intertempe alian vojon por retiriĝo; ĉar malsupreniĝi de tiu senarbejo ili devus, se soldatoj venus sur la vojon, ĉar tiukaze oni sidus ĉi tie en la kaptilo.

En la mallonga tempo ili vere bone observis la regionon. Ili devis trovi nur alian vojon por retiriĝo, kaj tio ja certe sukcesus, se ne ĝuste ĉi tie, tiukaze pli malsupre sur la vojo, eble proksime de la fonto.

„Ĝuste mi pensis“, diris Howard mallaŭte al Kurtin, „ke ni estis ja efektivaj azenoj, ke ni ne rampis al la mino. Sed nun mi ekkomprenas, ke tio estus la plej malbona, kion ni povis fari. Ĉar tiukaze, se ili ennestiĝus ĉi tie, ili baldaŭ trovus nin ĉe la mino, estis do la plej taŭga, kion ni faris.“

„Sed kion ni faru nun, se ili ĉi tie starigos sian ĉefan komandemon, tion mi vere ne scias“, flustris Dobbs. „Tion pripensis neniu el ni. Mi almenaŭ supozis, ke ili venos ĉi tien kaj denove foriĝos.“

„Ni atendu do dum iom da tempo“, diris Lacaud, „eble ili reŝanĝos sian planon kaj foriros.“

„Mi proponas“, konsilis Howard; „ke ni dislokigu nin laŭ la longo de la sulko. Se ili ĉi tie vagados, ili ne trovu nin arope, tiel, ke ili povus mortpafi nin kiel kuniklojn. Ili ja supozas, ke nur unu persono estas ĉi tie, kaj kiam ni atakos ilin de pluraj flankoj, ni eble tiel konfuzos ilin, ke ili formarŝos.“

Howard kaj Lacaud nun okupis la du malproksimajn finaĵojn de la sulko. Ĉiu el ambaŭ havis altkvalitan ĉasfusilon; Kurtin kaj Dobbs lokis sin en la mezo de la sulko tiel, ke ambaŭ ne estis samtempe rigardeblaj de unu persono, kiu eventuale vagados proksime.

La banditoj kaŭris kiel aro sur la senarbejo, ne tre malprok-

sime de la malvasta enirejo. Ili fumis, parolis kaj ridis; du el ili kuŝis sternintaj kaj dormis aŭ dormetis. Unu el ili iris al la ĉevaloj, por diri tie al la garduloj, ke oni restados ĉi tie, kaj ke ili tie pli malsupre serĉu nutrolokon por la ĉevaloj. Alia estis sendita al la observanta gardostaranto por transrigardi la valon kun li. Al ĉiuj, kiuj sidis en la sulko, venis samtempe en la kapon la penso, ke estus la plej bona okazo celi la kvin ulojn, kiuj ankoraŭ troviĝis sur la senarbejo, kaj transmondigi ilin. Se la ceteraj kvin venus por helpi, oni povus sukcese akcepti ilin el sekura kovrado, kaj tiukaze oni povus liberigi sin de la tuta kanajlaro. Kaj ĉiu ĉagreniĝis, ke oni ne interkonsiliĝis sufiĉe frutempe pri tia plano. Oni ja apenaŭ povus nomi tion murdo, ili pensis, ĉar ili ne estas homoj, sed bestaĉoj.

Dobbs implikiĝis pli kaj pli en tiun ĉi planon, kaj tiam li ne plu povis reteni ĝin por si mem. Li rampis al Howard, kiu estis plej proksima al Dobbs.

„La samon ankaŭ mi ĝuste pensis“, respondis la oldulo.
„Sed tiukaze ni havus la mortajn ulojn kuŝantajn ĉi tie.“

„Ni enfosu ilin“, flustris Dobbs.

„Kompreneble. Sed mi ne volas havi ĉi tie preĝejan tombejon, se oni pripensas, ke ni eble devos ankoraŭ vivi kelkajn semajnojn ĉi tie. Preĝeja tombejo estas ja necesa, sed oni ne devas havi ĝin ĉiutage kaj ĉiunokte ĝuste antaŭ la nazo. Aliokaze mi tute konsentus pri tio; unu el ili, tiu kun la variolmarkita vizaĝo, aspektas tiom insida, ke oni devas timi lin eĉ kiel plenkreskinta viro, se oni sidas kun li en preĝejo.“

„Lin vi ne renkontus en preĝejo.“

„Tute male. Ĝuste lin, kaj ĝuste tiun murdistan bandon. Mi ĵuras al vi, ĝuste ili estas tiuj, kiuj metas piede de la Sankta Virgulino de Gvadelupo aŭ de sanktulo Antonio la plej multajn arĝentajn piedetojn kaj braketojn. Ili rampas sur la genuoj de la preĝeja pordo ĝis la altaro kaj trifoje ĉirkaŭ la kvar vandojn. Iru foje tien kaj ekzameni ilin foje, ili havas ĉiuj bildeton kaj medalionon ĉirkaŭ la kolo. Nu, la registaro ĉi tie en Meksiko scias tre bone, kial ili traktas la eklezion tiel drakone. La uloj estas ja dekfoje pli superstiĉaj ol la plej nigraj paganoj en Centra Afriko. Ili estas – sed homo, kion volas la ulo tie? Li proksimiĝas ja rekte al ni. Ek, surposteniĝu!“

Dobbs rampis rapide kiel kato for.

Tiumomente efektive unu el la viroj rekte promenis al la sulko, ĝuste al tiu loko, kie sidis Kurtin. Li ne rigardis antaŭ si mem kaj ne al la sulko, li male tenis la kapon supren kaj rigardis la rokvardon laŭ ties tuta longo. Ŝajnis, ke li serĉas tie rekondukan vojon. Eble li ekhavis la ideon, ke la serĉata gringo ie tie povus troviĝi, aŭ, ke li tie havas sian vojon en la valon, ĉar oni ja ne trovis lin sur la alia vojo. Sed li vidis, ke tie ne estas irebla vojo, ĉio estis kvazaŭ firme masonita. Li fajfis por si mem kaj turnis sin por retroiri. Dum tio li rigardis malsupren kaj rimarkis la tersulkon. Certe li pensis, ke tio estas la pado, kiun ili povus bezoni. Li proksimiĝis, preskaŭ ĝis la rando de la sulko kaj tie li ekrigardis Kurtinon.

Kurtin dum la tuta promenado observis lin; li tial ne surpriziĝis, kiam li ekvidis lin proksime super si mem.

„*Caramba*“, vokis la bandito, retroturnis sin kaj vokis laŭte al siaj kunuloj: „Venu ĉi tien. Ĉi tie la birdeto sidas en sia nesto kaj elkovas siajn ovojn.“ Li laŭte ekridis.

La ceteraj viroj tuj eksaltis kaj venis surprizite pli proksimen. Sed kiam ili estis meze de la vojo, ekkriis Kurtin: „Haltu, banditoj, aŭ mi pafos.“

La banditoj tuj haltis. Ili ne kuraĝis preni siajn revolverojn. Ili ja ne sciis precize, kio okazas.

La viro, kiu malkovris Kurtinon, tuj tenis ambaŭ manojn alte kaj iris seninterrompe suprentenante la manojn, reen al la mezo de la senarbejo, kie staris la aliaj.

Dum certa tempo ĉio estis trankvila, kaj poste la viroj komencis haste kaj ekscitite interparoli.

Lastfine la ĉefo iom paŝis el la fono kaj diris: „Ni ne estas banditoj. Ni estas de la polico. Ni serĉas la banditojn.“

Kurtin iom levis la kapon. „Kie vi havas la policajn plakedojn? Se vi estas de la polico, vi devas havi almenaŭ insignon. Montru ĝin foje senkaŝe al mi.“

„Insignon, ĉu?“ rediris la viro. „Mi ne havas plakedon, mi ankaŭ ne bezonas ĝin. Mi ankaŭ ne devas montri ĝin. Elvenu foje de tie. Ni volas interparoli kun vi.“

„Vi povas interparoli ankaŭ de tie kun mi. Mi komprenas tre bone, kion vi diras.“

„Ni arestos vin. Vi ĉasas ĉi tie kaj ne havas licencon por la ĉasado. Ni arestos vin kaj forprenos vian revolveron kaj vian fusilon.“

Kurtin ridis transen. „Kie estas via plakedo? Ĉu vi vere rajtas uzi armilojn? Vi ja ne havas plakedon. Kaj vi ne estas de la federacia polico, ankaŭ ne de la ŝtatpolico. Vi tute ne povas aresti min.“

„Aŭskultu, sinjoro“, diris la parolisto kaj venis paŝon pli proksimen, „ni ne arestos vin. Donu nur vian revolveron al ni. La ĉasfusilon vi rajtas reteni. Ni bezonas la revolveron kaj ankaŭ la municion.“

Li proksimiĝis ankoraŭ plian paŝon kaj la ceteraj viroj sekvis lin.

„Eĉ ne paŝon pli proksimiĝu!“ vokis Kurtin, „aliokaze mi tuj pafos, por ke vi sciu tion.“

„Bonvolu esti iom pli ĝentila, sinjoro. Ni ja tute ne volas damaĝi al vi, ni bezonas nur la revolveron.“

„Tiun mi bezonas mem.“

„Ĵetu la revolveron transen al ni, tiukaze ni ne plu molestos vin kaj iros sur nia vojo plu“, vokis iu el la ceteraj viroj.

„Nenion vi ricevos. Kaj nun rapide foriĝu.“

Kurtin grimpis iom pli supren, por povi transrigardi la lokon iom pli bone.

La viroj denove interkonsiliĝis pri tio, kio estas farenda. Ili vidis, ke la gringo en la tersulko momente havas avantaĝon, li bone kaŝiĝis.

Tuj, kiam ili tirus la revolverojn, li lasus fali sin, kaj antaŭ ol ili povus atingi la trairejon de la vepro, li jam sesfoje estus pafinta, kaj se li bone pafus, ili ĉiuj ekkuŝus sternitaj. Ili tial reiris kaj kaŭris sin sur la teron. Intertempe fariĝis jam la deka, kaj ili pensis pri tio varmigi siajn tortiljojn aŭ tamalojn, aŭ tion, kion ili krome portis ĉe si. Ili bruligis bivakfajreton kaj kaŭriĝis por prepari sian magran manĝon.

Certe ili konvinkiĝis, ke la gringo en ĉiu kazo fariĝus ilia predo. Li ne povis foriĝi de tie, kaj ĉar ili kampadis ĉi tie sur la senarbejo, temus certe nur pri du tagoj ĝis la sieĝato devos rezigni pri rezisto. Iam ankaŭ li dormus. Kaj poste oni povus facile surprizi lin.

Ili manĝis, tiam ili kuŝiĝis kaj siestis. Tio daŭris du horojn, poste la uloj denove fariĝis vivantaj kaj interparolis insiste. Ili provis okupiĝi. Kaj pro tiu agemo ili ekpensis superruzi Kurtinon por aresti lin kaj poste agrable pasigi la posttagmezon pere de li. La viktimo trovas tian distron kutime malpli agrabla. La kulminon de tia kara societa ludo pri garantiaĵoj li ofte ne transvivas. La homoj vidas ja en la preĝejoj tiom da bildoj kaj pentraĵoj kun la plej sangaj kruelecoj. Ili vidas la starigitajn figurojn de la sanktuloj kaj martiroj

kun disŝiritaj korpoj, figuroj, kiuj estas plenpikitaj per lancoj kaj sagoj, ili vidas malfermitajn buŝojn, el kiuj rikanas la fortranĉita stumpo de la lango, elŝiritajn homajn korojn, sur kiuj la sango gutas malsupren, kaj el kiuj fulmas ruĝaj flamoj, manojn trabatitajn per najloj kaj sange kovritajn manojn kaj piedojn, ekrompitajn genuojn kaj frakasitajn genuajn patelojn, dorsojn, kiuj estas vipataj per fiŝhokoj kaj kapojn, sur kiujn estis batitaj dornokronoj per forta ligna martelo. Kaj antaŭ tiuj ĉi bildoj kaj lignaj figuroj, kiuj estas tiom realaj, ke oni estas skuata de nedirebla hororo, kiam oni vidas ilin, aŭ se oni estas krude vekata el dormo, se ili aperis en sonĝo. La kredantoj kaj piuloj surgenuas dum horoj kun vaste malfermitaj brakoj kaj etenditaj manoj kaj plorsingultas kaj ĝemas kaj preĝas kaj murmuras kaj kantas per mallaŭta voĉo cent, ducent, kvincent avemariojn. Kaj tiuj viroj, se ili serĉas distron pere de siaj viktimoj, ne bezonas havi eltroveman talenton, ili devas imiti nur tion, kion ili vidis ekde la infaneco en la eklezio. Kaj ili imitas tion, lerte kaj fidele laŭ la modeloj, ĉar la tuta spirita imago, kiun ili havas, radikas en la religio, sed en religio, kiu efikas al ili nur pere de la eksterajoj, per reala prezento, per misteraj ceremonioj. Kaj tie estas, antaŭ tiuj homoj, kie en la sankta semajno antaŭ Pasko estas prezentata al la kredantaj amasoj la tuta kruela torturada historio kun ĉiuj kronikaj detaloj per vivgrandaj figuroj kaj per ŝokiga natureco. Tio ne estas Pasionludo; la prezentadoj estas absorbataj laŭlitere kaj senpere de tiuj homoj, de tiuj bedaŭrindaj homoj, kiuj helpe de fatale agantaj potencoj dum jarcentoj kaj ĝis nun estas tenataj en superstiĉo kaj nescieco, pro la pure egoisma intereso de tiuj potencoj. Kaj registaro, kiu strebas

labori laŭ vere moderna spirito por la beno de tiuj turmentataj senfeliĉaj homoj, kaj kiu estas devigata konduki la batalon kontraŭ tiuj potencoj, devas elsendi kavaleriajn regimentojn por kapti tiujn, kiuj faras nenion krom imiti tion, kion ili vidis, kaj trakti ilin kiel krimulojn. Ĉu la priskribita trajnatako kun tia nekredebla krueleco povas esti entreprenata de normalaj homoj? La paganaj indiĝenoj en la Sierra Madre, en Oaxa, en Ĉiapaso kaj Jukatano ne estas kapablaj je tia bestaĉeco. Sed la mestizoj kaj meksikanoj, kiuj antaŭ la krimo preĝas al la patrino de Dio kaj antaŭ Sanktulo Antonio surgenuas dum horo kaj petegas, ke ili helpu al ili, por ke la krimo sukcesu, kiuj post la krimo denove surgenuas kaj petegas la patrinon de Dio kaj promesas dek stearinajn kandelojn al ŝi, por ke la regimentoj ne kaptu ilin, ne konas krimon kaj neniun kruelecon, kiujn ekzerci ili ne sentus sin kapablaj. Ilia konscienco estas ĉiam malŝarĝita, ili metas la ŝarĝon de sia kulpo sur la dorson de tiuj figuroj, kiuj laŭ ilia opinio estis kreitaj por tiu celo.

Ankaŭ pri agrabla postagmeza amuzo, kiu tute senpeke komenciĝas per tio, ke oni ŝovas ardantajn lignerojn en la buŝon de la viktimo, la viroj tie ŝajne pensis. Kaj pri tio ili parolis poste ankaŭ tute senkaŝe kaj tiel klare kaj sobre, ke Kurtin povis kompreni, kio atendu lin.

Unu el la viroj eltiris sian revolveron kaj ŝovis ĝin tiel sub sian malfermitan ledojakon, ke oni ne povis rimarki, ke la armilo estas pafpreta. Kurtin ne povis vidi la movon, ĉar ĝi estis kaŝita al li; sed Lacaud observis ĝin.

La viroj unu post la alia ekstaris, rektigis sin kaj revenis al

la mezo de la senarbejo.

„Aŭskultu, sinjoro“, vokis la viro kun la orobronza pajloĉapelo, „ni volas intertrakti. Ni volas nun foriĝi, ĉar ni ne plu havas ion por manĝi ĉi tie kaj ni ankaŭ intencas iri al la foirejo morgaŭ matene. Tial ni nun devos ekiri. Donu al ni la revolveron. Mi havas ĉi tie oran horloĝon kun bona ĉeno. Tiun mi donos al vi por la revolvero. La horloĝo validas cent kvindek pesojn. Tio estas bona negoco por vi.“

Li tiris la horloĝon el la poŝpantalono kaj svingadis ĝin helpe de la ĉeno.

Kurtin leviĝis denove, li vokis transen: „Retenu vian horloĝon, mi retenos mian revolveron. Ĉu vi iros al la foirejo ĉu ne, estas indiferenta al mi, sed la revolveron vi ne ricevos, la diskuto pri tio estas finita.“

Li apogis la brakojn kaj volis denove salti malsupren. Kaj nun la viro, kiu tenis preta la revolveron sub la jako, celis per la armilo. Li staris kovrate de alia, kaj eĉ se Kurtin ekvidus la viron, li ja ne povus vidi, ke la armilo estas pafpreta.

Sed antaŭ ol la bandito povis pafi, knalis pafo, kaj la revolvero falis el la mano de la viro, dum li ĵetis la brakon en la aeron kaj kriis: „Mi estas trafita.“

Kiam la pafo knalis, ĉiuj viroj turnis sin surprizite al la sulko. Ili vidis nubeton ŝvebantantan supren. Sed la nubeto venis el la maldekstra angulo kaj ne de tie, kie sidis Kurtin. Sed ili povis rigardi nek la pafinton nek la armilon.

Ili tiom miris, ke ili ne povis diri vorton. Atenteme irante malantaŭen, ili atingis la randon de la vepro. Tie ili sidiĝis sur la teron kaj komencis paroli denove. Tion, kion ili priparolis, ne povis kompreni la sieĝatoj en la sulko, sed ili vidis, ke la banditoj troviĝis en la plej granda konfuzo. Ĉu eble eĉ estas polico, kiu kaŝas sin tie?

Nun ankaŭ tri aliaj, kiuj surpostenis en la vepro, kuris rapide supren, ĉar ili aŭdis la pafon kaj supozis, ke ili devus enmiksiĝi. Sed la gvidanto forsendis ilin, ĉar li evidente ĉi-momente imagis tion pli grava, ke la ĉevaloj estu pretaj.

Interparolinte iom da tempo, ili per unu fojo laŭte ekridis. Ili leviĝis kaj seninterrompe ridante, ili revenis al la mezo de la senarbejo.

„He, sinjoro, nin vi ne povas mistifiki tiel“, vokis la gvidanto. „Ni vidis ĝin. Vi tie en la angulo firmligis la fusilon kaj pafis per tirado de ŝnuro. Sed ni ne lasas trompi nin per tiaj mistifikoj.“

La viroj ekridis amuziĝante. Kaj per unu movo ili havis nun ĉiuj revolveron ĉemane.

„Elvenu, knabeto, aliokaze ni venos al vi“, vokis la gvidanto. Rapidu! Unu, du, tri. Nu, ek, tuj!“

Kurtin kriis: „Mi eĉ ne pensas pri tio. Se vi faras paŝon, mi pafos.“

„Nu, tion ni volus vidi unue, *hombre*.“

Subite ĉiuj viroj lasis fali sin sur la teron kaj komencis rampi kun revolvero en la pugno de diversaj flankoj tien, kie sidas Kurtin. Sed ili ne avancis longan distancon. Kvarfoje knalis el diversaj lokoj de la sulko kaj du el la viroj kriis, ke ili estas trafitaj. Certe la pafoj nur skrapis ilin, ĉar ili ĉiuj turnis sin kaj rampis malantaŭen en la vepron.

Tie ili interkonsiliĝis, kio farendos. Fariĝis klare al ili, ke la sulko de pli ol nur unu viro estas okupita, eble eĉ de kvaropo aŭ de kvinopo. Kaj tiuj uloj ne povis esti iuj aliaj ol policanoj. Se tio efektive estus polico, tiukaze ilia sorto estus certa, ĉar la polico ne nur ĉi tie supre atendus, ili intertempe jam ankaŭ tenus okupitaj la vojon kaj barus tiel la retiriĝvojon al ili.

Restis do nur unu afero. La batalo nun devis komenciĝi. Sed faris la impreson, kvazaŭ ili ne volus komenci kaj kvazaŭ ili volus atendi, kion faros la uloj en la sulko. Ili atendis de tie la atakon. Sed kiam ne sekvis atako kaj ili ne aŭdis sonon el la sulko, ili fariĝis denove necertaj kaj supozis plian fojon, ke la gringo tie nur mistifkas ilin. Ĉar tiukaze, se estus soldatoj, ili ne atendus, tiukaze ili atakus kaj pelus ilin en la brakojn de la soldatoj, kiuj haltas survoje.

Sed la postenuloj ne raportis ion, kaj kiam unu el ili proksimiĝis supren, li kapneis kaj ekkonigis, ke tie malsupre ne estas soldatoj, ke liberas la vojo.

Poste ŝajne iu proponis, ke oni fakte sieĝu la ulojn ĉi tie en la sulko, ĉu estas soldatoj, ĉu ĉasistoj, ĉar la predo nun valorus des pli. Se tie estus kelkaj homoj, tiukaze ili ricevus

ankaŭ kelkajn armilojn, nutraĵojn kaj kromaĵojn, kiujn oni bezonas. Plimulton tiuj en la sulko certe ne havis, pensis la banditoj, ĉar ili tiukaze estus uzintaj sian avantaĝon ataki ĝuste en tiu momento, kiam la pafoj el la sulko zorgis por konfuziĝo.

La kvar viroj en la sulko trovis nun iom da tempo por interkonsiliĝi, ĉar ili vidis, ke la banditoj momente ne entreprenus ion. Ili rampis ĉiuj al tiu angulo, kie Howard sidis kaj interkonsiliĝis, kion fari. Ili manĝis ion, trinkis iom da akvo kaj permesis al si la saman ĝojon, kiun la banditoj nun jam dum kelkaj horoj ĝuis – ili fumis.

„Se oni nur scius, kion ili intencas fari!“ diris Kurtin.

„Ĉu ni scias tion, ĉu ne, fine estus egale“, diris Howard, „ni ĉiam povos ekagi nur tiam, kiam ili komencos ion.“

„Ni povus ja eliri kaj ataki ilin“, konsilis Dobbs.

„Tiukaze ni estus en la kaptilo.“ Howard kapneis kaj plensĝtopis sian pipon. „Momente ili ne scias, kiom da personoj ni estas. Sed tiam ili povus dislokiĝi. La senarbejon ni povus defendi sukcese, sed sur la vojon ni ne povus iri, tie ili embuskas. Kaj la senarbejon ni povos defendi pli bone, se ni trankvile restados en la sulko. Ni ja eĉ ne scias, ĉu estas plia trupo survoje, ĉu ne.“

„Ankaŭ mi pensas, ke estos pli bone, se ni trankvile restados en la sulko“, diris Lacaud. „Eterne ili tie ne sidos.“

„Kiom da tempo sufiĉas la akvo, la lardo kaj la knalaĵoj?“

demandis Kurtin.

„Ŝpareme uzate, sufiĉus tri tagojn.“

Nun la azenoj komencis krii. La banditoj ekaŭskultis, sed ne tre okupiĝis pri tio. Eventuale tio donis al ili la sekurecon, ke tamen ne estas soldatoj tie. Ĉar tiuj ne venus sur azenoj. La azenojn, se ili efektive pensis pri tio kunpreni ilin, ili ne povus atingi antaŭ ol ili regus la terenon.

Howard diris nun: „Ni devas prepari nin por la nokto. Tiam ili povos ŝtelire ataki nin.“

„Ne en tiu ĉi nokto, kaj ne en la sekva“, diris Lacaud. „Estas plenluno kaj la tereno ĉi tie estas prilumata, kvazaŭ estus taglumo, mi scias tion de la pasinta nokto.“

„Tio estas efektive vera“, konfirmis Howard. „Pri tio ni bonŝancas. Je la nokto ni pli bone formu duopojn kaj defendu ambaŭ angulojn. Unu el ni tiam alterne povus dormi kaj la alia rigardadus. Kompreneble, tion mi ja ne devas diri, ke tiukaze se ambaŭ dormus, ni ĉiuj ne leviĝus plu.“

De la banditoj neniu plu montris sin sur la senarbejo. Ili restadis en la vepro, kie oni aŭdis paroli ilin, kaj kie oni vidis kuradi ilin de tempo al tempo tien kaj tien.

„Estus nun la taŭga tempo, ke du el ni unue dormu“, diris Howard duonon de horo poste. „Ili dum la tago ne plu venos. Pri tio ni povas esti tute certaj. Mi supozas, ke ili certe atakos nin mallonge antaŭ la matena krepusko. Pri tio mi vetus kun vi.“

Ili disdividis la dormotempojn kaj la nokto pasis tute trankvile, escepte de memgardema alproksimiĝo, kiu okazis je la komenco de la malhelo. Sed kiam knalis pafado, antaŭ ol nur du el ili elestis de la vepro, ili rezignis pri tio. Iom da tempo poste ankaŭ la luno estis tiom hela, ke oni povus vidi hasti katon trans la senarbejon.

Sed je la tria matene Lacaud puŝis Kurtinon kaj Howard donis puŝon al Dobbs.

„Ĉu vi vekigis?“ demandis Howard.

„Jes, tute.“

„Transe io moviĝas. Ili proksimiĝas. De kvar flankoj ili rampas supren.“

„Ŝajne estas la tuta dekopo“, diris Dobbs, rigardinte certan tempon transen.

„Jes ja, ili nun riskas ĉion. Espereble ankaŭ la duopo je la alia angulo ne dormas surpostene. Mi diras al vi, Dobbs, tuj kiam ili estos en la mezo, ni pafos. Bone celu ilin, por ke ili tuj estu dece akceptataj. Se ili en la angulo – Kurtin estas ja dormema rato – iom dormemus, tiukaze ili vekigus pro nia pafado. Tiuokaze ili ankoraŭ havos tempon.“

Sed antaŭ ol la atakantoj atingis la mezon de la tereno, jam knalis du pafadoj el la transa angulo, kie sidis Kurtin kaj Lacaud, ĉar ankaŭ ili supozis, ke eble estus necese vekigi Dobbson kaj la oldulon antaŭ ol la banditoj estus tro proksimaj.

Sed la atakantoj ne lasis fortimigi sin. Ili rampis plu. Ŝajne neniŭ el ili estis trafita, ĉiukaze ne grave, nek sakro nek krio estis aŭdebla.

Nun pafis ankaŭ Dobbs kaj la oldulo. Kaj unu el la banditoj sakris. Unu el la kugloj do trovis ŝajne la celon.

Verŝajne la viroj supozis, ke nun la tuta municio estas elpafita kaj ke estis nur truko kun firmligitaj fusiloj, aŭ kiu sciŭ, kion alian ili eble supozis, ĉiukaze ili volis fini la aferon rapide. Malgrandan distancon ili ankoraŭ rampis, poste ili eksaltis kaj kuris parte kliniĝinte al la sulko, en larĝa vico laŭ ties tuta longo.

Tiel ili kompreneble ofertis multe pli bonan celon. Tri el ili tuj estis trafitaj. Du el ili tenis vunditan brakon. Kaj la tria el ili treniĝis forte lamante al la vepro, ĉar li ricevis pafon en gambon. El la sulko oni pafis seninterrompe plu. Dume la atakantoj ne povis uzi siajn armilojn, ĉar ili vidis neniun, kiun ili povus celi. Ili ja ankaŭ ne sciis, kiel aspektas la sulko, kie ili eble povus paŝi en kaptilon.

Ili denove lasis fali sin sur la teron, vokis ion reciproke kaj komencis rerampi al la vepro.

Tiam rapide mateniĝis, kaj dum la tago riskeblus atako eĉ multe malpli ol en la nokto, kiel ili nun eksciis sendube.

Kiam la kvaropo denove kuniĝis en angulo por matenmanĝi, diris Howard: „En la sekva nokto ili revenos. Tiam ili certe havos alian planon. Ili ne rezignos. Nun ne plu. Ili intertempe lernis, kia bona defendejo estas tiu ĉi sulko. Pli

bonan ĉefkvartiron ili tute ne povus trovi. Kaj tiam ankoraŭ estas niaj pafiloj, kaj kion ni havas krome. Ni devos bone pripensi, kion ni povos fari.“

Sed ĉar temis pri kvar viroj kontraŭ dek, kiuj havas retirvojon, kvaropo, kies trinkakvo estas kalkulenda trinkujope, kontraŭ dek, kiuj pere de la malfermita fuĝvojo povas provizi sin per akvo kaj nutraĵoj kaj eĉ per helpofortoj, ĉi-okaze ne fareblis multaj planoj. Kaj ĉar decidis ankaŭ ĉiam la atakantoj, kiam oni rajtas dormi, kaj kiam ne, la atakantoj havis eĉ plian avantaĝon.

Kurtin, kiu surpostenis dum la aliaj matenmanĝis, subite vokis: „Ĉi tien foje. Kion ili faras tie? Fariĝos nun serioze.“

La triopo tuj iris al la paftruoj kaj ĉiu el ili ekkonis samtempe, ke de nun temos pri morto aŭ vivo.

La banditoj estis tre fervoraj. Ili forhakis branĉojn kaj trunketojn kaj komencis konstrui ŝoveblajn lignajn fortikaĵetojn laŭ la maniero de la indiĝenoj. Kaŝite post tiuj, ili povis ŝoviĝi tute trankvile ĝis la sulko kaj oportune venki la sieĝatojn. Kelkajn pafojn oni ja interŝanĝus kun la viroj en la sulko, sed la finrezulto estis fakte jam decidita.

Kontraŭ tiu plano ankaŭ Howard ne plu sciis konsilon. Temis ankoraŭ nur pri tio en la lasta proksimbatalo fari sin tiel multekosta, kiel tio eblas. Kiu vivante falus en iliajn manojn, tiu certe ne havus kaŭzon verŝi ĝojajn larmojn.

„Min fakte miras ja nur, kial ili ne havis jam antaŭe la

ideon“, diris Kurtin. „Tio estas ja malnova truko de la indiĝenoj.“

„Tio postulas tro da laboro“, rediris Howard.

Ili interkonsiliĝadis, sed ne havis ideon, kiu povus liberigi ilin el la diable malbenita situacio, en kiu ili troviĝis tiumomente. Povus eble ankoraŭ sukcesi haki vojon tra la vepro. Sed tion la viroj transe tuj vidus. Ili pensis ankaŭ pri la mino. Tamen tio estus nur negrava tempogajno. Fine ili tamen revenis al la ideo provi atakon, kvankam tio estis senespera, ĉar tiukaze ili starus sur la senarbejo, dum la aliaj estus en la vepro kaj okupus la vojon. Kaj lastfine ili forlasis ankaŭ tiun ideon, ĉar laste eĉ Dobbs, kiu plej fervore subtenis tiun planon, akceptis, ke tio estus senmezure granda stultaĵo.

Se nur la rokovando estus grimpebla! Sed ĝi estis tro kruta, kaj eĉ se ili provus tion kun la espero, ke ili pli supre super la elstaraĵo trovos ion por povi firmteni sin, estus tamen vane. Nokte ne eblis, kaj en la taglumo oni povus mortpafi ilin sen peno, dum ili ne povus defendi sin.

Ili povis fari nenion alian ol trankvile rigardi ilin transe, kiel ili laboras. Je la kvara posttagmeze ĉio estus preta, kaj tiam certe atendebus la atako, se ili ne rigardus la komenciĝantan malhelon la pli avantaĝa tempomomento.

Estis je la dekunua. La viroj sidis ĉe la eniro de la senarbejo kaj tagmanĝis. Ili havis bonan humuron kaj ridis. La kvar viroj en la sulko evidente estis la ĉefa temo de iliaj ŝercoj,

ĉar ĉiam, kiam ili supozis, ke sukcesis bona ŝerco al ili, kiun ili priridis, ili rigardis transen al la sulko.

Tiam oni subite aŭdis vokon: „Ramirez, Ramirez, *pronto*, *muy pronto*, rapidu, rapidegu.“

Unu el la postenuloj suprenkuris la vojon kaj rapidegis al la gvidanto. La viroj ĉiuj eksaltis kaj iris sur la vojon. Oni aŭdis ilin paroli kaj paroli, sed la parolado pli kaj pli malproksimiĝis.

Tiam fariĝis kviete, kaj la sieĝatoj ne sciis, kion fari el tio.

„Tio estas truko“, diris Dobbs. „Ili kondukas nun tiel, kvazaŭ ili forirus, por ke ni elvenu sur la vojon. Tie ili embuskos kaj atendos nin.“

„Ne verŝajne, tute ne verŝajne“, opiniis Howard. „ĉu vi ne vidis, ke unu el la postenuloj tie ekscitite alkuris?“

„Tio apartenas al la mistifko, por ke ni supozu, ke ili rapide leviĝis kaj foriĝis.“

Sed Howard kapneis. „Ili ne bezonas ludi trukon, de kiam ili havas tiun indiĝenan ideon.“

Sed Dobbs ne lasis konvinki sin. „La indiĝena ideo estas ja tute bona. Tamen ĝi povas kosti al kelkaj uloj la vivon aŭ kelkajn vundojn. Eble ilia municio raras. Se ili povos kapti nin sen bezoni municion, kaj sen tio, ke ni dispafo nian municion, kiun ili ja jam rigardas sia propraĵo, ili estus ja stultaj, se ili almenaŭ ne provus tion. Se ili ne sukcesos, la

ŝoveblaj lignofortikaĵetoj ankoraŭ plenumos sian taskon.“

„Vi ŝajne pravas“, Howard konsentis nun. „Estas municio nia, kiun ili volas ŝpari, ĉar, se ili atakos nin, ni kompreneble elpafos ĉion, kion ni havas.“

Kurtin ne miksis sin en la interparoladon. Li atenteme rampis en la sulko kaj tiam grimpis sur la rokan elstaraĵon. Ĉar la banditoj ne videblis kaj iliaj voĉoj sufiĉe malproksimis, li povis aŭdaci foje elrigardi.

Li sidis sur la roka elstaraĵo kaj rigardis malsupren en la valon. Dum sufiĉe longa tempo. Tiam li subite vokis: „He, eksteriĝu, tie malsupre alvenas kavaleria skadro. Ili persekutas niajn amikojn.“

La triopo nun vere elrampis kaj ĉiuj ĝrimpis sur la elrigardejon. De tie ili rigardis tre buntan bildon. La soldatoj disdiviĝis en ses grupojn kaj svarmadis en la ebena. Ili certe eksciis, ke la banditoj devas esti ie tie. Pri tiu roka sovaĝejo ili dum tio ankoraŭ ne pensis, ĉar ili ja sciis, ke la banditoj havas ĉevalojn kaj ili verŝajne ne supozis, ke oni povas grimpi supren sur ĉevaloj.

Sed Lacaud havis alian opinion. Li diris: „Ŝajnas, kvazaŭ ili jam scias, kie kaŝiĝas la rabistoj. Sed ili ne estas tiel neprofesiaj ĉi tie eniri en embuskon. Sur la kruta vojo enfermita de densaj arbustoj kaj rokaj vandoj, ili ne povas fari ion, aŭ nur kun grandaj perdoj. Aŭ ili sieĝas la monton aŭ ili provas planon. Kaj mi supozas, ke ili faras tion.“

La soldatoj moviĝis plu, kvin aŭ ses kilometrojn malsupren

en la valon. La banditoj ĝis nun certe pensis, ke ilia kaŝejo estas konata al la soldatoj. Sed nun, kiam ili vidis rajdi plu la soldatojn, ili komencis senti sin sekura tie. Peco de la vojo de la rokoj estis transrigardebla. Kaj Kurtin rimarkis, ke la banditoj revenis rajdante por restarigi sian ĉefkomandemon ĉi tie. Sed la oficiroj de la federaciaj trupoj tre superis ilin pri ruzo.

Kiam la trupoj estis sufiĉe malproksimaj, ili klare videble komencis serĉi vastspace spurojn. Kun grandaj movoj kaj kun okulfrapa tien-kaj ĉi tien-rajdado ili ekkonigis, ke ili nun fine eltrovis, ke la banditoj devas esti en la roksovaĝejo. Sen granda rapidemo ili kolektiĝis kaj marŝis nun en la direkto al la rokoj por serĉi la vojon en la alton. Tio estis ilia truko. Ili sciis, ke la banditoj per ĉiuj rimedoj provus eviti lasi enfermi sin en la roksovaĝejo, se ili havus okazon gajni alian terenon. El la rokoj ili ne plu povus fuĝi, se ili foje estus enfermitaj, kaj la soldatoj trankvile povus teni okupataj la alirvojojn sen devi ataki kaj sen elmeti sin sur la internaj vojoj al la kugloj de la banditoj, kiuj embuskas post arbustoj kaj en montaj fendoj.

La postenuloj de la banditoj bone observis la movojn de la soldatoj. Kiam ili nun ekkonis, ke ilia kaŝejo estas malkovrita, ili decidis rapide uzi la antaŭecon kaj, gajni, tra la vepro bonege kovrate, la alian flankon de la tereno. Tie ili povus fuĝi sen esti vidataj aŭ oni rimarkus ilin nur tiom malfrue, ke ili kun siaj ripozintaj ĉevaloj facile kapablus plivastigi la antaŭecon tiom, ke la soldatoj eble denove perdis ilian spuron.

Sed malgranda taĉmento de la soldatoj troviĝis kaŝite en la vepro flanke de la tereno, kiun la banditoj provis atingi. Tiu ĉi taĉmento prenis sian pozicion en la pasinta nokto sen tio, ke la banditoj, kiuj okupiĝis ja ĉi tie pri sia nokta atako, ion eksciis pri tio. La soldatoj bone aŭdis la pafadon en la nokto, dum kiu la eĥo de la rokvojandoj vaste disvastiĝis en la valon, kaj tio konvinkis ilin, ke ili troviĝas sur la ĝusta vojo. La kaŭzon de la pafado ili ja ne sciis, sed ili supozis, ke la banditoj aŭ estas ebriaj aŭ elbatalas inter si kverelon.

La kvaropo sidis tie supre sur la rokelstaraĵo kaj atendis la batalon, kiu okazos laŭ ilia konsidero post horo. Se tio estos pasinta, ili fine povos denove eklabori.

La pafoj ekknalis, kaj la taĉmentoj, kiuj ŝanĝis en la direkto en vasta cirklo por elogi la banditojn, nun alsturmis en plena galopo. La revojo supren al la rokoj ŝajne estis barita al la bandoj, kaj tial ili ekgalopis per sovaĝa kriado, svingante la brakojn kaj brutale enpikante fingrolongajn spronojn en siajn ĉevalojn por kiel eble plej rapidigi ilin. Kaj efektive la ĉevaloj rapidegis en nepriskribebla rapideco mal-supren de la valo.

Poste sekvis la soldatoj, kiuj troviĝis en la vepro. Ili unue devis surseliĝi, kiam la banditoj preterflugis, ĉar la banditoj ne tiom proksime preteriris kiel atendis la soldatoj; ili sekve tion ne prezentis sufiĉe bonajn celojn. Tiel la banditoj ankaŭ ĉifoje gajnis antaŭecon. Ili ne nur rajdis, ili ankaŭ pafis dum la rajdado sur siajn persekutantojn.

„Tio estas bona, se ili gajnos konsiderindan antaŭecon“,

diris Howard.

„Kial?“ demandis Dobbs mirigite.

„Tiukaze la soldatoj foriĝos el tiu ĉi regiono. Ili ja povus pensi, ke ĉi tie supre estas ankoraŭ pli da banditoj, kaj ili vizitus nin. Ni vere ne bezonas ilin, eĉ ne tial, ĉar ili liberigis nin el diable fia situacio ĉi tie. Mi tamen prefere nur hejmvojaĝante volus danki al ili.“

La rajdanta grupo malproksimiĝis pli kaj pli kaj la pafado reeĥis pli kaj pli mallaŭte, kaj baldaŭ la observantoj sur la roko ne plu vidis, kio okazas malsupre, ĉar glutis la rajdistojn la trembrila horizonto.

14

La viroj restarigis sian kampadejon, kuiris kaj manĝis kaj longe etendiĝis ĉe la bivakfajro. Estis ankoraŭ multe da tempo ĝis la sunsubiro, sed neniu proponis ankoraŭ labori en tiu ĉi tago.

Kiam malheliĝis kaj ili, trinkante sian kafon kaj fumante siajn pipojn, sidis ĉirkaŭ la fajro, diris Kurtin: „Mi supozas tamen, ke Howard pravas, ke ni plej bone agos, se ni rezignos pri plulaboro kaj plenŝutos la minon. Ni eble povus el-skrapii pliajn mil dolarojn, sed pli bone estos, se ni kon-

tent-as pri tio, kio estas sekura. Povus aperi subite plian fojon ĉi tie tiaj nepetitaj gastoj, kaj ĉu ni ĉiam tiel bonŝance elturniĝus, tio estus plia demando.“

Unue neniu diris ion pri tio. Tiam, post pli longa paŭzo Dobbs opiniis: „Jes, mi konsentas. Ni do morgaŭ malstarigu la kampadejon, postmorgaŭ matene ni ordigu niajn aĵojn kaj la pakaĵojn kaj la bestojn, kaj je la sekva mateno ni ekiru. Ankaŭ mi ne emas plu labori ĉi tie.“

Lacaud aŭskultis tion sen enmiksiĝi. Li fumis kaj rigardis ŝajne indifere al la bivakfajro. De tempo al tempo li ekstaris, rompis branĉojn surgenue, kaj kion li ne povis disrompi, tion li ĵetis tuj sur la fajron.

„Ĉu vi konas la rakonton pri la Cienega-mino?“ li demandis subite.

„Ni konas tiom da rakontoj pri minoj“, diris Howard pro enuo. Li revis ĝuste pri planoj, kiel li povus plej avantaĝe uzi la enspezitan monon, por ke li havu agrablan vivon, dum la mono duobliĝu, kvarobliĝu kaj fine centobliĝu sen tro da peno kvazaŭ per si mem. Pro la demando de Lacaud li estis interrompita pri la imago de la centobliĝo. Eble li eĉ malkovris eraron pri siaj kalkuloj, kaj ĉar li estis tro laca por ankoraŭfoje peni rekonstrui, trapensi kaj tralabori la tutan pensovicon kaj la multajn nombrovicojn, kiujn li evoluigis antaŭe per sia imago, li diris: „Aĥ, pravas, vin ni forgesis ja tute.“

Tiumomente ankaŭ Kurtin kaj Dobbs rigardis supren.

Kurtin ridis: „Jen vi vidas, kiel malgrava vi estas ĉi tie. Vin ni tute pretervidis, kvankam vi batalis kun ni kaj nun trankvile manĝis kaj trinkis kun ni. Nu, ni havas niajn proprajn pensojn, kaj en tiuj vi ne havas lokon.“

„Ĉu vi ne diris ion pri plano?“ demandis Dobbs. „Tiun vi nun povas reteni por vi mem. Min ĝi ne interesas. Eĉ se tie enestus ankoraŭ dek mil dolaroj, mi ne volus havi ilin. Mi volas iri en la urbon, volas vidi junulinojn, sidi ĉe tablo kun manĝo regalita de kelnero sur blankan tablotukon, kaj observi kiel aliaj homoj kuiras kaj laboraĉas por aĉega salajro.“

„Sed tamen elvringeblos pli ol dek mil“, diris Lacaud.

„Kie?“ demandis Kurtin.

„En mia plano.“

„Ha, tiel“, respondis Kurtin kaj oscedis.

„La oro kuŝas tute malkaŝe.“ Lacaud provis interesigi la triopon. Ŝajne li ne sukcesis, ĉar Dobbs diris: „Se ĝi senkaŝe kuŝas, tiukaze simple levu ĝin kaj ne lasu ĝin eble eĉ kuŝi. Alie vi povus bedaŭri tion. Vi ja estas la modelo por knabo, kiu ĉiam pentas ion, kaj ĉiam havas ion por pento. Ĝis do, mi retiriĝas por dormi.“

Ankaŭ Howard kaj Kurtin ekstaris flegme, etendiĝis, oscedis kaj iris al la tendo. Survoje tien Kurtin pripenseme haltis. Poste li turnis sin, denove etendiĝis kaj rigardis dum tio supren al la luno.

Li ekpensis ion kaj tial li vokis en la tendon: „Howard, ĉu vi baris la vojon hodiaŭ posttagmeze, kiam vi senligis la azenojn?“

„Kompreneble“, li vokis, „ĉe la kurbiĝo malantaŭ la herbejo, kiel ĉiam, ĉe la akvoflako.“

Lacaud alportis sian pakaĵon kaj sternis sin ĉe la fajro.

Kurtin vidis tion kaj venis al la fajro.

„Ankaŭ vi ja povus veni en la tendon, ulo. Tiom da loko por via angulo ankoraŭ disponeblas.“

Sed Lacaud respondis: „Mi dormas sufiĉe agrable ĉi tie. Mi pli preferas dormi ĉe bivakfajro ol en tendo. Sed aŭskultu, ĉu vi ne volas partopreni? Konsiderinda sumeto elvringeblas, fidu min.“

„Kion partopreni? Ha, jes, vian planon. Ne, mi ĝojos, se mi forestos de ĉi tie. Mi ne plu eltenas tion. Neniu el ni plu restados ĉi tie. Tion, kio troveblas ĉi tie, ni elskrapis, kaj mi ne plu movos eĉ manon ĉi tie.“

Kurtin iris transen al la tendo kaj enrampis.

„Nu, kion la knabo do celis?“ demandis Dobbs.

„Lian planon, sed mi rifuzis mangeste.“

„Mi efektive ne scias, kion pensi pri tiu ulo“, diris Howard. „Preskaŭ mi supozas, ke li ne bone firmŝtraŭbis kelkajn

klapojn enkapo aŭ kelkaj estas lozaj. Mi nur devus scii, kion li faris dum la lastaj ses monatoj, kaj kie li estis, tiukaze mi povus diri al vi tute precize, ĉu li estas la eterna oroserĉanto aŭ ĉu li fariĝis freneza pro la vepro. Eble, li estas kaj tio kaj tio.“

„Ĉu eterna oroserĉanto?“ demandis Kurtin scivoleme.

„Jes ja, unu el tiuj, kiuj eterne serĉadas kaj serĉadas, iu, kiu scias dekon da fabelaj rakontoj pri ŝutkovritaj kaj perditaj orminoj, kiu havas en la sako aŭ en la kapo dekon da planoj kaj desegnaĵojn, kiuj montras al li la sekuran vojon al perdita mino, iu, kiu turnadas en sia cerbo dekon da ridindaj babilaĉoj de indiĝenoj kaj mestizoj pri lokoj, kie estas trov-eblaj oro aŭ diamantoj. Li serĉas kaj serĉas, kaj ju pli malbone montaro estas irebla kaj sovaĝa, ju pli granda la danĝero, des pli li estas konvinkita, ke li troviĝas tute proksime de brake fortaj orvejoj. Sed li trovas neniam unconda oro, kvankam li scias tute certe, ke li jam staras rekte antaŭ mino kaj morgaŭ ekfrapos la vejnon. Ankaŭ tio estas frenezeco, kiu povas fariĝi simile tiel danĝera por la kunhomoj, kiel ĉiu alia frenezeco. Tiaj obseditoj estas eĉ pli kompatindaj ol aliaj frenezuloj, ĉar ili ĉiam migras, sen ripozo kaj sen celo. Baldaŭ ili preskaŭ mortas pro malsato, baldaŭ pro soifo, baldaŭ ili devas defendi sian vivon kontraŭ pumoj, kontraŭ sonserpentoj kaj aliaj venenaj reptilioj, baldaŭ kontraŭ misfidemaj indiĝenoj, kaj aliokaze ili falas ie en abismon, rompas siajn ostojn kaj kuŝadas, ĝis trovas ilin indiĝeno aŭ bandito, kiu penas vivi ilin denove. Sed kuraceblaj ili ne estas, ĉar ili ĉiam scias, ke ili morgaŭ tute certe trovos la minon.“

„Sed tiun impreson li ne faris al mi“, diris Dobbs. „Jen ankoraŭ io alia estas kaŝita je li.“

„Eble“, konsentis Howard. „Mi nun ne volas cerbumi pri li. Pro mi li estu iu ajn. Mi nur ne scias ankoraŭ, kion ni faru kun li, se li eble provos formigri kun ni. Tion ni ne povus akcepti.“

„Morgaŭ li kompreneble vidos la minon“, diris Kurtin.

„Tio nun ne plu damaĝas nin“, respondis Howard. „Ni fermos ĝin kaj, se li restados post nia foriro kaj denove malfermos ĝin, tiukaze tio estos afero lia.“

Sekvamatene, post mallonga matenmanĝo, Howard, Dobbs kaj Kurtin fervore laboris. Ili tre miris, kiam Lacaud ne montris scivolon rampi kun ili al la mino. Ili ja ne petis lin, estas vere, sed ili atendis, ke li certe havos intereson pri tia tiom grava afero, kia estas ormino. Li eĉ ne demandis pri ĝi. Eltrinkinte sian kafon, li ekstaris kaj komencis iri sur la vojo malsupren.

Kurtin sekvis lin, ĉar li supozis, ke Lacaud iras malsupren en la vilaĝon por diri tie, ke estas nun la tempo por traserĉi ĉi tie la neston, ĉar morgaŭ estos tro malfrue. Lacaud ne sciis, ke Kurtin sekvas lin. Li iris senzorge sur sia vojo kaj rigardis nur detale ĉiun pli grandan arbon, ĉiun ŝtonon, kvazaŭ li serĉus iujn signojn. De tempo al tempo li kliniĝis por esplori la grundon. Fine li venis al la herbejo, kie estis la bestoj. Li transiris kaj venis ankaŭ al la akvoflako. Post kiam li skrupule rigardis ĝin, li rigardis supren kaj iris en la

direkto de la rokovando. Tie li nun komencis rampadi kaj serĉadi.

Nun konvinkite, ke Lacaud havas aliajn intencojn ol kaŭzi malfacilaĵojn al la viroj, Kurtin revenis al la du aliaj kaj rakontis tion, kion li observis.

„Nu, estas tiel, kiel mi rakontis al vi hieraŭ vespere, jen la eterna oroserĉanto“, diris Howard. „Ni ne disipu tempon pro li.“

Ili okupiĝis pri tio malkonstrui la ĉarpentaĵojn kaj Dobbs vundiĝis je mano. Li koleriĝis kaj diris: „Por kio ni malkonstruu ĉion? Ni lasu stari ĉion kaj foriru sur nia vojo.“

„Ni ja antaŭe interkonsentis tion, kiam ni komencis labori ĉi tie, ke tiukaze, se ni sukcesos, ni malkonstruos kaj fermŝutos ĉion.“

„Tio nur retenos nin, kaj mi ankaŭ ne scias, por kio tio taŭgu“, grumble diris Dobbs.

„Nu, knabo, unue mi pensas, ke oni montru al la monto, kiu montriĝis tiel malavara, almenaŭ tiun dankon, ke oni ne postlasos ĝin tiel aĉe traktite, ke oni fermu do la vundojn, kiujn oni kaŭzis al ĝi. Kaj lasi stari la instalaĵojn ĝuste antaŭ ties nazo kaj postlasi ĝian ĝardenon kiel kotan konstruejon, tio estas nedeca. La monto efektive meritas, ke oni respektu ties belecon. Krome mi prefere volus repensi pri la loko tia, kia mi trovis ĝin, kiam ni alvenis, por ke mi ne havu ĉiam tiun amason da rompitaĵoj kaj rubo antaŭ la okuloj, kiam mi pensos pri tiuj ĉi monatoj. Estas sufiĉe malbone, ke

ni povas montri nur ĝuste la bonan intencon, kaj ke la loko ankoraŭ aspektos sufiĉe netolerebla, kiam ni estos for.“

„Stranga estas via imago pri la personeco de la monto“, diris Kurtin, „sed ankaŭ mi pensas, ke oni purbalau la loĝoĉambron, kiun oni trovis pura, kiam oni forlasos ĝin, eĉ se ĉeestas neniu, kiu laŭdas onin pro tio.“

„Alian kaŭzon ni havas aldone“, daŭrigis la oldulo, „povus ja esti, ke iu venos supren ĉi tien, dum ni ankoraŭ estos survoje. Tiukaze li tuj eltrovus, kion ni faris ĉi tie. Kaj li persekutus nin kun kelkaj uloj. Se ĉio ĉi estos reordigita tiel bone, kiel ni kapablos tion, ĝi aspektos kvazaŭ ĝi estis nur longtempa kampadejo, kie ni faris ĉion ajn, nur ne lavadi pezan flavaĵon. Nu, Dobbs, kunlaboru fervore, ni laboris tiom da tagoj por nenio antaŭ ol la monto malfermis sian trezorkeston. Tiu ĉi tago ĉi tie enhavu bonan kaj noblan laboron, eĉ se ĝi kontante enspezigos neniom. Ankaŭ, se vi aranĝus florigardenon antaŭ via dompordo, vi ne pensas pri tio, ke tio alportu kontantan monon.“

La tagmanĝo estis konciza kaj simpla, tiel, kiel la triopo al kutimiĝis en la pasintaj monatoj. Ili kuiris per kaldrono teon kaj manĝis aldone ledecan pecon de faruna patkuko, kiun ili matene bakis. Tuj kiam la teo estis trinkita kaj ĉiu finfumis pipoplenon, oni denove vigle laboris plu. La lumo de la tago eluzendis ĝis la lasta minuto. Kiam la suno matene leviĝis, la matenmanĝo devis esti finita kaj la vespermanĝo komenciĝis, kiam la suno jam subiris. Nur tiel eblis, ke la tri viroj povis plenumi tiom da laboro. La longeco de la tago dum la tuta jaro estis simila, la negravan diferencon

ili apenaŭ rimarkis. Ankaŭ la pluvotempo ne influis esence ilian laboron. Okazis, ke dum kelkaj horoj elverŝiĝis veraj pluvotorentoj. Sed tiukaze oni havis ĉiam sufiĉe da alia laboro. Krome la pluvo havis eĉ avantaĝojn, ĉar ĝi plenigis la tertankon, kiun ili fosis por ĉiam havi sufiĉe da akvo por la lavado de la sablo, kaj tiel ili ŝparis la suprenportadon de akvo.

„Danne, estis malbenita laboraĉo“, opiniis Kurtin, kiam li sidiĝis momenton por ripozi.

„Konsentite, vi pravas“, konfirmis la oldulo. „Sed, se ni elkalkulus tion, ankoraŭ neniu el ni estus havinta tian bonan kaj tiom altan tagsalajron, kiel ni enspezadis ĉi tie.“

Ankaŭ Dobbs starigis la ŝpaton flanken, sidiĝis kaj komencis ŝtopi pipon. „Venas nun en mian kapon“, li diris lante, „ke ni ankoraŭ ne povas esti tute kontentaj. Ne pro niaj enspezoj, sed mi opinias, antaŭ ol ni ne havos niajn tutajn sorĉaĵojn sekurigataj kaj bone protektataj en urbo kaj bele surtavoligitaj antaŭ niaj okuloj en nia hotelĉambro sen frapi atenton, ni ne rajtas diri, ke ili apartenas al ni.“

„Tio dum la lastaj semajnoj ĉirkaŭvagadis ankaŭ en mia kapo“, diris la oldulo. „Tio fariĝos malfacila vojaĝo. Tio fariĝos la plej komplika afero. Jen banditoj, jen akcidentoj survoje, jen la federacia polico, kiu scivolas kaj kiu scii volas, kion ni transportas. Kaj, se ili trovos la flavajn nuksetojn, tiukaze ni aŭ ŝtelis ilin aŭ murdis kaj prirabis iun aŭ ni elfosis ilin sen licenco kaj sen pagi la oficialan tarifon. Tio ankoraŭ postulos diversajn konsiderojn. Jes, foje pensu

ankaŭ iom pri tio, kiel plej bone kaj plej sekure surŝipigi la raran pipron.“

La du pli junaj kompanianoj silentis. Poste ili sulkgis la fruntojn, kvazaŭ ili streĉe pensadus. Poste ili ĝemis, ĉar la pensado streĉis ilin pli ol la plej streĉa minlaboro, kaj fine ili profunde enspiris, ekstaris kaj disĵetis la termontetojn.

Malfrue posttagmeze ili surtavoligis la kunbatitajn lignajninstalaĵojn kaj ekbruligis ilin, por ke ili foriĝu. Sekvatage ili volis ĵeti teron sur la brulejon. Poste ili volis ankoraŭ diversloke enplanti tie kelkajn arbustojn, junajn arbojn kaj herbotufojn elfositajn en aliaj lokoj. La oldulo preterire diris: „Ja povus esti, ke unu el ni ne povos porti sian parton en sekuran havenon, aŭ li disipos ĝin dum kelkaj semajnoj aŭ li malbonŝancos pro alia kaŭzo. Tiu tiukaze povos reveni ĉi tien kaj ankoraŭfoje rasti ĉion, li tiam trovos ja ankoraŭ decan tagsalajron. Tio estas plia kaŭzo, kial ni lasu ĉion tiel nesuspektige, kiel eblas. Tiukaze neniu tuj havos la ideon ĉirkaŭrigardi ĉi tie.“

Jen afero, kiun Dobbs kaj Kurtin komprenis pli bone ol tio, kion la oldulo diris pri la dankemo al la monto, kaj ke oni ne lasu la naturon hontigite post si. Dobbs opiniis, ke la naturo zorgu por si mem, ke ĝi havas pli da tempo kaj pli da pacienco ol li, ke li ne estas la noktogardisto de soleca montara pejzaĝo. Sed oni ja promesis tion al la oldulo, kaj laŭ tio oni ankaŭ agis. Li simple estis olda kaj havis siajn kapricojn, kvankam li estis ankaŭ partnero, kun kiu oni povas elteni dum certa tempo.

Kiam ili jam finis la taglaboron, la loko efektive aspektis tia, ke neniu, kiu preterirus kaj rigardus nur supraĵe, supozus, ke ĉi tie iam estis mino. Nur la monto de la kunbatitaj ĉarpentaĵoj plu subbrulis kaj fumis ankoraŭ. Morgaŭ ankaŭ la memoro pri ĝi perdiĝos.

Lacaud ĉirkaŭ la tagmeza tempo ne estis ĉe la bivakfajro. Ĉu li estis pli frue aŭ pli malfrue sur la kampadejo, la triopo ne sciis. Ili tute forgesis lin. Ili okupiĝis tro multe pri siaj propraj koncernoj anstataŭ memori lin. Nur nun, kiam ili rampis sur sia ĉirkaŭvojo al la senarbejo kaj vidis lin kaŭri kaj ordigi la bivakfajron, ili rememoris pri tio, ke la viro plu ĉeestas.

„Ĉu vi intertempe jam trovis vian orminon?“ demandis Dobbs, dum li paŝis kun akvokaldrono al la fajro.

„Ankoraŭ ne“, rediris Lacaud, „sed mi pensas, ke mi neniam estis tiom proksima, kiom hodiaŭ.“

„Jen multe da feliĉo“, ridante diris Kurtin, kiu proksimiĝis kun sia pato.

Lacaud havis kaldronon kun sia propra rizo super la flamoj.

„Kafon vi ne devos kuiri“, diris Howard bonkore, „tiun vi povas trinki kun ni. „Pli da kafeo ni ne surŝutos, nur pli da akvo, kaj la akvon ni nun ja ne plu devos ŝpari.“

„Dankon!“ diris Lacaud koncize.

Ili lavis sin, poste ili manĝis kaj kaŭris ĉe la fajro. Howard, Dobbs, kaj Kurtin sentis sin kiel fabriklaboristoj sabate vespere. Ili sciis, ke ili morgaŭ frue agrable devos labori nur dum proksimuma horo por priplanti la senarbejon. Tiam sekvos la multe pli agrabla laboro de la kunpakado, kaj tiam ili havos plu nur la facilan taskon prepari la transportan karavanon. Ĉio estos agrabla facila laboro, dum kiu oni povos fumi, kanti kaj babili.

Tial ili ankaŭ sidis je la unua fojo dum monatoj komforte kaj gajhumore ĉe la bivakfajro. La penso, ke ili baldaŭ adiaŭos sin de ĉi tie, post kiam ili eltenis kune preskaŭ jaron plenan de streĉega laboro kaj de neimageble asketa vivo, tio faris ilin tiel konkordemaj, kiel ili neniam kapablis esti antaŭe. Je la unua fojo ili sentis, ke firma bendo ĉirkaŭligas ilin, kio signifas amikecon, kamaradecon kaj fratecon. Ili sentis, ke ĉiu el ili subtenus la aliajn, eĉ se tio kostus la vivon. Tial ili sentis sin pli parencaj ol samsangaj fratoj. Sen eksplicite diri tion, ili reciproke kviete petis pri pardono pri ĉio ĉi, kion ili reciproke faris kaj diris, se temis pri bagateloj aŭ fiaj malicaĵoj dum la lastaj monatoj.

Lacaud estis ekskludita de tiu frateco, ĉar li ne povis legi kaj kompreni la perceptojn de la aliaj, tiel, kiel ili povis, ĉar ili reciproke tute elkoniĝis. Ili povis kaŝi al la aliaj nenion, kio okazas en ili, kaj kion ili pensas. Sed antaŭ Lacaud ili povis kaŝi ĉion, kion ili ne volis sciigi al li. Lin ili povis eĉ erarigi kaj trompi, kiam ili havis la intencon. En la triopo ili ne sukcesis pri tio. Ĉiu el ili havis en la pasintaj monatoj neniujn aliajn studobjektojn ol siajn du kunulojn. Nek librojn nek

gazetojn nek aliajn vizaĝojn nek neatenditajn pejzaĝobildojn, kiuj detenus ilin de iliaj studadoj.

Okazis ofte, ke unu el ili nur komencis frazon, kaj la du aliaj sciis tuj la tutan enhavon de la frazo kaj eĉ la precizajn vortojn kaj la precizan vortsinsekvon, kiun uzis la parolanto. Tial elformiĝis inter ili ankaŭ la stranga kutimo, ke neniu el ili iam finis sian frazon, ĉar tio ne necesis, kaj ĉar alia jam respondis, se estis elparolitaj nur tri aŭ kvar vortoj de frazo. Tio estis ja unu el la kaŭzoj, kial ili reciproke atakis la nervojn de la aliaj tiel, ke ili kapablus murdi sin reciproke, nur por ne scii ĉiam jam antaŭe la vortojn kaj pensojn de alia kaj devi enui aŭ ĉagreniĝi preskaŭ ĝismorte pri ili. Sed kiel ili povus pliigi sian vorttrezoron kaj sian ideoriĉon? Ĉiam temis pri la samaj aferoj, ĉiam pri la samaj nocioj, ĉiam pri la samaj taskoj. Evoluiĝis inter ili, sen tio, ke ili konsciiĝis pri tio, tute stranga formo de interparoladoj, kontraŭ kiu fremdulo devis esti senhelpa.

Ekzemple ili konstruis ĉerporadon. Per la helpo de simpla kapstano pelata de azeno la ĉerporado estis ekmovata por ĉerpi la akvon sur la sulkon, de kie ĝi falis en la patojn, en kiuj estis ellavata la sablo. Ĉar estis pli facile priservi la kapstanon, devis fari tiun laboron Howard. Tute komence oni ankoraŭ vokis: „Howard surŝutu la akvon, ni pretas.“ Tiu tre longa voko densiĝis al unu vorto: „ŝit“. Kaj tiu vorto „ŝit“ devis fine transpreni la nocion por akvo entute, ĉar ĝi estis pli mallonga kaj pli simple direbla ol „*water*“. Eĉ, se la parolo estis pri akvo por kafokuirado aŭ pri trinkado, oni simple diris: „Ŝit' ĉe l' fajr'?", kion signifis: „Ĉu la akvo staras ĉe la bivakfajro?“ La ŝpato, pro kaŭzoj, kiujn poste neniu

plu povis klarigi, fariĝis “kat”, la pioĉo fariĝis „ŝajk“, la dinamitkartoĉo estis nomata „Mary“. Se Marinjo estis ekbruligenda, ili uzis por tio du vortojn, unu vorto el ili estis „Mary“, la alia vorto pro ĝentileco kaj ankaŭ pro aliaj kaŭzoj, ĉi tie ne mencioblas, kvankam ili je certaj antaŭkondiĉoj kaj certaj kondiĉoj certe povas havi rilaton kun iu Marinjo. Kaj tiun vorton oni tiam uzis eĉ, se temis pri la ekbruligado de pipo aŭ de la bivakfajro. „Manĝo“, do manĝotempo, ricevis nomon, kiu fakte esprimis la malon, se oni efektive uzus la vorton inter sinjorinoj kaj ĝentlemanoj, kiuj kutime evitas ĝin kaj estas eĉ tre memgardemaj, se ili devas priskribi ĝin.

Howardon oni vokis neniam per lia nomo, sed nur „Olb“. Tio evoluiĝis el „Old boy“, olda knabo aŭ oldulo. Kurtin estis „Ku“ kaj Dobbson oni vokis „Pamp“. Kial, li mem ne sciis, kaj neniu povus klarigi tion.

Tiel tio funkciis pri ĉiuj vortoj kaj nocioj. Ili povis paroli kune dek minutojn sen tio, ke Lacaud komprenis ion ajn.

Ili mem kompreneble ne sciis, ke Lacaud ne povas kompreni ilin. Eĉ ne venis en ilian kapon pensi pri tio, ke li foje devis imagi, ke li estas inter fremduloj, kiuj venis el iu ne-konata fremda lando. Ili tiom kutimiĝis pri tio, ke ili trovus sin ridindaj, se ili parolus alie.

„Jes, pri la kapablo sukcese foriri“ – Howard daŭrigis denove la penson, kiun li finis posttagmeze en la mallonga interparolado. Anstataŭ kapabli sukcese foriri, li diris „bas-kuli“, sed oni devas prezenti la interparoladon ja en formo tia, kian komprenas ankaŭ tiuj, kiuj ne apartenas al la frataro.

„Jes, pri la „kapablo sukcese foriri“, jen afero malbenita de la diablo. Ni ja sukcesos foriri kaj pluri, kial ne? Sed eĉ, se oni supozas, ke oni havas ĉion jam en laŭorda sekureco, oni ankoraŭ tute ne havas ĝin kiel krediton sur sia bankkonto. Ĉu vi iam aŭskultis la historion pri *doña* Catalina Maria de Rodriquez? Certe ne. Ankaŭ en ŝia afero ne temis pri la oro kaj la arĝento, sed pri la kapablo sukcese foriri kaj pri la transdonado al sekura loko.“

„En Gvadelupo estas la gracobildo de nia sankta patronino de Gvadelupo, la protektpatronino de Meksiko. De Meksikurbo vi povas veturi per tramo tien. Al tiu gracobildo pilgrimas ĉiuj meksikanoj kaj indiĝenoj, kiuj havas kordeziron, kun la certa espero, ke la gracobildo plenumos iliajn dezirojn, ĉu por forpreni agron de la najbaro, ĉu tial, ĉar de knabino forkuris la amato, ĉu pro tio, ke edzino timas, ke povus fariĝi publike, ke ŝi enterigis sian edzon per herbeto kaj tial povis havigi al si alian edzon.“

„Ĉio ĉi estas ja nur trompo kaj superstiĉo“, rimarkis Dobbs.

„Tute ne“, rediris la oldulo. „Vi devas nur fidi pri tio, kaj tiukaze ne plu estas trompo. Tiu, kiu fidas pri Dio, por tiu ekzistas Dio, kaj kiu ne kredas pri la plej supra gvidanto kaj administranto de la stelaroj, por tiu ekzistas neniu. Sed pri tio ni ne longe kverelu. Mi ja eĉ ne diras, kion mi mem pensas pri tio. Mi raportas nur neŝminkitajn kaj sobrajn faktojn.

Tio okazis antaŭ pli ol cent kaj kvindek jaroj, proksimume en la tempo de la usona revolucio. Tiam vivis proksime de Huacal finance bonfarta indiĝeno, kiu apartenis al la estroj de la Chiricahua-triboj. Li havis belan bienon kaj ne partoprenis en la murd- kaj rabentreprenoj de la najbaraj klanoj. Lia klano setlis tie kaj trovis en la agrikulturo pli da ĝojo kaj bonfarto ol en la militoj kaj en la eternaj bataloj kontraŭ la hispanoj. La tribestro havis nur unu suferon en la mondo: lia ununura filo, heredonto de lia nobela rango, estis blinda. En pli malnovaj tempoj la filo estus mortigita. Sed de kiam la tribo setlis kaj la triboj agnoskis la kristanecon, oni fariĝis pli grandanima. En tiu ĉi kazo ludis rolon ankaŭ la fakto, ke la knabo estis belkreskinta kaj fortika, kaj ke oni povis priskribi lin eĉ treege bela knabo.

Monaĥo, kiu vagadis tie, kaj kiu eluzis la donacemon de la tribestro ĝis la lasta hufofereca bonŝanceto, konsilis al la patro, ke li entreprenu kun sia edzino kaj la knabo pilgriman vojaĝon al la gracoplena dipatrino de Gvadelupo, kaj ke li nepre ne ŝparu je la oferodonoj, ĉar por tiuj la dipatrino estas tre akceptema kaj ŝi scias alte taksi la valoron de la donoj.

La tribestro postlasis la bienon sub la kontrolo de sia onklo kaj ekpilgrimis. Li rajtis uzi nek ĉevalon, nek azenon, nek ĉaron kaj devis iri piede la gigantan distancon de preskaŭ du mil kilometroj kun la edzino kaj la infano, li devis preĝi en ĉiu preĝejo preterirata de li tricent avemariojn kaj oferi kelkajn kandelojn kaj arĝentajn okulojn.

Fine li atingis Meksikon, kaj post kiam li preĝis kaj petegis multajn horojn en la katedralo, komenciĝis la lasta parto de lia tre streĉa tasko. De la katedralo ĝis la gracobildo en Gvadelupo estas kvin kilometroj. Tiujn kvin kilometrojn devis li, lia edzino kaj la knabeto, moviĝi sur la genuoj. Kaj ĉiu el ili dum tio devis porti permane brulantan kandelon, kiu spite al vento kaj pluvo ĉiam devis bruli. Se kandelo finiĝis, devis esti ĝustatempe ekbruligita sur la malnova kandelo konsekrita nova, kiu kostis pli da mono ol aliaj kutimaj kandeloj. La tutan nokton daŭris la peniga lasta vojaĝo. La knabo endormiĝis kaj ankoraŭ en la dormo li plorsingulte petis pri peco da maizkuko kaj pri akvo. Sed ili rajtis nek manĝi nek trinki. Ili atendis, ĝis kiam la knabo denove iom refreŝiĝis kaj poste la procesio iris plu. Ĉiuj homoj, hispanoj kaj indiĝenoj, kiuj renkontis ilin, evitis ilin, timeme kruco-signante sin. „Kian neimageblan, neindan pekon devis esti deliktinta tiu familio, ke ili devas pentofare elteni tian teruran pilgriman vojaĝon“, ili pensis.

Tute laciĝintaj ili alvenis piede de l' *Cerrito de Tepeyacac*, al tiu monteto, sur kiu la dipatrino en la jaro 1531 al la Quauhtlatohua-indiĝeno Juan Diego aperis trifoje persone kaj postlasis sian bildon en lia *ayate*, en lia ponĉo. Tie ili

kaŭris tri tagojn kaj tri noktojn sur siaj genuoj, preĝante kaj peteg-ante. La tribestro promesis transdoni sian brutaron kaj sian tutan rikolton al la eklezio, se la patrino de Dio helpus lin pri la mizero. Sed miraklo ne okazis. Jen li fine promesis laŭ la konsilo de la monaĥo oferi sian tutan bienon kaj ĉion, kion li havas, se la patrino de Dio estos doninta al lia filo sanajn okulojn.

Sed la atendita miraklo de la monaĥo tiel sekure promesita al li, ankaŭ tiam ne okazis. La knabo estis tiel elĉerpita de la longa fastado kaj de la streĉa vojaĝo, ke lia patrino devis fine tute dediĉi pri lia flegado por vivteni lin. La tribestro, ne plu sciante, kion fari plu, komencis dubi precipe pri la potenco de la dipatrino kaj pri la potenco de la kristana religio ĝenerale, kaj li diris, ke li nun volas iri al la ŝamanoj de sia tribo, kiuj laŭ li sufiĉe ofte donis pruvojn pri la potenco kaj la mirakloforto de la malnovaj indiĝenaj dioj al siaj antaŭuloj. La monaĥoj malpermesis al li tiel blasfemadi kaj minacis al li, ke lia familio ankoraŭ multe pli fiajn malsanojn devos atendi, se li ne ĉesos esprimi siajn dubojn. Kaj ili diris al li, ke li sola respondecas tion, ke la gracopatrino scias bone, kion krome scias neniu homo, ke li faris erarojn dum la vojaĝo, ke li preterlasis preĝejon kaj, ke li intence miskalkulis ĉe la preĝado de la avemarioj, por pli rapide fini tion, ke li manĝis, kiam li ne rajtis manĝi, kaj ke li trinkis diversajn fojojn matene akvon sen antaŭe surgenuiĝi kaj preĝi. Fine devis koncedi la tribestro, ke li foje eventuale vere iam preĝis ne tricent, sed nur ducent kaj okdek avemariojn, ĉar estas malfacile por li memorteni tiom grandajn nombrojn. Kaj certe, diris alia monaĥo, li preterlasis sciigi diversajn

pekojn, kiam li preĝis en la katedralo, ĉar la diopatrino al ĉiu, kiu meritis tion, ĝis tiam ja helpis el la mizero. Tial li ripetu la pilgriman vojaĝon post ses monatoj.

Eble tio estis tamen tro por la tribestro, aŭ – kaj tio certe estas tio, kio plej verŝajnas – li perdis la kredon pri la mirakla forto de la bildo. Ĉiukaze li reiris al Meksiko, manĝis multe kaj bone kaj ankaŭ denove brakumis sian junan edzinon, kion li ne faris, fidele al la tasko, dum la tuta vojaĝo. Poste li enketis en la urbo kaj oni montris al li la domon de iu *don* Manuel Rodriquez. Tiu *don* Manuel estis fama hispana kuracisto, sed li estis tre mon- kaj potenc-avida. Li ekzamenis la knabon kaj klarigis al la tribestro, ke li verŝajne kapablos redoni la okullumon al la infano. Kion la indiĝeno povus pagi, li demandis.

La tribestro diris, ke li havas bienon kaj multajn brutarojn. Sed, ke tio ne estas mono, respondis *don* Manuel al li, kaj ke li bezonas monon, multe da mono. La tribestro respondis, ke li faros el la kuracisto la plej riĉan viron en tuta Nova Hispanio, se li donos al la filo la okullumon. ‚Kiel vi volas fari tion per via bieno?‘ demandis *don* Manuel. ‚Mi konas riĉan or- kaj arĝentominon‘, diris la tribestro al li, ‚kaj tiun mi montros al vi, kiam mia filo povos vidi.‘ Kaj ili faris la kruelan kontrakton, ke *don* Manuel havos la rajton denove blindigi la knabon, se la mino ne ekzistas aŭ jam apartenas al alia.

Don Manuel laboris kaj operaciis la knabon du plenajn monatojn kaj neglektis en tiu tempo ĉiujn siajn aliajn klientojn,

inter ili eĉ la sekretan sekretarion de la vicreĝo. Kaj post du monatoj la knabo povis vidi kiel aglo kaj *don* Manuel klariĝis al tribestro, ke nun la okullumo estas certigita. Kaj tio estis ĝusta.

La ĝojo de la tribestro estis senfina, kaj lia dankemo venis el fidela koro. „Nun mi volas diri al vi, *don* Manuel, ke mi ne trompis vin.‘ Tion li respondis, kiam la kuracisto demandis lin pri la pago. „La mino apartenas al mia familio. Kiam la hispanoj venis, nia praavo ŝutkovris ĝin, ĉar li ne volis havi hispanojn en nia distrikto, ĉar ni malamis la hispanojn, kaj ĉar ni sciis, ke la blankuloj amas la oron kaj la arĝenton pli ol sian filon de Dio. Oni perfidis la minon kaj la hispanoj venis kaj elŝiris de mia praavo kaj de lia edzino, la langojn, kiam ili ankoraŭ vivis, nur por ekscii, kie estas la mino. Sed kvankam lia buŝo estis plena de sango kaj la doloroj frenezigis lin, mia praavo ridis al iliaj vizaĝoj kaj ili ne ricevis la minon. Kaj mia praavo notis la vortojn kaj post lia morto ili iris de la buŝo de la filo al ties filo kaj tiel plu ĝis mia buŝo: „Se al vi aŭ al via familio aŭ al via tribo estos plenumita granda servo de homo, kiun al vi ne volis plenumi aŭ ne povis plenumi nek la plumokronita Dio de nia popolo nek la sanganta dornokronita Dio de la blanka popolo, tiukaze donu la trezoron al tiu homo, kaj al tiu ĝi apartenu. Vi, *don* Manuel, plenumis pere de mia filo al mi, al mia familio kaj al mia tribo tiun servon, kiun plenumi spite al ĉiuj miaj penoj kaj preĝoj kaj oferoj, la dio de la blankuloj estis tro malforta. Kaj tial la minejo apartenu al vi. Sekvu mian vo-

jon, kiun mi diros al vi, post kiam pasos tri monatoj kaj parolu al neniu pri tio, kion vi scias, kaj mi faros el vi la plej riĉan viron en la tuta Nova Hispanio.“

„La indiĝenoj ne scias multe pli pri minoj ol ni mem“, diris Howard, kiam li plektis plu la fadenon de sia historio. „Ili iam tre precize konis ĉiujn kaŝitajn minojn, kiujn post la konkero de Meksiko indiĝenoj ŝutkovris kaj faris netroveblaj por venĝi sin pri la kruelaĵoj, kiujn oni iam krimis al ili. Sed la indiĝenoj ja ne restadis tie, kie ili loĝis kaj vivis dum la konkerista tempo. Miloj da ili de la hispanoj estis fortrenitaj al aliaj distriktoj kiel laboristoj kaj sklavo, aliaj estis forpelitaj pro ribeloj kaj bataloj de siaj loĝlokoj en montarojn kaj ĝangalojn, aliaj estis ekstermitaj de varioloj kaj de aliaj epidemioj, kiujn la blankaj kulturportintoj kaŭzis sur la kontinento. Tribestraj familoj formortis aŭ estis mortigitaj antaŭ ol ili povis pludoni sian scion al siaj posteuloj. Tial fariĝas pli kaj pli malofte, ke indiĝeno konas ŝutkovritan minon. Ofte li nur supozas koni iun, ĉar tio, kio en lia familio estas konata pri tiu aŭ tiu mino, fariĝis tiel legendeca, tiel kunligita kun trovitaj kaj konataj minoj, ke la ĝusta loko ne troveblas, des pli, ĉar la loko estis difinita per vortoj kaj signoj kaj direktiloj, kiuj en la lingvouzo ŝanĝiĝis dum la kuro de la tempo kaj tial devas konduki al misvojoj. Sed tiu historio okazis ja en longe pasinta tempo, kiam la memorkapablo de la indiĝenoj estis ankoraŭ pli freŝa, ĉar ĝi ankoraŭ ne estis influata de la homa trafiko tiel, kiel tio estas, de kiam fervojoj ekzistas kaj la indiĝenoj sin multe pli

ofte kaj pli rapide disiĝas ol pli frue, ĉar ankaŭ ili translokiĝas tien, kie ili trovos siajn vivrimedojn pli facile ol en sia naskiĝloko.

Fininte siajn negocojn en Meksiko, *don* Manuel komencis kun sia edzino Maria la longan kaj streĉan vojaĝon al Huacal. Li trovis la tribestron kaj estis akceptata de li pli bone ol frato. ‚En la vojaĝo mi ekhavis la ideon‘, diris *don* Manuel al sia gastiganto, ‚ke estas sufiĉe strange, kial vi ne ekspluatas mem la minon, Aguila? Vi ja estus povinta doni al mi cent mil oroguldenojn, kaj mi farus tion, kion vi postulus de mi.‘ La tribestro ridis: ‚Mi ne bezonas oron kaj mi ne bezonas arĝenton. Mi havas manĝon kaj bonan edzinon kaj belan filon, kiun mi amas kaj kiu estas forta kaj kun plaĉa staturo. Kion oro donus al mi? La tero benignas, riĉe benignas, la fruktoj donas benon, riĉan benon, miaj brutaroj donas benon, riĉan benon. Oro ne donas benon kaj arĝento ne donas benon. Ĉu ĝi donas benon al vi, al la blankaj hispanoj? Vi murdas vin reciproke pro la oro. Vi malamas vin reciproke pro la oro. Vi fuŝigas la belecon de via vivo pro la oro. Ni neniam faris la oron nia mastro. Ni neniam estis ties sklavoj. Ni diras, ke oro estas bela, kaj tial ni faras ringojn el ĝi kaj aliajn ornamaĵojn, kaj ni ornamas nin, niajn edzinojn kaj niajn diojn per ĝi, ĉar tio estas bela. Sed ni ne faras monon el ĝi. Ni povis rigardi ĝin kaj ĝojigi nin per ĝi, sed ni ne povis manĝi ĝin. Nia popolo kaj ankaŭ la popoloj en la valo neniam batalis pro oro au militis pro oro. Sed ni multe batalis pri la grundo, pri agroj, pri riveroj kaj lagoj, pri urboj, pri salo, pri brutaroj. Sed ĉu pri oro aŭ pri arĝento? Ĝi estas ja nur plaĉe rigardebla. Sed, se mi havas

malsaton, mi ne povas meti ĝin en mian stomakon, kaj sekve tion ĝi ja ne havas valoron. Ĝi estas nur bela kiel floro, kiu floras, aŭ bela kiel birdo, kiu kantas. Sed, se vi metas la floron en la stomakon, ĝi ne estas plu bela, kaj se vi kuiras la birdon, ĝi ne plu kantas.' Tiumomente *don* Manuel ridis kaj diris: 'Mi ne metos la oron en mian stomakon, Aguila! Fidu tion.' Kaj ankaŭ la tribestro ridis kaj diris: 'Certe ne. Mi ja povas servi al la tero, sed mi ne povas servi por oro, ĉar alie mi ne havus ion po manĝi. Neniujn tortiljojn kaj nenujn *camotes*, batatojn. Vi ne komprenas tion, kion diras mi, kaj mi ne komprenas, kion diras vi. Vi havas alian koron. Sed mi estas tamen via amiko.'

Ili bezonis tri tagojn, dum kiuj ili rampadis en la montoj kaj serĉis, skrapis kaj fosis en la vepro. *Don* Manuel miskomprenis la longan serĉadon kaj supozis, ke la indiĝeno tromp-is lin pri la pago. Sed kiam li tiam vidis, kiel lerte kaj laŭplane la tribestro rastis la terenon, kiel precize li atentis la situon de la suno kaj sur la ombrojn ĵetitajn de la montopintoj, li tamen devis agnoski, ke estas postsekvata certa vojo. 'Tute tiel simpla, kiel vi eble pensas, tio ne estas', diris la tribestro. 'Tie estis tertremoj kaj kelkaj jarcentoj da pluvotempoj kaj nubaj elverŝigoj kaj terglitadoj, riveroj ŝanĝis sian vojon, riveretoj elsekigiĝis kaj ekestis novaj. Tie arbetoj grandiĝis kaj grandaj arboj, kiuj iam estis celoj, mortis. Eble povas daŭri ankoraŭ semajnon, *don* Manuel, vi devas havi paciencon.'

Daŭris eĉ pli ol semajnon. Kaj la tribestro diris vespere: 'Morgaŭ mi povos doni al vi la minon, morgaŭ mi vidos ĝin

per miaj okuloj.‘ *Don Manuel* volis scii, kial li ne tuj rajtis vojaĝi kun la tribestro, kiam tiu iris hejmen. ,Tiukaze ni tamen devus atendi ĝis morgaŭ, ĉar la suno ankoraŭ ne troviĝis en la celo. Nun ĝi staras en la celo. Mi ankaŭ scias jam kelkajn tagojn, kie la loko troviĝas, sed morgaŭ mi havos la minon kaj povos doni ĝin al vi.‘

Efektive, je la sekva tago ili trovis la minon en ravino. ,Tie iam derompigis montoparto. Tion vi ankaŭ povas rigardi. Tial estis tiel komplike trovi la lokon. Jen la mino, kaj ĝi estas nun vere via. Sed mian domon vi devus hodiaŭ forlasi‘, diris la tribestro. ,Kial? Mi ankaŭ sen via rimarko forlasus ĝin, ĉar mi volas konstrui la domon proksime de la mino.‘ ,Jes, mia domo nun ne plu estas taŭga. Vi havas la riĉan minon kaj ne alportos benon.‘ La tribestro volis adiaŭi lin per manpremo, sed *don Manuel* diris: ,Atendu, Aguila. Mi ankoraŭ volas meti demandon al vi. Se mi estus postulinta de vi cent mil orguldenojn, por ke mi sanigu vian filon, ĉu vi tiukaze estus malferminta la minon mem?‘ ,Certe mi estus farinta tion‘, diris la demandito,‘mi ja volis vidi mian infanon sanigita. Sed se mi estus ekhavinta la sumon, mi tuj estus ŝutkovrinta ĝin denove, ĉar oro ne estas bona. Kion mi povus fari alian? La hispanoj ekscius tion, kaj ili min, mian edzinon kaj mian filon, murdus por ricevi la minon. Laŭ via moro oni ja pro oro ĉiam murdas. Estu atentema, *don Manuel*, ke ne estos murdita ankaŭ vi, se viaj konatoj ekscios, ke vi havas orominon. Se ili scias, ke vi havas nenion krom pano kaj tortiljoj, neniam iu murdus vin. Mi volas ĉiam esti via amiko, sed ni nun devus adiaŭi nin.‘

Don Manuel komencis starigi sian kampadejon kaj *Aguila* reiris al sia domo, kiu malproksimis tagvojaĝon de la mino. Antaŭ sia ekveturo *don Manuel* havigis al si la oficialajn certigitajn atestojn de la registaro, kiuj pravigis lin serĉi multekostajn metalojn, kaj okupi la lokojn, se li trovas iujn, laŭ sia minorajto. Li revojaĝis en la plej proksiman urbon, kie li estis postlasinta sian edzinon, kunvenigis sian edzinon kaj samtempe varbis laboristojn kaj aĉetis la necesajn maŝinojn, laborilojn kaj eksplodilojn. Poste li komencis elfosi la minon. La trovoj superis liajn plej aŭdacajn atendojn. La mino estis tiel riĉa pri arĝento, ke ĝi superis ĉiujn aliajn konatajn minojn. Ĝi donis kiel esencan produkton arĝenton, sed kiel kromprodukto ankaŭ troviĝis oro.

Multaj okazaĵoj instruis lin, ke estas plej bone, se oni ne tro multe parolas pri la mino, se oni ne tro gloras ĝin. Ne nur privataj personoj, sed eĉ la reĝaj oficistoj kaj la altranguloj de la eklezio pli ol nur majstre sciis kiel forludi la minon el la manoj de viro, kiu ne havas sufiĉe da potenco. La posedanto subite malaperus, neniu sciis, kie li restadus kaj la mino estus transdonita kiel senposedanta havaĵo aŭ al la reĝo aŭ al la eklezio. La inkvizicio, kiu en Meksiko multe pli longe ekzercis sian teruran potencon ol ie aliloke surtere, kaj kiu nur tiam fine tie foriĝis, kiam venkis la revolucio kaj la lando fariĝis libera kaj sendependa respubliko, efikis en tiu tempo ankoraŭ per nebrensitaj fortoj. Sufiĉis, ke episkopo atingis informon pri riĉa mino, kaj la trovinto kaj posedanto de tiu mino estis trenita pro blasfemio, herezo, nigra magio aŭ manko de respekto kontraŭ la mirakla efiko

de gracobildo antaŭ la tribunalon de la inkvizicio. Tiun tribunalon tre timis eĉ la plej forta viro en la lando, la vicreĝo. Se li estis asignita antaŭ la tribunalon, li renkontis ĝin nur akompanata de korpogardaro grave armita kaj kun la anconco, ke liaj trupoj kaj la artilerio havas la ordonon sen pardono pafi al la konstruaĵo de la Sankta Inkvizicio, se li ne estos interne de mallonga tempo denove en sia palaco kaj ne montros sin al siaj soldatoj. Kion en tiu kazo povus fari simpla privatulo? Dek aŭ dudek atestantoj prezentiĝus, kiuj ĵurus, ke ili vidis, ke la viro ne surgenuis antaŭ la monstranco, aŭ ke ili laŭdire aŭskultis, ke li diris, ke estas malfacile kredi, ke la filo povas esti samtempe sia propra patro, aŭ, ke la papo ne povas erari. Kaj se oni ĵurus tion, oni bruligus la deliktinton, kaj li devus rigardi tion speciala graco, se oni ne bruligus lin vivanta, sed se oni nur strangolus lin antaŭ la ekbruligo. Kia ajn puno estus verdiktita, en ĉiu kazo oni ĵurus antaŭe, ke li estas kulpa, kaj tiel lia tuta posedaĵo transirus al la eklezio. Tial ne estis tre strange, ke tiuj homoj, kiuj posedis riĉan posedon aŭ rifuzis libervole doni al la eklezio kaj al la monaĥejoj la grundon aŭ la minon, kiun oni avidis, multe pli rapide estis verdiktitaj pri herezo kaj kulpigitaj ol povraj indiĝenoj, kiujn traktis la inkvizicio multe pli milde; ĉar ne estus iu, kiu pagus por la povraj indiĝenoj la grandajn kostojn de la komplika ekzamenado. La kostoj por la tribunalo ja estis karaj. Neniam iu faris ion por nenio, kiel pruvas tion la procesaktuoj. La atestantoj estis la plej lastaj, kiuj farus tion malkara, pro konsidero de la sankta celo. La potenco de ĉiu religio estas limigita. Neniu religio povas tuŝi tiajn limojn aŭ eĉ provi transpaŝi ilin sen formorti. Religio, kiu fariĝis tro rigida, religio, kiu tro perdis

sian flekseblecon, formortas, ĉar ĝi ne plu povas integriĝi en la evoluon kaj la tempon. Ne povas esti ĝiseterne entreprenataj sen puno militoj de popoloj, kies religio ne permesas al ili elingigi la glavojn, kaj kies religio ordonas al ili ne mortigi.

Don Manuel estis ruza, danke al la riĉaj spertoj, kiujn faris aliaj. Li forsendis nek arĝenton nek oron. Li suramasigis ĝin kaj atendis sian tagon. Kvankam la mino ebligis tre riĉigajn enspezojn al li, li traktis siajn indiĝenajn laboristojn sufiĉe mizere. Li pagis eĉ ne tiom da salajro, ke ili satiĝis. Li laborigis ilin ĝis renversiĝo, aŭ ĝis kiam ili eĉ formortis, kaj se ili ne laboradis sufiĉe, li eĉ ordonis vigligi ilin per skurĝoj. Per negroj oni tiel povis mastrumi ion tian dum longa tempo, sed ne per indiĝenoj. Dum la tricent jaroj de la hispana regado en Meksiko la hispanoj neniam kaj je neniu tempo havis la tutan landon en nekontestata posedo. Ie dum la tuta tempo ĉiam estis tumulto, insurekcio aŭ ribelo. Kaj kiam ribelo je iu loko brutale estis subigita sen respekto al homoj, ĝi ie aliloke komenciĝis denove. Estis ĉiam tiel kaj ĝenerale kaj detale. Kaj iutage estis la ribelo en la mino de *don Manuel*. Lia edzino, *doña* Maria, ankoraŭ sufiĉe frue povis fuĝi. Sed lin oni mortbatis. Liaj trezoroj ne estis rabitaj, sed, post la morto de *don Manuel*, forlasis la indiĝenaj laboristoj la lokon kaj reiris en siajn vilaĝojn.

Kiam *doña* Maria pere de heroldoj eksciis, ke la mino denove estas sekura, ŝi revenis por daŭrigi la laboron. Ŝi trovis la ekspluatitajn trezorojn lerte kaj sekure enfositaj. Kion ŝi posedis, sufiĉus por vivi vivon sen zorgoj ĝis ŝia fino.

Sed en ŝia kapo obstine fiksiĝis la penso reiri al Hispanio por tie prezentiĝi, kiel la plej riĉa sinjorino. Ĉar ŝi ankoraŭ estis juna, kaj ankaŭ ricevis sufiĉe da belo por sia vivovojo, ŝi nutris la esperon aĉeti en Hispanio kastelon kaj nobelan bienon kaj proksimiĝi per edziniĝo kun markizo al la kortego. Ekzistis ja elstaruloj de la alta hispana nobelaro, kiuj edzinigis nur pro ties riĉo indiĝenajn princofilinojn aztekajn, tezkukajn kaj aliajn el Meksiko kaj de Peruo. Kial, ŝi, kiu devenis el honorinda civitana familio, ne ricevu ankoraŭ multe pli facile markizon kiel edzon kun la helpo de sia ne-mezureble granda posedo?

Ŝi kapablis bone kalkuli, eble eĉ pli bone ol ŝia mortbatita edzo. Ŝi elkalkulis, kiom kostus kastelo kaj kiom kostus malnova nobela bieno en Hispanio, kiom la mastrumado de tiu posedo kostus, la servistaro, ĉaroj, ĉevaloj kaj vojaĝoj, kiom la markizo bezonus, kaj kiom ŝi mem ĉiutage devus eldoni por povi ludi brilan rolon je la kortego. Ŝi kunkalkulis konsiderindan sumon. Sed ĉiam ŝi supozis, ke ankoraŭ estas multe da aferoj, kiujn ŝi ne pripensis, ke tie estas ankoraŭ impostoj al la registaro, ke ŝi devos konstrui preĝejon por teni la altajn sinjorojn de la inkvizicio en favora humoro kaj por ne vekti voluptavidajn sentojn de ili. Kaj tiam ŝi ankoraŭ laboris tiom longan tempon, ĝis kiam duobligis la kunkalkulita sumo. Per tio ŝi estis sekurigita kontraŭ ĉiuj miskalkuloj. Estis efektive streĉegaj jaroj, dum kiuj ŝi devis batali. Malproksime de la civilizacio, for de ĉiu eĉ plej eta komforto, tage kaj nokte atenteme, lerte traktante la laboristojn, por ke ilia salajro ne estu tro alta, sed ke ĝi estu tamen sufiĉe alta, por ke ili eltenu ĉion kaj ne ribelu. Tiukaze oni devis

pensi ankaŭ pri rabatakoj, pri banditogregoj, kiuj formiĝis el krimuloj, el dezertintaj soldatoj kaj el forkurintaj punkaptitoj, el la elkraĉaĵo de la urboj kaj kiuj marodante vagadis tra la lando, disvastigante simile grandan teruron ĉe indiĝenoj kaj ĉe blankuloj.“

16

Eĉ palvizaĝa enviulo devus lasi al *doña* Maria, ke ŝi montris sin pli kapabla pri la multnombraj taskoj ol ŝia eksedzo. Ŝi timis nek la morton nek la diablon nek marodantajn banditajn nek ribelantajn indiĝenojn, kaj ŝi certe ankaŭ iel estus aranĝinta kun la inkvizicio, se tiu defio estus metita al ŝi. Ŝi estis korpe forta, eltenema kaj entreprenema; sed, se ŝi ne atingis la celon tiel, ŝi gajnis la ludon des pli certe per siaj diplomataj kapabloj. Ŝi povis ridi, se tio ŝajnis necesa, ŝi povis larmi, se ŝi trovis tion pli taŭga. Ŝi povis sakri kiel stratrabisto kaj ŝi povis preĝi pli insiste ol franciskana monaĥo. Ŝi povis labori kiel ses indiĝenoj, kaj se io ne okazis tiel, kiel ŝi deziris, ŝi decidite eklaboris permane mem, kaj la indiĝenoj ne kutimiĝintaj vidi damon, kiu faras ŝajne tiel facile tian streĉan laboron, kaptiĝis en speco de anatemo kaj devis fari tion, kion *doña* Maria postulis de ili. Tio deruliĝis tiel dum jaroj. Fine ŝi tamen ricevis tiel grandan sopiron pri Hispanio, pri pura domo, pri bona kuirejo, pri mola dormejo kaj pri vira partnero, kiun ŝi povas karesi kaj droloti, ke ŝi iutage decidis kunpaki kaj ekvojaĝi. Kiam ŝi taksis sian posedon, ŝi trovis, ke ĝi devus sufiĉi por ĉiu ajn pensbla lukso.

Ŝi formis armitan protektotrupon, kiu servis por gardi kaj defendi la minon kaj la akumulitajn trezorojn. La trupo konsistis el indiĝenoj, kelkaj mestizoj kaj du hispanaj soldatoj, kiuj estis dizertintaj aŭ maldungitaj. Iun el tiuj du hispanoj ŝi faris la gvidisto por la helaj tagoj kaj la alian gvidisto por la noktoj.

La valormetalojn, de kiuj konsistis sesono el oro, kaj ĉio cetera el pura arĝento, ŝi gisigis en ingotojn, por ke ili estu pli facile transporteblaj. Tiujn brikojn oni sekure pakis en kestojn. Kiom granda estis la riĉo, kiun ŝi kunskrapadis el la mino, ekkoneblas je tio, ke necesis sesdek muloj, ĉiu el ili ŝarĝita ĝis la limo de sia transportkapablo, por fortransporti la valormetalojn.

La karavano kun siaj dudek armitaj akompanantoj forvojaĝis, por vojaĝo du mil kilometrojn longa ĝis la ĉefurbo de Meksiko, sur neniel laŭorda strato, trans dezertajn areojn, trans krutajn montarojn, tra riveroj, tra ravinoj kaj rokfendegoj, tra praa vepro kaj praarbaro, tra ĝangalaj regionoj, dum kelkaj tagoj en la glacie fridaj ventoj de la *Sierra*, poste en la ardanta varmego de la tropikaj regionoj, kaj poste trans neĝkovritajn montarajn partojn, kaj tra ĝangalaj pejzaĝoj saturitaj de febro.

Kaj poste venis vespero, kiam la kampadejo ŝajnis al ŝi strange movata. Ŝi rigardis pli proksime kaj trovis, ke unu el la hispanoj provis ŝanĝi la aferojn je sia favoro. Li venis al ŝi kaj demandis: ‚Ĉu vi volas edzigi min, ĉu ne, *doña* Maria?‘ ‚Mi, vin? Tian stratrabiston, ĉu? Iun, kiu falis malsupren de la pendumilo, ĉar la ekzekutisto uzis ŝnuron

kadukan anstataŭ bonkvalite novan?‘ La ulo respondis: ‚Mi prenos ĝin ankaŭ tute volonte sen vi, *señora*. Mi edzinigos eĉ pli lindan.‘ ‚Kion vi prenos sen mi?‘ demandis *doña* Maria. ‚Tion, kio tie estas en la kestoj.‘ ‚Ne tiom longe, kiom ĉeestos mi, bastardo.‘ La viro levis la manon, montris transen, kie la homoj kampadis kaj diris kun rikano: ‚Tiukaze antaŭe foje rigardu tien, eble vi ja ankoraŭfoje pripensos tion rilate al la geedziĝo. Antaŭ ol horo estos pasinta, mi volonte atendos vian decidon.‘ ‚Tiukaze vi povus atendi eĉ dum via tuta plua vivo, se oni ne pendumos vin antaŭe.‘

Sed ŝi iris tamen transen al la homoj kaj trovis, ke la ulo faris sian laboron lerte. La alia hispano kaj la indiĝenoj estis firmligitaj, dume la mestizoj estis flanke de la ulo kaj intencis partopreni la negocon. Ili staris tie, kun pistoloj ĉe la zonoj kaj impertinente kaj rikanante rigardis la inon.

‚Lerta laboro, tion mi devas koncedi‘, opiniis *doña* Maria al la ulo, kiu sekvis ŝin.

‚Ĉu ne?‘ li respondis. ‚Tiukaze vi nun do ne plu longe hezitos pripensi la aferon kaj diros obeeme kaj laŭorde, ke jes‘, li aldonis.

‚Ne, vi tute pravas, bastardo, tiukaze mi ne longe plu pripensos la aferon‘, ŝi diris. Samtempe ŝi kaptis de unu el la seloj kuŝantaj surtere skurĝon, kaj antaŭ ol la viro eĉ nur ekvidis, kio okazas, ŝi jam knaligis senkompatan baton transverse de lia vizaĝo, kiu blindigis liajn okulojn. Li ŝanceliĝis kaj ŝi sekvigis fulmrapide ses pliajn tiajn batojn transverse de lia vizaĝo. Poste li renversiĝis kaj ne moviĝis

plu. Sed ŝi nur komencis la lecionon. La mestizoj estis tiom mirigitaj pri tio, kion ili vidis, ke ili pensis nek pri forkurado, nek pri pafado. Kaj kiam ili fine konsciiĝis, kio okazis al ilia gvidanto, jam zigzagadis la fulmaj skurĝobatoj sur iliaj vizaĝoj. Tiuj, kiuj ne falis, komencis forkuri, per brakoj protektante siajn vizaĝojn. *Doña* Maria saltis al la alia hispano kaj malfermtranĉis per hastaj movoj la ŝnurojn, per kiuj li estis firmligita. Tiu tuj liberigis la indiĝenojn, kaj ili estis rapide sur la ĉevaloj kaj kaptis la mestizojn per lazoj.

„Pendumu la bastardon“, vokis *doña* Maria kaj montris al la hispano, kiu havis la intencon edzinigi ŝin, kaj kiu pene komencis leviĝi de la tero. Duonon de minuto poste li jam pendis je ŝnuro. „Kion mi diris al vi, hundo?“ ŝi vokis al li, kiam la indiĝenoj tiris lin supren. „Mi ja diris al vi, ke vi estos pendumita antaŭe. Kaj kio pri vi?“, ŝi diris nun turnante sin al la mestizoj. „Vin mi same devus pendumigi. Sed mi ankoraŭ lasos truon malfermitan por vi. Vi ja tamen ĉiuj kuros en la maŝon de la ekzekutisto, kaj mi ne volas fuŝi la negon al li. Sed tion mi diras al vi, se vi tion provos ankoraŭfoje, mi skurĝos vin persone ĝis la haŭtpecoj pendos de viaj skeletoj. Tiam mi ordonos, ke oni vin rostu kaj poste pendumu. Vi ne devos restadi ĉe mi, vi povas foriri tuj. Mi ne bezonas vin. Salajron vi ne ricevos kaj la pistolojn mi deprenos de vi. Sed, se vi vere volas restadi kun mi, mi donacos al vi la pistolojn en Meksiko, la selojn kaj la ĉevalojn, kiujn vi rajdas. Aŭskultu foje, hispano.“ Ŝi iris nun al la viro, kiu estis ŝia partiano. „Kiel vi nomiĝas? Jes, Rūgo. Se ni estos en Meksiko, vi ricevos“ – ŝi volis diri „la tutan mulon“, sed ŝi pripensis tion ankoraŭ ĝustatempe – kaj diris: „Tiukaze vi ricevos la dekstran flankŝarĝon de la mulo tie transe, kaj la

indiĝenoj ricevos la duonon de la ŝarĝo sur la maldekstra flanko, tiun ili povos dividi inter si.’ Per tio finiĝis la ribelo.

Sed tie estis ankoraŭ la marodantaj banditogregoj, kun kiuj oni devis luktadi, kaj kontraŭ kiuj ŝi devis defendi la frajton je sango kaj vivo. Tiuj gregoj ne interesiĝis pri sango kaj vivo, ili batalis ĝis la lasta sangoguto, ĉar ili ĉiam povis nur gajni. Kaj pri la vivo, kiun ili riske enmetis kontraŭ tio, ili fajfis, ĉar pri tio ja jam delonge estis decidita definitive en juĝeja verdikto, ofte eĉ en pluraj.

Ankaŭ falis besto kun sia ŝarĝo en ravinon kaj la ŝarĝo savendis, alia besto sinkis kun sia riĉo en marĉon aŭ malaperis iu ĉe la transirado de rivero. Estas plu demando, ĉu estis pli facile ekspluati la trezorojn el la mino, aŭ ĉu estas pli facile sekure transporti la trezorojn ĝis Meksikurbo, sen tio, ke la vivo de *doña* Maria postrestus survoje.

Ŝi travivis dum la vojaĝo vere plendindan tempon, kaj se ŝi memoris pri la dura tempo de la multaj jaroj en la minejo, tiukaze tiu tempo ne estis malpli priplendinda. Neniam ŝi povis ĝoji pri sia vivo, de kiam ŝi estis la posedanto de la mino. Kaj ŝi ne memoris eĉ nur pri unu horo, kiam ŝi sentis sin tute sekura pri siaj vivo kaj trezoro. En vero, se ŝi pensis pri ĉio kaj rememoris ĉiujn tagojn, ŝi pasigis la plej kompaktindan vivon, kiu imageblas, vivo, multe pli mizera ol tiu de besto. Ĉiam en timo, ĉiam kun afliktoj. Inkuboj ĝenis ŝian dormon. Kaj ŝi trovis neniam ripozon pro la turmentoplenaj pensoj, kiuj pelis kaj persekutis ŝin dum tiuj tagoj. En la tuta mizero de sia malĝojiga estado, ŝi havis nur unu lumantan kaj radiantan bildon en la kapo: tiun momenton, kiam ŝi

transdonos sian trezoron en la sekurigan domon de la reĝa registaro en Meksiko.

Tiu momento, por kiu ŝi trasuferis tian tiel kompatindan vivon dum la lastaj jaroj, aperis. Ŝi atingis la urbon Meksiko sen perdi eĉ unu ingoton de sia valorplena havaĵo. La vicreĝo persone akceptis ŝin kaj ŝi estis alte honorata per tio, ke la vicreĝo interparolis kun ŝi dum longa tempo en privata aŭdienco. Ŝia ĝojo kaj dankemo kontraŭ la moŝta sinjoro apenaŭ plu havis iujn limojn, kiam li promesis al ŝi, ke li volas konservi la trezoron, kiun ŝi akiris post tiom streĉega kaj rezignoplena laboro, en la arkaĵoj, kiuj aliokaze servas nur por la konservado de la reĝa trezoro kaj de la ŝtatmono.

Tio estis multe pli ol *doña* Maria iam ajn esperis. Nenie en la tuta Nova Hispanio, eĉ ne en la katakomboj de la katedralo aŭ en monaĥejo ŝia trezoro estus tiel bone konservata kaj tiel bone protektata, kiel en la firmaj arkaĵoj de la registaro kaj sub la persona respondeco kaj garantio de la vicreĝo, de la plej alta potenco en la lando. Tie fine estis kuŝanta ŝia trezoro sekura kaj bone konservata, ĝis kiam ĝi estos transportita kun arma eskorto al la ŝipo kaj tiam ŝi povos preni ĝin kun si al la lando de sia sopiro. Ŝi promesis al la vicreĝo por lia favorplena prizorgado, kiun Lia Moŝto ekzercis al ŝi, parton de sia trezoro, kiu estis sufiĉe granda, por ke eĉ vicreĝo en Nova Hispanio povis nomi ĝin princa rekompenco.

Post tio ŝi pagis la salajrojn al siaj dungitoj kaj adiaŭis ilin. Poste ŝi iris en la gastejon, kie ŝi loĝis, la plej bonan gastejon, kiun havis la urbo.

Kaj tiam, fine, post tiom da jaroj, ŝi povis trankvile enlitiĝi por dormi. Je la unua fojo dum jaroj ŝi povis trankvile spiri, trankvile kaj malstreĉite manĝi sen ĝeno. Fine ŝi rajtis havi ankaŭ aliajn kaj pli belajn pensojn ol ŝi devis turnadi en sia cerbo en ĉiuj ĉi lastaj jaroj.

Sed tiam okazis io, kion ŝi ne atendis, kvankam tio neniel estis stranga, sed tute natura. La trezoro ne perdiĝis, kaj ankaŭ ne estis ŝtelita el la arkaĵoj en nokto kaj nebulo. Sed io alia perdiĝis. *Doñja* Maria en la gastejo sternis sin por domi, bone protektata en mola belega lito. Sed neniu vidis ŝin denove leviĝi. Neniu iam ajn denove vidis ion de *doñja* Maria. Neniu denove ion aŭdis pri ŝi. Ŝi perdiĝis kaj neniu homo povis diri, kie ŝi postrestis.

„Nu, tio estas ja tute simpla“, Howard finis sian rakonton, „*doñja* Maria forĝesis nur, ke oro kelkfoje faras homon ankaŭ nevidebla. Cetere mi rakontis al vi la historion nur tial, por montri al vi, ke la transporto havas tiom da komplikajojn, kiom la serĉado kaj la fosado. Kaj eĉ, se oni supozas havi ĉion perfekte sekurigita, ankoraŭ ne estas decidita, ĉu oni povos aĉeti al si almenaŭ tason da kafo de ĝi. Ĉio ĉi estas ja la kaŭzo, kial oro estas tiom multekosta.“

„Ĉu rilate tion ne estas la eblo“, diris Kurtin, „ke oni povus eltrovi, kie la mino estas? La ino ja ne ĉion ekspluatis, ŝi postlasis sufiĉe da valorajoj.“

„La minon vi povas trovi tre facile“, rediris Howard, “sed vi alvenus tien tro malfrue. Ĝi estas ekspluatata de granda minasocio, kaj la asocio jam enspezis dekoble pli ol ĝi enspezigis al la perdita *señora*. La mino efektive ŝajnas neelĉerpebla. Vi povas trovi ĝin tute facile, ĝi nomiĝas ‚*Doñja Maria-mino*‘. Kaj ĝi troviĝas proksime de Huacal. Vi povus labori tie por semajna salajro, se tio plaĉas al vi.“

La viroj sidadis ankoraŭ dum kelke da tempo ĉirkaŭ la lante estingiĝanta bivakfajro, kaj tiam ili ekstaris. Ili etendiĝis, tretadis piede sur la teron kaj volis iri transen al la tendo.

„La historio estas jam pli malnova ol cent jarojn“, diris tiu momente Lacaud.

„Tion ja neniu kontestis“, diris Dobbs.

„Sed mi konas rakonton, kiu aĝas nur du jarojn, kaj kiu estas simile tiel bona aŭ eĉ pli bona.“

„Aĥ, fermtenu vian fibuŝon“, diris Dobbs oscedante, „ni ne volas aŭdi vian rakonton, eĉ se ĝi estus aĝa nur semajnon. Vian historion ni jam konas, tiu interesas nin tiom malmulte, kiom vi mem. Kaj se vi diras nenion, jen tio estas la plej agrabla al ni. Vi estas ja eternulo.“

„Mi estas kio?“ demandis Lacaud.

„Neniulo“, diris Dobbs kaj nun ankaŭ li trotis post la du antaŭirintoj al la tendo transen.

Je la sekva mateno, je la antaŭlasta, kiun ili intencis pasigi tie, la triopo estis tiel ekscitita, ke ili apenaŭ trovis la trankvilon por matenmanĝi. Ili rampis en siajn sekretajn kaŝejojn kaj ĉiu elprenis sian orokvanteton de la akirita laboro. Estis grajnetoj, sablo kaj polvo, atenteme entorditaj en malnovajn tendotolaĵojn kaj firmŝnuritaj per fadeno. Ĉiu posedis sufiĉe belaspektan kvanteton da tiaj saketoj. La tasko tiam estis enpaki tiujn saketojn bone kaj ne frapante atenton. Ili metis ilin en elsekigitajn sovaĝbestajn haŭtojn, kaj tiel do ekestis firme ŝnuritaj pakaĵoj, kiuj efektive faris la impreson, kvazaŭ ili estus pakaĵoj, kiuj konsistas nur el sekaj feloj. Tiuj pakaĵoj poste venis en sakojn, kaj la ŝarĝo estis preta.

Dobbs kaj Kurtin poste iris ĉasi por ankoraŭ ricevi pecon da sovaĝbesta viando por la vojaĝo. Howard ĉarpentis portoselojn por la azenoj kaj riparis la rimenojn kaj la tolaĵojn, por ke ili ne estu retenitaj dum la vojaĝo per rompiĝoj de la pakaĵoj. Lacaud denove iris sian propran vojon kaj serĉadis en la vepro proksime de la paŝteja areo. Sed li ne diris, kion li serĉis, kaj de la triopo neniu demandis lin. Ili rigardis lian konduton nek per la gesto de kompato nek per moko. Kompato estis fremda al ili, kaj por rikane moki lin, ili ne sentis sin sufiĉe interesitaj. Estis tute indiferente al ili, kion la viro faras, tiom longe, kiom li ne malhelpos ilin. Eĉ, se li estus trovinta monton el pura oro, ili ankoraŭ tre dubus, ĉu ili transŝovus sian planon sekvamatene ekvojaĝi eĉ nur je tago. Ili tiel firmkroĉiĝis je la tujekveturo, ke nenio povus reteni ilin. Ili estis per unu fojo tiom sataj pri la soleco, la laboraĉado kaj la tre streĉa vivmaniero, ke Lacaud povus diri nenion al ili, kio povus instigi ilin restadi tie eĉ nur tagon

pli. Ilia humuro estis tiel, ke ili estus traktintaj tiun Lacaud per pugnoj ĝis li preskaŭ mortus, eĉ se li estus provinta prisvati ilin restadi tie nur plian semajnon, ĉar li estas sur la spuro de granda afero. Kiam Howard preterire diris, ke Lacaud ŝajne precize scias, kion li volas, ĉar li ne agas tute tiel reveme kiel eternulo, diris Kurtin: „Min nenio plu povas tenti. Li povus porti al mi pecon tiom grandan, kiom mia pugno. Kaj mi eĉ ne volus havi ĝin.“

„Ne havi, ĉu? Kial ne?“ diris Dobbs. „Havi jes, sed kiel forporti ĝin? Ni apenaŭ povos porti hejmen tion, kion ni jam havas. Mi ne plu volas havi ion, aŭ li devus ĝin transporti por mi al Durango. Do, nun ĉesu paroli pri tio.“

Ĉivespere ili sidis sufiĉe silenteme je la bivakfajro. Ĉiu estis multe tro okupita pri siaj pensoj kaj planoj por rakonti ion aŭ por aŭskulti trankvile iun alian. Estis ankoraŭ malhele, kiam ili malkonstruis la tendon kaj survojiĝis.

„Ĉu vi restados plu ĉi tie?“, demandis Kurtin la viron Lacaud.

„Jes, mi ankoraŭ havas laboron ĉi tie“, li diris.

„Nu, multe da feliĉo, knabo. Eble ni havos pli poste iam la tempon aŭskulti vian belan rakonton“, opiniis Dobbs ridante. „Tiam vi eble prezentos ankaŭ pruvojn pri ĝi.“

Lacaud ŝovis la manojn en la poŝojn kaj respondis: „Pruvojn, ĉu? Pruvojn vi diras, ĉu? Tiujn mi nun jam povus meti. Sed vi ja ne havas tempon.“

„Tiun ni vere ne havas“, diris Dobbs, „tial ni nun devos foriri. Ni devos hasti por atingi sekuran terenon.“

Howard mansalutis Lacaudon kaj diris: „Mi postlasas al vi salon, pipron kaj ankoraŭ aliajn bagatelajojn, kiuj estus nur balasto por ni. Eble vi povos uzi ilin. Jen ankaŭ peco da tolaĵo por la tendo. Vi akceptu ĝin, ĝi estas taŭga kontraŭ pluvo en la nokto.“

„Dankon“, rediris Lacaud.

Ankaŭ Dobbs kaj Kurtin skuis manon de Lacaud. Dobbs donis al li tabakon kaj Kurtin manplenon da kartoĉoj. Nun, kiam ili adiaŭis, ili fariĝis subite amikoj. Kurtin havis ĝin jam sur la lango inviti lin kun ili retroiri, ĉar por li ja devus esti terure ĉi tie solece kaŭri en la vepro, kvankam eĉ ne estas plu espereto trovi ion, ĉar ili ĉi tie sufiĉe longe turnis ĉiun ŝtoneton kaj precize scias, kio troveblas, kaj kio ne troveblas. Sed li ne diris tion, nur: „*Good bye!* Adiaŭ!“

Howard havis similan tenton. Li volis peti lin kunveni. Kaj li konsideris doni al li okupon en sia kinejo, kiel filmrepresentadiston aŭ kiel domzorgiston. Sed ankaŭ li ne elparolis tion. Li etendis nur la salutmanon al li kaj diris: „*Good luck!*“ Bonŝancon!“

Kaj Dobbs pensis, ke viro plia, dum la vojaĝo ne povus esti damaĝo. Estus protekto plia kontraŭ banditoj, kaj se la frajto estus dividita je kvar viroj, ĝi ne aspektus tiom okulfrapa, sed li nur forte skuis lian dekstran manon kaj diris afable: „*So long*“ Ĝis do!“

Ankaŭ Lacaud diris al ĉiu kelkajn adiaŭajn vortojn, tiam li staradis certan tempon kaj postrigardis la aliajn. Kiam li ne plu povis vidi ilin, li turnis sin al la bivakfajro, pikante tretadis kun botela pinto en ĝin kaj diris laŭte: „Domaĝe.“

17

La vojaĝantoj devis iri vastan ĉirkaŭvojon kun siaj pripakitaj azenoj por eviti la vilaĝon, kiun Kurtin frekventis por aĉetoj, kaj por ne esti vidataj de la loĝantoj. Ili volis lasi la homojn de la vilaĝo en la supozo, ke Kurtin ankoraŭ estas tie supre. Kiam ili troviĝis malproksime de la vilaĝo, ili ankaŭ ne iris sur la vojoj, sed migris sur padoj, sur kiuj oni nur malofte renkontas iun. Ju pli ili malproksimis de la distrikto, des pli ili povis esperi, nerigardate atingi la urbon. Kiam ili estos jam en la urbo, ili kaj iliaj havaĵoj estos sekuraj. Tiukaze ili iros en hotelon, transpakos ĉion lerte kaj sidiĝos kun kofroj ne frapantaj la atenton en la trajnvagonon.

Ili havis apenaŭ plu monon en la poŝoj, nur kelkajn pesojn, kaj tiuj devis sufiĉi ĝis la urbo. Tie la azenoj, kaj ĉio, kion oni krome ne plu bezonos, vendeblos kaj tio tiam estos la veturmono. Sed unue oni devos atingi la urbon. Tio postulos tempon. La distanco ne estis tre granda. Sed la vojojn ili ne volis iri ankaŭ tial, ĉar ili tie pli ofte povus renkonti bandidojn aŭ federacian policon ol sur kaŝitaj padoj. Ju malpli da homoj ili renkontus des pli agrable estus.

Sed la padoj ne ĉiuj estis tiel, kiel ili dezirus tion. Ĉiuj padoj kondukis aŭ al vilaĝo aŭ al homa loĝejo. De tempo al tempo antaŭ ili aperis vilaĝo, kiam ili nek atendis nek deziris ĝin. Kaj se ili iam estis jam en viddistanco de vilaĝo, ili ne povis retroiri senprobleme. Tio suspektigis ilin.

Tiel ili alvenis je la dua tago en indiĝenan vilaĝon. Tio ne estis evitebla. Tre nekutime tio ja ne estas, ke azenkaravano moviĝas tra loko. Ke nur blankuloj kondukas tian karavanon, estas ja malofta afero, sed neniu cerbumas pri tio, ĉar la blankuloj de tempo al tempo ja havas sufiĉe strangajn ideojn.

Kiam ili nun estis meze de la loko, ili vidis stari antaŭ kabano kvar meksikanojn. Tri el ili havis kartoĉozonon kaj malantaŭe sur la kokso revolveron.

„Tio estas polico“, diris Dobbs al Howard, „nun ni estas en la kaĉo.“

„Ŝajne efektive estas polico“, objĉetis la oldulo.

Dobbs haltigis la azenojn, sed Howard puŝis lin kaj diris: „Nu, ne faru stultaĵojn. Se ni tiel subite haltos aŭ eĉ retroiros, tiukaze ni estos finitaj. Jen ili tuj rimarkus, ke io ne estas laŭorda pri ni. Nur tute trankvile antaŭen, kvazaŭ ni havus puran konsciencon. Tiun ni ja efektive havas. Mankas nur la tarifo kaj la ne havigita licenco.“

„Sed tio povus kosti al ni la tutan fatrason“, sakris Dobbs.

Intertempe ankaŭ Kurtin proksimiĝis.

„Kion volas tie la viro kun la okulvitroj?“ li demandis kaj kapsignis transen al la viro, kiu ne estis armita, kaj kiu staris ĉe la enirejo de la kabano kaj evidente interparolis kun la loĝantoj.

„Tio estas verŝajne registara komisaro“, diris Dobbs. „La ekzekutisto sciu, kio tie okazas. Ni iru tute trankvile plu.“

La meksikanoj ne rimarkis la alvenintojn. Nur kiam ili atingis la placon, kie la kabano staras, turnis sin unu el la policanoj al ili. Tiam li ŝajne diris ion al la aliaj. Kaj post tio ĉiuj turniĝis al ili kaj postrigardis la vojaĝantojn, kiuj iris sen hasto plu. Kiam ili preskaŭ jam transpasis la placon, subite iu el la viroj postvokis ilin. „*Hola, señores, un momento!*“

„Nun ni estas firmpinĉita“, diris Dobbs mallaŭte.

„Mi iros sola transen“, proponis Howard, „vi restados ĉi tie ĉe la azenoj. Mi volas aŭskulti, kion ili intencas fari.“

Howard iris transen. Kiam li staris antaŭ la viroj, li diris: „Bonan tagon, per kio ni povas servi al vi?“

„Ĉu vi venas de la montoj malsupren?“ demandis unu el la oficistoj.

„Jes, ni ĉasis.“

„Ĉu vi ĉiuj estas vakcinitaj?“ demandis la viro poste.

„Ĉu ni estas kio? Ĉu vakcinitaj?“ Howard parolis tion malŝargite, ĉar li tuj ekkonis, kion la viroj celas ĉi tie.

„Kompreneble, ni estas ĉiuj vakcinitaj. Jam kiel malgrandaj infanoj. Tio estas ĉe ni leĝa devo. Mi estas vakcinita certe jam dek fojojn en mia vivo.“

„Kiam je la lasta fojo?“

„Antaŭ du jaroj.“

„Ĉu vi havas la *certificado*-on, la oficialan ateston ĉe vi?“

Howard ridis: „Tion mi portas ja ne ĉiam en poŝo.“

„Kompreneble ne“, diris la viro. „Sed tiukaze mi nun devos vakcini vin ĉi tie. Ni estas la vakcinada komisiono, kaj ni devas vakcini ĉiun, kiun ni trafas ĉi tie en la vilaĝoj.“

La viro kun la okulvitroj iris en la kabanon kaj elvenis kun sia kuracista kesto. Li malfermis ĝin, Howard nudigis la brakon kaj la viro pikis lin per injektildadilo en la karnon. „Vi estas estas malpli komplikaj ol la homoj ĉi tie“, li diris ridante. „La homojn de ĉi tie ni devas embuski, ili kuras sur la montojn kaj en la vepron, ĉar ili supozas, ke ni volas detranĉi iliajn kapojn.“

„Jes“, opiniis unu el la policianoj, dum li elprenis libron, „ĉi tie vakcini la tutan loĝantaron kostas al ni pli da peno ol kapti banditogregon. Sed la epidemio tro disvastiĝus, se ni ĉi tie ne havigus ĉiujn por profilakta vakcinado. La infanoj estas la plej teruraj. La inoj kriadas, kvazaŭ ni volus murdi la infanojn kaj batalas kiel freneziĝintoj kun ni, se ni volas surmeti la injektildadilon. Jen, mia vizaĝo, tute vundgratita de la inaĉoj. Kaj jen mia kolego, li havas grandan tuberon

sur la kapo, kie la inaĉoj trafis lin per ŝtono. Ni estas jam kvar tagojn ĉi tie, ili ĉiuj kaŝiĝis ie. Kaj ni devas malsatigi ilin, ĝis kiam ili revenos. Iom post iom ili ja revenos, ĉar ili vidas, ke la infanoj jam vakcinitaj ankoraŭ vivas. Sed kiel ni klarigu al ili, ke ni laboras ĉi tie nur por la beno de la homoj kaj de iliaj infanoj?“

Dum tiu tempo li foliumis la libron kaj poste atingis la vakajn foliojn.

„Skribu ĉi tie sur ambaŭ flankoj vian nomon“, diris la oficisto.

Howard skribis kaj redonis la libron.

„Kiom da jaroj?“

La oficisto enskribis la aĝon, subskribis la folion, elŝiris duonon de la folio ĉe la laŭlonge truita linio kaj donis ĝin al Howard.

„Jen via atesto, la alian foliparton ni retenos en nia libro. Sendu ankaŭ viajn du kamaradojn ĉi tien. Ne damaĝos al ili. Eĉ, se ili estas jam dekfoje vakcinitaj.“

„Kion mi do pagu nun?“ demandis la oldulo. „Mono tre raras ĉe ni.“

„Por tio vi devas pagi nenion. Tio kostas nenion. Tion pagas la registaro.“

„Tio tiukaze estus ja sufiĉe malkare“, diris Howard ridante kaj rulis la manikon malsupren.

„Ni ja scias“, diris nun unu el la aliaj oficistoj, „ke vi ĉiuj estas vakcinitaj, aŭ ni almenaŭ supozas tion. Sed ni nun eĉ plej prefere vakcinos vin ĉi tie. Ni estas sufiĉe dankemaj, ke vi venis ĉi tien en la ĝusta tempo. La enloĝantoj vidas de sia kaŝejo ja ĉiun movon, kiun ni faras. Tial ni elektis ĝuste tiun kabanon. Ĝi staras plej libere. Se la homoj vidos, ke ni ne faras diferencon inter indiĝenoj kaj blankuloj, kaj ke vi ĉi tie prezentas viajn brakojn, kvazaŭ vi farus tion ĉiutage, la homoj ekfidus nin kaj vidos, ke ĝi ne kostos la vivon.“

Howard iris transen kaj sendis Dobbs kaj Kurtin al la vakcinado.

„Mi ne scius, kion mi farus pli prefere“, diris Kurtin ridante, „ĉiun momenton mi pensis, ke ili venos kaj stulte demandos nin.“

„Se plezurigos vin“, diris Howard, „jen vi povos rakonti al ili, kion vi faris dum la lastaj monatoj. Ili ne havas intereson pri viaj familaj aferoj. Ili estas la vakcinada komisiono, kaj ĉio, kio ne havas rilaton al la vakcinado, lasas ilin tute frida. Ili vakcinus eĉ persekutatan banditon ĝuste preterirantan kaj lasus forkuri lin poste. Ne apartenas al ilia negoco kapti banditojn.“

„Nu, nu“, interrompis Dobbs, „pli bone, se vi tenos fermita vian buŝon. Ni lasos vakcini nin, sed tiam ni tuj iru plu.“

„Ĉu mi eventuale diris, ke ni setlu ĉi tie?“

„Sed vi parolas ĝuste tiel, kvazaŭ ni falu al ili ĉirkaŭ la kolon“, diris Dobbs kaj trotis transen al la kabano.

Howard skuis la kapon, kun bedaŭranta gesto kaj turnis sin al Kurtin: „Dobbs estas sen humuro, kion mi asertis ĉiam. Mi falas ja pli prefere al vakcinada komisiono ĉirkaŭ la kolon ol en la manojn de polica taĉmento, kiu kontrolas minojn. Nun ekkuru do transen, Kurtin, kaj lasu doni la paperon al vi, por ke ni povu plu migri.“

Vespere ili kampadis proksime de la loketo Amapuli. Ili devis restadi tie, ĉar oni diris al ili, ke ili ne povos atingi la sekvan akvejon antaŭ la komenco de la nokto.

Dum ili ankoraŭ pretigis sian vespermanĝon, venis kvar indiĝenoj de la vilaĝo al ilia kampadejo. Ili salutis kaj tre ĝentile demandis, ĉu ili rajtas sidiĝi teren.

„*Como no?*“ diris Howard. „Kial ne? Vi tute ne ĝenas nin.“

La kvar indiĝenoj sidis dum certa tempo kaj observis kiel la fremduloj rostas sian viandon kaj kuiras sian rizon.

„Vi venas certe de malproksime“, diris fine unu el la indiĝenoj. „Kaj vi certe volas ankoraŭ plu vojaĝi malproksimen. Vi estas ja certe tre saĝaj viroj.“

Kurtin diris: „Ni povas legi librojn, kaj ni povas skribi leterojn kaj ni povas kalkuli per nombroj.“

„Per nombroj, ĉu?“ demandis unu el ili. „Nombroj, ĉu? Tion ni ne konas.“

„Dek estas nombro“, klarigis Kurtin, „kaj kvin estas nombro.“

„Ho“, opiniis nun unu el la vizitantoj, „tio estas nur la duono. Dek estas nenio, kaj kvin estas nenio. Vi opinias dek fingrojn aŭ kvin fabojn aŭ tri kokinojn, ĉu ne?“

„Tiel estas“, enmiksiĝis Howard.

La indiĝenoj ridis, ĉar ili komprenis tion. Kaj unu el ili diris: „Dek oni ne povas diri. Oni devas diri ĉiam kiom da? Dek birdoj aŭ dek arboj aŭ dek viroj. Se oni diras dek, tri, aŭ kvin, sen tio, ke oni diras, kion oni celas, tiukaze tio estus truo, kaj tio estus malplena.“

Tiam ili ridis denove. Post pli longa silento iu el ili diris: „Mia filo falis en la akvon. Ni tuj denove elteris lin. Sed mi ne pensas, ke li estas morta. Sed li ne rekonsciiĝas. Vi certe legis librojn kaj scias, kion oni do faru.“

Howard demandis: „Kiam via filo falis en la akvon? Ĉu hieraŭ?“

„Ne, hodiaŭ posttagmeze. Sed li ne vekiĝas.“

„Mi iros kun vi kaj rigardos vian filon“, diris Howard. „Mi rigardos, ĉu li estas morta.“

La viroj ekstaris kaj Howard iris kun ili. Ili venis en domon konstruitan el sekigitaj argilaj brikoj. Sur tablo kuŝis mato el plektitaj palmfolioj, *petate*. Kaj sur la petato kuŝis la akcidentulo.

Howard rigardis lin tre detale, levis la okulklapojn, metis la maldekstran orelon al ties brusto. Li palpadis la manojn kaj piedojn kaj diris: „Mi volas foje provi, ĉu li rekonsciiĝos.“

Li faris dum kvarono de horo movekzercojn spirigajn kun li. Poste li ordonis meti varmegajn humidajn kompresojn sur la korpon de la knabo, frotis la piedojn kaj manojn kaj, kiam li metis denove sian maldekstran orelon sur ties bruston, li trovis, ke lia koro komencas bati. Post horo la knabo spiris mem, kaj nur minutojn poste li malfermis la okulojn.

La viroj kaj inoj starantaj en la kabano, observis la agojn de la fremdulo sen diri ion. La du inoj, kiuj okupiĝis pri la varmigado de la kompresoj, interkomunikis nur per gestoj aŭ per mallaŭte flustrita vorto. Eĉ tiam, kiam la knabo tute vekiiĝis, la homoj ne kuraĝis paroli.

Howard prenis sian ĉapelon, surmetis ĝin kaj iris al la pordo. Neniu retenis lin kaj neniu diris ion. Nur la patro postsekvis lin, etendis manon kaj diris: „Mi tre dankas, sinjoro.“ Poste li reiris en sian domon.

Malheliĝis kaj Howard devis klopodi trovi la kampadejon. Sed la lumo de la bivakfajro montris al li fine la vojon.

„Kion vi do atingis?“ demandis Dobbs.

„Jen bagatelo“, diris Howard, „buŝ-al-buŝspirado“, kaj tiam li jam rekonsciiĝis. Li havis ĝuste nur ŝokon. Li certe post kelkaj horoj mem leviĝus sen helpo. Li glutis ne pli ol buŝplenon da akvo. „Ĉu vi ankoraŭ postlasis iom de la viando al mi?“

Antaŭ sunleviĝo ili jam denove marŝis survoje. Ili volis sufiĉe rapide atingi Tomini-on kaj provi tie trapasi la alte situantan montaron.

Post kiam ili finis sian tagmanĝon kaj pakis la azenojn kaj ĝuste komencis survoji la bestojn, diris Kurtin: „Kio tie okazas? Tio aspektas ja kvazaŭ iu persekutus nin.“

„Kie?“ demandis Dobbs. „Jes, nun mi vidas ilin, indiĝenojn sur ĉevaloj. Sed ili ja ne ĝuste nin devas persekuti. Ili ankaŭ povus troviĝi sur promena rajdo aŭ ili rajdas al foirplaco.“

Ne daŭris longan tempon, ĝis kiam la rajdistoj proksimiĝis. Ili ekkonis la kvar indiĝenojn, kiuj hieraŭ vespere vizitis ilin.

Kaj krome tie estis du pliaj viroj, kiujn Howard vidis en la domo.

La viroj salutis, kaj tiam diris unu el ili: „Sed, sinjoroj, kial vi forkuris de ni?“

Howard ridis kaj diris: „Ni ne forkuris, sed ni devas plu vojaĝi, ni devos atingi la urbon. Ni havas tie gravajn negocojn, kiuj postulas rapidecon.“

„Ho“, diris la indiĝeno, kies filo troviĝis antaŭe en vivdanĝero, „negocoj povas atendi, negocoj ne devas hasti. Est-as ankoraŭ pliaj tagoj, ne nur hodiaŭ kaj ne nur morgaŭ kaj ne nur postmorgaŭ. Sed unue mi ja devos inviti vin esti miaj gastoj. Mi ja ne povas permesi vian foriron. Vi redonis la vivon al mia filo. Tial vi devos esti mia gasto. Du semajnojn. Ho, tio estas tro malmulte. Vi devos esti dum ses semajnoj mia gasto. Mi havas terposedon. Mi havas multe da maizo. Mi havas bovinojn, mi havas multajn kaprinojn. Mi donos al vi ĉiutage bongustan rostitan meleagron kaj ovojn kaj lakton. Mia edzino faros al vi ĉiutage tamalojn.“

„Ni dankas al vi el nia tuta koro“, diris Howard. „Sed, kiam ni ne estos ĝustatempe en la urbo, ni perdos nian negocon.“

„Negocoj ne forkuras“, diris nun alia el la indiĝenoj. „Negocoj estas ledecaj kiel la viando de maljuna kaprino. Negocoj faras zorgojn. Kial vi zorgu pri io, se vi fartos tiel bone ĉe ni. Vi ne havos zorgojn, kaj ni havos ankaŭ muzikon kaj dancon.“

„Ne“, ni devos foriri, ni devos tute certe atingi la urbon“, diris Dobbs kaj li fariĝis iom ĉagrenita.

„Ni akceptis vian donacon“, diris nun la patro, „kaj nun vi devos akcepti ankaŭ nian donacon.“

Kiam la indiĝenoj ekkomprenis, ke estis pli komplike peti la fremdulojn kiel gastojn ol ili supozis, diris iu el ili: „La du pli junaj viroj trankvile ekiru, sed vi“, kaj li turnis sin al Howard, „vi ne foriru. La filo de mia frato certe mortus, se

ni ne petus vin sukcese fariĝi nia gasto. Ni devos pagi vian medicinon, ĉar vi estis tiel bonkora al la knabo.“

Kiom ajn ĉagrenitaj la tri vojaĝantoj estis, kiom ajn ili defendis sin, ili ne povis eskapi. Ili estis ĉirkaŭataj de la ses viroj kaj sub ties potenco.

Fine Dobbs ekhavis ideon. Li diris al Howard: „La stultecon, kiun ni faris hieraŭ, ne lasos nuligi sin. Ili estos kontentaj, se restados vi. Ili volas nur vin reteni ĉi tie. Ni iros plu, kaj vi povos pli poste sekvi nin. Tio estas la ununura elirvojo.“

„Vi povas facile paroli“, diris Howard, „sed kio fariĝos el mia pakaĵo?“

„Tiun vi retenos ĉe vi“, diris Kurtin.

Dobbs obĵetis: „Tion mi ne konsilus. Ili traserĉos vian havaĵon kaj forprenos ĝin de vi. Aŭ ili elbabilos tion, kaj ĝi publikiĝos. Kaj se ili ne mortbatos vin, aŭdos tion banditoj kaj embuskos vin.“

„Kion mi do faru?“ demandis Howard.

„Ni kunprenos vian havaĵon kaj transdonos ĝin en banko sur konton sub via nomo. Aŭ, ĉu vi eble ne fidas al ni?“ Tion demandis Dobbs.

„Ĉu fidi?“ Kial ne fidi?“ Howard ridis kaj rigardis de unu al la alia. „Ni ja preskaŭ tutan jaron kune vivis kaj kune laboris. Jen ja ĉiam estis io por fido. Ĉu eble ne?“

Kaj ĉar nenio alia restis al ili, ili devis trovi decidon, kun kiu ankaŭ la indiĝenoj estos kontentaj. Por ili temis nur pri tio montri al Howard sian dankemon. Tial ŝajne estis la plej bona solvo, se Howard transdonis al la du laborkamaradoj sian havaĵon. Ambaŭ transprenis la respondecon por la transdonado kaj ambaŭ donis al li notfolion, sur kiu ili kvitancis la havaĵon, tiom kaj tiom da saketoj, ĉiu kun proksimume la sama pezo de tiom kaj tiom da gramoj de ellavita sablo.

„Kaj kie vi ĝiros ĝin?“ demandis Howard.

„Ni ĝiros ĝin en sekurŝrankon de la banko *Banking Company* en Tampiko, vianome“, diris Kurtin.

„Bone do“, diris Howard, kaj ili adiaŭis unu de la aliaj.

„Estas ja nur por kelkaj semajnoj, oldulo“, diris Kurtin. „Mi atendas vin en ĉiu kazo en Tampiko. Vi renkontos min en la *Southern*-hotelo aŭ en la hotelo *Imperial*. Mi restadus kun vi ĉi tie, sed tio estas ja nur disipo de tempo, kaj vi scias, ke min atendas damo.“

Howard ricevis unu el la ĉevaloj, dume la indiĝeno, kiu fordonis sian ĉevalon, surĉevaliĝis ĉe alia viro. Poste ili rajdis ridante kaj kontente en sian vilaĝon, triumfe alkondukante Howardon en sia mezo.

Pro la restado kaj pro la longaj intertraktadoj, dum kiuj la indiĝenoj ne montris rapidecon, sed persiston venkigi sian volon, estis duono de la tago perdita. Ekestis la impresoj, kvazaŭ la indiĝenoj ne tre insistis pri la akompano de la kunuloj de Howard. Se Howard estus dezirinta, ke ambaŭ estu inkluditaj en la gastamikecon, ili certe estus devigitaj kuniri kaj oni estus traktinta ilin simile afable kiel Howardon. Sed la indiĝenoj ŝajne ne trovis plaĉon je la duopo. Eble estis ties rigardoj, kiuj ne plaĉis al ili. Kaj ili pli konsideris la rigardojn ol la ceterajn aspektojn.

Tiu restado estis la kaŭzo, ke Kurtin kaj Dobbs je tiu tago eĉ ne atingis Cienegan, indiĝenan vilaĝeton, kaj tial devis vojaĝi plian tagon antaŭ ol ili atingis la trapasejon en la alta montaro, kiun ili intencis trairi.

Ili ambaŭ ĉagreniĝis kaj grumblis pro la okazintaĵo. Ili apenaŭ interparolis ion, kaj se ili devis diri ion, ili siblis tion tra la dentoj. Ili estis koleraĵoj, ke ili devis transporti la frajton de Howard, ke ili devis peli liajn azenojn, ke ili devis ŝarĝi kaj malŝarĝi ties havaĵon, kaj ke li mankas kaj ne plenumas sian parton de la laboro. Kaj estis ĝuste la azenoj de Howard, kiuj ŝatis eskapi, estis ĝuste la pakaĵoj liaj, kiuj ne estis lerte kunŝnuritaj kaj kiuj deglitis dum la transporto de la pakaĵoj. Ili surpakis ilin sakrante. Kaj dum ili faris tion, la ceteraj azenoj komencis grandigi la distancojn inter si kaj ili devis kapti ilin. Tiaj aferoj ne estus okazintaj, se ĉeestus tri viroj. Sed sakri pri Howard kaj insulti lin, ili povis nur el la foro. Ili baldaŭ ekkomprenis, kiel ridinda tio estas; ĉar

Howard ne povis aŭskulti ilin, kaj tial tio estis stulta disipo de fortoj fulmotondri kontraŭ li. Ili do sakris pri la azenoj, sed tiuj ne respondis kaj ne konsideris tion serioze. La azenoj trotis sian vojon, eltiris jen tigeon kaj jen branĉeton de arbustaĵo, ĉiam tiam, kiam ili havis sekundon da tempo movi la langojn kaj se la sekva besto en la vico ilin ne urĝigis malĝentile.

Fine al ambaŭ uloj restis nenio alia krom insulti tradente reciproke la alian, ridinde riproĉi la alian, ŝovi la kulpon pri negravaj kaj longe pasintaj aferoj al la alia, nur por aŭdi respondojn kaj ekscitiĝi pli kaj pli pri ili. Estas ĉiam la respond-oj, kiuj kaŭzas kverelon. Neniu el ambaŭ havis la filozofan trankvilon ne respondi la riproĉojn, kulpigojn kaj ridindajn asertojn. Kurtin respondecis pri la marŝformacio antaŭe kaj Dobbs pri tiu malantaŭe. Kaj trans la azenojn, kiuj trotis pacience kaj indulge inter ambaŭ, ili reciproke transpafis siajn karesemajn kaj fiintencajn parolojn. La azenoj turnis siajn orelojn jen antaŭen por gustumi brilan sakron de Kurtin jen malantaŭen por aŭskulti, kiomgrade Dobbs akceptos kaj kiel draste li respondos la fidirojn de Kurtin. Poste la azenoj, kiuj iris unu apud la alia, kunpuŝiĝis per siaj nazoj, priflaris sin reciproke, flustris ion kaj rikanis per larĝaj buŝoj. Kiam la pado estis tro malvasta, tiel, ke ili ne povis iri unu apud la alia, priflaris la malantaŭa azeno la postaĵajn partojn de la azeno marŝanta antaŭe. Tiu tiukaze turniĝis, kapjesis, rikanis kaj nepridubeble ekkonigis, ke li komprenas ĉion kaj formis sian opinion pri tio. Ili daŭrigis sciigi sian opinion inter si, ĉiam per priflarado kaj turniĝado, kapjesado kaj rikanado kaj skuado kaj turnado de la brake longaj oreloj. Se Dobbs kaj Kurtin prenis al si nur

dum momento la tempon por foje atenti, kion kaj kiel la azenoj pensas pri la afero, ili certe estus ricevintaj imagon pri aŭtentika mondosagaĝeco. Sed kiu tiom humiligus sin akcepti azenon kiel instrumastron?

„Mi haltas ĉi tie“, diris Dobbs subite. „Mi ja ne estas brutbesto, kiu kuradas seninterrompe dum la tuta tago seninterrompe antaŭen.“

„Tamen estas ja nur la tria, ulo“, respondis Kurtin.

Dobbs kriis kolere trans la azenojn: „Mi ja ne ordonis al vi, ke vi ekkampadu ĉi tie. Pro mi vi povus trotadi ĝis morgaŭ frue matene.“

„Ĉu ordonis? Ĉu vi?“ blekis Kurtin malantaŭen. „Vi povas ordoni nenion al mi. Vi ja ne estas la ĉefo.“

„Ĉu eble vi? Diru do. Mi atendas nur aŭdi tion de vi.“

Dobbs ruĝiĝis vizaĝe.

„En ordo“, diris Kurtin iom pli trankvile, sed plu kun ĉagreno, „se vi ne povas plu – “

„Povas, ĉu? Povas, ĉu?“ kriis Dobbs. „Kun vi mi ankoraŭ povus vetkonkuri.“

„Jes ja, tio estas en ordo. Do, se vi ne volas iri plu, tiukaze ni blovu la haltosignalon kaj malŝarĝu ĉion kaj kampadu. Konsentite, akceptite.“

„Ĉi tie ja estas akvo“, diris Dobbs, same trankviliĝante, „kiu sciu, ĉu ni vespere trovus ankoraŭ akvon.“

Manĝado ĉiam pacigas, se oni ne parolas dum la manĝo pri la temo de la kostoj.

Ankaŭ en tiu ĉi kazo la manĝo efikis pacige, kvankam ĝi ne estis festmanĝo.

Kaj ankaŭ ĉifoje tosto estis metita. Ankaŭ ĉifoje pri la alia.

Dobbs estis la parolanto de la vespero. Li diris: „Kion la oldulo faros nun?“ Kaj dum tio li ne pensis pri li, sed pri si mem, pri siaj propraj interesoj. Komprenoble, unue la penso ja efektive koncernis Howardon. Sed antaŭ ol li finis la frazon, fariĝis klare al li, ke io alia estas pli proksima al li ol Howard. Li rigardis transen al la pakaĵoj, kaj lia rigardo restadis certan tempon ĉe la pakaĵoj de Howard.

Ankaŭ Kurtin rigardis al la pakaĵoj. Sed li malĝuste interpretis la rigardon de la festparolanto. Ĉar li diris: „Ho, mi pensas, ke ni povos porti la tutan ŝipkargon glate kaj komplete en la dometon. Ni estas nun jam sufiĉe for de la monto. Tio estas nun tute nesupekta. Post du tagoj, se ni havos klaran rigardon de la altaĵo, ni jam vidos fumi la lokomotivon.“

Dobbs diris nenion pri tio. Li fikse gapis en la bivakfajron. Poste li rigardis transen, kie moviĝis la malhelaj ombroj de la paŝtantaj azenoj; kaj ĉar li ne volis denove fikse rigardi en la bivakfajron kaj ne observi ree la azenojn, lia rigardo denove turniĝis al la pakaĵoj kaj kroĉiĝis je tiu de Howard.

Subite li puŝis Kurtinon per pugno kaj laŭte ekridis. Lia ridado fariĝis glugla, singulta kaj skuata.

Kurtin rigardis lin mirigite kaj konfuzite, iom li infektiĝis de la ridado, ridetis kaj ĉirkaŭrigardis, kvazaŭ li volus serĉi la kaŭzon, kial Dobbs estas plezurigita kaj gaje ekridis.

Fine li demandis kun ridanta buŝo: „Viro, pri kio vi fakte ridas tiom multe?“

„Aĥ, filĉjo mia, filĉjo mia“, diris Dobbs, elkreve ridante, „filĉjo mia, tio estas ja tiel komika, tiel nedireble komika.“

„Kio estas komika?“

„Pripensu do, tiu azeno, nomata viro, donas al ni sian tutan „ŝparmonon“. Ĉi tie en la sovaĝejo. Kaj ni povas tiel facile formarŝi kun ĝi. Neniu ventospiro plu restos de ni. Kie li serĉu nin, tiu olda magrulo?“

Kurtin ĉesigis rideti. „Mi ne komprenas vin, Dobbs“, li diris, „pri kio vi do parolas?“

Dobbs ridis kaj denove perpugne puŝis Kurtinon: „Vi ne komprenas, ĉu? Blekanta ŝafo, kie vi plenkreskiĝis?“

„Eĉ se vi tiel gajas, mi ne komprenas vin.“ Kurtin skuis la kapon.

„Kio ne kompreneblas? Ne konduitu tiel obstinege. Ni foriĝos.“

Kurtin ne montris mienon, kvazaŭ li komprenus, kion Dobbs celis de li.

„Ni foriĝos“, klarigis Dobbs, „ni komplete surpakos ĉion kaj dividos la predon, kaj ĉiu iros sian vojon.“

„Mi nun ekkomprenas“, Kurtin kapjesis.

„Daŭris sufiĉe longan tempon“, diris Dobbs kaj frapis lin surŝultren.

Kurtin ekstaris. Li paŝadis iom, poste li denove iris al la bivakfajro. Sed li ne sidiĝis, sed restadis staranta, kaj rigardis supren en la ĉielon. Poste li diris koncize kaj rigide: „Se vi pensas, ke ni plifaciligu Howardon pri ties laborpago, se vi opinias tion – ?“

„Kion alian do? Kompreneble mi opinias tion kaj mi opinias tion serioze!“

„Nu, se vi opinias tion“, daŭrigis Kurtin, kvazaŭ li tute ne estus interrompita en sia frazo, „tiukaze mi ne akceptos tion. Mi ne estas de tiu speco.“

„Lastfine“, diris nun Dobbs, dum li ekstaris kaj sin starigis tute proksime antaŭ la jam staranta Kurtin, „lastfine mi ne bezonos vian permeson, se vi nepre volas scii tion. Vin mi ne demandos. Kaj se vi ne partoprenos, tiukaze tio estos damaĝo via. Tiukaze mi prenos la tutan dolĉan raspitaĵon sola. Kaj vi povos viŝi vian muknazon, se vi havas viŝĉifonon. Ĉu vi komprenas tion?“

„Jes, tion mi nun komprenas.“ Kurtin ŝovis la manojn en la poŝojn kaj retroiris paŝon, por havi Dobbson ne tro proksime ĉe la korpo.

„Kaj nun, ĉu?“ demandis Dobbs fride. „Kion do?“

„Tiom longe, kiom estos mi ĉi tie, vi ricevos eĉ ne cendon de tio, kio apartenas al la oldulo. Mi subskribis lian notfolion.“

„Ankaŭ mi faris, sed mi fajfas pri tio. Tiu unue devus trovi nin. Tiukaze mi rakontus al li, ke banditoj forprenis ĝin de ni. Tio estas klara kiel diamanto.“

Kurtin parolis celkonscie plu. „Mi subskribis la notfolion kaj mi promesis al li, ke mi transdonos ĉion ĝuste kun vi aŭ sen vi. Ne estas sole pro la notfolio kaj pro mia subskribo kaj pro mia promeso. Oni promesas tiom da aferoj en la vivo, kaj oni subskribas tiom ofte en la vivo, se oni volus plenumi ĉion ĉi, oni ne plu havus tempon por vivi. Tio do ne estas la kaŭzo. Estas alia afero. Li ne ŝtelis ĝin, li ne kunkolektis ĝin ie permane, li ne gajnis ĝin en loterio aŭ je borso aŭ en la *Monte Bank*. Li akiris ĝin fidele kaj streĉe per honesta laboro. Mi kutime respektas nenion. Sed certan aferon mi respektas. Kaj tio estas akiraĵo, kiun iu fidele kaj streĉe perlaboris per siaj manoj.“

Dobbs mangestis malestime: „Lasu la bolŝevistajn ideojn ie aliloke. Per tio vi povas nutri viajn kokinojn. Tiajn ideojn mi konas parkere.“

„Tio havas neniun rilaton kun bolŝevistoj“, respondis Kurtin. „Ja eblas, ke tio estas la intenco de la bolŝevistoj aŭ komunistoj, respektigi la laborsalajron al ĉiuj nelaboristoj, kiuj jam havas la monon, por ke oni donu al la laboristo la salajron, kiun li efektive meritas, kaj ke oni ne tiru ĝin per ĉiuj eblaj ĉirkaŭ- kaj ŝteliraj vojoj denove el ties monujo, kaj por tio entreprenas aferojn, kiuj tute ne interesas la laboristojn. Sed tio estas skribita sur alia folio. Tion ili povas trakti inter si. Mi ne havas rilaton al tio. Kaj nun koncize kaj klare, bubo: Tiom longe, kiom mi estas en la vico aŭ proksime de la vico, vi ne tuŝos eĉ grajneton de tio, kio apartenas al la oldulo. Ties ŝparaĵon vi ne tuŝos, tiom longe, kiom mi staros sur miaj du piedoj. Nun vi scias.“

Kurtin sidiĝis, prenis sian pipon kaj komencis ŝtopi ĝin. Li penis aspekti trankvila.

Dobbs staris plu kaj rigardis Kurtinon strange. Poste li laŭte kaj moke ekridis: „Vi pravas, filjĉo mia, nun mi scias. Nun mi scias, kion vi intencas. Mi sciis tion jam delonge.“

„Kion vi sciis jam delonge?“ demandis Kurtin sen rigardi supren.

„Ke vi intencis tion mem, hodiaŭ aŭ morgaŭ pafmortigi min en la nokto, enterigi min kiel mortintan favan hundon, kaj tiam vi foriĝos kun la pakaĵoj de Howard kaj kun miaj kaj subridos, ĉar ni estis tiaj stultaj bovoj.“

Kurtin sinkigis la pipon, kiun li ĝuste volis ekbruligi kaj rigardis supren. Liaj okuloj estis vaste malfermitaj, sed ili

estis kavaj kaj malplenaj. Pro tiu akuzo li perdis la kapablon doni esprimon al siaj okuloj. Pro tiu ago, je kiu li estis ĵus suspektata, li pensis neniam. Li efektive ne rigardis sin honorinda modela homo. Li ja sciis kapti la okazon, se io estis kaptebla, kaj per konscienciproĉoj li ne lasis turmenti sin. La riĉaj naftomagnatoj, la ŝtalreĝoj, la gigantoj de la fervojo ne povus esti tio, kio ili estas, se ili lasus influi sin de tielnomata konscienciproĉo. Kial li, la malgrandulo, la etulo, havu pli noblan kaj pli fajnan konsciencon ol tiuj, kiuj estas nomataj la steloj de la nacio, kaj kiujn prezentas gazetoj, ĵurnaloj kaj legolibroj kiel la grandaj ekzemploj pri agoforto, volforto kaj sukceso? Sed tio, kion Dobbs pensis ebla pri li, tio estis la plej fia ago, kiun li povis imagi. Eble li ne trovus la agon tiom fia, se li mem estus havinta la ideon. Sed ĉar ĝi estis ĵetita de Dobbs tiel malice kaj naŭze al lia kapo, li trovis ĝin tia fia ago, kiel neniun, pri kiu li aŭskultis iam. Ĉar per tio, ke Dobbs pensis lin kapabla pri tiu ago, li ekkonis per unu fojo la senliman fiecon kaj malicon de Dobbs. Kiel li povis pensi ion tian pri iu? Ja nur tial, ĉar li mem intencis fari tion. Sed se li intencis fari ion tian, Kurtin fakte estis jam morta viro. Dobbs ja ne hezitus murdi lin por posedi la tutan oron. Kaj tiu konscio, ke nun temas pri lia vivo, estis la kaŭzo, ke estingiĝis ĉiu esprimo en liaj okuloj. Li vidis la danĝeron kaj ne povis eviti ĝin.

Li estis senhelpa, tiel senhelpa, kiel homo malofte povas esti. Ja kiel li povus gardi sin kontraŭ Dobbs? Kvar aŭ kvin tagojn ili ankoraŭ devos migri. Solaj, eĉ, se ili trovus iun, tio ne sekurigus lin. Dobbs devus nur aludi al la homoj, kiujn ili renkontus, kio enspezebus, kaj ili tuj estus je lia flanko. Kaj se ili ne renkontus iun, des pli bone por Dobbs. Unu

nokton Kurtin certe povus pasigi sen dormo kaj protekti sian haŭton, sed en la sekva nokto li dormus des pli firme. Dobbs tiukaze eĉ ne devus disipi kuglon. Li povus firmligi lin, bati lin sur la kapon kaj enfosi lin. Eĉ la baton li povus ŝpari.

Tiukaze ekzistus nur unu elirvojo. Kurtin devus fari je Dobbs tion, kion Dobbs intencas fari je Kurtin. Alia savo ne eblus. Voru aŭ vi estos vorita. Alia leĝo ne estas.

Liajn orsaketojn mi tute ne volus havi, pensis Kurtin, sed mi devos transmondigi lin. La oldulo ricevos sian parton, mi retenos mian, kaj tiun de la fripono mi enfosigos. Je ĝi mi ne volus riĉigi min. Sed mia vivo valoras same tiom, kiom lia.

Lia mano kun la pipo ripozis sur lia sino. Lia dekstra mano kuŝis sur genuo. Nun li tiris la dekstran manon malrapide al si kaj lasis ĝin gliti malantaŭen al la koksa poŝo.

Sed en la sama momento Dobbs jam tenis la revolveron supre.

„Unu movon, bubo“, li vokis, „kaj mi ekpafos.“

Kurtin tenis la manojn trankvilaj.

„Levu la brakojn“, diris Dobbs.

Kurtin iom etendis la brakojn supren.

„Mi ja tute ĝuste supozis tion“, diris Dobbs moke, „mistifiki min per longa parolaĉo, tio en mia kazo ne sukcesos.“

Dobbs venis pli proksimen: „Ekstaru!“ li diris.

Kurtin ne parolis vorton. Li paliĝis. Kiam li staris, Dobbs tute proksimiĝis, iris ĉirkaŭ li kaj ŝovis la fingrojn en la revolverpoŝon de Kurtin por malarmigi lin.

Subite Kurtin turniĝis per unu movo. Dobbs pafis. Sed pro la neatendita movo de Kurtin la kuglo ne trafis la celon, kaj antaŭ ol Dobbs povis ekpafi duan fojon, Kurtin kroĉis pugnon al lia mentono, kiu ĵetis Dobbson teren. Kurtin tuj ĵetiĝis sur lin kaj perforte forprenis de li la revolveron. Poste li saltis supren kaj retroiris kelkajn paŝojn.

„La kartoj estas nun alie miksitaj, Dobbs“, li diris.

„Mi vidas“, rediris Dobbs. Li rektiĝis, sed restadis kaŭranta sur la tero.

„Mi nun volas diri al vi, ke vi tute malpravas“, opiniis Kurtin. „Mi pensis eĉ ne momenton pri tio forpreni ion de vi aŭ eĉ forigi vin.“

„Tion vi povas nun facile rakonti al mi. Sed, se vi estas tia bona pia infano, kiel vi asertas, tiukaze redonu mian kanonon.“

Kurtin ridis: „Tiun mi prefere retenas, ĉu? Ĝi ne estas ludilo por vi.“

„Komprenite“, respondis Dobbs koncize kaj iris al la bivakfajro.

Kurtin tiris la kartoĉojn el la revolero de Dobbs kaj ŝovis ilin en poŝon. Poste li pesis la armilon dum certa tempo permanente. Li volis ĝin transdoni al Dobbs, kaj Dobbs ankaŭ jam etendis brakon, sed li rekonsciigis kaj ŝovis ankaŭ tiun revolveron en pantalonpoŝon, tiam ankaŭ li sidiĝis al la bivakfajro, sed atentis pri tio, ke li havu sufiĉe da loko por eviti neatenditan atakon de Dobbs.

Nun li eligis sian mallongan pipon kaj bruligis la tabakon. Dobbs tute ne parolis, kaj Kurtin havis sufiĉe da okazoj okupiĝi pri siaj pensoj.

Li neniel pli bonŝancis ol duonon de horo pli frue. Li ne povis observi Dobbson kvar tagojn kaj kvar noktojn. Fine li endormiĝus kaj Dobbs subigus lin. Dobbs ne montros kompaton. Li estas ja nun konvinkita, ke li ĝuste supozis tion, ke li agos en nepra bezono, se li forigos Kurtinon. Nur unu el ili povos transvivi. Ambaŭ preskaŭ freneziĝus pro timo kaj trolaciĝo. Kiu ekdormos, tiu estos la viktimo de la alia.

„Ĉu ni disiĝu morgaŭ matene aŭ hodiaŭ en la nokto kaj ĉiu iros sian propran vojon?“ fine demandis Kurtin.

„Tio plaĉus al vi.“

„Kial plaĉus?“

Dobbs moke ekridis. „Min kapti de malantaŭe? Ĉu ne? Aŭ sendi banditojn sur mian nukon, ĉu?“

„Tiukaze do, se vi pensas tion“, diris Kurtin, „tiukaze mi ne scias, kiel ni disiĝu? Jen mi devos firmligi vin. Dum estas kaj nokte.“

„Jes, tion vi devos fari. Do, venu al mi kaj ligu min, mi preta.“

Dobbs pravis. Ne estus simpla afero firmligi lin. Tio povus facile konduki al tio, ke la kartoj denove estos interŝanĝitaj. Kaj tio tiukaze estus la lasta fojo. Dobbs estis tiu, kiu korpe kaj mense estis pli forta, kiu kaptas okazon pli senrespekte. Pro la fortikeco de lia memkonscio li estis la pli forta el ambaŭ. La senrespektulo transvivas la hezitulon. Tiuj, kiuj fidigas pli pri rapida ago ol al trankvila zorgema pripensado aŭ taksado, estas la konkeruloj. Sed la aliaj estas la venkontoj kaj iĝos la posedantoj. Sed ĉimomente temis nur pri la konkerado, ĉar la sekureco de la propra vivo ekskluzive dependis de la malrespekta subigo kaj neniigo de la alia. Kurtin havis la potencon, sed li timis uzi ĝin. Li estis politikisto, sed ne kreanto. Male al tio Dobbs povis diboĉi, sed ne disipi; li povis neniigi, sed ne detrui. Kaj tial li ankaŭ ne estis kreanto, ĉar la kreanto povas disipi kaj detrui.

19

Por Kurtin komenciĝis terura nokto. Sed ne por Dobbs. Malkovrinte la nefortan flankon de Kurtin, li sentis sin sufiĉe sekura. Li povis nun ludi kun Kurtin.

Kurtin kuŝiĝis tiom malproksime de Dobbs, ke li bone povis observi lin kaj samtempe havis sufiĉe da spaco por povi akcepti lin kun antaŭtenata armilo, se li atakus. Kurtin penis per ĉiuj fortoj resti vekiginta. Li estis laca pro la tagmarŝo kaj sentis, ke ne estos facile elteni la tutan nokton. Promenadili ne volis, ĉar li supozis, ke tio lin endormigus eĉ pli. Li sidis certan tempon rektiĝinte, sed ankaŭ tio lacigis lin. Poste li pensis, ke estus pli bone volvi sin en la kovrilon kaj sin sterni. Dum tio la korpo laŭ li povus ripozi. Dobbs ankaŭ ne sciis, kiam li ekdormos iom, ĉar li ne povus vidi tion tiel precize.

Proksimume post horo, kiam Kurtin longe ne moviĝis, Dobbs rektiĝis kaj komencis rampi. Tuj Kurtin levis la revolveron: „Eĉ ne paŝon plu“, li vokis transen.

„Bona noktogardisto“, respondis Dobbs kaj ridis.

Malfrue post noktomezo vekigis Dobbs pro la kriadado de unu el la azenoj. Li faris denove la provon ekrampi, sed Kurtin tuj haltigis lin.

Nun Dobb sciis, ke li gajnos la batalon kaj firme endormiĝis mem. Li havigis al si la noktan dormon, kiun li forprenis de Kurtin helpe de la du truketoj. La sekva punkto apartenas al li.

Je la tago Dobbs devis iri enfronte de la marŝformacio. Tiu-tempe li povis entrepreni nenion. Poste denove fariĝis vespero, kaj tiam noktiĝis. Mallonge post noktomezo Dobbs tute trankvile stariĝis, iris transen al Kurtin kaj forprenis

liajn revolverojn. Poste li puŝis lin perpiede forte en la ri-
pojn.

„Ek, fripono“, li diris, „la kartoj estas nun denove miksitaj.
Sed ĉifoje la lastan fojon.“

Kurtin ankoraŭ dormebriis kaj demandis: „Kio? Kiuj kartoj
denove estas miksitaj?“ Poste li ekkomprenis kaj volis ek-
stari.

„Restadu sidanta“, diris Dobbs kaj sidiĝis antaŭ li. Li puŝis
la lignon en la fajron, kaj la flamoj eklumis.

„Multon ni certe ne plu parolos“, daŭrigis Dobbs. „Mi ne fa-
ros por vi la infanartiston kiel vi por mi en la lasta nokto
kaj la pasintan tagon. Mi faros nun glatan finon al la negoco.
Mi ne volas vivi ĉi tie la tutan tempon en timo.“

„Do murdo.“ Kurtin diris tion sen ekscitiĝo. Li estis tro laca
por kapti la sencon de la tuta okazaĵo.

„Ĉu murdo?“ respondis Dobbs. „Kial murdo? Mi ja devas
defendi mian felon. Mi ja ne estas via kaptito. Mi ja ne de-
pendu de via graco, kiom longe vi lasos barakti min ankoraŭ.“

„Tiel glate tio ne iros“, diris Kurtin, lante revekiĝante pense.
„La oldulo ja ne tiel facile lasos formarŝi vin.“

„Ĉu li ne lasos? Tio simplas. Vi firmligis min al arbo kaj fuĝis
kun la tuta oro. Tio estas ja tute simpla. Li serĉos vin. La

fripono estos vi. Por ke li ne trovu vin, pri tio lasu trankvile zorgi min. Ek supren, kaj marŝu antaŭen.“

„Kien?“ demandis Kurtin.

„Al la tombejo. Aŭ ĉu vi eble pensis, ke al iu dancplezuro? Estas ja afero via, kiel vi volas kompreni tion. Preĝi vi certe ne devos. Cetere mi volus scii al kiu? Sed vi ja tute per vi mem alvenos la ĝustan lokon. Tute ne zorgu pri tio. Mi nur iom mallongigos vian vivtempon, jen ĉio. Ek do, marŝu, antaŭen.“

„Kaj se mi ne ekiros?“ demandis Kurtin. Li estis eĉ tiam ankoraŭ laca kaj dormebria. Ke tio estas damne serioza, kio okazas ĉirkaŭ li, tion li sciis tute precize. Sed lia laceco ne lasis percepti la aferon laŭ ties tuta senco, por ke li povu pensi plu ol ĝis la pafo, kiun li tuj aŭdos. Pro sia dormemo li ne perceptis la fakton, ke post la pafo lia vivo estos finita. Ĉio, kio estis dirita kaj farita, aperis al li kiel sonĝo. Kaj en tiu sonĝo li tute ne perdis la konscion, ke estas nur sonĝo kaj nenio pli, ke li vekigis morgaŭ matene, kaj ke li memoros pri la sonĝo nur el granda distanco. Tamen li provis firme memorteni la okazaĵojn en tiu sonĝo, por ke li povu ripeti ilin post la vekigo tute precize. Ŝajnis grava al li ne forgesi tiun sonĝon, ĉar tiu sonĝo montris tiom akran karakterbilon de Dobbs al li, kiel li neniam antaŭe povis vidi ĝin. Li memoris tute nedubeble, ke li iam aŭdis, ke oni foje en sonĝo povas konatiĝi kaj prijuĝi homon pli bone ol en la vera vivo, kaj li intencis ekde morgaŭ frue esti eĉ pli atenta pri Dobbs ol ĝis tiam.

„Mi ja ankaŭ povas plu sidi ĉi tie“, li diris, dum liaj okuloj estis fermitaj, „kial mi ankoraŭ marŝu dum longa tempo, mi estas laca kaj volas dormi.“

„Vi tiam povos dormi sufiĉe longe“, diris Dobbs.

„Antaŭen, ekstaru kaj marŝu!“

La laŭta bruska komandado de Dobbs turmentis Kurtinon, kaj por ne plu devi aŭdi ĝin, li ekstaris ŝanceliĝante kaj stumblante. Dobbs puŝis lin per siaj pugnoj antaŭen, kvindek aŭ sesdek paŝojn en la vepron. Poste li pafis tiel sur lin, ke Kurtin renversiĝis.

Kurtin tuj sternis sin. Dobbs kliniĝis al li, kaj kiam li aŭdis nek spiron nek ĝemeton, li ŝovis la revolveron en la ingon kaj reiris al la bivakfajro.

Ĉi tie li sidis dum certa tempo kaj provis pripensi, kio faren-dos. Sed li ekhavis eĉ ne unu penson. Li sentis sin tute vaka. Li fikse rigardis en la fajron, postŝovis lignerojn aŭ puŝis ilin perpiede en la ardaĵon. Poste li bruligis la pipotabakon.

Kiam li estis enspirinta dum kelkaj fojoj la tabakfumon, hastis fine penso tra lia cerbo. Li pensis, ke li eble eĉ ne trafis Kurtinon, ke tiu eble nur stumblis kaj falis teren, ĝuste kiam la pafokazis. Li turniĝis al la vepro, kie Kurtin kuŝis. Dum certa tempo li rigardis tre atenteme transen, kvazaŭ li atendus, ke Kurtin proksimiĝas renkonte al li.

Tiam la sidado fariĝis neoportuna por li. Li ekstaris, iris kelkajn fojojn ĉirkaŭ la bivakfajro kaj per bota pinto li puŝis

branĉojn en ĝin. Li residiĝis kaj tiris la kovrilon al si. Li volvis sin en ĝin kaj tiam longe etendiĝis. Per profunda spiro li intencis ekdormi, sed meze de la spirado li haltis. Li estis certa, ke li ne trafis Kurtinon, kaj ke tiu subite staros antaŭ li mem kun elingita revolvero. Tion li ne eltenis, tio ĝenis lin ĉe la endormiĝo.

Li ŝiris brulantan branĉegon el la fajro kaj iris kun ĝi en la vepron. Kurtin kuŝis ankoraŭ sur la sama loko. Li ne spiris kaj liaj okuloj estis fermitaj. Dobbs tenis la brulantan branĉon proksime al ties vizaĝo. Sed Kurtin ne moviĝis. Lia ĉemizo sur la brusto estis plena de sango.

Kontentigite Dobbs volis foriri. Sed antaŭ ol li iris tri paŝojn, li turniĝis, eltiris la revolveron kaj pafis ankoraŭfoje sur Kurtinon. Poste li reiris al la kampadejo.

Li metis la kovrilon ĉirkaŭ la ŝultrojn kaj sidiĝis al la biva-kfajro.

„Malbenite, mi ekhavis konsciencriproĉojn“, li diris ridante al si mem, „kiam mi pensis, ke li eble eĉ ankoraŭ vivas. Sed nun mi estas trankviligita.“

Tiu vorto „konsciencriproĉo“, kiun li nun uzis, firmkroĉiĝis tamen je liaj pensoj. La vorto laboris memstare plu, kaj ĉiu frazo, kiu formiĝis en li, grupiĝis ĉirkaŭ la vorto „konsciencriproĉo“. Ne tiom pri la nocio, sed pli pri la nuda vorto mem.

Nun mi tamen volas vidi, ĉu la konscienco mistifikas min, li pensis. Murdo estas la plej terura ago, kiun oni povas fari.

Sekve tion vekigōs la konscienco. Sed mi neniam aŭdis pri ekzekutisto, ke konscienciproĉo turmentis lin. *Mr. McDollin* en *Sing Sing* kondukis cent kaj kvindek personojn al la elektra seĝo, kaj ŝajne tio plezurigis lin. Li certe trankvile dormas en sia lito ĉiun nokton, sen tio, ke turmentas lin la konscienco. Eble tie estas kvar butonoj, kaj el kvar viroj ĉiu premas sur butonon. Kaj neniu scias, kiu butono estas la mortiga butono. Sed *Mr. McDollin* devas firmkateni ĉiun ulon je la seĝo. Li mortigis jam cent kaj kvindek aŭ eĉ pli da homoj. Kaj li estas tamen estimata viro, ŝtatoficisto.

Kiom da germanoj mi buĉis en Francio? Ĉu dek kvin? Mi pensas, ke estis dudek tri. 'Bonege', diris tiam la kolonelo. Kaj mi ĉiam bone dormis. Neniu el la germanoj iam aperis al mi dum la dormo. Neniu maltrankviligis mian konsciencon. Eĉ ne iliaj patrinoj aŭ iliaj edzinoj aŭ iliaj infanetoj molestis min en la dormo aŭ kiel vekiginton. Kiel tio estis tie en la arbaro *L'Argonne*? Mitralonesto de la germanoj. Fulmotondro, kiel kuraĝe ili tenis la pozicion. Eĉ per du kompletaj kompanioj ni ne povis proksimiĝi, tiam ili elpafiĝis, ili svingadis blankan ĉifonon. Postrestis nur dek unu de la bravuloj. Ni proksimiĝis. Ili ĉiuj tenis la manojn supre. Ili ridis al ni. Estis honestaj soldatoj. Ili supozis ankaŭ nin honestaj soldatoj. Ni ĉiun el ili trapikis kiel brutbestojn. Tiu, kiu plej terure trapikadis kaj sovaĝegis kaj ne havis indulgon al vunditoj, estis laŭnome certa Steinhofler. En Germanio naskita kaj transirinta Francion deksepjara. Liaj gepatroj kaj gefratoj, ĉiuj ankoraŭ estas en Germanio. Li estis tiu, kiu ne havis kompaton. Jen kelkaj, kiuj petis pri sia vivo, ĉar ili havis laŭdire tiom da infanoj. Kion diris la nobla Steinhofler al tiuj patroj? Kion do? Nu, estis tre malica diro,

kaj li ekpikis. Mi supozas, ke li ricevis medalon. Sed angla servosoldato de oficiro ĝuste alvenis, kiam la buĉado koncernis la lastajn junajn virojn, kiuj tute ne defendis sin, sed estis tute senmovaj. Kaj la anglo diris: „*Dirty dogs*, hontu.“ Se eĉ Steinhofler ne hontis, se eĉ ne hontis tiom da aliaj el ties samlandanoj, kiuj post la militdeklaro fariĝis pli murdemaj ol la plej sangavida jingo, kial do hontu mi? Mi havis neniam konscienciproĉojn pro la germanaj uloj, Steinhofler des malpli. Kial la konscienco maltrankviligu min do pro tiu naŭza ulo Kurtin? Se li estas morta kun certo, la koncienco estas trankviligita. La konscienco ekriproĉas onin nur tiukaze, se minacas la pundomo aŭ la ekzekutisto staras apud ni kun la maŝo. Se oni estas absolvita aŭ jam pasigis la puntempon, la murdito ne plu aperas al oni.

Li aperas nur tiukaze, se oni timas, ke ĝi povus malkaŝiĝi, aŭ ke ili povus kapti onin.

Kaj ĉar soldatoj kaj ekzekutistoj estas pagataj, tial la konscienco ĉiam lasas ilin en paco, eĉ se ili mortigas kiom ajn da homoj. Kion mi do timu? Mi havas la predon kaj Kurtinon oni trovos neniam. Pli bone, se mi morgaŭ matene ankoraŭ enfosos lin.

Dobbs ekridis laŭte. Li trovis tion gaja, ke liaj pensoj subite fariĝis tiel viglaj kaj tiel rapide konfuziĝis. Ŝajnis strange al li, ke li nun fariĝis tiom saĝa, ke li havis tiajn prudentajn pensojn. Li pensis, ke tio eble lasus noti sin. Kaj oni supozus lin erudito. Kaj li miris pri si mem, ke li neniam antaŭe sciis, kiel prudente kaj senantaŭjuĝe li povas pensi. Li pensis, ke

devus esti tre facile venki moralpredikistojn, kiuj ĉiam babilacas pri la konscienco sen tio, ke ili iam tuŝis la konsciencon dum granda afero; per tio, ke oni pruvas al ili, ke ĉio, kion ili parolas kaj verkas, kaj per kio ili timigas la homojn dum tuta vivo, estas nenio alia krom galimatio. Se oni kredas pri konscienco, tiukaze oni havas ĝin, kaj tiukaze ĝi atakas onin je komando; sed, se oni ne kredas pri konscienco, tiukaze oni ne havas ĝin, kaj ĝi molestas onin neniam.

Dobbs longe etendiĝis ĉe la fajro, kaj dum li provis endormiĝi, li sentis, ke li dormos tiel bone, kiel li ne dormis dum kelkaj tagoj. Kaj efektive li firme tradormis ĝis matene.

Li trinkis iom de la kafo postrestinta de la lasta vespero kaj komencis surpaki ĉion. Nur ĉe la surpakado li vere ekrimarkis, ke Kurtin estas morta. Tion li rigardis kiel fakton, kiu lin ne pli koncernis ol, se Kurtin estus mortinta je iu malsano, aŭ, ĉar iu mortbatis lin. Li sentis sin nur kiel spektanto. Eĉ ne dum momento li havis la senton de kompato aŭ eĉ senton pri pento. Li ne devis penti ion. Kurtin estis forigita de la vojo, kaj tio donis perfektan trankvilon al li.

Li pripensis, ĉu li prenu la havaĵon de Kurtin al si, aŭ, ĉu li simple postlasu ĝin tie. Sed fininte la penson, li jam decidis sin. Estus sensencaĵo postlasi la pakaĵojn ĉi tie. Ili fariĝus predo de la banditoj aŭ de marodantaj indiĝenoj. Kurtin ja ne plu bezonis la orotrezoron. Male al tio: kiom ajn Dobbs ankoraŭ povus komenci per la valorplena ŝarĝo! Li povus ekzemple – sed tio ja tute ne estus elpensebla, kiom da aferoj li povus entrepreni per ĝi. Estus ja troigite diri, ke la

tuta ŝarĝo povus fari lin superriĉa viro, eĉ ne riĉa viro. Sed tamen bonstatulo. Kaj ĉar li ne pensiuliĝus kiel pigrulo kun ĝi, sed entreprenus ion, fondus fabrikon aŭ grandan brutbienon aŭ spekuladojn aŭ – . Ne, spekuladojn prefere ne. Estus demando, ĉu Fortuno estus je lia flanko. Sed kial ne? Ĉu eble ne pro la nekonsiderinda bagatela ago de legitima memdefendo? La plej fiaj friponoj plej bonŝancas. Nur la honestuloj kaj la honorinduloj ĉiam malbonŝancas, kion ajn ili entreprenas aŭ kion ajn ili komencas. Komprenoble, se li postlasus la tutan havaĵon tie, neniu povus riproĉi lin, ke li eble eĉ nur pro la predo defendis sin. Estas homoj kaj eĉ juĝistoj, kiuj povas tute tordi kaj malfaciligi aferon tiel, ke fine glata rabomurdo estus la rezulto. Sed, se li postlasus la ŝarĝon de Kurtin tie, kaj ĝi estus prenita de aliaj, akceptus neniu homo surtere, ke li ne prenis tion, kio apartenis al Kurtin. Pli bone estos, se li kunprenos ĝin sen hezitemo kaj por la unua tute ne afliktiĝos pri la afero. Se io publikiĝus, tiukaze li havus ankoraŭ sufiĉe da tempo por diri: „Kion vi do volas? Ĉi tie estas ja la tuta propraĵo de la viro. Mi ne ŝtelis ion de li.“ Li unue observos, kiom longe ĉio iros glate kaj en kiu grado li havos sukceson.

Tio deruliĝos same tiel simple pri la havaĵo de Howard. Se Howard trovos Kurtinon, *well*, tiukaze lia oro ankoraŭ tiel ĉeestos, kiel Howard ĝin transdonis al mi. Sed unue li devos trovi lin. Kaj se Howard iam pli poste trovos Kurtinon – neniu povas scii tion, de tempo al tempo okazas tre strangaj hazardoj – tiukaze do simple banditoj de Kurtin ĉion forprenis dum la vojaĝo kaj li ĝuste ankoraŭ povis savi la nudan vivon kaj unu sakon el la propraj. Estas ja tiom da

banditoj ĉirkaŭe. Al tiuj oni povas kroĉi ĉion, ĉar oni supozas ilin kapablaj pri ĉio. Ili mortpafis ankaŭ tiun Kurtin. Eble estos tamen pli bone diri, ke ili ambaŭ kverelis kaj pugnobatalis, kaj poste ili disiĝis. Kurtin iris poste alian vojon, kaj kio okazis al li, tion li, Dobbs, ne scias. Sed estas tamen pli bone tuj rakonti la historion pri la rabatako de la banditoj. Por kio longe rompi la kapon al si pri tio, kion diri kaj kion rakonti. Unue necesos esti en sekureco en la urbo, tiam troviĝos ankaŭ elirvojo, kiel ĉio povos esti bele ordigita. Oni ankaŭ povus atendi tute trankvile la oldulon en Tampiko kaj salti al li kun sovaĝa rakonto tiel, ke li rezignos pri ĉiu ajn esplorado. La sakon aŭ la du sakojn, kiujn oni savis el la ungoj de la banditoj, oni povus dividi kun la oldulo. Tiukaze li estos tute kontenta, ke li retenis almenaŭ iom kaj diros nenion plu. Eble okazos al la oldulo survoje ĝis la trajno ankoraŭ io malagraba. Se oni havus ĉemane nur kelkajn mestizojn! Por dudek pesoj aŭ por dudek kvin ili povus embuski la oldulon kaj forigi lin; ĉar tiukaze neniu plu scius ion pri la afero.

20

La azenoj fine surhavis la pakaĵojn. Ili staris tie pacience, trotadis paŝon aŭ du paŝojn kaj denove staris kviete. De tempo al tempo ili turniĝis. Ili atendis la vokon kaj ne tute komprenis, kial la vojaĝo ne estas daŭrigata. Ili kutimiĝis pri siaj tempoj kaj estis jam malfrue antaŭtagmeze. La ŝarĝado de la azenoj faris pli da peno al Dobbs ol li atendis.

Ne estis tiel facile ŝarĝi tute sola sen la helpo de dua persono la bestojn tiel, ke la pakaĵoj ne komencas gliti, ĉar li ne povis stari samtempe je ambaŭ flankoj de la besto. Samtempe levi ambaŭ pakaĵojn sur la portoselojn ne eblis, ĉar la pakaĵoj estis tro pezaj, kaj ĉar li ne povis levi ilin tiom alte, ke ili samtempe surseliĝu kaj tenu la balancon. Se la azenoj almenaŭ kaŭriĝus kiel kameloj por la ŝarĝado! Sed tion azenoj ne faras, ĉar ili ne estas kameloj. Ili ankaŭ ne povus starigi sin kun tia peza ŝarĝo, kvankam ili povas troti kun tia ŝarĝo dum horoj supren de la montoj kaj poste malsupren sen montri aludon de laciĝo. Laste Dobbs tamen sukcesis fini la surpakadon.

Li volis ĝuste voki la azenojn kaj doni batojn al ili, kiam li denove pensis pri Kurtin; kvankam li pensis pri Kurtin jam seninterrompe dum la tuta mateno kaj speciale dum la ŝarĝado, sed pli tiel, kiel pri malĉeestanto aŭ antaŭiranto ol pri mortulo. Ke Kurtin estas morta, morta por ĉiam, ankoraŭ ne estis tiel ligita kun lia konscio, ke li povus pensi nur pri la morta Kurtin.

Sed kiam la marŝo estis daŭrigota, li pensis pri la morta Kurtin. Kaj tiumomente venis en lian kapon la ideo, ke li ja intencis entombigi lin antaŭ la marŝo, pro la pli granda sekureco. Dum sekundoj li hezitis, ĉu li simple povus lasi kuŝi lin tiel, kiel ĝi kuŝas. Kojotoj, pumoj, vulturoj, formikoj kaj muŝoj sufiĉe rapide forigus lin. Sed tiukaze restus ankoraŭ kelkaj ostoj kaj ĉifonoj. Tio vere ne necesas, ke la ostoj faru reklamon kaj rakontu pri tio, kio okazis aŭ eble okazis.

Sed tiuj pensoj miksiĝis kun alia penso, kiu ĝis tiam estis tute fremda al li, kaj kiu faris lin sendecida. Li pensis, ke li eble ne povos vidi la kadravron sen fari stultaĵon. Ĉio ĉirkaŭ li estis tiel nenature soleca kaj kvietaj. La arbaro estis aĉe nutrata, la arboj ŝajne ne tute elkreskiĝis. Ili ŝajne ne povis decidiĝi, ĉu ili ankoraŭ kresku iom pli alte aŭ ĉu ili prefere estu plu tiel, kiel ili estas. La sekeco estas vere tro longa kaj povas kosti la vivon, se oni bezonas tro da akvo. Kaj ĉar kelkaj arboj pro prudenteco ne volas fariĝi pli grandaj, sed la tero sub ili ne akordis kun tio, tial ili kreskis kurbigite, kripole, oblikve kaj groteske.

Apenaŭ kantis birdo aŭ hastis ĉasbesto tra la vepro. Estis vento en la aero. Dobbs sentis kaj vidis tion pro la migrantaj nuboj. Sed la arboj ne moviĝis. Ili staris kiel ŝtonigitaj. Ili ŝajne ne estis verdaj, sed grize bluecaj kiel rompiĝemaj lafaj rokoj. La aero ĉirkaŭ li ŝajne fariĝis same griza kiel la lafa koloro kaj ŝajnis al li, kvazaŭ la aero estus ŝtonigita kaj do apenaŭ plu spirebla.

La azenoj staris tute trankvile, kvazaŭ ili atendus fariĝi ŝtonecaj kiel ĉio alia ĉirkaŭe. Ili turnis de tempo al tempo timige malrapide la kapon al Dobbs kaj rigardis lin per grandaj nigraj okuloj dum longa tempo. Li ektimis dum momento la azenojn kaj por forskui la timon, li iris al azeno kaj firmtiris ties ŝnurojn. Poste li iris al alia kaj skuadis je la pakaĵoj, kvazaŭ li volus kontroli, ĉu ili estas sufiĉe firmligitaj aŭ eventuale deglitos dum malsupreniĝo el la alto. Sed ili estis sufiĉe firme ligitaj. La puŝado de la bestokorpoj kaj la palpado de la feloj trankviligis lin kaj li forgesis la rigardon de la grandaj vitrecaj lumantaj karbobuloj.

„Ĉu li havas la okulojn malfermitaj, vitraj, vakaj kaj obtuzaj? Tio estus tre laŭnatura“, li diris al si, „ĉiu mortulo havas nefermitajn okulojn, kaj la okuloj estas ĉiam vitraj kaj obtuzaj. Ne“, li pensis, „ili ne estas vitraj kaj ankaŭ ne lumas kiel azenaj okuloj, ili estas ŝrumpigitaj, kiel obtuza, malklara vitro. Ili tute ne estas vitraj, ili estas nur vitrecaj. Estos tamen pli bone, se mi enfosos lin. Mi eble povus pensi pri liaj okuloj. Sed mi devos enfosi lin.

Li tiris ŝpaton el la pakaĵo. Sed kiam li havis ĝin ĉemane, li pensis denove, ke la enfosado ne estas necesa kaj signifas nur disipon de tempo. Ĝuste tial li eble ne povus atingi la trajnon ĝustatempe, kaj ju pli rapide li estos for el tiu regiono des pli bone estos.

Dum li denove volis ŝovi la ŝpaton inter la ledorimenojn, kaptis lin tamen la scivolo ekscii, ĉu Kurtin eble jam estas atakita de vulturoj. Scii tion precize, donus grandan sekurecon al li, li pensis. Li denove eltiris la ŝpaton kaj iris transen en la vepron.

Li iris rekte al tiu loko, kie Kurtin kuŝis. Li eble estus elektinta la direkton, eble eĉ la lokon kun fermitaj okuloj. Sed kiam li venis al la loko, ĝi estis vaka. Li eraris. La malheleco de la pasinta vespero kaj la flagranta lumo de la brulanta branĉo indikis la direkton ŝanĝite. Li komencis serĉi, rampadis tra la vepro kaj ŝovis sin inter la branĉojn de la arbustoj. Li subite ne sentis sin plu agrable dum tio. Li timis renkonti la kadavron, kiam li atendus ĝin neniel. Tion li volis eviti. Li pensis, ke eble eĉ povus okazi, ke li subite tuŝus

la vizaĝon de la mortulo. Eĉ nur la penso havigis al li malgrablan senton. Li pensis lasi la serĉadon tute.

Tamen, reirinte duonon de la vojo, li diris al si, ke li trovos neniam trankvilon, se li ne vidos ankoraŭfoje la kadavron antaŭ si kaj povos esti konvinkita, ke Kurtin efektive estas morta kaj ne plu faros stultaĵojn.

Plian fojon li komencis serĉi. Zigzagante li iradis tra la vepro. Poste li rekuris al la kampadejo por ekiri de tie laŭdirekte. Li subite ne plu povis rememori precize, en kiu direkto li pelis Kurtinon je la pasinta vespero. Dekfoje, dek kvin fojojn, dudekfoje li hastadis en tiu direkto, sed vane. Li ne trovis la mortulon. Ĉu li vere tiom eraris pri la direkto?

Lia ekscitiĝo kreskis pli kaj pli. La suno troviĝis jam tre alte kaj ardis senkomplete. Li ĝemis kaj ekŝvitis. Li komencis soifi terure. Sed li ne trinkis, sed verŝis la akvon senpripense grandkvante en sin.

Ĉiufoje, kiam li denove rampis tra la vepro, li nervoze turniĝis ĉiumomente. Dum sekundo li supozis, ke tio devas esti timo. Sed li konvinkis sin mem, ke tio povas esti nur nervozeco. Konscienciproĉoj tute certe ne estis, pri tio li certis. Estis nur la ekscitiĝo.

La azenoj jam fariĝis senpaciencaj. La plej antaŭaj komencis formarŝi. Kaj baldaŭ sekvis la cetera parto de la marŝkolono, indiferece trotante. Kun sakro li sekvis ilin per salto. Tio faris la azenojn timemaj kaj konfuzitaj. Ili komencis kuri. Li devis preterkuri la antaŭajn por reteni ilin. Tio faris

lin tute senspira. Li pelis la azenojn reen al la kampadejo. Jen ili staris trankvile kaj prironĝis la magrajn herbojn. Baldaŭ tiu kaj baldaŭ tiu ĉi turniĝis al li kaj rigardis lin mirigite per grandaj okuloj. Tio timigis Dobbson, kaj li ekin-tencis fermligi iliajn okulojn.

Sed li denove komencis serĉi. Kaj kiam li estis konvinkita je centa fojo esti sur tiu loko, kie li pafis sur Kurtinon, li vidis kuŝi pecon de karbigita branĉo. Kaj nun li sciis, ke li troviĝas sur la ĝusta loko. La peco en la pasinta nokto estis forrompita de la branĉo, kiun li bezonis por prilumi la lokon.

La tero aspektis senordigita. Sed tio same tiel bone povis deveni de lia propra trafosado kaj ĉirkaŭkurado. Sangon li ne povis vidi. Krome sur tiu ĉi tero apenaŭ videblus sango. Ĉu Kurtin estis fortrenita de besto? Aŭ ĉu iu trovis kaj levis lin? Per si mem li ne povis forrampi, ĉar li estis ja morta. Pri tio Dobbs ja konvinkiĝis. Certe besto fortrenis lin.

Des pli bone, pensis Dobbs. Tiukaze baldaŭ nenio restos de la kadavro. Iomete pli trankviligite, li komencis pensi pri la ekmarŝo. Sed li ĉiam denove turniĝis. Baldaŭ li supozis, ke li vidis Kurtinon inter la branĉoj. Kaj baldaŭ li subite moviĝis ektimigite, ĉar li opiniis, ke li rimarkis alian homon. Poste li denove eksaltis, ĉar li supozis, ke li aŭdis voĉojn. Kaj se ie branĉo rompiĝis au ŝtono ruliĝis, li supozis, ke pumo ŝteliradas proksime de li, tiu, kiu fortrenis Kurtinon. Tiu nun ekhavis apetiton kaj volis ataki lin de malantaŭe.

Li komandis la azenojn, kaj ili komencis marŝi. Sed la marŝo estis multe pli komplika ol Dobbs antaŭe supozis. Se li iris

antaŭe, la lastaj azenoj postrestis kaj komencis disiri por serĉi herbojn sur flankaj padoj kaj inter arbustoj. Kelkajn fojojn li devis haltigi la marŝtaĉmenton, ĉar li devis rekonduki postrestintajn azenojn.

Poste li iris fine de la marŝtaĉmento. Nun la antaŭaj azenoj disirinte ekvadis kaj la tuta azenaro disiĝis. Tial li prenis ŝnurojn kaj ligis ĉiun azenon al la portoselo de la antaŭiranta azeno por kunteni la azenojn. Denove li iris antaŭe por gvidi. Sed tuj, kiam unu el la postaj azenoj ne povis sekvi kaj tiris je la selo de la antaŭa, haltis la antaŭa azeno kaj la tuta azenaro kun ĝi.

Li komencis do okupiĝi nur pri la kondukanta azeno por vipi ĝin antaŭen kaj devigi ĝin kuntiri la aliajn. Tio funkciis tiel ĉirkaŭ kvindek paŝojn. Poste tio fariĝis tro stulta por la azeno. Ĝi haltis, firme apogis la antaŭajn piedojn antaŭe, metis la longajn orelojn malantaŭen kaj staris firme kiel roko. Ĉu Dobbs vapis ĝin, ĉu Dobbs tretis per la botoj en ties molajn flankojn, ne moviĝis la azeno. Ĝi ja ne sciis, kio okazas. Ĝi marŝu antaŭen, sed samtempe ĝi estis tirata malantaŭen. Dobbs ŝanĝis plian fojon sian taktikon kaj transprenis mem la gvidadon de la azenoj kaj tiris la antaŭan azenon. Tio dum certa tempo tre bone funkciis. La azenoj ĉiuj postsekvis. Sed kiam la kondukanta azeno lernis, ke estas por li pli facile kaj pli oportune esti tirata ol libervole iri, li lasis sin pli kaj pli tiri kaj treni, ĝis Dobbs fine devis tiri tiom grandan ŝarĝon, kvazaŭ troviĝus tuta trajnvagonaro je la ŝnuro, kiun li tiris post si trans la ŝultron. Li devis rezigni pri tio, kaj denove provis peli la azenojn de malantaŭe kaj li

ĉiam kuris laŭ la azenaro antaŭen kaj malantaŭen, por kurenti la vagemajn azenojn.

Poste venis tempo, kiam la vico de la azenoj iris tute libervole kaj sen kaŭzi penon. La azenoj kutimiĝis pri la trotado kaj tenis sin laŭorde sur la pado. Tio okazis tiel trankvile kaj agrable, ke Dobbs povis oportune posttroti ilin kaj ĉe tio bruligi al si la pipotabakon. Kaj ĉar li devis fari nenion alian krom iri trankvile sian vojon, la pensoj rekomencis labori en li.

Mi ne rigardis sufiĉe detale, li pensis. Eble li ne estis morta, sed nur tre grave vundita. Nun li rampas tra la vepro kaj fine alvenos en indiĝenan vilaĝon. Tiam ĉio estos finita. Li turnis sin unufoje, ĉar li supozis jam aŭdi post si la indiĝenojn, kiuj persekutas lin, por transdoni lin al la polico.

Sed li ankoraŭ ne povus esti en vilaĝo. La vilaĝoj estas malproksimaj. Kaj eĉ se li vere ankoraŭ ne estus morta, li tamen estis trafita tiel gravege, ke li povus moviĝi antaŭen nur tre malrapide. Mi devos trovi lin kaj fini lin por ĉiam, pensis Dobbs plu. Nun tio estas ja jam ĉiukaze provo de murdo kaj stratrabado. Tio kostus dudek jarojn sur la Sankta-Maria-Insulo.

Fine li ne vidis alian eblon ol reiri kaj denove serĉi la kadavron aŭ la vunditan Kurtin. Venis en lian kapon, ke li serĉis en certa direkto eĉ ne unu fojon. Tio estis la kontraŭa direkto de tiu loko, kie li lasis kuŝi Kurtinon, malantaŭ la fajro sur la alia flanko de la vepro. Tie li ankoraŭ ne esploris. Kaj estis tute klare, ke Kurtin rampis al la kampadejo por

trinki, kaj poste rampis plu en tiu direkto, ĉar tiu direkto rekondukis lin en la proksimecon de tiu vilaĝo, kiun ili vidis hieraŭ posttagmeze. Dobbs dormis trankvile kaj ne vidis kaj ne aŭdis ion. Krome Kurtin eble ne tute proksimiĝis al la kampadejo por ne vekti Dobbson kaj ne kapti la lastan kuglon. Defendi sin li ja ne povus. Neniu dubo eblis, Kurtin rampis en tiu direkto kaj en tiu direkto li devos trovi lin.

Estis mallonge antaŭ la vespero, kiam Dobbs revenis al la malnova kampadejo. Li ne prenis al si la tempon por malŝarĝi la azenojn, sed tuj komencis serĉi. Nun li serĉis en tiu direkto kun la sama hasto kaj la sama fervoro, per kiu li serĉis antaŭtagmeze en la kontraŭdirekto.

Sed la nokto rapide komenciĝis

kaj Dobbs devis fini la serĉadon.

Nun restis nur unu elirvojo al li. Li ne povos disipi eĉ nur plian horon je la serĉado. Morgaŭ matene li devos tuj ekmarŝi kaj atingi kiel eble plej rapide la haltejon en Durango, tie tuj vendi la azenojn kaj la laborilojn kaj sidiĝi en la sekvan trajnon, por foriĝi en pli granda urbo. Al Laredo, *Eagle Pas*, *Brownsville* aŭ al alia limhaltejo li ne rajtis iri dum certa tempo. Ĉar tiukaze, se Kurtin efektive atingus vilaĝon aŭ Howard estus survoje, la limo tute certe unue estus traserĉata pro li.

Je la pasinta posttagmezo Dobbs vidis ekde senarbejolo de alta monto malprokisme la fumnubojn de veturigata trajno. Laŭ tio la distanco ĝis tie ne povus esti plu tre granda.

21

Jam frutempe Dobbs survojis. La azenoj marŝis sufiĉe obeeme, post kiam ili devis ektroti. La bestoj estis pli bonvolemaj ol en la tago antaŭe, ĉar ili ne devis stari tiom longtempe, kaj ĉar ili jam konis la unuan parton de la vojo. Tamen azeno eskapis kaj Dobbs ne povis kapti ĝin. Li devis rezigni pri ĝi, ĉar aliokaze li perdus tro da tempo. Dum la persekutado la pakaĵo estis forte puŝita kontraŭ arbojn, la ledorimenoj disŝiriĝis kaj la azeno trotis sen la pakaĵo plu. Dobbs tial decidis distribui la pakaĵojn. La azeno ja sekvos kaj vespere libervole revenos en la kampadejon.

Nun Dobbs preskaŭ seninterrompe povis vidi la fervojlinion malproksime. La vojo kondukis dum la tuta tago seninterrompe malsupren en la valon. Facile li povus atingi la haltejojn Chinacates aŭ Guatimape je la sama posttagmezo. Sed en tiu eta vilaĝo li frapus tro la atenton pro sia azenaro. Nun pli ol antaŭe, ĉar li estis tute sola. Tio vekus suspekton. Krome en tiu loketo neniu aĉetus de li la azenojn, la laborilojn aŭ aliajn aĵojn, kiujn li devus vendi por povi pagi la velturbileton kaj la ekspresfraĵton.

Tial ne restis io alia al li krom marŝi ankoraŭ la distancon ĝis Durango, kie li malpli okulfrape povos entrepreni siajn negocojn. Estos do ankoraŭ du tre streĉaj marŝtagoj. Eble eĉ tri. Se li nur scius, ĉu Kurtin estas morta ĉu ne. Sed finfine oni lasu foje okazon ankau al la bonkora Fortuno.

Pretigante vespere la kampadejon, Dobbs sentis sin pli trankvila ol dum la du antaŭaj tagoj. Efektive ne estis konscienciproĉoj, kiuj maltrankviligis lin. Estis antaŭ ĉio la obtuza sento, kiun oni ekhavas, se oni faris laboron nur je duono aŭ sufiĉe neglekteme. Kaj li faris sian laboron pli ol nur neglekteme. Tio venĝis sin. Tio lin malcertigis. Li estus devinta frakasi la kranion de Kurtin tute, li estus devinta puŝi la tranĉilon en ties koron kaj enfosi lin ankoraŭ en la sama momento. Tio estus kompleta laboro, kiu havigus al li veran kontentigon kaj trankvilon. „Faru vian laboron perfekte kaj tuj“, oni instruis lin jam, kiam li estis ankoraŭ infano. Kaj kiam fine foje ĉio dependis de tio, li faris la laboron nek perfekte nek tuj.

Sed tiam tiu azeno trotis proksimen, kiu eskapis je la tago antaŭe kaj nun ĝi revenis al siaj kunuloj. Du el la paŝtiĝantaj azenoj ŝovis la kapojn tute antaŭen kaj blekis. Ili certe estis ĝiaj pli intimaj amikoj. Sed la reveninta azeno iris al alia azeno, priflaris ĝian kolon kaj gratis ĝin tie per la dentoj kaj komencis paŝti sin apud la alia, tiel indiferente, kvazaŭ ĝi iris nur kvin minutojn iom flanken kaj ne trotis tutan tagon en distanco de kelkaj mejloj post la azenaro.

„Jen mi ja bonŝancas“, Dobbs vokis ridante, kiam li vidis proksimiĝi la trotantan azenon. „Estas dek kvin pesoĵ savitaj. Post kiam pasos du tagoj, mi povos skribi trankvile leteron al la oldulo kaj sendi al la alia ulo kuraciston. Ili tiam ne plu povos grati min sub la ungoj.“

Li tiom gajis, ke li komencis fajfi kaj fine eĉ kanti. Krome li dormis en tiu ĉi nokto multe pli trankvile ol en la antaŭa,

kiam li kelkfoje vekiĝis pro brusonoj, kiuj timigis lin, kvankam ili estis tute naturaj.

Antaŭ tagmezo de la sekva tago, kiam la pado kondukis trans monteton, li malsupre povis jam vidi malproksime Durangon. Durango, la aminda juvelo de la *Sierra Madre*, kiu estas ĉiam banata en ora lumo kaj mallaŭte ventumata de softaj zefiroj dorlotantaj ĝin kiel delikataj inaj manoj. Ĝi estas krome kareseme nestigita inter gardantaj montoj. „Urbo de l' sunlumo“ ĝi estas nomata de tiuj, kiuj vidis ĝin kaj kiuj resopiras ties intiman karesemon.

Patrino Tero metis al ties flanko mondomiraklon tian, kia apenaŭ ekzistas dua, la monton „*Cerro del Mercado*“, monton el pura fero, pezanta 600 milionojn da tunoj. Patrino Tero ne estas avara, se ĝi foje montras la kapricon disdoni donacojn.

Je tiu ĉi vespero li kampadis lastan fojon. Morgaŭ vespere li estos en Durango kaj la sekvan matenon li sidos en la trajno al Canitas. La vendo de la azenoj kaj de la ceteraj aĵoj okazos rapide. Li postulos tiom, kiom li bezonos proksimume.

Li jubilis. Li sentis sin sur la sekura flanko. Se la vento favore blovis transen al li, li povis aŭdi la bojadon de la frajtraĵoj tra la kvieto de l' nokto. Kaj tiu strange hurlanta bojado de la lokomotivoj, kiu povas soni tiel makabre kaj fantomece, enfluigis al li senton, kvazaŭ li jam estus en hotelo proksime de la fervojo. Estis la krio de la civilizacio. En tiu krio li sentis sin protektata. Li sopiris la leĝojn, la laŭjurecon, la firmajn murojn de la urbo, ĉiujn tiujn aĵojn, kiuj

protektos lian havaĵon. Interne de tiu sfero, kie leĝoj konfirmas la propraĵon kaj kie fortaj potencoj havigas respekton al la leĝoj, li estos sekura. Tie ĉiu afero, ĉiu akuzo estas pruvenda. Kaj se nenio pruveblas, tiukaze la havanto estas la laŭleĝa posedanto, kies propraĵo estas protektata per fusiloj kaj prizonoj. Sed li eĉ evitus devi havigi pruvojn. Li iros atenteme preter ĉiuj ĉi ŝtonoj kaj ŝtonetoj, pro kiuj oni povas stumbli tiel facile, kiam oni devas teni malfermitaj siajn okulojn en ĉiuj direktoj. Kion Howard povus fari? Nenion. Se li provus atingi ion helpe de la polico aŭ de tribunalo, tiukaze li mem sidus en la kaĉo. Li ja fosis mem minon kaj ekspluatis ĝin sen peti la permeson de la registaro. Li priŝtelis la ŝtaton kaj la nacion. Li do certe gardos sin entrepreni ion kontraŭ li. Kaj Kurtin, ĉu? Se li efektive vivus, kion li povus fari kontraŭ li? Same tiom malmulte. Ankaŭ li, Kurtin, priŝtelis la ŝtaton, li ja devus konsenti tion, se li volus akuzi lin. Dobbs ne priŝtelis la ŝtaton. Neniu povos pruvi tion al li. Ĉu murdoprovo? Ankaŭ tion Kurtin ne povos pruvi. Neniu vidis tion: La pafcikatroj, ĉu? Kiu sciu, en kiu boksbatalo aŭ eĉ en kiu stratrabado entreprenita de li, li eble ricevis la vundojn. Dobbs estos tiam nobla, eleganta bonstata sinjoro, kiu povas lupreni multekostan advokaton. Per li oni akceptos, se li kalumnios la du aliajn per nobla malŝata gesto kiel stratrabistojn. Oni devos ja nur rigardi ilin. Kaj krome ili ja priŝtelis la ŝtaton. Li ja aranĝos ĉion laŭplaĉe. Ili neniel povos damaĝi al li, ne, kiam li troviĝos sub la protekto de la leĝoj. Estas ja bone, ke ekzistas leĝoj.

Nur ĉi tie, antaŭ ol li atingos la haltejon, antaŭ ol li povos kaŝi sin sub la gardantaj brakoj de la leĝoj, la duopo povos entrepreni ion kontraŭ li. Sed ili estas malproksimaj de li

kaj morgaŭ li estos en sekureco. Eble ili trovos lin poste tute hazarde ie en Usono aŭ en Meksiko aŭ eĉ en Eŭropo. Ili kompreneble impertinente povos krii al lia vizaĝo, ke li estas rabmurdisto, stratbandito, tute fia fripono. Tion ili povus fari. Kontraŭ io tia oni estas sendefenda. Sed tio ne impresos lin. Kaj se ili troigos la aferon, li akuzos ilin pro kalumnio kaj insulto. Ĉar tio estus kalumnio, ĉar neniu juĝisto en civilizita lando akceptus, ke tiaj aferoj povus okazi ie surtere. Jam ne plu, ne plu nun. Tio okazis ankoraŭ antaŭ cent jaroj, eble antaŭ kvindek jaroj. Nun ne plu. Nenie surtere. Tiaj foraj kaj ne gardataj regionoj ne plu ekzistas. Tion scias ĉiu juĝisto. Li ridos pri tio. Kaj tiam la kalumniinto devos pagi sukan punmonon aŭ malaperi en prizono, ĉar Dobbs estos honorinda kaj bonstata viro, kiu estas akirinta sian monon per laŭleĝaj spekuladoj.

La oldulo aŭ Kurtin kompreneble povus inside murdi lin. Tion ili povus fari, kontraŭ tio oni estas sendefenda spite al ĉiuj leĝoj. Sed poste oni pendumus ilin aŭ ili troviĝus sur eklektra seĝo. Tion ili scios antaŭe, kaj tial ili prefere lasos tion.

Jen bojas denove lokomotivo tra la nokto. Estas por Dobbs, kvazaŭ li aŭdus muzikon. La muziko de l' gardateco.

Strange, ke Kurtin tute ne kriis, kiam li pafmortigis lin, ke li ne ĝemis, ke li ne plorĝemetis, ne stertoris, ne ĝemis. Nenio, nenio. Li renversiĝis tuj kiel dehakita arbo, falis laŭlonge kaj estis morta. Nur la sango fluis kaj premis sin larĝe kaj tenace tra la ĉemizo. Jen la ununura movo. Kaj kiam Dobbs kun brulanta branĉo prilumis lin kaj atendis, ke li sentos

hororon, li vidis nur la blankan rigidan vizaĝon. Li ne povis teruriĝi, ĉar Kurtin kuŝis tiel komike elartikigite, ke Dobbs preskaŭ ridis pri la groteska elartikiĝo de la korpo.

Kaj Dobbs subridis nun por si mem. Li trovis tion tiel komika, ĉion, kiel Kurtin falis laŭlonge, kiel li kuŝis tie tiel silenta, kaj kiel tuta vivo per tia mallaŭta facila premo de la revolvera ĉano estis finita por eterneco.

Sed kie povus esti la kadavro? Ĉu li estas kidnapita? Trovita kaj ensekurigita, ĉu? Ĉu fortrenita de pumo aŭ de jaguaro? Sed tion li certe estus vidinta. Eble li ankoraŭ ne estas morta, ĉu?

Dobbs fariĝis maltrankvila. Li komencis frostotremi. Li incitadis la fajron, poste li turniĝis kaj rigardis trans la senarbejon, poste transen en la arbustaĵon. Fine li devis stariĝi. Li iris tien kaj tien. Li flustris al si, ke li devas fari tion por varmigi sin, sed efektive li faris, ĉar li tiel pli simple povis rigardi preskaŭ samtempe ĉiudirekte. De tempo al tempo li supozis, ke li vidas iun proksimiĝi ŝtelire. Poste li denove opiniis aŭdi, ke iu proksimiĝas al la bivakfajro. Kaj tiam li havis subite la senton, ke iu staras tute proksime malantaŭ lia dorso, ke li ĵus sentis ties spiron je orelo, kaj ke la pinto de longa tranĉilo celas lian dorson. Per subita movo Dobbs saltis antaŭen kaj turniĝis, kun eltirita revolvero. Sed li vidis nenion. Li vidis nenion krom la malhelaj ombroj de la azejoj, kiuj enue paŝtis aŭ sternis sin.

Dobbs senkulpigis sin per tio, ke oni ĉiam devas esti memgardema, ke tia konduto tute ne estas ridinda kaj ke ĝi ne

havas ion komunan kun timo aŭ eĉ kun konscienciproĉoj. Tiu, kiu estas tiel sola en la sovaĝejo kaj kunportas valorplenan ŝarĝon, ĉiam estas iom nervoza. Tio estas tute normala. Kaj tiu, kiu ne koncedas tion al si, trompas nur sin mem. Li dormis en tiu nokto ne tute tiel bone kiel en la antaŭa nokto. Sed li ankaŭ tuj sciis la kaŭzon. Estis nur tial, ĉar li estis tro lacigita. La ekmarŝo matene hezitiĝis, ĉar kelkaj azenoj vagadis tro malproksimen kaj rekondukendis. Dobbs estis tro neglektema, kiam li piedkatenis la azenojn. Li perdis du horojn.

La vojo fariĝis pli bona kaj ĉirkaŭ tagmezo Dobbs povis taksi, ke li estos post tri horoj en Durango. Ne estis lia intenco tuj iri en la mezon de la urbo, sed li volis halti ĉe la unua *fonda*, kiun li trovos ĉe la rando de la urbo. Tie li volis intertrakti kun la posedanto, ke li havigu al li aĉetantojn por la bestoj, se li ne transprenos ilin tuj mem kontraŭ malkara prezo por fari bonan negocon. Poste li ŝarĝus la tutan ceteran pakaĵaron, do la sakojn kun la ununure grava havaĵo sur ĉaron kaj veturigis ĝin al la ekspresfraĵta oficejo. Tio tiam neniel frapus la atenton. Li simple povus deklari ilin kiel sekajn felojn. Li pagus la plej altan takson por komercaj varoj kaj tiam neniu plu okupiĝus pri tio.

La vojo fariĝis neimageble sableca kaj polveca. Unu flanko de la vojo estis malfermita. Je la alia flanko leviĝis muro el seka rompiĝema argilo kaj pecetiĝanta veterbatita ŝtono. Dorneca arbustaĵo kaj agavaj plantoj staris lacaj, soifaj kaj kovritaj de alta tavolo de polvo je kelkaj lokoj apud la vojo.

Se la vento leviĝis, aŭ se ventopuŝo preterhastis, staris grandaj kolonoj el sufoka polvo en la aero. Ili malfaciligis la spiradon. Kaj la sablo atakis la okulojn tiel, ke ili ekdoloris kaj ŝajne blindiĝis dum kelkaj minutoj. Kiam la ventopuŝo jam preterflugis, la aero ne moviĝis kaj ŝarĝis peze, kvazaŭ ferece, la teron. Tiam bolis kaj ardis la aero kaj la polvo brutetigis kaj rostis la haŭton. La tero, dum monatoj atendante la pluvon, ne povis elteni la ŝarĝantan perforton de la suno kaj reĵetis kun turmentiga pasio la lumadon alten. La ŝanceliĝanta brilo de la akra sunlumo atakis la okulojn kaj cerbojn de la homoj kaj bestoj tiel, ke ili ŝanceliĝante treniĝis antaŭen, fermante la okulojn tiel, ke ili ne povis pensi pri io alia krom pri la fino de tiu suferado.

La azenoj ŝanceliĝante trotis plu kun duone fermitaj okuloj. Neniu provis vagadi, neniu eskapis. Ili iris kiel aŭtomatoj. Ili movis apenaŭ la kapojn. Ankaŭ Dobbs tenis la okulojn fermitaj. Se li malfermis ilin nur je fendeto, alĵetiĝis kruela ardanta fluo de akra lumo tiel, ke li supozis, ke la okulgloboj devos forbruli tuj.

Tra malvasta fendo en la okuloj li vidis stari kelkajn arbojn ĉe la vojo. Li pensis, ke tie li volas halti iom, kvin minutojn aŭ dek, por povi apogi sin per la arbotrunko, por senti la ombbron kaj malfermi la okulojn por ripozigi ilin. La azenoj starante reteneblos ja facile kaj estos kontentaj povi ripozi en la ombro.

Li venis al la arboj, kuris antaŭen, turnis la gvidantan azenon kaj la azenaro haltis. La azenoj per si mem urĝis en la

ombron kaj restadis trankvilaj. Dobbs iris al la akvosako, lavis la polvon de sia buŝo kaj trinkis akvon.

„Ĉu neniu cigaredo, homo?“ li subite aŭdis paroli iun.

Li ekmoviĝis timigite. Ekde tagoj estis la unua homa voĉo, kiun li aŭdis.

En la unua momento, kiam li aŭdis la paroladon, li pensis pri Kurtin, poste tuj pri Howard. Sed tiam li ekkomprenis ankoraŭ en la sama sekundo, ke ĝi sonas hispane, kaj ke tiu ne povas esti unu el liaj du kunuloj. Li turnis la kapon kaj vidis kuŝi sub unu el la plej proksimaj arboj tri virojn. Ili estis tute ĉifonkovritaj kaj trivitaj mestizoj. Homoj, kiuj eble antaŭe dum sufiĉe longa tempo laboris en iu mineja asocio kaj poste dum multaj monatoj estis sen laboro. Ili vagadis ĉi tie ekstere en la proksimeco de la urbo, dormis, pigris, almozpetis kaj, se ili ie povis ŝteli iom, ili rigardis tion destino fare de Dio, kiu ne lasas malsatmorti paseron, eĉ se tiu nek plugas nek semas.

Eble ili estas eskapintaj punkaptitoj aŭ serĉataj pro nesukcesa afero kaj kaŝas sin ĉi tie, ĝis kiam estos kreskintaj barboj al ili, kaj ili rajtos esperi reiri en la urbon sen esti ekkonataj. Tiuj, kiujn la urbo eĉ ne toleras sur siaj rubejoj, vagadas ekstere ĉe la vojoj kondukantaj al la urbo. Longan distancon for de tie, kie komenciĝas rustigitaj ladjkonservujoj, disrompitaj boteloj, truigitaj emajlaj potoj, premkavigitaj siteloj, flaviĝintaj eroj de gazetoj kaj ĉiuj ceteraj elkraĉaĵoj, kiujn ĉiutage elĵetas civilizita urbo. En la tropika zono ne estas pli bone ol ie aliloke. Neniu besto estigas tiom da rubo

kaj koto kiel civilizitaj homoj; kaj forigi la rubon, kiun la homoj ĉiutage estigas, kostas al la homoj simile tiom da peno, laboro kaj pripensado, kiom la produktado kaj foruzado de la aĵoj, kiujn ili supozas bezoni.

Dobbs estis ja dum sufiĉe longa tempo en la lando por scii, ke li troviĝas nun en unu el la plej diablaj situacioj, kiujn li atendis iam ajn. Tiun elkraĉaĵon de la urboj li konis. Ili estas la uloj, kiuj povas perdi nenion, sed tiukaze laŭ senco, kiu lasas uzi sin pri neniu alia homtavolo.

Li pensis nun, ke li ege eraris per tio, ke li deturniĝis de la vojo por ĉi tie ripozi dum kvarono de horo enombre. Pli sekura li ankaŭ sur la vojo ne estis, sed li ne estus tiel senelireje en la kaptilo, kiel en tiu momento.

„Cigaredon mi ne havas. Mi eĉ ne gustumis iun dum dek monatoj.“

Tio sonis tre bone. Li diris per tio samtempe, ke li mem estas povra diablo, kiu eĉ ne povas aĉeti cigaredon.

„Sed mi havas ankoraŭ iom da tabako“, li aldonis.

„Ĉu papero por rulumado?“ demandis unu el la viroj.

La viroj ankoraŭ kuŝis trankvile kaj pigre sur la tero. Ĉiuj turniĝis al li, unu el ili kaŭrante, alia apogante sin per brako, kaj la alia kuŝante laŭlonge surventre kaj la kapon flegme klinite iom flanken por rigardi Dobbson.

„Pecon da gazeto mi havas“, diris Dobbs.

Li eltiris la tabakujon, tiris pecon de papero el poŝo kaj transdonis ĝin malsupren al tiu, kiu troviĝis plej proksime al li; ĉar tiu ne penis ekstari por laŭorde akcepti la tabakon.

Ĉiuj deŝiris paperpecon kaj surŝutis la tabakon. Poste ili rulumis la cigaredojn kaj la plej antaŭa redonis la tabakujon al Dobbs.

„Ĉu *cerillos*? Ĉu alumetojn?“ demandis tiu, kiu redonis la tabakujon.

Dobbs ŝovis manon en poŝon kaj eligis la alumetojn. Ankaŭ la skatoleton kun la alumetoj la uloj redonis.

„Ĉu al Durango?“ demandis unu el ili.

„Jes, mi volas vendi la azenojn. Mi bezonas monon. Mi havas neniom.“

Tio estis prudenta respondo, pensis Dobbs, nun ili jam scias, ke mi havas neniom enpoŝe.

Ĉiu el la triopo ekridis. „Mono estas ĝuste tio, kion ankaŭ ni bezonas, ĉu? Miguel? Tiun atendas ankaŭ ni, monon.“

Dobbs apogis sin kontraŭ arbo tiel, ke li povis observi la triopon. Li ŝtopis nun sian pipon kaj ekbruligis la tabakon. Lia tuta laceco finiĝis. Li serĉis elirvojon. Eble mi povus uzi ilin kiel pelistojn, li pensis. En tiu kazo tute ne frapos la atenton, kiam mi alvenos en la urbon. Estus pli bone, ol se mi alven-us tien tute sola kun la karavano. Tiukaze ili ne estos danĝeraj, ili havas la laboron, ĉiu el ili atendas peson,

kaj tiel ili forgesos aliajn intencojn. Tiukaze ili jam sentas manĝon en la stomako kaj kelkajn glasojn da tekilo.

„Mi povus bezoni du aŭ tri pelistojn“, li diris.

„Ĉu vi povus?“ ridante demandis unu el ili.

„Jes, la azenoj faras problemojn. Ili ne volas kunesti.“

„Kion vi do volus pagi?“ demandis alia.

„Unu peson.“

„Ĉu al ĉiuj aŭ al ĉiu?“

„Al ĉiu. Kompreneble nur, kiam ni estos en la urbo, kaj mi tie estos enkasiginta monon. Nun mi havas eĉ ne unu centavon enpoŝe.“

Denove Dobbs pensis, kiel prudenta kaj klara estas la respondo.

„Ĉu vi estas tuta sola?“ demandis nun tiu, kiu apogis sin sur la brakon.“

Kion mi respondu? pensis Dobbs. Sed por ne tro longe lasi atendi ilin je respondo kaj per tio vekti suspekton, li respondis: „Ne, mi ne estas sola. Venos du pliaj el miaj amikoj malantaŭ mi sur la vojo kun la ĉevaloj.“

„Tio estas stranga, Miguel, ĉu vi ne pensas la saman?“ diris tiu, kiu kuŝis longe etendiĝinte sur la ventro.

„Jes“, Miguel konsentis, „tio estas efektive stranga. Li iras ĉi tie tute sola kun sia granda karavano kaj lasas sekvi siajn amikojn sur ĉevaloj.“

„Ĉu vi vidas alveni la amikojn sur la ĉevaloj?“ demandis tiu, kiu apogis la kapon.

„Mi rigardos foje“, rediris la etendiĝinto. Li leviĝis malrapide, elpaŝis de la arboj kaj rigardis la vojon supren, kiun oni povis vidi malproksime pli bone ol proksime.

Li revenis kaj diris: „La du amikoj kun la du ĉevaloj estas ankoraŭ tre malproksimaj. Certe horon. Tio estas stranga, Miguel, ĉu ankaŭ vi opinias tion?“

„*A decir verdad*“, diris Miguel, „ankaŭ mi pensas, ke tio estas tre stranga. Kion vi tie ŝarĝis?“ li demandis poste, leviĝis kaj iris al unu el la azenoj.

Perpugne li frapadis la pakaĵojn.

„Ŝajne estas feloj“, li diris.

„Jes, ankaŭ feloj“, koncedis Dobbs. Li sentis sin pli kaj pli malagrabla kaj pensis pri la ekiro.

„Pumojn, ĉu?“

„Jes“, diris Dobbs leĝere, „ankaŭ estas pumoj inter ili.“

„Tiu alportas konsiderindan sumeton“, opiniis Miguel kun faksperta mieno kaj retropaŝis de la azeno.

Por kaŝi sian maloportunecon, Dobbs iris nun al azeno kaj pli firmtiris la ledorimenojn, kvankam tio tute ne necesis. Poste li iris al alia kaj skuis ĉe la pakaĵo, kvazaŭ li devus konvinkiĝi pri tio, ke ili estas sufiĉe firme ligitaj. Post tio li fermtiris sian zonon kaj ŝiris la pantalonon pli alten, kvazaŭ li pretigus sin por la pluvojaĝo.

„Nu, mi devos nun – jes ja, nun mi devos migri plu, por ankoraŭ esti antaŭvespere en la urbo.“ Dirante tion, li frapis sian pipon je sia levita botokalkanumo, ĝis ĝi estis malplena. „Kiu do volas kuniri kiel pelisto al Durango?“ Li retrorigardis, sed rondcirkligis samtempe la azenojn por kun kolekti ilin.

Neniu el la uloj donis respondon. Ili rigardis sin reciproke kaj interŝanĝis rigardojn. Iun el la rigardoj Dobbs kaptis kaj ekpuŝis azenon por trotigi ilin. La azeno ektrotis, kaj alia sekvis ĝin flegme. Sed la ceteraj restadis starantaj kaj prironĝis herbojn. Dobbs iris al alia azeno kaj vokis lin. Ankaŭ tiu komencis ektroti.

La viroj ekstaris. Ili promenis inter la azenoj ankoraŭ starantaj kaj urĝis ilin, ŝajne senintence, malantaŭen, aŭ ili starigis sin tiel, ke la azenoj ne sekvis, sed denove haltis, kiam ili jam faris paŝon.

Sed tiam la azenoj komencis fariĝi maltrankvilaj. Vidante, ke la pinto jam marŝas kaj estas survoje. Ili ŝovis la virojn flanken por ricevi spacon. Sed la viroj fariĝis nun viglaj kaj impertinente kaptis la ŝnurojn de la azenoj kaj firmtenis ilin.

„For de la azenoj!“, Dobbs kriis koleriĝinte.

„Kio?“ defie diris Miguel, antaŭen ŝovante la kapon. „Ni povos vendi ilin tiel, kiel vi mem, ili ne fariĝos pli aĉaj pro tio, ke vendos ni ilin.“

La du aliaj ridis kaj prenis eĉ duan azenon al si.

„For de la azenoj, mi diras ankoraŭfoje!“ kriis Dobbs kun pli laŭta voĉo. Li retrosaltis paŝon kaj eltiris la revolveron.

„Per via feraĵo vi ne povas timigi nin“, mokis unu el ili, „ne nin.“ Vi povas pafi nur al unu viro el ni. Kaj al tiu estos ĉiukaze tute egale.“

Retroiru kaj redonu la azenojn!“ kriis Dobbs.

Poste li pafis al la plej proksima, al Miguel. Sed la revolvero klakis nur seke kaj metale. Trifoje, kvinfoje, sepfoje klakis la revolvero. Neniu pafis knalis. Dobbs fikse rigardis kaj la viroj gapis perplekse. Mirigite ili forgesis ridi aŭ moki.

Sed unu el ili kliniĝis kaj kaptis pezan ŝtonon.

Sekvis nur sekundo, rapida sekundo. Kaj en tiu sekundo revenis la pensoj al Dobbs tiel rapide, ke li devis pensi eĉ ankoraŭ en tiu mallonga sekundo, kiam decidiĝis lia vivo, kiel nur eblas, ke oni povas pensi en tia sekundo tiom multe. Lia unua penso estis, kial povis okazi, ke la revolvero ne funkciis. Sed tiam venis tute longa historio en lian konscion. En tiu nokto, kiam li pafis al Kurtin, li ŝteliris al la dormanta Kurtin, eltiris ties ŝargitan revolveron kaj poste pafis per ĝi

sur lin. Kurtin havis ambaŭ revolverojn en la poŝoj, sian propran kaj tiun de Dobbs. Ĉar ambaŭ revolveroj estis signitaj kaj Howard povus ekkoni la revolverojn, lastfine Dobbs forĵetis tiun de Kurtin al Kurtin, per kiu li antaŭe estis pafinta ankoraŭfoje sur lin, kiam li trovis lin je dua fojo. Sed la propran revolveron li prenis al si. Tiel ekestus la ŝajno – ke tiukaze se oni trovus Kurtinon – li estas atakita kaj defendis sin. La revolvero de Dobbs havis alian kalibron, el lia revolvero la pafoj ne fareblis. Dobbs forgesis nur unu aferon. Kiam li prenis sian propran revolveron al si, li forgesis reŝarĝi ĝin. Li forgesis, ke en tiu punkto, kiam Kurtin forprenis la revolveron de li, tiu malŝarĝis la revolveron. Inter ĉiuj aliaj pensoj, kiuj tiom okupis lin dum la lastaj tagoj, li eĉ ne pensis pri tio, ke la revolvero ankoraŭ nun plu estas neŝarĝita.

Ankoraŭ en la sama sekundo Dobbs pensis pri alia armilo. Li staris proksime ĉe unu el la azenoj, je kies pakajo estis ligita maĉeto. Li kaptis ĝin por eltiri la maĉeton kaj por defendi sin per ĝi. Li estus eĉ sukcesinta. Kun la maĉeto en la mano li eble estus trovinta la tempon por ŝarĝi la revolveron, ĉar li havis kelkajn unuopajn kartoĉojn en la ĉemizo-poŝo.

Sed jen la sekundo finiĝis kaj la ŝtono tuj trafis lian kapon. Li vidis ĝin alflugi, sed ne povis sufiĉe rapide deturni la kapon, ĉar li dediĉis sian lastan penson tute al la maĉeto.

La ŝtono renversigis lin pli pro la flugenergio ol pro la vundiĝo.

Sed antaŭ ol li trovis la tempon denove surpiediĝi, Miguel jam estis ĉe la maĉeto, je kiu li estis atentigita nur pro la movo de Dobbs. Per lerta manmovo li tiris la maĉeton el la longa ledingo, saltis al la kuŝanta Dobbs kaj per forta, mal-longe kaj lerte svingita bato glate dehakis la kapon de la nuko de Dobbs.

Ne tre timigitaj, sed perpleksaj pri tiu rapida agado, gapis ĉiu el la triopo sur la kadavron. La okuloj de Dobbs, kies kapo nur je la largŝo de la maĉeto malproksimis de la trunko, konvulsiis nerveze kaj tiam ili abrupte haltis je tri kvaronoj malfermitaj. Ambaŭ manoj etendiĝis kaj poste kramfekuntiriĝis. Tion ili ripetis kelkajn fojojn. Tiam, post kiam ili premis la ungojn je lasta fojo en la propran manplaton, ili malfermiĝis softe kaj mortaj haltis duone malfermitaj.

„Tion faris vi, Miguel“, diris unu el la du aliaj mallaŭte kaj proksimiĝis.

„Tenu fermita vian buŝon“, kriis Miguel kolere kaj turnis sin tiom rapide al la parolinto, kvazaŭ li volus mortbati ankaŭ lin. „Tion mi scias mem, kiu kroĉis baton sur lin, leporulo. Se tio konatiĝos, oni pafmortigos vin same tiel certe kiel min. Tion vi ja scias, aŭ ĉu mi rakontu tion al la policianoj? En mia kazo tio ne ŝanĝus ion, kaj via flegopatrino mi ja ne estas.“

Li rigardis la maĉeton. Estis nur iomete da sango sur ĝi. Li forfrotis ĝin je la arbo kaj poste li ŝovis ĝin denove en la ingon.

La azenoj, kiuj ĝenerale ja ne tre enmiksiĝas en la aferojn de la homoj, kiel la hundoj faras tion tiel volonte, leĝere formarŝis. Ĉar ili estas multe pli prudentaj ol kutime supozas homoj, kiuj havas neniam ion komunan kun ili, la azenoj marŝis sur la ĝusta vojo al Durango.

La viroj pro sia ekscitiĝo tute forgesis la azenojn. Ili forprenis de la mortigito la pantalonon kaj la botojn kaj tuj vestis sin per ili. Tre valorplenaj estis nek la pantalonoj nek la botoj, ĉar tiuj vestaĵoj estis pli uzataj dum la lastaj dek monatoj ol oni atendus de tiaj aĵoj. Tamen ili estis, kompare al la ĉifonoj, kiujn portis tiuj viroj, veraj luksaĵoj.

Sed la ĉemizon volis havi neniŭ, kaj neniŭ volis vesti sin per ĝi. Kvankam la tuta triopo surhavis anstataŭ ĉemizoj ion, pri kio oni nur malfacile povus diri, kio estas la pli kompakta parto, la truoj, aŭ la ĉifonoj pendantaj de la viroj.

„Kial vi ne volas preni la ĉemizon kaj vesti vin per ĝi, Ignacio?“ demandis Miguel, dum li puŝis perpiede la kadavron, kiu nun ne portis ion krom la trivitan kakikoloran ĉemizon.

„Ĝi ne multe valoras“, respondis Ignacio.

„Vi ne havas kaŭzon diri ion tian, hundido kota“, diris Miguel. „Kompare al via, ĝi estas pli bona ol nova.“

„Mi ne ŝatas ĝin“, opiniis Ignacio kaj deturnis sin. „Estas tro proksime al la kolo. Kial vi ne prenos ĝin mem?“

„Mi, ĉu?“ demandis Miguel kaj tiris kolere la brovojn supren, „mi ne vestas min per tiu ĉemizo, kiun tiu hundido nomata gringo portis varma sur sia korpo.“

Sed la vero estis, ke la ĉemizo ankaŭ por Miguel estis tro proksima al la kolo de la kadavro. Estas vere, ke ĝi ne havis sangomakulojn, sed tamen neniu volis vesti sin per ĝi. Ili havis la antaŭsenton, ke ili ne povus senti sin oportunaj en la ĉemizo. Ili ne kapablis klarigi la senton kaj ĉiuj kontentigis per tio, ke la ĉemizo estas simple tro proksima al la kolo, kaj ke ĝi tial ne estas konsiderinda plu kiel valorobjekto.

„La fripono ja en sia pakaĵo eble ankoraŭ havas kelkajn aliajn ĉemizojn“, diris Ignacio.

Miguel tuj kvazaŭ bojis al li: „Vi unue atentos foje, ĝis kiam mi estos rigardinta ĝin, kaj pri tio, kio poste ankoraŭ restos, ni poste povos interparoli.“

„Ĉu vi eble estas ĉi tie la kapitano?“ kriis nun la tria, kiu ŝajne staris indiferenta dum la lastaj minutoj, apogante sin per arbo. Li havis efektive kaŭzon ŝajnigi sin sen intereso, ĉar li alproprigis la pantalonon, kiam Miguel prenis la botojn. Nur Ignacio ricevis nenion el tiu distribuo, ĉar li ne ŝatis la ĉemizon.

„Ĉu kapitano?“ kriis Miguel koleriĝinte. „Ĉu kapitano ĉu ne kapitano, kion vi do faris ĝis nun?“

„Ĉu mi ĵetis la ŝtonon al lia kranio, ĉu ne?“ fanfaronis la tria.
„Vi ja aliokaze tute ne aŭdacus proksimiĝi al li, *cobarde*, malkuraĝulo.“

„Vi kun via ŝtono“, mokis Miguel, „tio estis ja ne pli ol pikado per dentopurigilo. Kiu el vi du favaj virkatuloj estis preta elmondigi lin? Ridindaj lamentuloj vi estas! Kaj por ke vi sciu tion tuj nun, la maĉeton mi povos certe uzi ankaŭ duan kaj trian fojon, je vi ambaŭ, kaj mi ne petos vin pri via permeso.“

Li turniĝis kaj volis iri al la pakaĵo.

„Kien la azenoj foriris, damne!?“ li vokis mirigite.

Nur tiumomente ĉiuj ekkonsciiĝis, ke la azenoj jam formarŝis.

„Sed nun ek do, kaptu la bestaĉojn, aliokaze ili alvenos en la urbon, kaj ni havos tuj poste ĉi tie svarmojn de ĝendarmoj ĉi tie ĉirkaŭe“, vokis Miguel.

La viroj ekstaris kaj postkuris la azenaron. Ili vere devis hasti, ĉar la vigle antaŭen marŝantaj azenoj, kiuj ĉi tie ĉe la vojo apenaŭ trovis iun sekan herbon, kiu kapablas reteni ilin. Daŭris pli longe ol horon antaŭ ol la viroj denove estis ĉe la arboj kun la bestoj.

„Prefere ni enfosu lin“, diris Miguel. „Aliokaze cirklus la vulturoj ĉi tie kaj iu, kiu ne scias fari ion pli bonan, povus veni por rigardi, kion trovis la vulturoj ĉi tie.“

„Ja, ĉu vi eble volas lasi notfolion kun via nomo ĉe li?“ moke demandis Ignacio. „Povas esti ja indiferente al ni, ĉu oni trovos la kadavron ĉu ne. Li ne plu rakontos, kiun li laste renkontis.“

„Vi estas ja ruza, kokineto mia“, diris Miguel. „Se oni trovos la kanajlon kaj ĉe ni liajn azenojn, jen vi ne povus kontesti ion plu. Sed se oni trovos la azenojn ĉe ni kaj nenie la kadavron, jen unue iu provu pruvi al ni, ke ni sendis la gringon en la inferon. Ni aĉetis la azenojn de la gringo. Sed, se oni trovos tion, kio ankoraŭ restos de li, neniue akceptos de vi, ke vi aĉetis la azenojn. Do, ek al la laboro!“

Kaj per la sama ŝpato, per kiu Dobbs volis enfosi Kurtinon, li nun mem estis enterigita. Ĝi okazis tre rapide. La viroj ne multe penis. Ili faris nur la plej necesan kaj translasis la laboron al la formikoj kaj vermoj.

Tiam ili denove survojiĝis kaj pelis la azenaron reen en la montaron, ĉar ili ne aŭdacis iri en la urbon, parte pro personaj kaŭzoj, parte ankaŭ tial, ĉar ili pensis, ke ili povus renkonti iun, kiu konas kaj atendas la azenojn. Estis ankaŭ sufiĉe verŝajne, ke Dobbs diris la veron kaj efektive ankoraŭ sekvas du viroj sur ĉevaloj sur la vojo de Dobbs. Ŝajnis al ili efektive tre neverŝajne, ke Dobbs kondukis la tutan azenaron sola. Kaj por eviti renkonti tiujn virojn, kiuj eble ekzistas, ili deturniĝis de la vojo, sur kiu Dobbs laŭ ilia supozo estis veninta, kaj grimpis sur alia mulopado supren en la montaron.

Kiam ili denove estis en la vepro, ili ne povis reteni dum pli

longa tempo sian scivolemon. Ili volis scii, kiom granda estas la predo kaj kiuj bonaj aĵoj estas en la pakaĵoj.

Fariĝis pli malhele, kaj la vepro faris ankoraŭ pli malhela la lokon, sur kiu ili haltis por tranokti. Por ne montri sian restadan lokon dum la tempo, kiam ili ankoraŭ estos en tiu regiono, ili rezignis ekbruligi fajron.

Ili fariĝis viglaj. Ili malŝarĝis la bestojn kaj komencis malfermŝnuri la pakaĵojn. Jen ankoraŭ troviĝis pantalono kaj ankoraŭ du paroj da facilaj ŝuoj. Jen ankaŭ gamelo, sed nur plu manpleno da fazeoloj kaj manpleno da rizo.

„Ŝajne li vere ne estis riĉa ulo“, diris Ignacio. „Efektive li nepre devis atingi la urbon.“

„Ankaŭ monon li ne havis“, grumble diris Miguel, dum li traserĉis la pakaĵon, kiun li jam malfermligis. „Li havis nur sepdek centavojn en pantalonpoŝo, tiu fripono. Ankaŭ la feloj, kiujn li havas, ne estas la plej bonaj. Ili enspezigos apenaŭ kelkajn favajn pesojn.“ Tiam li trovis la saketojn.

„Kion li havas ĉi tie? Sablon, efektive sablon. Mi volus scii, kial li kunportas la sablon en multaj etaj saketoj?“

„Tio estas tute klara“, diris Ignacio, kiu nun trovis la saketojn en sia pakaĵo. „Estas sufiĉe klare. La ulo estis inĝeniero de iu *Mining Company*. Li ĉi tie en la montaro serĉadis kaj poste intencis kunporti la sabloprovaĵojn en la urbon, por ke ili tie en oficejo estu esplorataj de la aliaj inĝenieroj kaj kemiistoj. Jen la usonaj kompanioj tuj scios, kie ili povos marki parcelojn.“

Li elŝutis ĉiun saketon. Ankaŭ Miguel elŝutis la enhavon de la saketoj, kiuj estis en lia pakaĵo. Kaj kiam li vidis, ke la saketoj estis nur senvaloraj deŝiritaj ĉifonaĵoj, li malbenis diojn, diablojn kaj ĉiujn gringojn. Fariĝis tiel malhele, ke ili ne povis vidi la specialan de tiu sablo, se ili estus sciintaj pli pri tio.

Ankaŭ Angel, la tria, trovis la saketojn en sia pakaĵo. Li donis al ili alian signifon. Li diris: „La ulo estis aŭtentika usona mensogisto kaj trompisto, tion mi povas diri al vi. La saketojn li ĉiujn tute lerte kaŝis inter la feloj kaj poste dense kunŝnuris ilin. Ĉu vi scias, kial? Li volis vendi la felojn en Durango laŭ pezunuo, kaj por ke ili pezu pli, li intermetis la sablon. Kaj por ke la sablo ne elfalu, tial li ŝutis ĝin en saketojn. Li estus vendinta la felojn vespere, kaj sekvamaten, antaŭ ol la aĉetinto estus malkovrinta la trompon, la birdohomo jam estus forfluginta kun la trajno. Al tiu kanajlo ni bele fuŝis la trompon.“

Kaj Miguel kaj Ignacio trovis, ke tio estas la plej bona klarigo por la sablo, kaj ili hastis liberigi sin de ĝi.

23

Ankoraŭ en la nokto ili ŝarĝis la pakaĵojn sur la azenojn kaj marŝis plu. Posttagmeze ili alvenis en vilaĝon, kaj ili demandis indiĝenon, kiun ili trovis antaŭ ties domo, ĉu li konas iun, kiu aĉetas azenojn, ĉar ili intencias vendi kelkajn el la azenoj, ĉar ili ne povas utiligi ilin. La indiĝeno rigardis la

azenojn, ĉirkaŭiris ilin, rigardis pro la brulmarkoj, poste li rigardis la pakaĵojn mem, kaj tiam li rigardis – sen frapi atenton – sur la botojn de Miguel kaj sur la pantalonon de Angel, kvazaŭ li intencus aĉeti ĉion ĉi. Fine li diris: „Mi ne povas aĉeti azenojn, mi nun ne havas monon. Sed mia onklo eble aĉetos ilin. Li havas ankaŭ sufiĉe da mono por tio, mi ne havas tiun. Mi volas konduki vin al mia onklo, kaj kun tiu vi povos intertrakti.“

La vendo deruliĝos ja glite-glate, pensis la tri friponoj, ĉar kutime oni devas iri en ses diversajn indiĝenajn vilaĝojn, antaŭ ol oni trovos iun, kiu aĉetas azenon. Plej ofte la homoj ja ne havas monon, kaj peso estas eĉ granda sumo por ili.

Post kelkaj cent paŝoj ili venis al la domo de la onklo. La domo estis, laŭ la plej multaj aliaj domoj, konstruita el sekigitaj argilaj brikoj kaj kovrita per herboj. Ĝi troviĝis ĉe la granda vilaĝa foirplaco, kie oni entreprenas la foirojn, la solenaĵoj de la Sendependeca tago, la festoj por la rememorigo pri la revolucio kaj la politikaj kunvenoj. En la mezo de la placo estis starigita modesta pavilono, kie kutime estas ludata la muziko, kiam okazas iu publika festo, kaj kie ankaŭ la parolistoj devas starigi sin, se ili volas paroladi. En tiu pavilono parolis ankaŭ la gvidantoj de la saneckomisiono, kiam ili alvenis kamparen por instrui la indiĝenan loĝantaron pri sanecflegado kaj prizorgado de infanoj. La laborista registaro sukcesis entute pri tiuj ĉi fakoj pli ol ĉiuj registaroj ekde la alveno de la unuaj hispanoj.

La indiĝeno iris en la domon de sia onklo por paroli kun li pri la aĉetado de la azenoj. Ne daŭris longan tempon, ĝis

kiam elvenis la onklo kaj iris renkonte al la tri stratrabistoj, kiuj sin kaŭris en la ombro de kelkaj arboj starantaj proksime de la domo.

La onklo ne estis plu juna kaj jam grizharara, sed fortika kaj tendena. Lia kuprokolora vizaĝo estis glata kaj liaj nigraj okuloj brilis tiel, kiel tiuj de knabo. Lia faska hararo estis tre longa kaj je la flankoj glatigita malantaŭen. Li iris tre rekte kaj lante renkonte al la viroj. Li salutis ilin kaj tiam tuj paŝis al la azenoj por kontroli ilin.

„Tre bonaj azenoj, sinjoro“, diris Miguel, „tre bonaj, *verdad*, tiujn vi ne povus aĉeti pli altkvalite sur la foirplaco en Durango.“

„Vi pravas“, diris la onklo, „ili estas altkvalitaj azenoj. Kompreneble iom lacigitaj pro la portado kaj iom malsataj. Vi do entreprenis longan vojaĝon, ĉu?“

„Ho, ne tiom longan, apenaŭ du tagojn“, enmiksiĝis Ignacio.

Miguel puŝis lin en la ripojn kaj diris: „Jen mia amiko ne tute diris la veron ĉikaze. Estas ĝuste, ke ni marŝis nur du tagojn ekde la lasta ripoza tago. Sed en vero ni vojaĝas jam kelkajn semajnojn.“

„Tiukaze ja ne estas miraklo, ke la azenoj estas iom lacigitaj. Sed ni certe refortigos ilin per nutraĵoj.“ Kiam li diris tion, li rigardis la ulojn pli precize. Iliajn vestaĵojn kaj iliajn aĉiĝintajn vizaĝojn. Sed li ne montris, ke li observas ilin, pli li ŝajnis, kvazaŭ li rigardus ilin nur tute senpripenseme,

dum li mense okupiĝas pri la aĉeto kaj la prezoj. „Kiom ili do kostu?“ li demandis, pli observante la ulojn.

„Ho, mi pensas“, diris Miguel ridetante kaj kliniĝinte la kapon konfideme, „mi pensas, ke dek du pesoj ne estas tro granda prezo.“

„Ĉu por ĉiuj?“, demandis la onklo ŝajne tute naive.

Miguel laŭte ekridis, kvazaŭ li aŭdus bonan ŝercon: „Kompreneble ne por ĉiuj. Mi opiniis, ke por ĉiu dek du pesoj.“

„Tio estas tre alta prezo“, diris nun la onklo negociste, „por tio mi povus aĉeti ilin ankaŭ sur la foirplaco en Durango.“

„Kiu sciu tion?“ respondis Miguel. „Tie ili kostas multe pli, dek kvin aŭ eĉ dudek pesojn. Sed tiam vi ankoraŭ devus peli ilin hejmen.“

„Ĝuste“, kapjesis la onklo, „sed tiukaze ili ankaŭ jam sur la vojaĝo enspezigus monon. Tiukaze mi povus paki varojn sur la azenojn kaj transporti ilin hejmen.“

Miguel ekridis larĝvizage: „Mi vidas, ke mi havas prudentan negocistan partneron antaŭ mi, kaj tiukaze ni ne tiom obstinu pri nia prezo. Mia lasta, mia vere lasta oferto – jen vi nepre kaptos la okazon, mia lastfina oferto estas naŭ pesoj por ĉiu azeno unuopa. Mi scias, ke ankaŭ vi ne estas riĉulo. Kaj ni havas ĉijare longan sezonon de sekeco.“

„Naŭ pesojn“, diris la onklo trankvile, „tion mi ne povus pagi. Kvar pesojn, kaj eĉ ne centavon pli.“

„Diru do kvin, kaj la azenoj estos ĉiuj via propraĵo“, diris Miguel kaj ŝovis la manojn en la pantalonajn poŝojn, kvazaŭ li jam havus la monon en la sako.

„Kvar pesoj estas mia oferto“, diris la onklo trankvile.

„Vi tiras la haŭton de miaj oreloj, sinjoro, sed en ordo, mi certe ne volas fariĝi benita, kaj blinda mi estu jam morgaŭ matene, se mi envere ne donacas la azenojn al vi por tia prezo.“ Tion diris Miguel kaj rigardis ĉe tio laŭvice de la onklo ĝis la nevo kaj poste al la du aliaj veprorabistoj. Tiuj kapjesis kaj malgaje mienis por aludi, ke ili ĝuste fordonis sian lastan ĉemizon por nenio.

La onklo kapjesis nun simile, sed per gesto, kvazaŭ li jam hieraŭ posttagmeze estus sciinta, ke hodiaŭ li aĉetos po kvar pesoj la azenojn.

Li iris denove al la azenoj kaj diris poste: „Ĉu vi volas porti la pakaĵojn sur viaj dorsoj plu?“

„Ha jes, prave, la pakaĵoj“, perplekse diris Miguel kaj rigardis al siaj du kunuloj; sed ĉifoje ne tiel fanfaroneme, kiel li faris tion kutime, sed tiel, kvazaŭ li volus petegi ilin pri ruza respondo aŭ konsilo.

Ignacio komprenis la rigardon kaj diris: „Ankaŭ la pakaĵojn ni vendos. Ni volas veturi plu per trajno.“

„Estas vere“, konsentis Miguel nun laŭ tio, „ankaŭ tiujn ni vendos. Tio estas nia intenco.“

En vero ili tute forgesis la pakaĵojn dum la vendo de la azenoj.

„Kion vi havas tie en la pakaĵoj?“ demandis la onklo denove proksimiĝante al la azenoj kaj puŝante per pugno kontraŭ pakaĵon.

„Felojn“, diris Miguel, „bonajn felojn. Ankaŭ niajn gamelejojn kaj krome ilaron. La fusilon vi ja apenaŭ povus pagi al ni, tio estus tro multekosta.“

„Kiu iloj estas?“ demandis la onklo.

„Ili estas diversspecaj“, respondis Miguel, „estas ŝpatoj kaj pioĉoj kaj ferrompiloj kaj tiel plu.“

„Kiel vi havigis tiujn ilojn?“ demandis la onklo ŝajne tute preterire, tiel, kvazaŭ li volus nur daŭrigi la interparoladon.

„Ho...la iloj...tio estas...“, Miguel fariĝis subite necerta. Li sentis maloportunecon kaj devis gluti kelkfoje. Pri tiu demando li ne estis preparita.

Tiam Ignacio subite bruske objĉetis: „Ni laboris ja ĉe usona minkompanio, de tie ni ja ĵus venis.“

„Jes ja, tiel estas“, diris Miguel nun rapide kaj rigardis dankeme transen al Ignacio. Li intencis neniam forgesi tiun helposervon al Ignacio.

„Tiukaze vi do ŝtelis la ilaron ĉe la minkompanio, ĉu?“ diris seke la onklo.

Miguel ridis konfideme kaj okulumis al la onklo, kvazaŭ li estus aliancano. „Ne vere ŝtelis“, li diris, „ŝtelado ne estas nia afero, ni nur ne redonis la ilaron, kiam ni havis nian lastan skipon. Tion ja neniu povas nomi ŝtelado. Ni ja ne volas havi multon por tio, eble du pesojn por ĉiuj iloj. Nur tial, por ke ni ne devu porti ilin ĝis la trajnstacio.“

„Mi kompreneble ne povas aĉeti ĉiujn azenojn“, diris nun heziteme la onklo. „Tiom da azenoj mi tute ne bezonas. Sed mi kunvokos la ceterajn enloĝantojn. Ĉiu havas iom da mono, kaj tial mi povas promesi al vi, ke vi facile liberiĝos de la azenoj kaj ankaŭ de la ceteraj aĵoj. Mi faros tion kiel eble plej sukcese, sidiĝu. Ĉu vi volas havi akvon aŭ pakaĵon da cigaredoj?“

Poste Angel iris en la domon kaj elvenis kun kruĉo da akvo kaj kun pakaĵeto *Supremos*.

La onklo parolis kun sia nevo, kaj la nevo ekiris por kunvoki la virojn de la vilaĝo.

La viroj venis. Olduloj kaj junuloj. Ili venis unuope aŭ duope. Kelkaj portis sian maĉeton ĉe la zono. aliaj senkaŝe permane. Aliaj portis nenion. Ili ĉiuj iris unue en la domon de la onklo kaj interparolis kun li. Poste ili elvenis, rigardis la azenojn tre detale kaj observis poste ankaŭ la tri fremdulojn. Ili rigardis la vendantojn eble eĉ pli detale ol la azenojn, sed ili faris tion multe malpli okulfrape ol ĉe la azenoj.

La fremduloj ne rimarkis, ke oni rigardis ilin tiel precize. Ili supozis tion la kutima scivolemo de la indiĝena kampara loĝantaro.

Post kelke da tempo ankaŭ la edzinoj de la viroj malrapide proksimiĝis iom timeme kaj ŝtelire. Ili ĉiuj kunportis siajn infanojn. Kelkaj inoj portis la infanojn en kunplektitaj tukoj sur la dorso. Aliaj portis ilin surbrake. La infanoj kiuj povis iri mem, kuris ĉirkaŭ siaj patrinoj kiel kokidoj ĉirkaŭ kokino.

Fine la viroj ŝajne ĉiuj kolektiĝis; ĉar venis neniu plu. Nur unuopaj inoj proksimiĝis ankoraŭ malrapide al la domo. La onklo elpaŝis nun de ĝi. Ĉiuj tiuj viroj, kiuj ĝis tiam estis kun li en la domo, sekvis lin. Ili formis densan grupon. Sed aliaj, kiuj jam elvenis antaŭe kaj rigardis la azenojn, haltis inter la azenoj. Tiel la stratrabistoj, kio ne frapis ties atenton, estis ĉirkaŭfermitaj sen rimarki tion. Kien ajn ili turniĝus, la reirvojo estus barita al ili. Kaj tamen tio aspektis tute kutime, ĉar la viroj estis ja tie por elekti la azenojn.

„La prezo ne estus tro alta“, diris la onklo, „ni ĉiuj ja nur tre miras, ke vi povas vendi tiajn bonajn azenojn tiom mal-kare.“

Miguel larĝmiene ridante diris: „Vidu, sinjoro, ni simple bezonas monon. Tiel estas. Kaj tial ni devas vendi ilin.“

„Ĉu la azenoj havas brulmarkojn?“ demandis nun la onklo tute preterire.

„Kompreneble“, diris Miguel, „ĉiu havas brulmarkon.“ Li returniĝis por rigardi al la azenoj por ekkoni la brulmarkojn. Sed la viroj tiel kaŝis la azenojn, ke neniu el la vepro-rabistoj povis vidi iun jn.

„Kian brulmarkon la azenoj do havas?“ demandis nun la onklo.

Miguel komencis senti sin tre neoportuna. Kaj liaj amikoj komencis turniĝi kaj barakti por vidi la brulmarkojn. Sed la indiĝenoj ŝajne senintence urĝis ilin pli kaj pli for de la azenoj.

La onklo rigardis Miguelon strange. Kaj Miguel fariĝis pli kaj pli malcerta. Li sentis, ke io proksimiĝas al li, kio povus fariĝi decida por lia estonteca vivo. Kiam la onklo, sen ripetisian demandon, rigardis plu tiel strange severe al lia vizaĝo, Miguel sciis, ke li devos respondi tiun demandon.

Li iom hezitis kaj glutadis, kaj tiam li diris: „La brulmarko – ja, la brulmarko, jen ringo kun substrio.“

La onklo vokis transen al la viroj starantaj ĉe la azenoj kaj demandis: „Ĉu tio estas la brulmarko, *hombres*?“

„Ne“, ili revokis.

„Mi eraris“, diris Miguel; „la brulmarko estas ringo kun kruco sur ĝi.“

La viroj diris: „Tio ne estas la brulmarko.“

„Mi estas tute konfuzita“, diris nun Miguel proksime al kolapso, „la brulmarko estas kompreneble kruco kun ringo ĉirkaŭ la kruco.“

„Ĉu tio estas vera?“ demandis la onklo.

„Ne“, diris la viroj, „tio estas malĝusta.“

„Vi ja rakontis al mi“, diris nun la onklo trankvile, „ke la azenoj estas viaj.“

„Efektive, ili estas niaj“, Ignacio obĵetis impertinente.

„Sed neniu el vi konas la brulmarkojn, tio estas stranga.“

„Tion ni ne priatentis“, diris Miguel kaj provis mieni malŝate.

„Ĉu vi iam ajn vidis viron“, demandis nun la onklo, sin turnante al ĉiuj ĉeestantaj viroj, „kiu posedas azenon aŭ iun ajn alian bruton, kaj ne scias ĉiun unuopan brulmarkon, eĉ se la brulmarkoj estus diversaj kaj la bruto venus el malsamaj breditaj brutaroj?“ La viroj ĉiuj ridis kaj diris nenion.

„Mi scias“, diris la onklo, „de kie estas la azenoj.“

Miguel rigardis ĉirkaŭe al siaj kunuloj, kaj tiuj rigardis al ĉiuj flankoj por vidi, ĉu ankoraŭ troviĝas truo, tra kiu ili povus fuĝi, tuj kiam komenciĝos la sekva frazo.

„Estas la azenoj de sinjorino Rafaela Motilina en Avino, la vidvino de sinjoro Pedro Leon. Mi konas lian brulmarkon.“

Estas la litero L kaj la litero P inversigita ĉe la streko de la litero L. Ĉu tio estas ĝusta, *hombres*,” vokis la onklo.

Kaj la viroj, kiuj staris ĉe la azenoj, ekvokis: „Tio estas ĝusta. Tio estas la brulmarko.“

La onklo rigardadis la grupon kaj vokis: „Porfirio, venu ĉi tien.“ Indiĝeno venis proksimen kaj starigis sin flanke de li.

Nun la onklo diris: „Mia nomo estas Alberto Escalona. Mi estas la alkaldo de la loko ĉi tie, laŭorde elektita kaj konfirmita de la guberniestro. Tiu viro ĉi tie, Porfirio, estas la policano de la loko.“

Estas la diverseco de la landoj kaj de la klimato, la diverseco de la homoj, ties edukado kaj influoj kaj multaj pliaj faktoroj, al kiuj ili submetiĝas. En ĉiu kazo estas tiel: Se en meza Eŭropo iu prezentiĝas kun sia titolo, li havas la intencon vekti en la ulo antaŭ si hororigan senton, tiun de respekto, kaj li atendas, ke lia antaŭulo ege traskuita de la majesteco de la okazaĵo kaj de la travivaĵoj, kliniĝos respektoplene kaj ekde tiu momento ne rifuzos la necesan respekton al la prezentanto de la titolo. Sed ĉi tie, sur tiu ĉi kontinento, titolo validas nenion. Kaj nomo ne multon. Sed la personeco mem ĉion. Neniu kliniĝas riverence, aŭ nur en esceptaj okazoj antaŭ damo, kaj tiu, kiu alparolus prezidanton per Lia Ekscelenco, efikus same tiel ridinda kiel la prezidanto, kiu lasus alparoli sin per Via Ekscelenco. La prezidanto estas multe pli malofte alparolata kiel *Mr. President* aŭ kiel sinjoro Prezidanto ol pli ofte aŭ fakte ĉiam kiel *Mr. Coolidge* aŭ *Señor Calles*. Kaj tiu, kiu havas rilaton al li, skuas lian

salutmanon, kiam li venas kaj kiam li foriras kaj parolas kun li tiel, kvazaŭ li estus ĉerpinta dum sia tuta vivo per kulero kun li el la sama pelvo. Tion la novaj glatgladitaj cilindroĉapelaj prezidantoj de la freŝe elkovitaj eŭropaj respublikoj ankoraŭ devos lerni. Ĉar la eŭropaj prezidantoj uzas ankoraŭ nun kiel ekzemplodonan modelon la absolutajn reĝojn, dum la prezidantoj ĉi-kontinente ne elektas ekzemplodonajn modelojn, sed se ili bezonas modelon, ili in mem elektas kiel modelon kaj ĝuste tial prezentiĝas kiel homoj tiaj, kiel ankaŭ ĉiu alia homo de la lando. Kaj se ĉi tie iu diras: „Nia prezidanto estas granda ŝtipkapulo!“ jen la prezidanto ne ĵetas lin je kelkaj monatoj en prizanon, sed, se li aŭdas pri tio, li diras al si aŭ al siaj amikoj: „Tiu viro scias pli pri mi ol mi mem. Li ŝajne estas saĝa viro.“

Sed, se ĉi tie iu prezentas sin kun sia titolo kaj diras: „Mi estas la urbestro de la vilaĝo kaj tiu tie estas la policprezidanto“, tiukaze tio signifas ion tute alian ol en Eŭropo.

La tri strataj embuskuloj tuj sciis, kion tio signifas, kaj ke nun, post kiam la titoloj estas diritaj, la manskuado havos definitive finon. Ili surseliĝis kaj provis foriĝi sen kunpreni siajn azenojn. Ili tiumomente estus vendintaj ĉiujn azenojn por unu peso, ili bonvoleme estus donacintaj ilin, se ili nur povus forlasi la vilaĝon. Sed nun oni klare ekkoneble firmtenis ilin.

Miguel provis eltiri sian revolveron. Sed li trovis la revolveringon malplena. Pro sia ekscitiĝo li tute ne rimarkis, ke Porfirio jam transprenis tiun penon anstataŭ li. La revolvero

kompreneble ne tre utilus, ĉar ĝi ja eĉ tiam ankoraŭ ne estis ŝargita.

Sed la homoj ne povis scii tion kaj ili eble estus permesintaj ilian foriron, se li direktus la armilon al ili.

„Kion vi volas de ni?“ kriis Miguel.

„Ĝis nun nenion“, diris la alkaldo. „Ni nur miras, kial vi volas forlasi nin tiel rapide sen kunpreni viajn azenojn.“

„Ni povas aŭ kunpreni niajn azenojn aŭ ne, ni povas fari kun niaj azenoj tion, kio plaĉas al ni“, vokis Miguel kolere.

„Kun viaj azenoj, jes ja, sed ili ne estas viaj azenoj. Mi konas la historion de tiuj azenoj. Sinjorino Motilina vendis tiujn azenojn antaŭ dek aŭ dek unu monatoj al tri usonanoj, kiuj volis ĉasi en la *Sierra Madre*. Mi konas la usonanojn.“

Miguel rikanis kaj diris: „Tio estas do tute prava. De tiuj tri usonanoj ni aĉetis la azenojn.“

„Por kiom da mono?“

„Dek du pesojn por ĉiu azeno.“

„Kaj nun vi volas vendi ilin ĉi tie por kvar pesoj por besto? Vi estas malbonaj vendistoj.“

La indiĝenoj ridis.

„Vi rakontis ja al mi“, diris la alkaldo, „ke vi havas la azenojn jam dum tre longa tempo. Kiom longe do?“

Miguel pripensis tion dum certa tempo kaj poste diris: „Kvar monatojn.“ Venis en lian kapon, ke li diris, ke ili laboris en mineja asocio kaj longe vojaĝis.

La alkaldo diris seke: „Kvar monatojn, ĉu? Tio estas stranga historio. La usonanoj venis antaŭ kelkaj tagoj de tie el la montaro. En la vilaĝoj oni vidis ilin. Tiam ili havis ankoraŭ ĉiujn ĉi azenojn, kiujn vi aĉetis de ili antaŭ kvar monatoj.“

Miguel denove provis elturniĝi per sia konfidema rideto: „Por diri la veron, sinjoro, ni aĉetis la azenojn antaŭ du tagoj, de tiuj usonanoj.“

„Tio estas pli verŝajna. Do, de la tri usonanoj vi aĉetis ilin, ĉu?“

„Jes.“

„Sed tio ne povas esti tri usonanoj, ĉar mi scias, ke unu el la triopo estas sur la alia flanko de la *Sierra* en vilaĝo, li estas kuracisto.“

„Estis nur unu usonano, de kiu ni aĉetis ilin.“ Miguel gratis sin survizaĝe kaj en la hararo.

„Kie vi do aĉetis la azenojn?“ demandis la alkaldo senpardoneme plu.

„En Durango.“

„Tio apenaŭ eblas“ diris la alkaldo. „La usonano ankoraŭ ne povis esti en Durango, kaj se li tie estus, vi ankoraŭ ne povus esti ĉi tie.“

„Ni tramarŝis dum la nokto.“

„Tio povas esti. Sed kial la usonano vendu ĝuste al vi la azenojn, se li jam estis en Durango, kie li estus trovinta sufiĉe da aĉetantoj, aliajn aĉetantojn.“

Nun Ignacio enmiksiĝis: „Kiel ni sciu, kial li ĝuste al ni volis vendi la azenojn kaj ne al aliaj? Tio estis kaprico lia.“

„Tiukaze vi devus havi kvitancon, ĉu?“, diris la alkaldo, „kvitancon kun la prezo kaj la brulmarko, aliokaze sinjorino Motilina ĉiutempe povus repostuli la azenojn, ĉar ŝia brulmarko estas enskribita.“

„Kvitancon li ne donis al ni“, respondis Miguel. „Li ne volis pagi la kvitancomarkon.“

„Tiujn kelkajn centavojn vi ja mem estus pagintaj, por havi pruvon pri la aĉeto“, diris la alkaldo.

„Damne“, kriis nun Miguel kaj minacis lin per ambaŭ pugnoj, „kion vi fakte volas de ni? Ni iras pace nian vojon kaj vi encirklas nin. Ni protestos ĉe la guberniestro pri vi, por ke oni eksigu vin, ĉu vi komprenas tion?“

„Tio estas ja efektive la limo de ĉio ebla.“ La alkaldo ridetis. „Vi alvenas ĉi tien en nian vilaĝon kaj volas vendi azenojn al ni. Ni volas aĉeti la azenojn kaj ankaŭ interkonsentiĝi pri la

prezo. Tiukaze ni havas ja la rajton ekscii, de kie venas la azenoj. Aliokaze morgaŭ frue eble venos la soldatoj kaj diros, ke ni estas banditoj, ĉar ni forkondukis la azenojn de iliaj laŭrajtaj posedantoj kaj mortbatis la posedanton, kaj oni pafmortigos nin.“

Miguel turnis sin al siaj amikoj kaj ĵetis rigardon al ili. Poste li diris: „Ni nun tute ne plu volas vendi la azenojn, eĉ ne por dek pesoj ĉiujn kune. Ni volas nun iri plu.“

„Sed la ilojn kaj la felojn vi ja povus vendi al ni, ĉu ne?“ demandis la alkaldo.

Miguel pripensis la aferon dum certa tempo. Kaj kiam li havis la ideon, ke la feloj kaj la ilaro ja ne havas brulmarkojn, li diris: „En ordo, se vi volas havi la felojn kaj la ilaron – Kion vi pensas?“ li diris, sin turniĝante al siaj kunuloj.

„Ni konsentas“, ili diris. „Ni povas rezigni pri la aĵoj.“

„Ĉu la aĵoj efektive estas viaj?“ demandis la alkaldo.

„Kompreneble“, respondis Miguel.

„Kial la usonano ne vendis la felojn en Durango? Kial vi reportis la felojn ĉi tien? Vi ja ankaŭ ne portus akvon sur azenaj dorsoj en la riveron, ĉu?“

„La prezoj ne estis sufiĉe altaj en Durango, kaj ni volis atendi pli taŭgan tempon.“ Miguel komencis iom promeni tien kaj tien, laŭ la spaco, kiun la viroj lasis al li.

„Ĉu la usonano iris nuda al la trajnstacio?“ neatendite demandis la alkaldo.

„Kion vi opinias?“ Miguel paliĝis.

„Vi ja portas liajn botojn, kaj tiu tie surhavas lian pantalonon. Kial neniu el vi vestis sin per lia ĉemizo, kiu ankoraŭ estas tute bonkvalita? Ĉiukaze estas tiel bona kiel nova, kompare al tiuj ĉifonoj, kiujn portas vi.“

Miguel silentis.

„Kial neniu el vi prenis ĝin?“ ripetis la alkaldo. „Mi povas diri tion al vi“, li daŭrigis, „kial neniu el vi volis vesti sin per ĝi.“

Nek Miguel nek unu el la du aliaj atendis plu, kion la alkaldo ankoraŭ diros. Per unu salto ĉiu el ili ĵetiĝis sur la virojn, kiuj estis plej proksimaj. Tio estis tiel surpriza por la viroj, ke ili ne kaptis sufiĉe rapide ilin. La uloj fuĝis kaj kuris sur la straton de la vilaĝo malsupren por liberigi sin.

La alkaldo mansvingis al kelkaj viroj, kaj kelkajn minutojn poste haste rapidis kvin uloj sur siaj ĉevaloj por atingi la fuĝintojn. Ili eĉ ne prenis la tempon por seli la ĉevalojn. Nur kapŝnurojn ili ĵetis sur la bestojn.

La veprorabistoj ne kapablis tre malproksimiĝi. La indiĝenoj atingis ilin antaŭ ol ili preteriris la lastan domon de la vilaĝo. Oni ligis ilin per lazoj kaj rekondukis ilin al la placo de la vilaĝo.

„Ni nun serĉos la usonanon kaj demandos lin, por kiu prezo li vendis la azenojn al vi, kaj kial li senvestigis sin ĝisnude por donaci al vi siajn botojn kaj sian pantalonon. Ni kunportos lian ĉemizon, kiun neniu el vi volis havi.“ La alkaldo diris tion kun sciigema tono sen atendi respondon.

La ulojn oni nun firmligis kaj tri indiĝenoj gardis ilin kaŭrantaj kun maĉetoj sur siaj genuoj, vidalvide al la uloj.

La viroj selis siajn ĉevalojn, metis tortiljojn en siajn bastkorbetojn kaj ekrajdis. La alkaldo kaj Porfirio rajdis kun ili.

24

Fremdulo apenaŭ povas vojaĝi en tiuj distriktoj sen esti rigardata. Ankaŭ, se li provas preteriri ĉiujn lokojn kaj ĉiujn homojn, tamen ĉiam ĉeestas okuloj, kiuj vidas lin, kiuj persekutas lian vojon kaj observas lian faradon. Tiu fremdulo plej ofte ne scias, ke li estas obvservata. Tiuj, kiuj iras renkonte al li, longan tempon antaŭe deflankiĝas de la vojo antaŭ ol la observato povas ekvidi ilin, kaj ili kaŝiĝas en la vepro, kie ili lasas preteriri lin, kaj nur tiam elvenos, kiam li ne plu estos observebla. Ili detale rigardis lin, sed li eĉ ne divenas, ke oni rigardis lin de la kapo ĝis la piedoj tiel detale, ke kelkajn horojn poste scias la tuta vilaĝo, kiel la fremdulo aspektas, kaj kion li kondukas kun si. En irigaciaj kanaloj, kaŝite de montetoj, rokoblokoj kaj arbustoj, okuloj vidas ĉiun movon kaj ĉiun paŝon de fremdulo.

La indiĝenoj sur la ĉevaloj sekvis la vojon, kiun Dobbs uzis, kaj ne tiun, sur kiu venis la vojrabistoj. Ĉar ili sidis sur ĉevaloj kaj ne havis pakaĵon, ili jam posttagmeze estis je tiu loko, kie haltis Dobbs. Tiu estis facile trovebla.

Du el la viroj sekvis la spurojn plu ekde tiu ejo al la urbo. Sed ili trovis baldaŭ, ke la azenoj nur disiris kaj tiam estis repelitaj.

Tial estis facila ludo por la alkaldo, kiu mem estis pursanga indiĝeno, rakonti la tutan okazintaĵon. La azenoj vagadis, sed neniu havis la tempon okupiĝi pri ili. Sekve tion sur la ejo okazis io, kio ĉiujn ĉeestantojn, kies piedaj spuroj re-koneblis, okupis tiom, ke ili ne vidis, kiam la azenoj komencis disiri, kaj la okazaĵo devis esti tre grava, ĉar aliokaze la azenoj ne estus povintaj disiri tiom vastdistance.

Nek sur la ejo, kie staris la arboj, nek ĝis la ejo, kien la azenoj estis rekondukitaj, nek ekde tiu ejo en la direkto de la urbo, videblis piedaj spuroj de la usonano. Eĉ se li estus irinta nudapiede, oni facile estus trovinta lian spuron. La formo de liaj piedoj ne estas tiel bela kiel tiu de indiĝeno, ĉar blankulo ĉiam iras kun botoj, kaj ofte kun tiaj, kiaj kripligas la piedfingrojn. Krome la piedoj de la blankuloj estas multe pli grandaj ol tiuj de la indiĝenoj, kiuj ĝenerale havas gracilajn kaj malgrandajn piedojn.

Ĉar de la ejo ne kondukis plu iuj spuroj de la usonano, li anbkoraŭ devis esti tie. Kaj ĉar li ne estis sufiĉe profunde kaj ne sufiĉe nesupektige enfosita, kaj ĉar ankaŭ ne pluvis, la viroj trovis lian tombon post kelkaj minutoj.

„Pro murdo oni povas esti akuzata nur tiukaze, se la kadavro estas prezentebla“, estis dirinta Miguel. Pri tio li pravis. Tio estas la leĝo, kaj oni rajtas nomi ĝin bona leĝo, ĉar en tiaj grandaj landoj homoj povas fari sin tiel nevideblaj, ke kadavro estas trovebla pli facile ol homo, kiu malaperis libervole.

La kadavro estis trovita, kaj ĉar la tri veprorabistoj posedis la proprajon de tiu mortigito sen povi pruvi la posedrajton, tiu kazo estis fakte jam solvita.

La alkaldo rigardis la mortulon nur sekundon, poste li diris: „Maĉeto“.

Poste la viroj detiris de la korpo la ĉemizon, kiun la alkaldo prenis al si, kaj post tio la indiĝenoj enfosis la kadavron. Ili faris tion sen kapkovriloj. Kaj kiam ili fermŝutis la fosaĵon, kiun ili enfosis pli profunde ol antaŭe, kvankam ili povis fari tion nur per siaj maĉetoj, ili staris dum certa tempo sen ĉapeloj ĉirkaŭ la monteto. Ili ne preĝis, sed ili ĉiuj rigardis kun klinita kapo malsupren al la monteto.

Dum la viroj ankoraŭ staris antaŭ la monteto, iris la alkaldo al la sekva arbo. Per la maĉeto li dehakis branĉeton kaj poste rompis ĝin per bato en du pecojn. Li ligis ilin per ŝnureto je kruco kaj pikis ĝin en la monteton tie, kie troviĝas la kapo.

Je la sekva mateno la viroj denove estis en sia vilaĝo. La alkaldo montris al la tri uloj la ĉemizon. Ili rigardis ĝin kaj levis la ŝultrojn.

Du viroj intertempe estis rajdisal la plej proksima oficejo de la federacia kavaleria milico. Antaŭtagmeze venis la soldatoj. La inspektoro, rigardinte la ulojn, diris al la alkaldo: „Jeties kapo tie“ – li signis al Miguel – oni anoncis rekompenco. Mi pensas, ke tricent pesoj aŭ ducent kvindek. Precize mi ne memoras. Jen bandito. Jam antaŭe li murdis du homojn. La du aliaj pendumilaj kandidatoj certe estas de la sama speco. Mi ne konas ilin. La rekompenco certe estos je via dispono, sinjoro, je Porfirio kaj je la ceteraj viroj ĉi tie. Kion vi faros kun la azenoj kaj la pakaĵoj?“

„Ni transdonos ilin morgaŭ al la posedantoj“, diris la alkaldo. „Mi scias, kie ili estas. Unu el ili estas kuracisto, tiun ili tie sur la alia montarflanko ne volas lasi foriri. Ankaŭ ni volas havi lin ankoraŭ dum semajno. Li ricevos ja nun siajn aĵojn kaj ne urĝos rapide foriri.“

Poste la polico transprenis la tri veproŝtelistojn. Oni ne ligis ilin per lazoj. Ili trotis en la mezo de la rajdantaj soldatoj. Jen la ĉemizo, jen la pantalono, jen la botoj, jen la azenoj, jen la pakaĵoj kaj jen la kruceto sur la monteto. Sekve tion la procesdebato ne pli longe daŭros ol du horojn. Multkostan pendumilan ekzekutejon oni ne konstruos, ankaŭ blankajn gantojn oni ne surmetos. Por tiaj aferoj la ŝtato ne disponigas monon multan. La monon la ŝtato devas ŝpari por pli gravaj aferoj.

Howard estis tre okupata viro. Li ne povis ĝoji pri la trankvilo tiel, kiel li esperis. Li estis la granda fama miraklokuracisto. La indiĝenoj de la alta montaro ĉiuj estas tre sanaj, kaj atingas aĝon, kiu sonas por eŭropano kiel fabelo. Nur kontraŭ enportitaj malsanoj ili estas sendefendaj. Sed, kvankam ili ĉiuj havas enviindan sanecon, ili tamen suferas je malsanoj kaj korpaj difektoj, kiujn ili tiom longe flustras al si mem, ĝis ili estas tute konvinkitaj, ke ili havas mal-sanon. Oni devas nur rakonti al ili pri malsano kaj klarigi la simptomojn, tiukaze ne pasas pli ol tri tagoj kaj ili ekhavas tiun malsanon. Pro tiu kaŭzo kuracistoj kaj eklezioj faras tian bonan negocon en la lando.

Iam al Howard venis ino, kiu volis scii, kial ŝi havas laŭsojn, kvankam ŝia najbarino laŭdire havas neniujn. Kion Howard preskribu? Laŭsopasto estus la ununura rimedo. Sed, se ĝi estus eluzita, la laŭsoj denove ĉeestus kaj la demando denove leviĝus: „Kial mi havas laŭsojn kaj mia najbarino ne?“ Howard helpis facile al ŝi, ĉar li estis aŭtentika ŝamano. Li diris: „Tio venas de tio, ke vi havas tre bonan sanan sangon, kiun ŝatas la laŭsoj, dum via najbarino havas tre malbonan kaj malsanan sangon.“

Post tio venis la najbarino, florante sana ino, kiu volis, ke oni preskribu al ŝi rimedon kontraŭ ŝia malbona kaj malsana sango. Se ŝi irus en la urbon al profesia kuracisto, kiu trapasis universitatan ekzamenon, tiukaze li preskribus al ŝi

salvarsanon, kvankam ŝi ne havas spuron de la malsano, kontraŭ kiu aliokaze salvsarano estas preskribata. Sed tiuj homoj imagas, ke salvarsano sanigas la sangon, kaj la kuracisto preskribas ĝin al ili.

Howard ne havis salvarsanon ĉemane, li tute ne havis medicinon. Li preskribis ĉiam nur trinkadon de varmega akvo, ĉiutage du litrojn. Por disponigi sufiĉe da variaĵoj, li preskribis du litrojn aŭ tri kvaronojn de unu litro aŭ unu kaj duonon de litro; tiam denove varmegajn akvon kun citronosuko aŭ kun oranĝosuko aŭ kun iu ajn herbo aŭ legomo, kiun li konis kaj pri kiu li sciis, ke ĝi povas damaĝi neniel.

Strange por tiu, kiu ne konas la sanigan forton de akvo, la viroj, inoj kaj infanoj sieĝintaj la miraklokuraciston, saniĝis ĉiuj. Almenaŭ ili asertis tion. Kaj estas ja tiel pri ĉiuj malsanoj, se oni estas konvinkita ne plu esti malsana, tiukaze oni estas ja sana.

Kontraŭ eksteraj suferoj, se laŭ la diroj de tiuj homoj la morto jam *directamente* troviĝis dense sub la haŭto kaj ili jam evidente povis senti la morton premantan la haŭton, Howard preskribis varmegajn kompresojn. Pro varieco kelkfoje ankaŭ fridajn kompresojn. Kompresojn ĉirkaŭ la kapo, sur la nukon, sur manplaton, sur la batantan pulson ĉemane, sur abdomenon, sur plandojn, do ie ajn, kie estas loko. Kaj tiuj homoj ankaŭ en tiu kazo ĉiuj saniĝis. La morto forrampis de la haŭto, ĉar fariĝis por ĝi, laŭ la situacio, aŭ tro varma aŭ tro malvarma.

Brako- kaj gamborompiĝojn, artikajn tordojn aŭ elartikiĝojn la homoj kuracis mem, tiukaze neniu kuracisto povis montri ion novan al ili. Kaj ankaŭ helpi naski Howard ne devis. Naskoj okazis tute glate sen komplikaĵoj.

La famo de Howard kreskis ĉiutage, kaj se li estus havinta pli da senco kaj pli da ŝato por la vivado kun naturaj homoj, li estus povinta pasigi tie sian vivon pace kaj beate. Sed li ja ĉiutage pensis pri sia ekveturo. Diversaj pensoj venis en lian kapon koncerne la du kunlaborantojn, ĉu ili vere laŭorde transdonos lian havaĵon kaj ĉu ili sekure atingos la trajnstacion. Li konsoliĝis per tio, ke li momente povas fari nenion, kaj ke li devas fidi la lertecon kaj honestecon de ambaŭ.

Jen iumatene rajdis indiĝeno en la vilaĝon kaj serĉis la domon, kie loĝas la granda kuracisto. Li parolis unue kun la gastiganto mem kaj poste ambaŭ iris renkonte al Howard.

La gastiganto diris: „Sinjoro, jen viro el transflanka vilaĝo de la montaro. Li devas rakonti historion al vi.“

La indiĝeno sidiĝis, rulumis cigaredon, bruligis ĝin kaj tiam ekparolis: „Lazaro estis en la vepro kaj karbigis lignon. Li estas karbisto. Estis frue matene. Li ĵus metis lignon sur la stakon. Tiomomente li vidis rampi ion sur la tero. Kaj kiam li rigardis pli proksime, li rimarkis, ke la rampinto estas blankulo. Li estis plena de sango kaj ne povis moviĝi plu. Lazaro donis trinkaĵon al li. Tiam li lasis sian lignostakon sola, pakis la blankan malsanan viron sur sian azenon kaj kondukis lin en la domon de sia vilaĝo. Metite sur maton en

la domo, la viro estis jam morta. Sed venis alia viro, kiu rigardis la blankulon kaj diris: 'Li ne estas tute morta. Li estas nur tre malsana aŭ tre malforta. Tial Filomeno devos rajdi transen al la blanka miraklokuracisto, ĉar Filomeno havas ĉevalon, kaj ĉar azeno ne kuras tiel rapide. Mi estas tiu Filomeno, sinjoro, kaj mi havas rapidan kaj bonan ĉevalon. Mi estas nun ĉi tie. Vi certe povos helpi al la malsana blanka viro, se vi kunvenos tuj.'

„Nu, kiel aspektas la blanka viro?“ demandis Howard.

Filomeno povis priskribi lin tiel detale, kvazaŭ li starus apud li. Kaj Howard ekkonis, ke li estas Kurtin.

Li tuj pretigis sin por foriri. Lia gastiganto kaj ankaŭ tri aliaj indiĝenoj akompanis lin.

Estis longa streĉa rajdado. Sed kiam la viroj alvenis tien, Kurtin jam iom ripozis, kaj ŝajne ne plu estis en danĝero. Al la homoj en la vilaĝo Kurtin rakontis per kelkaj vortoj, ke survoje li estis vundita per pafo. Sed, ke li ne scias de kiu. Li volis eviti, ke oni persekutu Dobbson, ĉar alie ĉio estus perdita.

„Tiu malinda kanajlo fridasange pafis sur min“, diris Kurtin al Howard, „ĉar mi rifuzis disdividi kun li vian havaĵon. Li ludis unue la trukon devi defendi sin pro urĝa bezono. Sed mi sciis tuj, kion li celas. Mi ja fakte povis konsenti pri la disdivido, kaj se ni estus alvenintaj en la urbon, la afero reordigeblus de mi. Sed vi eble estus estinta pli frue ĉe ni ol mi atendis, kaj tiukaze vi supozus, ke mi intencis trompi vin.

Vi certe ne akceptus, ke mi konsentis pri la disdivido nur pro ŝajno. Li pafis kuglon en mian maldekstran flankon kaj lasis kuŝi min en la vepro, por ke mi tie mortaĉu. Sed nun mi havas eĉ du pafvundojn, kvankam mi povas rememori nur pri unu pafado. Mi preskaŭ pensas, ke tiu fripono pli malfrue, kiam mi jam kuŝis senkonscia, revenis kaj pafis duan kuglon en min. Por esti tute certa pri sia fajna laboro. Malfrue en la nokto mi rekonsciiĝis kaj ŝanceliĝante moviĝis kaj rampis tiel rapide for de la loko, kiel eblis. Mi pensis, ke li certe revenos matene ankoraŭ plian fojon, antaŭ ol li marŝos plu, kaj se li vidos, ke mi ankoraŭ spiras, li pafmortigos min definitive. Mi tiam renkontis indiĝenon, kiu karbigis lignon en la vepro. Unue li forkuris, ĉar li timis min. Sed kiam mi parolis al li kaj diris, ke mi nepre bezonas helpo, li tuj helpis al mi kaj kondukis min ĉi tien. Sen lia subteno mi certe estus morta, ĉar mi ne plu povis rampi, ĉar neniu homo tie trovus min.“

„Jen la ulo do fuĝis kun ĉio?“ demandis Howard.

„Sendube.“

La oldulo pripensis la aferon dum certa tempo. Poste li diris: „Mi pensas, ke laŭkaraktere li estas certe honesta ulo. La eraro estis, ke li foriris sola kun vi. Estas damne aĉa tento vagadi dum tagoj kun multe da oro tra tiu soleca vepro kaj kun nur unu viro ĉe la flanko, sur flankaj padoj kaj sekretaj vojoj. La vepro logas kaj logas kaj krias kaj flustras seninterrompe: 'Mi elbabilos nenion, kaptu la okazon, estas okazo, kiu revenos neniam, mi estas pli silentema ol tomb-oj.' Se mi estus juna kiel vi, mi ne scias, ĉu mi rezistus dum

multaj tagoj al tia damna tento. Estas ja nur sekundo, ununura sekundo, pri kiu temas. Kaj kalkulu foje mem, kiom da sekundoj havas tago kun dudek kvar horoj. Unu sekundo, en kiu la principoj fulmrapide tranŝoviĝas, kaj antaŭ ol la principoj en la sekva sekundo denove reiras en la malnovan relon, oni jam ellasis liberige la ĉanon. Poste oni ne plu povas ŝanĝi tion kaj devas fari la laboron tute.“

„La fripono ne havas konsciencan, jen ĉio“, diris Kurtin.

„Li havas tiom multe kaj malmulte da konscienco kiel ni ĉiuj, se li pensas, ke li devas uzi la kubutojn por grimpi supren. Kie ne atendeblas akuzanto, tie ĝi silentas kiel malplena brandobotelo, kiu kuŝas en polvokovrita anguleto. La konscienciproĉoj fariĝas vivantaj nur, se ili estas subtenataj. Por tio ekzistas ja pundomoj, ekzekutistoj kaj inferaj punoj. Ĉu havis niaj municiaj liverantoj konscienc-riproĉojn, kiuj faris sian profiton per tio, ke ili helpis al eŭropaj popoloj buĉi sin reciproke? Ĉu nia *Mr. Wilson* havis konscienciproĉojn, kiam li lasis murdi kvindek milojn el niaj soldatoj, ĉar *Wallstreet* timis perdi sian monon kaj la municiaj fabrikistoj volis fari ankoraŭ pli bonajn negocojn? Mi neniam aŭdis ion pri tio. Ĉiam nur ni, la etpafuloj, devas havi konscienciproĉojn, aliaj bezonas neniujn. Nun en la amiko Dobbs certe viviĝos la konscienciproĉoj, kiam li ekscios, ke li faris rilate al vi nur duonon de la laboro. Ne, karulo mia, lasu min tute el la ludo, se temas pri la konscienc-riproĉoj. Mi ne fidus tion. Ni devos okupiĝi nun nur pri tio, kiel ni povos rekapti la predon de la ulo.“

Por ankoraŭ atingi Dobbson Howard volis tuj rajdi al Durango. Aŭ almenaŭ atingi lin en Tampiko, antaŭ ol li malaperos el la lando. Al Kurtin li diris, ke li restadu en la vilaĝo por plia flegado, kaj ke li poste sekvu.

Kiam Howard klarigis al sia gastiganto, ke li devos okupiĝi nunun pri sia propraĵo, ĉar Kurtin kuŝas tie malsana, ili konsentis lin pri tio, ke li devos ekvojaĝi, kvankam ne facilis al ili lasi foriri lin tiel frue.

Je la sekva mateno Howard estis preta iri al Durango. Sed la indiĝenaj amikoj ne volis lasi lin iri sola. Ili volis akompani lin, por ke li sekure alvenu en la urbon. Kaj por ke ne trafu lin simila sorto, kiel lian kunulon Kurtin, tial ili ĉiuj rajdis kun li.

Ili ĵus venis ĝis la sekva vilaĝo, kiam ili renkontis la indiĝenojn kun la alkaldo kiel gvidanto, kiuj survojis por konduki la azenojn kun la pakaĵoj al Howard.

„Kie estas via sinjoro Dobbs, la usonano, kiu havis la taskon akompani tiun azenaron ĝis Durango?“ demandis Howard, kiam li turnis sin kaj ne povis trovi Dobbson.

„Li estis mortbatita“, diris la alkaldo trankvile.

„Mortbatita, ĉu? De kiu?“ diris Howard tute mekanike.

„Fare de tri vojembuskuloj, kiuj hieraŭ estis kaptitaj de la soldatoj.“

Howard rigardis al la pakaĵoj, kaj ili ŝajnis al li strange malvastaj. Li saltis tien kaj malfermis pakaĵon el siaj propraj. La feloj ĉiuj enestis, sed la saketoj estis for. „Ni devos persekuti kaj atingi la vojourabistojn“, li vokis, „mi devos ilin pridemandi pri certa afero.“

Liaj akompanantoj signalis sian pretecon. Oni lasis konduki la azenaron en la vilaĝon, kie kuŝas Kurtin. La ceteraj viroj sur rektaj padoj postrajdis la soldatojn.

La soldatoj ne tre rapidis por antaŭeniĝi. Dum tiaj patrolaj rajdoj ĉiam estas vizitataj ankaŭ la lokoj troviĝantaj distrite ĉe la ĉefa vojo, por ekscii, kio okazas, kaj por montri al la pacaj enloĝantoj, ke la registaro ne forgesis ilin kaj protektadas ilin. La kunkondukataj kaptitoj eĉ pli profundigis la impreson ĉe la indiĝena kampara loĝantaro, ke ili povas trankvile okupiĝi pri sia laboro, kaj ke la registaro observas, ĉu ĉio laŭordas kaj, ke ĝi persekutas la spurojn de la banditoj kaj vojourabistoj. La banditoj, kaj tiuj, kiuj ĝuste havas en la senco foje provi tiun negocon, pro la kaptitoj, kies sorto jam antaŭe estas sufiĉe konata, imprese estas instruataj pri tio, ke havas ankaŭ sian ombran flankon provi la feliĉon kiel vojourabisto. Tiaj avertoj estas pli efikaj ol raportoj en la gazetoj, kiuj ne atingas tiun regionon, kaj se ili tamen atingas ĝin, ili ne povas esti legataj.

Je la sekva tago la soldatoj estis jam atingitaj. La alkaldo prezentis Howardon al la oficiro kiel la laŭrajtan posedanton de la azenoj kaj pakaĵoj, kaj Howard ricevis senprobleme la permeson pridemandi la banditojn. Kiel ili mortigis

Dobbson, tio ne interesis lin. La alkaldo jam sufiĉe detale rakontis tion al li. Li volis scii nur, kie estas la saketoj.

„La saketoj“, demandis Miguel. „Ha jes, tiuj ĉi saketoj, tiujn ni ĉiuj elŝutis. Nur sablo enestis, por doni pli da balasto al la feloj.“

„Kie vi elŝutis la saketojn?“ demandis Howard.

Miguel ridis: „Kiel mi sciu tion? Ie en la vepro. Jen saketo tie, kaj jen plia pli malproksime. Estis tenebre. Ni tiam nokte marŝis plu por foriĝi. Ni ne najlis krucon tie, kie ni elŝutis la saketojn. Sablo ĉie ekzistas. Vi devas nur kliniĝi. Kaj se vi ĝuste volus serĉi la sablon, kiun vi eble havis kiel provmaterialon, tiukaze mi ne pensas, ke vi ankoraŭ trovos sableron. En la antaŭlasta nokto estis terura ŝtormo. Tiu forblovis ĉion. Se mi scius precize kie estis, kie ni elŝutis la saketojn, mi volonte volus diri tion al vi por saketo da tabako, sed mi ne scias, kaj tial mi ne povas postuli la tabakon.“

Howard ne sciis, kion diri. Ĉion, kion li povis esprimi aŭ fari estis nur komenci ridadon tian, ke la ceteraj viroj kaj ankaŭ la soldatoj devis kunridi, kvankam ili ne sciis, pri kio temas. Sed la ridado sonis tiel natura, ke neniu povis defendi sin kontraŭ ties efiko.

Howard ĵetis al la veprorabistoj saketon da tabako, dankis al la oficiro, adiaŭis sin de li kaj tiam li retrorajdis kun siaj amikoj.

„*Well, my boy*“, diris Howard, dum li sidiĝis sur la randon de la ripozejo, kie Kurtin kuŝis. „La oro iris tien, de kie ĝi venis. Tiuj grandiozaj friponoj supozis ĝin sablo, per kiu ni laŭ ili intencis trompi la felokomercistojn en la urbo dum la pesado de la feloj. Kaj tiuj ŝafidoj la tutan sablon elŝutis. Kie, tion ili ne plu scias, ĉar estis malhele. Kaj krome la uragano en la antaŭlasta nokto zorgis pri la cetera. Por tabaksaketo nun havigeblis la tuta orotrezoro, pro kiu ni sklavlaboris dek monatojn.“

Kaj li komencis tiel forte ridi, ke li devis kurbiĝi, ĉar lia ventro ekdoloris.

„Ke vi tiukaze povas ridi, tio estas al mi tute nekomprenebla“, diris Kurtin preskaŭ kolere.

„Tion mi ne komprenas“, diris Howard, nun eĉ pli kaj pli ridante. „Se vi ĉi tie ne povas ridi ĝis vi krevos, tiukaze vi ne scias, kio estas bona ŝerco, kaj tiukaze mi devus bedaŭri vin. Tiu ŝerco valoras dek monatojn da laboro.“

Kaj li ridis tiel, ke la larmoj ruliĝis trans liajn vangojn.

„El mi ili faris miraklokuraciston“, kvazaŭ blekis la oldulo ridante, „mi povas elmontri pli da sukcesaj kuracadoj kaj por pli malmulte da medicino ol la plej kapabla kuracisto en Ĉikago. Vin oni dufoje pafmortigis kaj vi vivas ankoraŭ nun, kaj la kara Dobbs perdis sian kapon tiel komplete, ke li eĉ ne plu povus serĉi ĝin mem. Kaj ĉio ĉi por oro, kiu apartenas al ni, kaj pri kiu neniuj scias, kie ĝi troviĝas, kaj kiu estas pli

malmultekosta ol saketo da tabako por tridek kvin centavoj.“

Nun fine ankaŭ Kurtin ekridis, kaj li ĝuste volis simile tiel forte ekkrii kiel la oldulo jam faris la tutan tempon, sed Howard tenis la tutan tempon manon sur lia buŝo: „Ne tiom laŭte, olda knabo, aliokaze krevus viaj pulmoj. Kaj tiujn vi devos konservi, ĉar alie ni ne venus ĝis Tampiko. Trajnon ni certe ne povos uzi. Ni devos rerajdi sur azenoj, kaj tiujn, kiujn ni ne bezonas por la rajdado, tiujn ni devos vendi, por ke ni havu almenaŭ tortiljojn kaj *frijoles* kiel manĝon, ni, la dolarmilionuloj.“

„Kion ni nun do komencu?“ demandis Kurtin post certa tempo.

„Mi jam pripensis, ĉu mi ĉi tie daŭre setlu kiel ŝamano. Ni povos kune fari la negocon. Sola mi neniukaze povus fari tion, mi bezonas asistanton, kaj mi heredigos al vi ĉiujn miajn receptojn. Ili estas efikaj, tion mi promesas al vi.“

Kiam Howard komencis traserĉi ĉiujn pakaĵojn unuope, li trovis unu pakaĵon, el kiu la saketoj ne estis elŝutitaj. Aŭ ili estis pretervidataj aŭ tiu el la vojarabistoj, kiu alpropriigis tiujn pakaĵojn, estis tro pigra malfermŝnuri ĉiujn pakaĵojn, ĉar li pensis lasi tion por pli posta tempo, kiam ili ne devos tiom rapidi por foriĝi.

„Tio estos ĝuste sufiĉe por – por kio?“ demandis Howard.

„Tio rilate la kinejon do ne realigeblus, ĉu?“ demandis Kurtin.

„Por tio ĝi ne sufiĉus. Sed mi pensas, ke eble sufiĉos por tute eta frandaĵo- kaj ladskatolomagazeno, ĉu?“

„Kie? Ĉu en Tampiko?“ Kurtin rektigis sin sidante.

„Kompreneble. Do, kie pensis vi?“ respondis Howard.

„Sed en la lasta monato, kiam ni estis en Tampiko, kvar grandaj luksonutraĵaj vendejoj bankrotiĝis dum ses semajnoj.“ Kurtin trovis grava memori pri tio la oldulon.

„Tio estas ĝusta“, diris Howard. „Sed tio estis antaŭ dek du monatoj. Tio nun eble ŝanĝiĝis. Oni devas ja iom fidi pri sia feliĉo.“

Kurtin pripensis tion dum momento kaj diris poste: „Eble via unua propono estas la pli bona. Ni provu ĝin por la unua fojo certan tempon kun la medicina negoco, tiukaze certos almenaŭ la manĝo kaj la loĝejo. Ĉu tio estos certa pri la frandaĵoj mi ankoraŭ ne scias konkrete.“

„Sed, ulo, jen vi ja sidus ĉe la fonto. Tiukaze vi devus nur preni la ladskatolan malfermilon kaj malfermi ladskatolon aŭ ankaŭ du, se plaĉos al vi.“

„Bone kaj bele. Sed diru ankoraŭ al mi, kion vi manĝos, kiam ili venos kaj sigelos la luksnutraĵan magazinon. Tiam vi ja ne plu povos meti manon al la ladskatoloj.“

„Pri tio mi ne pensis“, diris Howard malĝojigite. „Tio estas ĝusta, tiam ni ne plu povos preni la ladskatolojn, kaj la plej bela skatola malfermilo tiam senvalorus. Ankaŭ mi pensas,

ke eble estos pli bone provizore lasi la frandaĵojn por si mem kaj prefere okupi pri la medicinfako. Krome tio estas tre honorinda profesio. Komercisto por frandaĵoj povas fine fariĝi ĉiu ŝtipkapulo, sed ŝamano tute ne. Por tio oni devas esti naskita. Kaj tion mi rajtas pri mi aserti plenrajte kaj kun deco. Venu nur unue transen al mia vilaĝo, tie vi vidos kaj lernos tion kaj tion. La ĉapelon vi detiros antaŭ mi, knabo mia, se vi vidos, kia honorinda persono mi tie estas. Ili volis fari el mi antaŭ kelkaj tagoj leĝdonan korporacion. Sed kion ili imagas pri tio, tion mi tamen ne povis ekscii.“ En tiu momento envenis lia gastiganto.

„Sinjoro“, li diris. „Ni nun devos ekrajdi. Ĝuste alrajdis viro, kiu diras, ke en la vilaĝo estas tiom da homoj, kiuj volas vidi la kuraciston, ke ili ektimas tie en la vilaĝo. Tial ni tuj devos ekrajdi.“

„Jen vi ja jam aŭdas“, turnis sin Howard al Kurtin, kiam li salutmane adiaŭis de li.

Kurtin ridis kaj diris: „Mi pensas, ke mi povos veni post tri tagoj por vidi la miraklokuraciston.“

Howard ne havis tempon respondi. La indiĝenoj apogis lin sub la brakoj, portis lin eksteren kaj levis lin sur la ĉevalon.

Poste ili forrajdis kun li.

FINO

GLOSARO

beachcombers = senlaboruloj, kiuj rastas la plaĝon por io uz-
ebla

cantina = kantino

carretero = ĉaristo

cementerio = Friedhof

compañeros = kunuloj, akompanantoj, kamaradoj

company = kompanio

directamente = rekte

don = sinjoro

fonda = gastejo kun manĝejo

frijoles = fazeoloj

gringo = fi-usonano, usonanaĉo, sed ankaŭ simple usonano

habanero = kubana danco

jingo = en tiu ĉi libro ĝi ne estas iu birdo, sed ĝi aludas agresivan hurapatriotan ŝoviniston

mestizo = miksitulo kun indiĝenaj kaj blankaj gepatroj

peso = monunuo en Meksiko

petate = petato, specifa tipo de mato, plektaĵo el palmfolioj

señor = sinjoro

señora = sinjorino

sierra = montaro, montĉeno

tienda = vendejo, butikoj

